

La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj



Finalistaj noveloj de la dua eldono
de la Interkultura Novelo-Konkurso

LA LASTA VOJAĜO DE CEZARO
KAJ ALIAJ NOKTAJ AVENTUROJ



La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj

*Finalistaj noveloj de la dua eldono
de la Interkultura Novelo-Konkurso*

Eldonejo: KAVA-PECH
Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice
www.kava-pech.cz/esperanto

© Les Éditions KAVA-PECH, 2023

ISBN 978-80-88326-30-4

Paola Cereda vi dà il benvenuto!

L'edizione 2022 del concorso letterario “INK” è giunta finalmente al suo momento pubblico e condiviso, con la presente raccolta di racconti sul tema del viaggio notturno.

I miei complimenti e i miei ringraziamenti vanno a voi, autori e autrici di diverse parti del mondo, che ci avete permesso di entrare nella vostra notte, svelandoci le sue tante sfaccettature. La notte è uno spazio intimo abitato da sogni e paure, è un luogo di misteri, spostamenti e incontri, è una dimensione fisica e spirituale dove tutto può accadere. Grazie a chi ha scritto nella propria lingua o direttamente in esperanto.

Grazie a François Bolduc e a Manuela Ronco per l'invito a presiedere in maniera onoraria questa edizione del concorso e, infine, a tutta l'Akademio Literatura de Esperanto per il costante impegno nel tessere legami internazionali affinché l'esperanto sia e continui a essere un ponte culturale per la comprensione reciproca e, quindi, per la pace di cui abbiamo più che mai bisogno.

*Paola Cereda,
la presidente onoraria della seconda edizione del Concorso Interculturale
di Novelle*

Paola Cereda bonvenigas vin!

La 2022-a eldono de la literatura konkurso “INK” finfine atingis sian publikan kaj komunan momenton, kun ĉi tiu kolekto de rakontoj pri la temo de nokta vojaĝo.

Miaj komplimentoj kaj dankoj iras al vi, aŭtoroj kaj aŭtorinoj el diversaj partoj de la mondo, kiuj permesis al ni eniri vian nokton, malkaŝante al ni ĝiajn multajn aspektojn. La nokto estas intima spaco loĝata de revoj kaj timoj, ĝi estas loko de misteroj, moviĝoj kaj renkontoj; ĝi estas fizika kaj spirita dimensio, kie ĉio povas okazi. Dankon al tiuj, kiuj verkis en sia propra lingvo aŭ rekte en Esperanto.

Dankon al François Bolduc kaj al Manuela Ronco pro la invito honore prezidi ĉi tiun eldonon de la konkurso kaj, fine, al la tuta Akademio Literatura de Esperanto pro ilia konstanta engaĝiĝo al teksado de internaciaj ligoj por ke Esperanto daŭre estu kultura ponto por interkompreniĝo kaj, do, por la paco, kiun ni bezonas pli ol iam ajn.

Paola Cereda,

la honora prezidanto de la dua eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso

Nicola Ruggiero salutas vin!

Akademio Literatura de Esperanto (ALE) daŭrigas la laboron de Esperantlingva Verkista Asocio: inter ĝiaj celoj ALE volas aktive stimuli kaj pli altniveligi la Esperantlingvan verkadon kaj agnoski la Esperantan literaturon en kaj ekster la Esperanto-komunumo.

Krome, ALE volas stimuli novajn talentojn per internaciaj konkursoj, kiel ĝuste temas pri Interkultura Novelo-Konkurso (INK), en kies dua eldono homoj engaĝas sin ne nur en la Esperantlingvan sed ankaŭ en nacilingvajn literaturojn.

Estas verŝajne nekredebla – pro forto, elano kaj bezono – la rilato de la homoj kun la vortoj kaj sekve kun ties interteksado kaj fina celo: rakonti. Por tiu celo certe eblas speguli sin kaj do komenci la rakontadon per propra biografiero, sed oni atingus apenaŭ kreaĵon. Ne forgesu, ke Narciso spegulis sin kaj tiel enamiĝis al si, ke li fine dronis. Prefere, oni spegulu sin kiel Alico kiu tra la spegulo atingis tute novan mondon, tute aliajn perspektivojn per distanciĝo kaj sekve per digno. Ĉio ĉi vivigas la vortojn en rakontojn.

Ĉu la aŭtoroj kiuj partoprenis en tiu ĉi konkurso sukcesis vivigi la vortojn? Tion nur la legantoj, la veraj regantoj de la Suverena Respubliko de Literaturo, povos aserti. Dume, nia komunumo dankas ilin pro la strebo – neniel banala – kaj ni dankas ankaŭ la organizantojn de tiu ĉi konkurso kaj ĉiun kunlaboranton kaj subtenanton pro la granda streĉo: ilia laboro brile permesis okazigi ĉi tiun konkurson.

*Nicola Ruggiero,
la prezidanto de la Akademio Literatura de Esperanto*

François Bolduc invitas vin!

La Interkultura Novelo-Konkurso estas literatura konkurso malfermita al ĉiuj, senrigarde de nacieco, religio aŭ deveno. Same pri lingvo: oni povas partopreni verkante en sia lingvo kaj sendi sian verkon kiel tradukaĵon en la akceptataj lingvoj. Por la dua eldono, tiuj estis Esperanto, la itala, la rusa kaj la ukraina.

La itala lingvo estis aldonita pro la okazado en 2023 de la Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio en Torino. Ambaŭ la ukraina kaj rusa lingvoj estis aldonitaj pro la rusa invado de Ukrainio, por ke kiu volas, povu esprimi sin en novelo, laŭ la temo de nokta vojaĝo.

En 2022, INK spertis siajn unuajn politikajn premiojn. Ukraina asocio minacis la organizan skipon je reprezalioj se ĝi ne malpermesos al rusoj kaj ruslingvanoj partopreni la konkurson. La respondo al ĉi tiuj premioj troviĝas en la unua paragrafo.

Vi tenas enmane unu el la malmultegaj artaĵoj kiujn kunkreis ukrainoj kaj rusoj dum la rusa-ukraina milito daŭras. Ni estas konvinkitaj ke ĉi tiu dialogo bezonas ekzisti, kaj ke sendepende de la cirkonstancoj, *fakte ju pli malfacilaj estas la cirkonstancoj*, des pli devas ekzisti iuj spacoj de paco, kie artistoj de la mondo povas libere renkontiĝi.

Partoprenis en la konkurso rusoj kaj ukrainoj, sed ankaŭ iamaj malamikoj kiel francoj, italoj, germanoj, israelanoj, indonezianoj, japanoj, usonanoj, meksikanoj. ktp. Mi bondeziras al vi agrablan legadon kaj, se vi verkemas aŭ inspiras vin la novelaro provi, sciu ke vi ĉiam estos bonvenaj partopreni en estontaj eldonoj de la konkurso.

*François Bolduc,
la ĉefredaktoro*

Krepuska ĉielo

Robert Sieber

Usono

Alte super la tero en la ĉiama krepusko, mi silente vojiris antaŭen tra la ĉielo. Mia surtuto estis firme butonita pro la malvarmo de la aero kaj la nebulo de mia spiraĵo treniĝis malantaŭ mi. Sub miaj pendantaj piedoj mi vidis mallarĝan teran vojon, kiu malaperis en la malproksimo. Unuflanke troviĝis arbaro de senfoliaj arboj, aliflanke senfrukta kampo surkreskata de brunaj kaj rompitaĵaj herbaĉoj.

Dum mi sekvis laŭ la vojo, mi preterpasis super malgranda brika konstruaĵo kun la restaĵo de ligna perono ĉe flanko. Ĝi eble estis antaŭlonge trajna stacidomo, sed mi ne vidis relojn aŭ spuron, kie relo povus estinti. La fenestroj estis disrompigitaĵoj kaj la tegmento estis en pecojn disfalinta. Mi longe studis la vidon ĝis ĝi pasis ekster mia vidkampo malantaŭ mi.

Kiam mi denove rigardis supren, mi vidis strangan vidaĵon antaŭ mi: dekoj da homoj en la aero, sole, duope, grupe, kelkaj senmove ŝvebantaj, aliaj sencele drivantaj, pli alte, malpli alte, frontantaj ĉiudirekten. Mi proksimiĝis. Kelkaj gapis senpense, kun larĝaj okuloj kaj buŝoj, dum aliaj rigardis la suban senvivan teron. Neniu parolis.

Paro da viroj rigardis min alproksimiĝi. La maldekstra, plej proksima al mi, atentigis min per urĝa pledanta esprimo. Sur lia vizaĝo vidiĝis ŝoko, konfuzo, kaj la espero ke mi, kiel ŝajna ĉi-tiea apartenanto, povus disponigi konsolantan klarigon. Mi malrapidiĝis kaj haltis antaŭ li, kaj li balbutis al mi, ne sciante kie komenci. “Ni ĉiuj estis en aviadilo”, li diris kun kapjesanta kunvojaĝanto apude, “kaj ni ne scias, kiel ni alvenis ĉi tien.”

Mi ridetis milde kaj rigardis lin iom kompreneme kaj kompateme, sed ne sufiĉe por kuraĝigi lin paroli plu. Mi ne respondis al li – li finfine ne faris al mi demandon – kaj rekomencis antaŭeniri. “Kompatindaj animoj”, mi pensis, “ili verŝajne ĵus mortis pro aviadilokraŝo sed tion

ankoraŭ ne scias.” Mi ne sentis devon klarigi tion al ili. Ili ja havis sufiĉan tempon ekkonscii kie ili nun troviĝas, kiel mi antaŭlonge faris, kaj komenci siajn proprajn, silentajn, solecajn, senĉesajn vojaĝojn en la malvarma aero de la ĉiame krepuska ĉielo.



Она шагнула в ночь

Джулия Ливай

Израиль

Она шагнула в ночь. Одна. О, она всегда была достаточно экстравагантной. Вот так уйти с шумного бала, не предупредив никого, ни с кем не попрощавшись? Гордая — она одна могла себе это позволить. Не оглянувшись, не помахав рукой, даже не откинув, кокетливо встряхнув головой, упавшую на лоб белую прядь волос, не поправив приспущенную белоснежную ткань на груди.

Она ушла, никого не попросив проводить, не улыбнувшись тем, кто с восхищением кружил её в вихре танца. А сколько их было, влюблённых, пылких в своей отчаянной молодости и зрелых, опьянённых поздней, быть может последней, страстью. Ах, как танцевала она на том балу! Со всей страстью своей необузданной души, со всем пылом жаркого тела. Не обращая внимания на усталость и стёртые до крови ноги. Под любую музыку — медленную, как жаркий полдень у реки, или быструю, как закат солнца в южных краях, весёлую, как добрая шутка друга, или грустную, как прощальный поцелуй.

Она ушла, не улыбнувшись тем, кто горел ещё воспоминанием о танце с ней, не бросив упрёка забывшим её при первых звуках новой музыки, не проронив ни единой слезы, без сожаления, с ледяным равнодушием в полуприкрытых глазах, оставив за спиной яркие огни и музыку непрекращающегося бала, и суету, и сплетни, и жадную до развлечений толпу.

Она шагнула в ночь, унося с собой целый мир. Короткие тревожные гудки разорвали тишину палаты. Седая прядь оголила, наконец, лоб упавшей на бок головы, худая морщинистая грудь застыла под спущенным воротом большой, не по размеру, белой больничной сорочки, а по экрану монитора побежала сплошная прямая линия.

Ŝi paŝis en la nokton

Julia Levi

Israelo

Ŝi paŝis en la nokton. Sola. Ho, ŝi ĉiam estis sufiĉe ekstravaganca. Ĉu foriri tiel de plenapogea balo sen averti iun, sen adiaŭi iun? Fiera. Nur ŝi povis permesi al si tion. Sen rigardi malantaŭen, sen saluti, eĉ ne skui la kapon, sur blanka tufo kiu falis sur ŝian frunton, sen alĝustigi la lozan neĝblankan ŝtofon sur sia brusto.

Ŝi foriris sen peti iun ajn akompani ŝin, sen rideti al tiuj, kiuj turnigadis ŝin kun admiro en kirlado de danco. Kaj kiom da ili estis, enamiĝintaj, ardaĵ en ilia senespera juneco, kaj maturaj, ebriaj pro malfrua, eble lasta pasio. Ho, kiel ŝi dancis en tiu balo! Kun la tuta pasio de ŝia senbrida animo, kun la tuta ardo de varma korpo. Ignorante lacecon kaj ĝissange frotvunditajn piedojn. Laŭ ajna muziko – malrapida, kiel kiel varma posttagmezo ĉe la rivero, aŭ rapida, kiel sunsubiro en la sudaj regionoj, ĝoja, kiel bona ŝerco de amiko, aŭ malĝoja, kiel adiaŭa kiso.

Ŝi foriris sen rideti al tiuj, kiuj ankoraŭ brulis pro la memoro pri la danco kun ŝi, sen ĵeti riproĉon al tiuj, kiuj forgesis ŝin ĉe la unuaj notoj de nova muziko, sen verŝi eĉ unu larmon, sen bedaŭro, kun glaciacia indiferenteco en duonfermitaj okuloj, postlasante brilajn lumojn kaj muzikon de senĉesa balo, kaj tumulton, kaj klaĉojn, kaj amuz-avidan homamason.

Ŝi paŝis en la nokton, kunportante la tutan mondon. Mallongaj anksiaj zumoj rompis la silenton de la hospitala sekcio. Griza tufo finfine nudigis la frunton de ŝia kapo flankenfalinta. La maldika kaj sulka brusto senmoviĝis sub la mallecita kolumo de granda, tro granda blanka hospitala bluzo. Trans la monitora ekrano, kuris seninterrompa rekta linio.

Пізня ніч

Оксана Василькова

Україна

Хлопчик відкрив очі, вдома було темно, як завжди. Відчувалась волога і солодкий присмак на губах. Він перевернувся на іншу сторону і опинився в другому кінці кімнати. Остання нагадувала спальний мішок: тепла, затишна, але дуже тісна. І чим більше виростав хлопчик, тим тіснішою ставала кімната. Проводячи там весь свій час, він вивчив кожну деталь й іноді така нудьга витала в повітрі, що він не витримував: бився руками і ногами об стіни і, зрештою, обезсилений засинав.

Ніч огортала пледом спокою і ніжно заколисувала. Та дитині не спалось: він побачив приглушене рожеве світло в щілині дверей: ніби хтось одягнув на ліхтарик клаптик тканини і бавиться. Цікавість розбурхувала уяву і приковувала погляд хлопця до грайливого сяйва. Несподівано він відчув в собі шалену силу, яка невпинно розтікалася по тілу і наближала до виходу. Помірним зусиллям двері відкрилися, але недостатньо. Він штовхнув сильніше. Потім ще. І знову. Кожен рух давався важче, але робив прохід просторішим, а світло яскравішим.

Коли вихід був майже відкритий, а хлопчик втомлений, він помітив, що виріс настільки великим, що заледве міг просунути голову в проріз дверей, а промені світла так разили очі, що іноді це було нестерпним. Його опанував страх. Він був сповнений сумнівів, у скронях пульсувала кров.

Він думав про те, що ніколи не бачив такого яскравого світла. Ніколи не покидав тиху кімнату. Але це його шанс. Шанс щось змінити. Відкрити для себе нове. Перейти на новий рівень.

Раптом крізь думки почувся голос: Ти зможеш! Я знаю, ти зможеш! І хлопчик зрозумів: або зараз або ніколи. Він востаннє штовхнув двері. І народився.

Noktofino

Oksana Vasilkova

Ukrainio

La knabo malfermis la okulojn. La domo estis malluma, kiel kutime. Oni povis senti humidecon kaj dolĉan guston sur la lipoj. Li turnis sin al la alia flanko kaj trovis sin ĉe la alia ekstremo de la ĉambro. Ĉi lasta similis al dormosako: varma, komforta, sed tre mallarĝa. Kaj ju pli la knabo kreskis, des pli malvastiĝis la ĉambro. Pasiginte tie la tutan tempon, li studis ĉiun detalon kaj foje en la aero ŝvebis tia enuo, kiun li ne plu povis elteni: frapis per manoj kaj piedoj kontraŭ la muroj por fine endormiĝi elĉerpita.

La nokto envolvis kovrilon de paco kaj milde lulis lin al dormo. Sed la infano ne povis dormi: li ekvidis obtuzan rozkoloran lumon tra la fendo de la pordo: kvazaŭ iu estus metinta pecon da ŝtofo sur la lanternon por amuziĝi. Scivolemo ekscitis la imagon kaj allogis la rigardon de la knabo al la ludema brilo. Neatendite, li sentis en li frenezan forton, kiu senĉese disvastiĝis tra lia korpo kaj alproksimigis lin al la elirejo. La pordo malfermiĝis per modera peno, sed ne sufiĉe. Li puŝis pli forte. Poste denove. Kaj denove. Ĉiu movo estis pli malfacila, sed igis la trairejon pli larĝa kaj la lumon pli hela.

Kiam la elirpordo estis preskaŭ malfermita kaj la knabo lacigita, li rimarkis, ke li tiel grandiĝis, ke li apenaŭ povis meti la kapon tra la porda fendeto. La lumradioj tiel blindigis liajn okulojn, ke foje tio estis preskaŭ neeltenebla. Lin subpremis timo. Liaj tempioj pleniĝis de sango, de duboj.

Li pensis, ke li neniam vidis tiom brilan lumon. Neniam antaŭe li forlasis la kvietan ĉambron. Sed ĉi tio estis lia ŝanco. Ŝanco ŝanĝi ion. Malkovri ion novan por si mem. Transiri al nova nivelo.

Subite aŭdiĝis voĉo tra la pensoj: Vi povas! Mi scias, ke vi povas! Kaj la knabo komprenis: nun aŭ neniam. Li puŝis la pordon lastan fojon. Kaj naskiĝis.

Mani

Laura Esposito

Italia

Entrarono nell'auto e tacquero chiudendo gli sportelli; sospeso tra loro quel momento di tensione carica di aspettative che precede un contatto a lungo cercato, una vaga promessa di intimità.

La serata era stata insolitamente piacevole e brillante, nonostante la compagnia banale e ordinaria.

Aveva incrociato quello sguardo affabile e ammirato come se non si fossero mai guardati veramente prima.

All'offerta di un passaggio a casa non aveva saputo dire no, aspettandosi un approccio o un invito che, tuttavia, adesso esitavano ad arrivare.

Restavano lì seduti a guardarsi le mani e inumidirsi le labbra, i pensieri su lenzuola sfatte e schiene inarcate, piccoli tonfi impercettibili del cuore.

“Allora ti riaccompagno a casa.”

La delusione prese la forma di un vuoto allo stomaco. Si costrinse a sorridere con cortesia mentre diceva: “Grazie, domani ho una giornata piena.”

Le vie note si susseguivano ai lati dei suoi occhi che non guardavano. Allungò le dita verso la mano che stringeva il cambio.

La vettura accostò e fece inversione di marcia. Un lungo dialogo silenzioso riempì l'aria di attesa e leggero desiderio.

I due non si voltarono, lo sguardo indifferente fisso in avanti, ma le loro mani iniziarono a conversare in punta di dita con discrezione, argomentando talvolta sui polsi, dove la fatica del fare diventa vulnerabilità.

Il cortile era buio e freddo. L'auto scricchiolò allegramente sulla ghiaia e quando a farlo furono passi veloci, sembrò che le stelle fossero appena arrivate lì a raccolta, basse e vicine, per raccontare ancora una volta quel nuovo mistero antico.

La porta si aprì su un atrio scuro e caldo, con sagome vaghe di vita e necessità. Alle mani interessò veramente poco, si fecero ardite e percorsero i sentieri della pelle ai confini dei capelli, le curve pericolose delle labbra, che hanno angoli vertiginosi.

Si presero la libertà di scoprire corpi pallidi e svelare la loro precarietà all'altro, così quando finalmente furono anch'esse esauste per tutto questo correre e affannarsi, si intrecciarono in un lungo abbraccio sonnolento.

Si alzò e andò alla finestra dove la campagna di ghiaccio brillava immobile. Quando appoggiò la mano sul vetro freddo, lasciò un'impronta di calore e condensa, che evaporò velocemente appena il contatto finì.

Poi tornò sotto le coperte, abbracciò l'altro corpo caldo e il suo cominciò a sciogliersi.

Quando arrivò l'alba era sparito del tutto. Restavano solo vaghe tracce di polpastrelli sul vetro di una finestra esposta a est.



Manoj

Laura Esposito

Italio

Ili eniris la aŭton kaj silentis, ferminte la pordojn. Inter ili, tiu momento de streĉiĝo plena de atendoj, kiu antaŭas delonge serĉatan kontakton, svagan promeson de intimeco.

La vespero estis nekutime agrabla kaj brila, malgraŭ la banala kaj ordinara akompano.

Estis renkonto kun tiu amika kaj admira rigardo kvazaŭ ili neniam vere rigardis unu la alian antaŭe.

Al la propono veturi hejmen ne eblis diri ne, atendante proksimiĝon aŭ inviton, kiu tamen hezitis alveni.

Ili restis tie sidantaj, rigardante la manojn unu de la alia kaj malsekigante siajn lipojn, pensantaj pri malordigitaj littukoj kaj kurbigitaj dorsoj, malklare aŭdeblaj batetoj de la koro.

“Do, mi akompanos vin hejmen.”

La seniluziiĝo prenis la formon de malplena stomako. Estis devigo ĝentile rideti dirante: “Dankon, mi havos plenŝtopitan tagon morgaŭ.”

Konataj stratoj sekvis unu la alian en nerigardantaj okuloj. Mano etendiĝis al mano, kiu tenis la rapidumstangon.

La aŭto haltis kaj retroiris. Longa silenta dialogo plenigis la aeron per atendo kaj leĝera deziro.

Ambaŭ ne turniĝis, ilia indiferenta rigardo fiksita antaŭen, sed iliaj manoj komencis diskrete interparoli je fingropintoj, foje kverelante je siaj pojnoj, kie la laceco fari fariĝas vundebleco.

La korto estis malluma kaj malvarma. La aŭto kraketis gaje sur la gruzo, kaj kiam rapidaj paŝoj faris same, ŝajnis, ke la steloj ĵus kolektiĝis tie, malaltaj kaj proksimaj, por rakonti denove tiun novan antikvan misteron.

La pordo malfermiĝis al malhela kaj varma halo, kun svagaj konturoj de vivo kaj neceso. La nezorgemaj manoj fariĝis aŭdacaj kaj vojaĝis

laŭ la vojoj de la haŭto ĝis la randoj de la hararo, la danĝeraj kurboj de la lipoj, kiuj havas vertiĝajn angulojn.

Ili prenis la liberon malkovri palajn korpojn kaj malkaŝi sian malfortikecon unu al la alia. Do kiam ili finfine elĉerpiĝis pro ĉiu ĉi kurado kaj agitado, ili interplektiĝis en longa dormema brakumo.

Leviĝinte, alproksimiĝo al la fenestro, kie la frostiĝinta kamparo brilis senmove. Kiam la mano tuŝis la malvarman vitron, ĝi lasis spuron de varmo kaj kondensado, kiu rapide vaporigis tuj kiam la kontakto finiĝis.

Sekvis reiro sub la kovrilojn, ĉirkaŭpreno de la alia varma korpo kaj ekfandiĝo de sia.

Kiam tagiĝis, la alia tute estis for. Nur malfortaj spuroj de fingropintoj restis sur la vitro de orientfronta fenestro.



Ne vekigû

Aaron Fingtam

Usono

La tuta mondo estas maro de konfuza mallumo. Miaj nebulecaj pensoj kirligâs ĉirkaŭ mi. Ĉu mi malvarmas? Jes ja. Mi envolvas min pli profunden en la litkovrilon. Atendu. Kiu litkovrilo? Mia pensnubo komencas klariĝi. Ho ve, ĉu mi vekigâs?

Ne! Bonvolu ne! Ne eblas! Ne justas! Mi ĵus ekdormis en tiu ĉi aĉa trajnlito. Kiel pasis la tempo tiel fekrapide? Ankoraŭ ne rajtas esti la horo por vekigi. Mi volas daŭre dormi!

Eterna Dio, mi petegas vin! Bonvolu Alaho, Budho, Zeŭso, se vi ekzistas! Kompatemaj dioj de trajnvojaĝado novaj kaj praaj, mi ĵuras je mia vivaĉo: se mi dormpovas eĉ dek kvin minutojn plu, mi neniam denove plendos pri kara, bela, plenkomforta trajnlito.

Ve!

Jen mia sorto. Mi ja estas veka.

Sed kioma horo estas? Bonvolu, bonvolu, bonvolu ne esti jam la sesa. Eĉ la kvina kaj duono taŭgus. Mi povus redormi duonhoron plu.

Preskaŭ ne eblas la jena tasko: malfermi okulon kaj kontroli la horon. Mi supren tiras mian dormmaskon kaj klopodas malfermeti la dekstran okulon. Mia brakhorloĝo aspektas malklara. Mi fingumas la butonojn. Sed kiu estas la ĝusta? Mi premas la supran dekstran butonon. *Bip!* Sed neniu lumo. Mi premas la malsupran dekstran, kaj la malsupran maldekstran. *Bip! Bip!* Tio probable ekigis la tempmezurilon. Fine mi premas la supran maldekstran butonon. *Bip!* Jen la blindiganta sed sciigonta verda lumo kun la potenco pri vivo kaj morto. Venis la momento de la vero. Mi herkule laboras por fokusi mian vidon je la brilantaj ciferoj. Kioma damna horo estas?

Ho, glora mateno! Estas nur 01:17! La abomena vekighoro ankoraŭ restas kvin horojn for. Mi povas spiri trankvile. Mi eskapis el la subtera

karcero! Mi evitis neeviteblan morton! Mia spirito kaj animo festas ene de mia koro. La Mio, la Supermio, kaj la Ĝio kune dancas en mia psiko. La vivo belas. Dank' al la universo! Mi povos daŭre dormi!

Mi remetis la dormmaskon sur miajn okulojn, sed ĝi nun ne estas masko. Ĝi iel fariĝis purpura simiido kiu brakumas mian kapon. Kio? Maskoj ne kutime fariĝas mamuletoj.

Ĉu mi ankoraŭ sonĝas? Kaj kies estas tiu ĝenega voĉo?

“Sinjoro. Sinjoro. Bonvolu vekigi. Ni jam estas en Ĉikago. Dankon pro via vojaĝado per *Amtrak*.”

Mille in una

Monia Minnucci

Italia

La guardai: lo zelo nella cura dell'immagine lasciava percepire che durante il corso della sua vita, molto probabilmente, non avesse fatto altro, oltre ad essere bella.

Ero rimasto in silenzio per la metà del tempo del nostro incontro, con un'espressione delusa stampata in viso e la tentazione di fuggire via, mentre lei parlava di cose irrilevanti, futili. Aveva descritto la prossima collezione autunno-inverno, i costosissimi interventi estetici che aveva fatto, i viaggi in Cina, Giappone, Però e, ogni tanto, condivideva le sue amenità con l'analisi di un dettaglio o svelava qualche segreto inconfessabile che l'aveva resa protagonista durante le peripezie della sua articolata esistenza. Io la guardavo e con attenzione scrutavo i colori della sua figura: iridi nocciola, capelli neri, pelle lunare, quasi diafana. Lei sembrava non accorgersi neanche della mia presenza, ma questa non era una novità, non per me. Continuava a parlare, gesticolava ed impigliava spesso il suo sguardo negli specchi della saletta fumatori del locale. Avevo sovente tentato di catturare la sua attenzione in più modi: mettendomi di fronte a lei, spostandomi di posto, lasciando cadere il fazzoletto, ma non era servito a nulla, c'erano troppi specchi in quella sala! La delusione sul mio volto, aveva pian piano lasciato posto allo stupore, quando mi accorsi che la sua vita era stata trascorsa all'insegna della lussuria e della vanità, non tanto per piacere personale, quanto per cultura e sopravvivenza. Aveva vissuto ciecamente, passando da un letto all'altro, da un matrimonio all'altro e, perdendo il senso della propria identità per compiacere chiunque, era diventata una moltitudine di donne riunite sotto la stessa stanca pelle. Una specie di "comune" dell'anima, un raduno di teatranti, i senza fissa dimora dei sentimenti. Gli angoli delle sue labbra si rivolsero in basso, in un broncio, una smorfia sofferta, quando, ad un certo punto del suo racconto, si era

accorta che di tanto vivere le era rimasto solo un lodevole conto in banca, ma non un affetto sincero cui tornare la sera per condividere gli spazi delle ampie stanze della sua dimora o a mitigare i vasti silenzi della sua anima inquieta. Non aveva più niente. Non aveva mai avuto niente. Anche la sua bellezza sfiorita la salutava, colando argento, giù per la chioma riccia. Fu solo allora che mi guardò con forza, diradò il suo sguardo in un lago di terrore, nel momento in cui la sua anima, oramai nuda, divenne consapevole di aver perduto il suo più grande potere: la seduzione. Cercò di mimare un gesto umano, allargando le braccia per accogliermi, ma io vidi solo un pagliaccio patetico e goffo, un altro tentativo di mettersi al sicuro, di sfruttare la situazione. Ancora una volta. La guardai, sorrisi, riposi l'orologio nel taschino. Mi sentivo freddo e meccanico, non nutrivo alcun desiderio di chiederle come mai mi avesse lasciato venti anni prima, del resto, tutta la sua vita si era rivelata un inno alla superficialità, dove non c'era spazio per un cuore... figurarsi altro!

Pagai il nostro conto e fu come pagare lei e saldare un vecchio debito col mio passato. Mi allontanai con garbo e mi soffermai pensieroso davanti alla vetrina del locale, proprio dove, in effetti, solo qualche ora prima avevo sperato che quel vetro opaco fosse l'ultima schermata a separarci, guardai dentro per incontrare il suo sguardo, ma vidi solo due occhi pieni di niente...

“Ciao mamma”, sussurrai con mestizia, lasciandomi ingoiare dalle ombre smarrite nella notte che affollavano il marciapiede.

Mil en unu

Monia Minnucci

Italio

Mi rigardis ŝin: la fervoro prizorgi sian aspekton divenigis, ke dum ŝia tuta vivo, ŝajne, ŝi faris nenion alian ol esti bela.

Mi restis silenta dum duono de la tempo de nia renkontiĝo, kun seniluziigita esprimo sur mia vizaĝo kaj la tento forkuri, dum ŝi parolis pri seninteresaj, bagatelaj aferoj. Ŝi priskribis la venontan aŭtunan kaj vintran modkolekton, la tre multekostajn estetikajn operaciojn, kiujn ŝi faris, la vojaĝojn al Ĉinio, Japanio, Peruo. Kaj, de tempo al tempo, ŝi spicis siajn dirojn per analizo de detalo aŭ malkaŝis ian nekonfeseblan sekreton, kiu faris ŝin protagonisto de la peripetioj de ŝia kompleksa ekzistado. Mi rigardis ŝin kaj zorge ekzamenis la kolorojn de ŝia vizaĝo: avelkoloraj irisoj, nigraj haroj, luneca haŭto, preskaŭ diafana. Ŝajnis, ke ŝi eĉ ne rimarkis mian ĉeeston, sed tio ne estis novaĵo. Ne por mi. Ŝi daŭre parolis, gestadis kaj ofte kaptis sian rigardon en la speguloj de la fumĉambro de la klubo. Mi ofte provis kapti ŝian atenton diversmaniere: starante antaŭ ŝi, ŝanĝante lokon, faligante poŝtukon, sed tio estis vana, estis tro da speguloj en tiu ĉambro! La seniluziigo sur mia vizaĝo iom post iom cedis lokon al miro, kiam mi konstatis, ke ŝia vivo estis pasigita sub la signo de voluptamo kaj vantemo, ne tiom por persona plezuro, kiom por kulturo kaj pluvivo. Ŝi vivis blinde, irante de unu lito al alia, de unu geedziĝo al alia, kaj perdinte sian senton de identeco por plaĉi al iu ajn, ŝi fariĝis multe da virinoj kunigitaj sub la sama laca haŭto. Ia “komunumo” de la animo, kunveno de aktorinoj, senhejmujoj de la sentoj. La anguloj de ŝiaj lipoj turniĝis malsupren, en paŭto, dolora grimaco, kiam, je certa punkto de ŝia rakonto, ŝi konstatis, ke el tia vivo restis al ŝi nur laŭdinda bankkonto, sed ne sincera afekcio al kiu reveni vespere por dividi la spacojn de la vastaj ĉambroj de ŝia loĝejo aŭ mildigi la longajn silentojn de ŝia maltrankvila animo. Ŝi ne havis ion plu. Ŝi neniam havis ion. Eĉ ŝia velkanta beleco salutis ŝin, ŝiaj

buklaj haroj formante arĝentan riveron. Nur tiam ŝi forte rigardis min. Ŝia rigardo fariĝis lago de teruro, en la momento, kiam ŝia animo, nun nuda, ekkonsciis ke ŝi perdis sian plej grandan potencon: allogkapablo. Ŝi provis imiti homan geston, etendante la brakojn por bonvenigi min, sed mi vidis nur patosan kaj malgracian klaŭnon, alian provon atingi sekurecon, ekspluati la situacion. Ankoraŭ unu fojon. Mi rigardis ŝin, ridetis, remetis la horloĝon en mian poŝon. Mi sentis min malvarma kaj mekanika. Mi neniel volis demandi ŝin, kial ŝi forlasis min antaŭ dudek jaroj. Finfine, ŝia tuta vivo montriĝis himno al supraĵeco, kie mankis loko por koro... kaj des pli por ĉio alia!

Mi pagis nian kalkulon, kaj estis kiel pagi al ŝi kaj likvidi malnovan ŝuldon de mia pasinteco. Mi foriris elegante kaj medite restadis antaŭ la fenestro de la restoracio, ĝuste kie, fakte, nur kelkajn horojn antaŭe mi esperis, ke tiu opaka vitro estu la lasta ekrano, kiu disigis nin. Mi enrigardis por renkonti ŝian rigardon, sed mi nur vidis du okulojn plenajn de nenio...

“Ĝis, panjo”, mi flustris malgaje, lasante min esti englutita de la ombroj perditaj en la nokto, kiu plenigis la trotuaron.

Волнующий аромат

Наталья Никулина

Россия

Он вышел из дома ещё в сумерках. Двор был наполнен теми таинственными, растворяющимися в наползающей темноте тенями, которые возникают после заката и живут считанные минуты. Его нестерпимо тянуло туда, в наступающую ночь. Темнота будоражила, обостряла чувства, наполняла тело какой-то дремавшей дотоле силой. Он легко спрыгнул со ступенек крыльца, потянулся и направился по дорожке, уходящей вглубь сада. Вечера вечером, прогуливаясь неподалёку от старого, отполированного ветром и дождём ствола сосны, лежащего у заброшенного колодца, он уловил еле различимый, но ещё хранивший в себе волнующий аромат запах. «Её запах! — вспыхнула мысль. — Она была здесь совсем недавно! Быть может, сидела на тёплом стволе и слушала соловьиные трели». Ах, как тогда забилося у него сердце, как затрепетали ноздри, пытающиеся впитать исчезающий аромат.

Днём его неотступно преследовали воспоминания о вчерашней прогулке. Хотелось немедленно встать и бежать. Бежать туда, где она оставила свой благоухающий след. Сидеть и ждать. Ждать, неотрывно глядя вдаль. Ждать, прислушиваясь ко всем звукам и шорохам. «Она должна, она обязательно должна прийти снова!» — как заклинание крутилось в голове. Суета дня на время вытеснила это навязчивое желание, но оно вернулось вновь, когда воздух наполнился густым бархатным предзакатным жёлтым светом. Сердце его опять усиленно забилося. Желание увидеть её заполнило все клеточки организма.

И вот он, распираемый изнутри этой жаждой встречи, шёл по знакомой садовой дорожке. Все чувства были напряжены, как тетива лука. Ночь постепенно скрывала окружающие пред-

меты, но их очертания были ещё различимы. Вот вдаль раздался какой-то шорох, и в кустах мелькнула большая тень. «Соперник? Он не потерпит никаких конкурентов!» — мысль об этом пулей вонзилась в мозг. Натянутая внутри тетива тут же превратилась в стальной стержень, и вождедлённое желание сменилось желанием биться до конца. Тело напряглось, и он решительно двинулся в сторону мелькнувшей тени. Однако предполагаемый недруг уже скрылся в чернеющей глубине сада, и необходимость битвы отпала. Азарт от предвкушения поединка только добавил силы его вождедлению. Воодушевлённый предчувствием скорой встречи, он продолжил свой путь, зорко всматриваясь в просветы между деревьями.

Появившаяся из-за рассеивающихся облаков луна осветила сад бледным, холодным светом. Впереди стали обрисовываться очертания колодца. Подул лёгкий ветерок. И вот он опять уловил тот волнующий запах. Её запах! Ещё еле различимый и прерывающийся божественный аромат закружил ему голову и остановил дыхание. Но кровь мощным толчком наполнила тело, и он как на крыльях ринулся на зов этого аромата. Запах становился плотнее, а желание нестерпимее. «Но где она?» — мелькнула растерянная мысль. Резко остановившись, он попытался прислушаться, но громкий стук сердца заглушал все звуки. Волнение постепенно отпускаяло, и сквозь затихающее биение крови стали проступать иные звуки. Громко запел соловей, совсем рядом застрекотали цикады. Весь обратившись в слух, он, наконец, услышал тихий шорох и лёгкое постукивание, которые исходили от ствола поваленной сосны. Мягко ступая по густой траве, осторожно приблизился. «Вот она!» Объект его вождедления расслабленно сидел на бревне, глядя на луну. Затаив дыхание и весь напрягшись, сжавшись изнутри в плотный комок, он резко, как выпрямившаяся пружина, прыгнул к ней и с восторгом победителя вонзил свои острые когти. Так кот Васька поймал свою первую мышь.

Ekscita aromo

Natalia Nikulina

Rusio

Estis ankoraŭ krepusko kiam li forlasis la domon. La korto estis pleniĝita de tiuj misteraj ombroj, dissolviĝantaj en la rampanta mallumo, kiuj aperas post sunsubiro kaj vivas nur dum kelkaj minutoj. Li estis neelteneble tirita tien, en la alproksimiĝantan nokton. La mallumo ekscitis, akriĝis liajn sentojn, plenigis lian korpon per ia potenco ĝis tiam dormanta. Li malpeze saltis de la ŝtupoj de la verando, etendiĝis kaj direktis sin laŭ la pado, kiu kondukis pli profunden en la ĝardeno. Hieraŭ vespere, promenante ne malproksime de malnova trunko de pino, polurita de vento kaj pluvo, kuŝanta apud forlasita puto, li kaptis odoron apenaŭ distingeblan, sed ankoraŭ konservantan ekscitan aromon. “Ŝiaodoro!”, ekbrilis lia menso. “Ŝi estis ĉi tie antaŭnelonge! Eble ŝi sidis sur la varma trunko kaj aŭskultis najtingalajn trilojn.” Ho, kiel lia koro komencis bati tiam, kiel liaj naztruoĵoj tremis, provante sorbi la malaperantan aromon.

Dum la tago, liaj memoroj de la hieraŭa promeno senĉese hantis lin. Li volis tuj leviĝi kaj kuri. Kuri tien, kie ŝi lasis sian bonodoran spuron. Sidi kaj atendi. Atendi, rigardante malproksimen. Atendi, aŭskultante ĉiujn sonojn kaj susuradojn. “Ŝi devas, ŝi nepre devas reveni!”, kiel sorĉo turniĝis en la kapo. Dum tempo, la tumulto de la tago anstataŭis ĉi tiun obsedan deziron, sed ĝi denove revenis, kiam la aero pleniĝis per densa, velura, antaŭsunsubira, flava lumo. Lia koro denove batis intense. La deziro vidi ŝin plenigis ĉiujn ĉelojn de lia korpo.

Kaj jen li, interne malsata pro tiu ĉi soifo je renkontiĝo, marŝanta laŭ la konata ĝardenovojo. Ĉiuj sentoj estis streĉaj, kiel ŝnuro de pafarko. La nokto iom post iom kaŝis la ĉirkaŭajn objektojn, sed iliaj konturoj ankoraŭ estis distingeblaj. Malproksime aŭdiĝis susuro, kaj granda ombro aperis en la arbustoj. “Ĉu rivalo? Mi ne toleros konkurencon!” La penso pri tio trapikis lian cerbon kiel kuglo. La interna streĉita ŝnuro

tuj fariĝis ŝtala bastono, kaj la sopiro estis anstataŭigita per deziro batali ĝis la fino. Lia korpo streĉiĝis, kaj li decide direktis sin al la flagreca ombro. Tamen, la supoza malamiko jam malaperis en la nigriĝantajn profundojn de la ĝardeno, kaj la neceso batali malaperis. La ekscito pro la antaŭsento de la duelo nur aldonis forton al lia volupto. Kuraĝigite de la antaŭgojo de baldaŭa renkonto, li daŭrigis sian vojon, vigle rigardante tra la breĉoj inter la arboj.

La luno, elirinta el malantaŭ la disiĝantaj nuboj, lumigis la ĝardenon per pala, malvarma lumo. Antaŭe komencis aperi la konturo de la puto. Blovis milda venteto. Kaj nun, li denove kaptis tiun ekscitan odoron. Ŝiaodoro! Ankoraŭ apenaŭ distingebla kaj intermita, la dia aromo kirlis lian kapon kaj haltigis lian spiradon. Sed la sango plenigis lian korpon per potenca impeto, kaj li, kvazaŭ sur flugiloj, rapidis al la alvoko de ĉi tiu aromo. La odoro fariĝis pli densa, kaj la deziro pli neeltenebla. “Sed kie ŝi estas?” ekbrilis konfuzita penso. Abrupte haltinte, li klopodis aŭskulti, sed la laŭta batado de lia koro dronigis ĉiujn sonojn. La ekscito iom post iom malkreskis, kaj aliaj sonoj komencis aperi tra la forvelkanta batado de la sango. La najtingalo laŭte kantis, kaj la cikadoj tuj apude ekĉirpis. Tute nun aŭskultanta, li finfine aŭdis mallaŭtan bruon kaj mildan frapadon, kiuj venis de la trunko de la falinta pino. Paŝante delikate sur la densa herbo, li singarde alproksimiĝis. “Jen ŝi estas!” La objekto de lia deziro sidis senzorge sur la trunko, rigardante la lunon. Retenante la spiron kaj streĉiĝante, kunpremante sin interne en densa amaso, li abrupte, kiel rektigita risorto, saltis al ŝi, kaj kun la gojo de venkinto plonĝigis siajn akrajn ungegojn. Tiam, la kato Vaska kaptis sian unuan muson.

L'auto-stoppeuse

Cyrille Chopelet

France

Il actionna le levier à droite de son volant et les essuie-glaces s'immobilisèrent. Enfin ! Enfin il laissait derrière lui l'averse et voyait clairement devant son véhicule. Rouler de nuit n'était pas son plus grand plaisir. Rouler sur une route en forêt le forçait à guetter les animaux qui pourraient se précipiter sur la voie. Rouler seul était d'un ennui mortel. Mais lorsque l'on ajoutait la pluie à tout ça, ça devenait vraiment une corvée.

Les bornes défilaient, les arbres aussi. Tout était désespérément monotone. Soudain, il devina une forme claire au loin et leva le pied malgré lui. Alors que son camion approchait, il reconnut une femme vêtue de blanc, se tenant les bras contre la fraîcheur de la nuit.

En entendant le bruit de son moteur, ou peut-être en percevant la lumière de ses phares, elle se retourna et tendit le bras, levant le pouce dans le signe universel de l'auto-stoppeur. Il ralentit encore et s'arrêta à son niveau, puis se pencha pour ouvrir la portière passager. Il remarqua alors que sa tenue s'apparentait davantage à une nuisette qu'à une robe.

« Vous devez avoir froid ! En plus, la pluie arrive. Je peux vous déposer quelque part ?

— Oui, s'il vous plaît. Je vais au prochain village.

— Montez ! »

Elle s'installa, frissonnante, et il vit qu'elle était pieds nus. Tandis qu'il redémarrait, il prit la parole, ravi d'avoir quelqu'un avec qui parler.

« Comment une jolie fille comme vous se retrouve quasiment nue dans les bois au milieu de la nuit ?

— On m'a joué un sale tour, je préfère ne pas en parler si vous voulez bien.

— Allons, ça ne doit pas être si terrible ! J'ai eu ma part de blagues ou de paris stupides entre amis, vous savez. Même quelques belles

bêtises qu'on découvre le lendemain, avec une gueule de bois. Je vous raconte une des miennes et vous me dites la vôtre ?

— Non, vraiment, je ne souhaite pas en discuter. »

Le ton de la femme avait changé. Jusqu'à présent affable, elle s'était visiblement braquée, et il n'insista pas. Après quelques minutes dans ces conditions, il trouva sa compagnie plus pesante que la solitude mais, peu habitué à avoir de la compagnie, la seule solution qu'il trouva pour rompre le silence fut d'allumer la radio.

« ... notre émission sur les légendes urbaines. Ce soir, un grand classique certainement connu de tous : l'auto-stoppeuse fantôme. Dans la version la plus connue de cette histoire, un homme aurait pris en auto-stop une étrange femme qui lui aurait indiqué l'adresse de son domicile, qu'elle souhaitait rejoindre. Cependant, à l'instant où ils arrivèrent à destination, la femme disparut, comme s'évaporant dans les airs. L'homme aurait alors inspecté la maison et y aurait trouvé une photo de la femme en question, décédée depuis plusieurs années.

Comme toujours avec les légendes contemporaines, les variantes sont nombreuses. Dans certaines régions, la femme s'évanouit dans les airs à l'approche d'un passage dangereux. Dans le Calvados, les gendarmes sont ainsi habitués à un signalement récurrent d'auto-stoppeuse fantôme qui paniquerait et crierait à l'approche d'un virage, avertissant du danger, juste avant de disparaître brusquement. On dit qu'elle est le fantôme d'une jeune femme morte accidentellement dans ce virage dans les années 1970. Des signalements similaires se font dans la même région au sujet d'une autre auto-stoppeuse, supposée décédée dans les années 1960 lors d'un accident sur un carrefour réputé dangereux.

Vous savez comment se déroule notre rubrique : plus encore que les différences entre les variantes, ce sont les similitudes qui nous intéressent. Dans l'immense majorité des cas, l'individu sollicitant un transport est une femme, vêtue de blanc, rejoignant ainsi la catégorie des dames blanches. On ne rencontre pas d'exemple de ces récits où le fantôme serait malveillant... »

Il avait perdu le fil, ne pouvant s'empêcher de remarquer que sa passagère correspondait en tous points à la description faite de l'auto-stoppeuse fantôme, lui jetant des regards en coin pour l'observer. Au

bout de quelques minutes, elle tourna la tête vers lui, un large sourire aux lèvres.

« Quoi, vous pensez que je suis une dame blanche, c'est ça ?

— N... Non, pas du tout. »

Sa réponse était hésitante et elle éclata d'un rire chaleureux. Il ne savait pas s'il devait s'en inquiéter ou au contraire se sentir rassuré, jusqu'à ce qu'elle se calme.

« Ah, merci, j'avais besoin de rire un peu après cette nuit. OK, je vous raconte l'histoire, mais vous la gardez pour vous. Je suis... une femme qui travaille la nuit, si vous voyez ce que je veux dire. Mon dernier client a tenu à s'éloigner du village pour ne pas risquer de se faire attraper par sa copine, et on est allés dans la forêt. Là où il y a eu un problème, ç'a été au moment de rentrer. Il devait être satisfait, ou bien distrait : il m'a payée, puis il est monté dans sa voiture et est reparti. Il a juste oublié que je dépendais de lui pour rentrer, et que mes vêtements et mes affaires étaient à l'arrière de son auto. Ça risque d'être drôle lorsque sa copine tombera dessus ! »

La petveturantino

Cyrille Chopelet

Francio

Li frapetis la levilon dekstre de la stirilo kaj la viŝiloj haltis. Finfine! Fine la pluvo estis malantaŭ li kaj li klare vidis antaŭ sia veturilo. Veturadi nokte ne estis lia plej granda ĝojo. Veturadi tra arbaro devigis lin atenti pri bestoj, kiuj povus kuri sur la vojon. Kaj veturadi sole estis mortige enuige. Sed kiam pluvus super ĉio tio, ĝi vere fariĝas tasko.

La kilometroj pasis, tiel faris la arboj. Ĉio estis senespere monotona. Subite, li ekvidis palan formon de malproksime kaj levis sian piedon. Kiam lia kamiono alproksimiĝis, li rekonis virinon, vestitan blanke, tenante siajn brakojn kontraŭ la nokta malvarmeto.

Aŭdinte lian motoron, aŭ eble vidante liajn lumilojn, ŝi turnis sin kaj etendis sian brakon, farante la universalan signon de petveturantoj. Li denove malrapidiĝis kaj haltis ĉe ŝia nivelo, kaj apogis sin por malfermi la pasaĝeran pordon. Li tiam rimarkis ke ŝia vesto pli similis al noktoĉemizo ol al robo.

“Vi sendube estas malvarma!”, li diris. “Kaj la pluvo venas. Ĉu mi eble povas forkonduki vin ien?”

“Jes bonvolu! Mi iros al la sekva vilaĝo.”

“Bone, enveturiĝu!”

Ŝi grimpis, tremante, kaj li vidis, ke ŝi estas nudpieda. Dum li denove forveturis, li ekparolis, ĝoja pro havi iun kun kiu paroli.

“Kiel bela knabino kiel vi finiĝas preskaŭ nuda en la arbaro meze de la nokto?”

“Mi preferus ne paroli pri tio, se tio ne ĝenas vin.”

“Nu, ĝi ne povas esti tiel malbona! Mi havis mian parton de stultaj ŝercoj aŭ vetoj, vi scias. Eĉ la eraroj, kiuj oni malkovras matene kaj post-ebrie. Nu, mi diros al vi unu el miaj kaj vi diros al mi vian rakonton, ĉu?”

“Ne, vere, mi ne volas diskuti pri ĝi.”

Ŝia tono ŝanĝiĝis. Ŝi estis agrabla ĝis nun, sed ne plu, kaj li ne insistis. Post kelkaj minutoj de tio, li trovis la kompanion pli peza ol la solecon sed, nekutima havi pasaĝeron, li ne trovis alian manieron ol ŝalti la radion por rompi la silenton.

“...tempon por paroli pri urbaj legendoj. Ĉi-vespere, ni parolos pri klasikaĵo. Fakte, vi probable konas ĝin: la malaperantan petveturanton. En la plej ofta versio de la rakonto, stranga petveturantino petas aŭtomobiliston forkonduki ŝin hejmen sed, kiam ili alvenas, ŝi malaperas. La viro tiam iom esploras la domon kaj malkovras bildon de la virino. Malnovan bildon, ĉar la virino mortis antaŭ multaj jaroj.

“Kiel ĉiuj nuntempaj legendoj, ĉi tiu havas multajn variantojn. En iuj regionoj, la virino malaperas alproksimiĝinte danĝeran paŝon. En Francio, en Calvados, la ĝendarmoj kutimas alripetaĵoj. La unua estas petveturantino, kiu panikas kaj krias kiam alproksimiĝas kurbiĝo. Oni diras, ke ŝi estas la fantomo de juna virino, kiu hazarde mortis ĉe tiu turniĝo en la 70-aj jaroj. La dua temas pri alia petveturantino, kiu supozeble mortis en la 60-aj jaroj dum akcidento ĉe rimarkinde danĝera vojkruciĝo.

“Nu, vi scias ke la diferencoj inter la variantoj estas interesaj, sed la similecoj eĉ pli. En la granda plimulto de kazoj, la petveturanto estas virino, blanke vestita, tiel aliĝanta al la larĝa kategorio de Blankaj Sinjorinoj. Ne estas multaj ekzemploj de ĉi tiuj rakontoj, kie la fantomo estas malbonvola...”

Li ne plu aŭskultis, ne povante ne rimarki, ke lia pasaĝerino ĉiel respondas al la priskribo, kiun li ĵus aŭdis. Li provis koncentriĝi pri la vojo, sed daŭre ĵetis flankajn rigardojn por observi ŝin. Post kelkaj minutoj, ŝi turnis sian kapon al li, larĝa rideto sur siaj lipoj.

“Kion? Vi pensas, ke mi estas Blanka Sinjorino, ĉu?”

“N... Ne, tute ne”, li diris, balbutante.

Ŝi eniris varman ridon, kaj li ne sciis, ĉu li devas zorgi aŭ trankviliĝi, ĝis ŝi finis ridi.

“Dankon, mi bezonis ĝin post ĉi tiu nokto. Bone, mi rakontos al vi mian rakonton, sed ne parolu pri ĝi. Mi estas... virino kiu laboras nokte, se vi scias, kion mi volas diri. Mia lasta kliento insistis iri for de la vilaĝo, por ke lia koramikino ne povu kapti lin, do ni iris en la arbaron. Ne estis problemoj ĝis li pagis min. Li certe estis kontenta, aŭ almenaŭ

distrita: li eniris la aŭton kaj forveturis, nur forgesante, ke ankaŭ mi dependis de li. Ĉiuj miaj vestaĵoj kaj miaj posedaĵoj estas en la malantaŭo de lia aŭto. Estos amuze kiam lia koramikino trovos ilin!”

Nelle notti d'estate

Paola Cereda

Italia

*(da La figlia del ferro, romanzo,
Perrone Editore, 2022)*

Nelle notti d'estate, un'aria leggera correva nella Valle di Lazzaro e invitava al riposo, condita dal frinire dei grilli e dagli ululati di qualche animale. Le civette stavano all'erta sui rami per anticipare un pericolo, tra il fruscio di una lepre che tardava a raggiungere la tana e i cinguettii dei primi risvegli. Nelle notti d'estate, la casa addormentata era il posto in cui restare. Sostare. Rimanere immobili nei corpi assopiti dove la differenza tra la vita e la morte era nel respiro delle persone amate. I sogni erano i più difficili da addomesticare, loro sì che sfuggivano al tempo lento. Si mischiavano, si agitavano e prendevano la forma esplicita delle paure e quella più misteriosa dei desideri. Erano come volevano e andavano dove volevano, irrazionali ma con la logica lucidissima dei bisogni più urgenti. Al risveglio, Iole cercava in ciò che restava: frammenti di ricordi confusi, che si lasciava alle spalle perché inutili e bugiardi. Invece erano utili e autentici. Erano i suoi interi.

Mario, a Iole, glielo portavano i sogni. Le portavano i suoi capelli fini, la furia dei baci, l'eccitazione del corpo, il gusto aspro della saliva e, soprattutto, le domande. Dove sei? Che cosa stai facendo? Con chi? Perché non ti decidi a cercarmi? E soprattutto cos'è per te la felicità, adesso che non è più quella cosa semplice che era starsi addosso?

Le domande nascevano nella testa, le agitavano lo stomaco ma non diventavano parole pronunciate a voce alta, capaci di mettere ordine nei sentimenti. Iole non aveva mai raccontato di Mario perché le sembrava stupido, addirittura ingiusto, chiedere alla madre e alla sorella di mettersi un po' di lato per lasciare spazio a quella parte di sé che non aveva mai mostrato. Non aveva mai detto della nostalgia.

Dell'amore.
Della faccia che ha.
Del suo nome.
Dei capelli fini.
Delle bugie.
Delle indecisioni e delle scelte.

Nel silenzio delle notti d'estate, quando i sogni diventavano tormento, Iole si svegliava all'improvviso e restava sdraiata su un fianco a ripensare al giorno in cui aveva toccato il corpo misero del rigattiere, alla sua mano sporca e alla vergogna che aveva provato davanti al bisogno di qualcuno che non le doveva niente. Più spesso pensava a Mario che non l'aveva cercata neppure una volta, nemmeno per dirle «che sciocca sei stata, ad andartene così».

Chissà se anche lui ritrovava Iole nei sogni e negli incubi, in ogni faccia e in ogni rumore. Quando andava in cortile o lavorava nell'orto, sperava di sentire la voce di lui che la chiamava.

Uno dei figli della materassaia aveva trovato lavoro in un'officina di Campo, e Iole gli aveva chiesto di consegnare un biglietto: «Devi darglielo di persona» si era raccomandata. Mario doveva sapere che stava bene e che era sfollata in Valle di Lazzaro con la madre e la sorella. Non si vedevano da così tante settimane che si chiedeva se fossero stati proprio loro a fare l'amore sotto il pino marittimo. Com'è che prima erano tutto e che, adesso, erano solo un pezzo minuscolo di tutto? Un pezzo lontano e addirittura inutile.

Lui aveva ricevuto il biglietto – il figlio di Lia glielo aveva assicurato – ma non lo aveva aperto. Se l'era ficcato nella tasca dei pantaloni e aveva continuato a lucidare il serbatoio della moto Guzzi. Non era salito in sella e non aveva guidato fino a Valle di Lazzaro per dire mi dispiace, Iole, mi dispiace per te, per noi, per il tempo perduto e la distanza. Sali che andiamo a Procchio per chiedere al prete di farci diventare marito e moglie, anche se io e te siamo già sposati, perché per esse' marito e moglie non occorre la fede. Per esse' marito e moglie ci vuole fiducia, e la fiducia è quando ami qualcuno così com'è, coi suoi difetti e tutto.

Ma Mario se ne stava zitto.

A parlare erano i sogni e nei sogni Iole vestiva l'abito bianco di Anarita, e camminava al fianco del padre lungo la navata della chiesa di Procchio. Mario la aspettava davanti all'altare: neppure il tempo di scambiarsi le promesse, che già gli sposi brindavano sotto un pergolato di uva bianca.

Prima della guerra, le coppie ballavano fino a mezzanotte e all'alba del giorno seguente partivano per il continente. Andavano a visitare Roma e poi Assisi, per chiedere a San Francesco la grazia di una prole abbondante. La guerra, però, aveva stravolto le abitudini: uscire dall'isola non era più così importante. L'unico desiderio era quello di esserci, senza la paura di esistere.

En la someraj noktoj

Paola Cereda

Italio

*(el La filino de la fero, romano,
eldonisto: Perrone Editore, 2022)*

En la someraj noktoj, malpeza aero blovis tra la Valo de Lazaro kaj invitis al ripozo, spicita de la ĉirpado de la griloj kaj de la hurlado de bestoj. La strigoj staris viglaj sur la branĉoj por antaŭvidi danĝeron, inter la susuro de leporo, kiu malfruis atingi sian kavon, kaj la pepado de la unuaj vekiĝoj. En la someraj noktoj, la dormanta domo estis la loko, kie resti. Halti. Resti senmovaj en la endormiĝantaj korpoj, kie la diferenco inter vivo kaj morto estis nur en la spiro de la amatoj. La sonĝoj estis la plej malfacile malsovaĝigeblaj, ili ja eskapis la malrapidan tempon. Ili miksiĝis, baraktis kaj prenis la eksplicitan formon de timoj kaj la pli misteran formon de deziroj. Ili estis kiel ili volis kaj iris kien ili volis, neraciaj sed kun la tre klara logiko de la plej urĝaj bezonoj. Vekiĝinte, Jole serĉis, kio restis: fragmentoj de konfuzaj memoroj, kiujn ŝi postlasis ĉar ili estis senutilaj kaj mensogaj. Male, ili estis helpaj kaj aŭtentaj. Ili estis ŝiaj entjeroj.

Estis la sonĝoj, kiuj venigis Marion al Jole. Ili alportis al ŝi liajn fajnajn harojn, la impeton de kisoj, la eksciton de la korpo, la acidan guston de salivo kaj, ĉefe, la demandojn. Kie vi estas? Kion vi faras? Kun kiu? Kial vi ne decidiĝas serĉi min? Kaj, ĉefe, kio estas por vi feliĉo, nun kiam ĝi ne plu estas tiu simpla afero, kiu estis apudeco?

La demandoj naskiĝis en ŝia kapo, ili movis ŝian stomakon sed ili ne fariĝis vortoj laŭtvoĉaj, kapablaj ordigi sentojn. Jole neniam rakontis pri Mario, ĉar ŝajnis stulte, eĉ maljuste, peti la patrinon kaj la fratinon flankenmetiĝi por fari lokon al tiu parto de ŝi, kiun ŝi neniam montris. Ŝi neniam menciis la nostalgion.

La amon.

Lian vizaĝon.

Lian nomon.

La belajn harojn.

La mensogojn.

La nedecidojn kaj la elektojn.

En la silento de la someraj noktoj, kiam la sonĝoj fariĝis turmentoj, Jole subite vekigis kaj kuŝis flanke pensante pri la tago, kiam ŝi tuŝis la mizeran korpon de la rubkomercisto, pri lia malpura mano kaj la honto, kiun ŝi sentis antaŭ la bezono de iu, kiu nenion ŝuldis al ŝi. Pli ofte ŝi pensis pri Mario, kiu eĉ ne unufoje serĉis ŝin, eĉ ne por diri al ŝi „kia stultulino vi estis, foririnte tiel”.

Kiu scias, ĉu ankaŭ li trovis Jolen en sonĝoj kaj koŝmaroj, en ĉiu vizaĝo kaj en ĉiu bruoj. Kiam ŝi iris al la korto aŭ laboris en la ĝardeno, ŝi esperis aŭdi lian voĉon voki ŝin.

Unu el la filoj de la matracisto trovis laboron en metiejo en Kampo, kaj Jole petis lin liveri noton: “Vi devas doni ĝin al li persone”, ŝi rekomendis. Mario bezonis scii, ke ŝi fartas bone kaj ke ŝi estis rifuĝinta en la Valon de Lazaro kun sia patrino kaj fratino. Ili ne vidis unu la alian dum tiom da semajnoj, ke ŝi demandis sin, ĉu ili vere amoris sub la pinastro. Kiel do okazis, ke ili antaŭe estis ĉio kaj nun ili estas nur eta peco de ĉio? Peco malproksima kaj eĉ senutila.

Li ricevis la noton – la filo de Linjo certigis tion – sed li ne malfermis ĝin. Li metis ĝin en sian pantalonpoŝon kaj daŭrigis poluri la tankon de la motorciklo Guzzi. Li ne surseliĝis kaj ne rajdis al la Valo de Lazaro por diri “mi bedaŭras, Jole, mi bedaŭras por vi, por ni, pro la perdita tempo kaj la distanco. Venu, ni iru al Prokjo por peti la pastron igi nin edzo kaj edzino, eĉ se vi kaj mi jam estas edziĝintaj, ĉar ringo ne necesas por esti edzo kaj edzino. Por esti edzo kaj edzino bezonatas fido, kaj fido estas kiam vi amas iun tian, kia li estas, kun ties mankoj kaj ĉio.”

Sed Mario silentis.

Estis la sonĝoj, kiuj parolis. Kaj en la sonĝoj Jole surhavis la blankan robon de Annarita, kaj marŝis apud sia patro laŭ la navo de la preĝejo de Prokjo. Mario atendis ŝin antaŭ la altaro: eĉ ne la tempo por interŝanĝi promesojn, kaj tuj poste la geedzoj tostis sub pergolo el blankaj vinberoj.

Antaŭ la milito, paroj dancis ĝis noktomezo kaj forveturis al la kontinento ĉe tagiĝo la sekvan tagon. Ili iris viziti Romon kaj poste Asizon, por peti de Sankta Francisko la gracon de abunda idaro. La milito tamen distordis la kutimojn: forlasi la insulon ne plu estis tiom grave. Oni nur deziris ĉeesti, sen la timo ekzistadi.

Liaj sorĉistinoj

Carlos Hernández Loarca

Meksiko

La Tata, kiel ni nomis nian avon ĉar ekde infaneco ni ne sukcesis bone prononci la vorton “patro”, kiel mia patro kaj liaj gefratoj nomis lin, mortis dum la pandemio. Li estis malgranda kampara viro lipharhava, dediĉita al zorgo kaj bredo de kaproj, kokinoj, kunikloj, koturnoj kaj kelkaj aliaj bestoj. Li loĝis en domo, kiun lia patro ekkonstruis sur la deklivo de la monteto malantaŭ la ĉefa placo de la vilaĝo, kaj kiun mia Tata finkonstruis por doni ĉambron al siaj gefiloj dum iliaj infanjaroj. Lia domo, granda kiel povas esti domo por sep personoj en malriĉa kampara vilaĝo en Meksiko, kun la tempo ekestis akompanita de aliaj domoj ĉiam pli kaj pli proksimaj unu al la alia, ĉirkaŭita de stratoj ne nur por ĉevaloj kaj bestaroj sed por motorcikloj kaj aliaj veturiloj, superrigardata de palisoj, kiuj konektiĝis per elektraj kabloj. Sed ankaŭ kun la tempo ĝi malpleniĝis, unue pro la manko de mia avino, poste ĉar mia patro kaj liaj gefratoj iris al urbo por studi aŭ labori, kaj nun tie nur restis mia avo kun liaj bestoj, foje vizitata de la gefiloj kaj genepoj, kaj foje de la vilaĝaj oficistoj de la registraro. Mia avo, Tata, malŝatis neatenditajn homojn, kiuj nokte frapis la pordon seninvite, ĉefe impostservistojn, pastrojn kaj doktorojn. Li diris, ke kiam impostservisto, pastro aŭ doktoro venas per sia volo al via domo, ili neniam kunportas bonajn novaĵojn.

Kaj mi memoras fojon kiam mia frateto kaj mi estis ĉe la avo por helpi kamparlabore dum niaj lernejaraj ferioj. Tiam ni estis eble ok aŭ naŭjaraj, en malfrua vespero de julio, kiam ni vidis ekstere viron kun nigra malgranda ĉapelo kaj papero en sia mano, li marŝis sur la strato, rekte al la domo de mia Tata, iom tro decidplena, sed samtempe iom tro perdita. Mia frato estis tiu, kiu lin vidis unue, kaj mia Tata tuj iris al fenestro por kontroli. “*Pastro, aŭ doktoro*”, li diris. Tiam, li iom akcele komencis serĉi ion inter la lignaĵoj de la muroj kaj de la plafono.

“*Se ili protektas vin...*”, li murmuris, “*mi vekos ilin...*”, ni preskaŭ ne aŭdis lin, “*...ne prenos vin...*”. Kiam li movis ornamaĵojn de siaj muroj, kelkaj tineoj ekflugis tra la tuta domo, kovrante min kaj mian fraton per ora polvo de siaj flugiloj. Li ŝajnis iom pli trankvila, ekstaris kaj ĉio iĝis silenta. La pordo sonis: “*paf, paf, paf*”. Mi kaj mia frato daŭre restis ĉe la kuireja tablo, rigardante mian avon, kiu iris al la pordo, sed kiu unue metis fingron antaŭ sian buŝon kaj diris: “Ŝŝ...” petante silenton. En unu sola movo, li malŝaltis la enan lumon kaj ŝaltis la eksteran, kaj li tiam malfermis la pordon. Tie, mia frato kaj mi estis en silento, brakumitaj de la doma mallumo, sed banitaj ankaŭ de ekstera oranĝa lumo kiu trafenestre venis el sunsubiro malantaŭ tiuj rozkoloraj nuboj en la montarplena horizonto... Tineo granda kaj dika flugis ĉirkaŭ ni, kaj decidis haltigi sian frenezan flugon sur mia maldekstra mano, sur mia indika fingro, kie ĝi lasis iom da ora kaj cindra polvo, ĝi restis tie dum du sekundoj antaŭ ol ekflugi soren denove. Nek mia frato nek mi atentis pri tio, kion nia Tata faris, ni estis kaptitaj de tiu bildo, de tiu strange paca sento, kaj de tiu tineo, ĝis la momento kiam la pordo refermiĝis “*pop-klik*”. Mia avo reŝaltis la lumon kaj spiris. “Ĉio estas bone, *miaj sorĉistinetoj protektis vin*”, li diris. “*Kiuj sorĉistinetoj?*”, demandis mia frato. “*La tineoj*”, diris mi. Kaj fakte, post tio, mia Tata rakontis al ni kiel la tineoj estis magiaj, ke ili protektas tion, kion vi amas, per sia flugila polvo, ĉefe de doktoroj, pastroj kaj aliaj sorĉistoj kaj sorĉistinoj, sed ke vi devas danki al ili per promeso neniam mortigi tineon en via vivo. Ĉi tiu rakonto ne nur igis nin promesi neniam mortigi tineojn, sed ankaŭ ne papiliojn, abelojn, skarabojn, araneojn nek iujn ajn aliajn insektojn. Mi kredas ke tio instruis al ni aprezi insektojn kaj bestojn, kaj trovi en iliaj vivoj valoron kaj gravecon. Mia Tata parolis pri siaj sorĉistinetoj nur fojfoje, li havis pli da magiaj rakontoj por ni.

Dum lia entombigo, la malgranda vilaĝo kuniĝis por subterigi mian avon en la loka tombejo. Pluraj personoj ofertis siajn respekton kaj kondolencan al lia familio, geamikoj kaj konatoj. Mia avo estis naŭdekdujara kiam li, pro naturaj kaŭzoj, mortis sur la kuireja tablo. La familio renkontiĝis ĉe lia domo, kaj ĉiuj brakumis kaj akompanis unu la alian dum la funebro. Neniu estis profunde surprizita, malgraŭ la tristeco. Kiam ni ekiris de la vilaĝo, ni pasis apud la tombejo kaj mi

decidis sendi lastan rigardon al la tero kiu estis manĝonta mian avon. Tie mi vidis grupon da nigre kaj brune vestitaj virinoj plorantaj apud la tombejo super la tomboŝtono de mia avo. Unu el ili vidis min kaj salutis min; mi hezitis sed fine mi salutis reen. Mi demandis al miaj gepatroj pri tiuj virinoj, mia patro diris ke lia patro rakontis plurajn fantaziaĵojn pri tiaj virinoj, sed ke plejeble ili estis simplaj najbarinoj, kiuĵ amis lin ĉu kiel amikon ĉu kiel amanton, kaj mia patrino menciis ke ili eĉ ŝajnis sorĉistinoj. Por mi, ili ja ŝajnis malfeliĉaj sorĉistinoj. Mi forgesis la aferon...

Hieraŭ, unu jaron post la morto de mia avo, mi kaj aliaj familianoj revenis al la vilaĝo, kaj mi vidis neniun tineon en la domo de mia Tata, sed kiam ni iris for, ni pasis apud la loka tombejo kaj tie mi vidis amason da maljunulinoj nigre kaj brune vestitaj ĉirkaŭ lia tombo, kelkaj plorantaj, kelkaj silentaj, unu, alta kaj dika, salutis min per granda cindra mano. Mi hezitis, sed fine mi adiaŭis ŝin per mia maldekstra mano, kaj sur ĝi, sur mia montrofigro, mi trovis polvan makulon, eble el ia cindro ene de la domo de mia avo, sed ĝi ŝajnis malsimila, pli brilanta, pli ora.

Nepre nun

Pascal Vilain

Francio

Plia halto de la trajno.

Kiom da tempo pasis de post la antaŭa? Ne nur kelkaj minutoj, verŝajne pluraj horoj. Fakte, mi ne scias.

Lulita de la regula kaj monotona rulkadenco de la vagonradoj sur la trako, mi donis min delonge en la brakojn de Morfeo.

Se bruaro plej bone simbolas trajnvojaĝon, nekontesteble por mi estas tiu grinca kunfrotiĝo de la feraj trajnradoj kun la ŝtalaj reloj, kaj la tuj rekonebla brueto de radoj, kiuj fojfoje trafas trakforkon.

Mia trajno haltis.

La bremsoknaro kaj sekva senmoviĝo elsonĝigis min. Jam forsvenis la scenoj kaj bildoj, en kiuj rolis la nun duona dorminto, kiu nevole mi ĵus iĝis. Mi tamen iel memoretas, ke ne vere agrablis lasta inkubsonĝo, ebla kialo de kapdoloreto, kiun mi nun suferas.

Okazis halto.


Kial? Kie ni estas?

Okulumante al la ekstero tra la vagonkupea fenestro, mi ekkomprenas: jen, stacio.

Multajn aliajn nia veturilo jam preterpasis; jam ĉe kelkaj ĝi senmoviĝis, ĉe aliaj ĝi plu haltos antaŭ ol atingi mian vojaĝcelon. Pasaĝeroj eltrajniĝu, aliaj eniĝu.

La stacidomo bonŝance staras ne meze de nenie, sed urborande.

Mi ne vere komprenas, kial pli kaj pli estis kaj plu estas konstruitaj novaj stacioj for de urboj. Ili devigas uzadon de navedaj busetoj por transporti vojaĝantojn de granda trajnhaltejo al urbocentro. Plie, ili senigas min, kaj verŝajne ne nur min, je iu plezuro ĉiam spertata. Mi ja ŝategas ĉi tiajn momentojn, okaze de nokta vojaĝo, kiam mi havas la eblon ŝtelobservi vivspurojn en dormhoroj. Impresas ĉefe silento profunda, kvankam ne prema, fojfoje rompita de nuraj surkajaj movoj.



Okulfrapas palega lumo, plejofte flavaĉa, kiun disaj stratlampoj ŝvebigas super la tuta pejzaĝo. Mirigas tute speciala etoso, travivebla nur plennokte.

Tie kaj tie plu videblas lampobrieto trakurtena. Homoj do ankoraŭ aktivis je la tria matene.

Ĝus revenis el laborejo...

Jam prepariĝas por nova labortago...

Plu amoras...

Daŭre diskutas...

Ree disputas...

Direktas sian atenton al malsanulo...

Suferas sendormecon...

Forgesis malŝalti lampon...

Jen biciklanto, kaj tie aŭtomobilo. Ekaperas reflektoroj blankaj, for-svenas ruĝaj...

Iu paŝadas: ĉu sendomulo, dormomankanto aŭ noktovagulo?

Plua vivo, sed lanta vivo...

Post kelkaj minutoj ekstartas ree la trajno. La radoj retrovas sian kadencan knaradon. Rapide reendormiĝas miaj samkupeanoj. Mi ne. Ne plu dormemas. Ne tuj. Revado anstataŭas sonĝadon. Sed tio ne daŭras. Plene vekita kaj konscia, ne tro ĝenata de la ronkado de kelkaj kunvojaĝantoj, mi lasas miajn pensojn vagadi al ŝi. Ŝi, kiun de tiom longe mi ne revidis.

Kial ŝi petis, ke tiun vojaĝon mi nepre faru? Nun!

Mi memoras pri simila nokta trajnvojaĝo antaŭ trideko da jaroj.

Sama fervojo. Samaj deirpunkto en Francujo kaj celstacio en Italujo. La tiama vagono malpli modernis, sed samis la monotonritma radgrincado sur la reloj. Male al hodiaŭ, mi ne solis: akompanis min grupeto de gejunuloj, kun kiuj mi estis pasigonta dusemajnan restadon en feriejo.

Juna franco dekkvinjara mi tiam estis, kaj nokta trajno kondukis min al Rapallo, borde de Mediteraneo, ĉe la turisma Liguria Riviero, konata ankaŭ kiel Riviero di Levante.

Ambaŭ semajnoj pasis ege agrable! Kunvivis en la sama restadejo italaj kaj francaj gejunuloj, kiuj celis ne nur amuziĝi sed ankaŭ praktiki alian lingvon ol sian denaskan. Ni ja kune diskutis, tage-nokte, kaj ridis, ludis, sportumis, foje enamiĝis... Adoleskeco estas ja ofte stampita per korinklinoj, ĉu ne?

Mia nokta vojaĝo antaŭeniras plu. Dum kilometrojn forglutas la trajno, memoraĵojn revivigas mia nedormema cerbo.

Giuliana tuj plaĉis al mi. Allogis min ŝia ĉiama ĉarma rideto, ŝia ina beleco, la neimitebla itala akĉento ŝia, kiam ŝi provis esprimi sin

france... Ni kune pasigis agrablegajn momentojn. Mi serĉis ŝian kompanion, ŝi la mian, ni rapide iĝis kvazaŭ nedisigeblaj. Ĉu adoleska enamiĝo? Ne estus troige aserti, ke al tio forte similis nia rilato. Restas al mi fotoj pri tiu somera restado: Giuliana kaj mi plejofte apudas.

Tiaj feriaj travivaĵoj tamen havu devigan finon: venis la disiĝa momento. Multon ambaŭ ni promesis: ke mi revenos Italujen, ke ŝi vojaĝos Francujen, ke ni ne forgesos unu la alian, ke ni rilatos letere, foje telefone. Kaj ni ja ade korespondis, tamen sen revido. Alifoje decidis por ni unue niaj gepatroj, pro aliaj feriprojektoj, alilandaj vojaĝceloj... Alifoje decidis ankaŭ viv-cirkonstancoj: jarojn poste ŝi iĝis edzino en sia lando. Mi edzo en la mia. Naskiĝis niaj respektivaj infanoj. Tiel iras la vivo.

Sed neniam ĉesis nia korespondado, akceptita de niaj vivkunuloj.

En la nokta mallumo kaj silento, regulritme traboras sian vojon mia trajno. Profunde dormas plu miaj samkupeanoj... vagadas plu miaj pensoj.

Kial ŝi petis, ke nepre nun tiun vojaĝon al ŝi mi faru?

Ĉu pro la fakto, ke ambaŭ ni senkunuliĝis? Ĉu ŝi spertis aliajn am-aventurojn post sia senedziĝo? Pri tio ŝi diskrete neniam aludis en siaj leteroj. Miaflanke, mi decidis ne plu kateniĝi en amor- aŭ amrilatoj. Tion mi skribis al ŝi, aldonante tamen ke la ligo, kiu kunigas nin, troviĝas super tiaj baznivelaj konsideroj. Ĉu pro tio ŝia insista peto? Nu... verŝajne ne... certe estas io alia.

En lasta letero ŝia, ŝi aludis pri grava malsano, kiu ŝin trafis. “Mi eltenos. Ĉio ĝlatos... Estus bele, se ni povus finfine revidi unu la alian!”

En lasta telefonalkvoko, ŝi insistis: “Venu kiel eble plej rapide, mi petas!” Mi ne scias, kion pensi. Konflikto en mi agrabla antaŭĝojo ŝin trovi kaj timiga antaŭsento ŝin perdi.

Nokta trajno kondukas min al Giuliana...

Безликие

Кира Синельник

Россия

Ночь. Из декораций: спящий город, спальный район окраины мегаполиса. Идет дождь. Свет проникает сквозь ветки деревьев, отбрасывающих тень на мокрый асфальт дороги. Ночное путешествие из подъезда в себя.

Человек вышел из подъезда. От пальцев руки и рта потянулись рваные линии дыма, сворачивающиеся в клубочки и расширяющиеся в воздухе до тех пор, пока не сольются с пространством ночной осенней улицы.

Нельзя вечно стоять у подъезда и курить. Рано или поздно придется вернуться обратно в квартиру. Что ж, еще одно небольшое усилие воли, всего лишь очередное усилие. Какое по счету? Почему нельзя выйти из подъезда и переступить порог в новую жизнь, в другой день, в иные обстоятельства?

Выкурив три сигареты подряд и сделав то самое усилие над собой, человек в серой толстовке зашел в подъезд. Лифт. Ключи. Замочная скважина. В коридоре квартиры темно. В зале горит свет. Есть ли еще кто-то здесь?

Человек в серой толстовке повернул в кухню, хлопнув за собой входную дверь. Поставил чайник на огонь. Вино больше пить невозможно. Кран. Вода. Газ. Механически запустив руку в верхний шкафчик, человек достаёт кружку. В кружке ничего нет. Есть ли кто-то еще в квартире? А нужен ли еще кто-то?

Дождь бьёт по окнам. Вчера наступила осень. Подул ветер. Листья не успели опадать, поэтому так и висят зеленые на деревьях. Странно думать, что они страдают под холодным ветром и дождем. Но невозможно им не сочувствовать.

Если поделить пространство на два, то получатся две половины. Если поделить пространство на три, то получатся три

трети. А можно пространство не делить, и тогда останется нечто целое, как единица.

Горячий чай обжег язык. Наверно, поэтому кто-то в него добавляет молоко.

На часах два часа. Темно. Даже если скоро рассветет, город останется погруженным в темноту: небо затянуто тучами и будет таким ближайшие месяцы. Надо просто привыкнуть. Потом даже понравится. И уже невозможно жить без пасмурной волоки. Это следует признать определенным видом зависимости — потребность существовать под тяжелым, серым, тёмным небом.

В зале послышался шум. Кто-то пытается просунуть ноги в домашние тапочки: это слышно по специфичному звуку скольжения по паркету подошвы от толчков стопы. Всё-таки кто-то здесь есть. И пространство поделено на два, значит, состоит из двух половин.

Если спросить кого-нибудь из вас, испытываете ли вы счастье ежесекундно каждый день в году, что вы ответите? Что подобное было бы проявлением шизофрении или иного заболевания, симптомы которого, возможно, не пугают в начале, но точно постепенно начинают вызывать опасения, разрастающиеся в панику. Если, конечно, абсолютно счастливый человек способен паниковать.

Шаги по коридору. Всё-таки удалось надеть тапки. В огромном зеркале во всю стену проскользнуло отражение, тень в шелковом халате кремового цвета. Нечто, что в фильмах снимают без лица, сосредотачивая взгляд смотрящего на фактуре материала, движениях, деталях. Мы видим собранные темные волосы, тонкую, длинную шею, линию талии, расширяющуюся к бедрам. И белые пушистые тапочки.

Человек-толстовка стоял у окна с кружкой в руках. Тень в шелках видела лишь спину. Лиц нет. Мы не видим их. Мягкий ковер поглотил звук шагов. Если, конечно, тень способна быть шумной. Она ступила на ковер и медленно скользила над ворсом. Если мы не видим лиц, можем ли мы видеть глаза? Обыч-

но мы только глаза и видим. Это правда. Мы смотрим в глаза, значит видим глаза, остальное наш мозг дорисовывает — тако-ва его работа, задача. Вы ведь знаете, что можно смотреть и не видеть? Так бывает: взгляд направлен на предмет, но в голове совершенно иная картина, то есть не прямое отражение с экра-на глаз, а нечто слепленное мозгом без спроса.

Сейчас мог бы прозвучать выстрел. Могла бы прерваться чья-то жизнь. И тогда совершенно не важно было бы, есть ли лица. Выстрела не было. Как не было и лиц. Вы думаете, я вас обманываю? В ту ночь, когда шел дождь, был второй день осе-ни, а листья остались на деревьях, в квартире в спальном райо-не на окраине мегаполиса было два человека без лиц. Голова как чистое полотно: ничего из того, что мы привыкли ассоцииро-вать с частями лица — ни ушей, ни ртов, ни носов. У них были только глаза, обрамленные дугами бровей и длинных, густых ресниц. Этого было достаточно. Господь не подумал, когда даровал человеку рот и уши. Когда их нет, то рот не произносит гадости, а уши их не слышат.

Когда привыкаешь общаться взглядами, глаза теряют спо-собность обманывать. Так было и с этими двумя. Помните исто-рии о магическом свете, который потоком течёт из глаз, словно они — две зияющие дыры во Вселенную, через которые свет далёких звезд, собравшись в единый концентрированный луч, находит выход в этих двух пропастях? Пропасть. Можно ли поверить, что глаза стали пропастью? Посмотрев в них, вы то-нули, падали и летели сквозь мысли, суть и душу их владель-ца. Абсолютная честность, абсолютная правда. Если, конечно, в подобной ситуации всё ещё актуальны понятия правды и лжи.

Человек-толстовка обернулся. В глазах тени в шелках была любовь. Путешествие в себя было окончено. Человек-толстовка вышел покурить, чтобы вернуться. Вернуться к себе. И к шел-ковой тени.

Senvizaĝuloj

Kira Sinelnik

Rusio

Noktas. El dekoracioj ĉeestas nur: dormanta urbo, loĝkvartalo de senlima urbego. Falas pluvo. Lumo trapenetas arbobranĉojn, kiuj ĵetas ombrojn sur malsekan asfaltan de ŝoseo. La nokta vojaĝo el dompordo al si mem.

Homo eliris el dompordo. De manfingroj kaj de lipoj eketendiĝis ŝiritaj linioj de fumo, lanuge buliĝantaj kaj poste vastiĝantaj laŭ aero ĝis plena kunfandiĝo kun aerspaco de nokta aŭtuna strato.

Ne eblas eterne stari apud dompordo kaj fumi. Nun aŭ iom pli poste necesos iri reen, en apartamenton. Estu tiel, ankoraŭ unu eta animstreĉo, nur unu vica animstreĉo. Kioma, se kalkuli ilin? Kial ne eblas eliri el domo kaj transpaŝi sojlon en novan vivon, en tute alian tagon, en tute aliajn kondiĉojn?

Fuminte tri cigaredojn unu post alia, farinte tiun animstreĉon, homo en griza pulovero reeniris domen. Lifto. Ŝlosiloj. Serurtruo. En antaŭĉambro de apartamento mallumas. En la halo lumo estas ŝaltita. Ĉu estas ankoraŭ iu ĉi tie?

Homo en griza pulovero turnis sin direkte al kuirejo, frapinte per enirpordo. Li metis teujon sur fajron de gazfornelo. Daŭre trinki vinon aĉas. Krano. Akvo. Gaso. Aŭtomate ŝovinte la manon en supran ŝranke-ton, la homo eligas kruĉon. En kruĉo estas nenio. Ĉu ja estas ankoraŭ iu en la apartamento? Ĉu ja estas bezonata ankoraŭ iu?

Pluvo batas kontraŭ fenestrojn. Hieraŭ venis aŭtuno. Ekblovis vento. Folioj ne sukcesis lasi branĉojn ĝustatempe kaj nun pendas verdaj de sur arboj. Estas strange konscii, ke ili suferas sub frida vento kaj pluvo. Sed ne eblas ilin ne kompati.

Se dividi spacon je du rezultigoj du duonoj. Se dividi spacon je tri rezultigoj tri trionoj. Sed ja eblas tute ne dividi spacon, kaj tiam restos io kompleta, kiel unuo.

Varma teo brogis la langon. Verŝajne ĝuste pro tio, iuj enverŝas en ĝin lakton.

Horloĝo montras la duan horon. Mallumas. Eĉ se baldaŭ mate-niĝos, la urbo restos mergita en mallumon: ĉielo estas ŝirmita de nuboj kaj restos sama dum kelkaj ontaj monatoj. Necesas simple alkitimiĝi. Poste tio eĉ plaĉos. Poste ne plu eblos vivi sen tiu malserena nuba vualo. Tion necesus oficiale trakti kiel specon de dependeco – tiun bezonon ekzisti sub peza, griza, malserena ĉielo.

En halo ekaŭdiĝis brueto. Iu penas enŝovi piedojn en hejmajn pantoflojn: tio distingeblas laŭ specifa sono de surpargeta glitado far plandumo sub movoj de piedfingroj. Tamen ĉi tie iu estas. Kaj do la spaco estas dividita en du partojn, ĝi konsistas el du duonoj.

Se demandi iun el vi, ĉu vi sentas veran feliĉon ĉiun sekundon ĉiun tagon de la jaro, kion vi respondos? Ke io simila estus simptomo de skizofrenio aŭ iu alia mensa malsano, kies ĉeesto, eble, ne timigas komence, sed poste certe vekos timon, kiu poiomete kreskos en panikon. Se ni opiniu, ke absolute feliĉa homo kapablas paniki.

Paŝoj en la koridoro. La pantofloj tamen estis sukcese surmetitaj. En grandega spegulo, kovranta la tutan muron, ekglitis spegulbildo, ombro en silka negliĝrobo de krema koloro. Io tia, kion en filmoj oni montras sen vizaĝo, por fiksi atenton de la spektantoj sur strukturo de ŝtofo, sur movoj, sur detaloj. Ni vidas ordigitajn malhelajn harojn, fajn-nan longan kolon, linion de talio, larĝiĝantan ĉe femuroj. Kaj lanugajn blankajn pantoflojn.

Puloverulo staris ĉe fenestro kun kruĉo en la manoj. Ombro en silko vidis nur lian dorson. Vizaĝoj mankas. Ni ne vidas ilin. Mola tapiŝo forglutis sonon de la paŝoj. Se, certe, ombro scipovas eligi sonojn. Ŝi paŝis sur tapiŝon kaj malrapide glitis super vilo. Se ni ne vidas la vizaĝojn, ĉu ni povas tamen vidi la okulojn? Verdire, ordinare ni vidas nur la okulojn. Tio estas vero. Ni rigardas en la okulojn, do ni vidas la okulojn, ĉion alian nia cerbo alpenstras – tia estas ĝia tasko. Vi ja scias, ke eblas rigardi, sed ne vidi, ĉu? Tiel okazas: la rigardo estas direktita al iu objekto, sed en kapo aperas tute alia bildo, tio estas ne rekta respegulo de la okula ekrano, sed io modlita de cerbo sen via permeso.

Nun povus ektondri pafo. Povus ĉesiĝi ies vivo. Kaj tiam tute ne gravus, ĉu estis la vizaĝoj. Ne estis pafo. Same kiel ne estis la vizaĝoj. Ĉu vi pensas, ke mi trompas vin? En tiu nokto, kiam falis pluvo, kiam estis dua tago de aŭtuno, kaj kiam folioj restis pendi de sub arboj, en apartamento ĉe loĝkvartalo sur rando de urbego trovis sin du homoj sen vizaĝoj. Kapo kvazaŭ pura tolo: estas nenio el tio, kion ni alkutimiĝis trakti kiel partojn de vizaĝo – nek oreloj, nek buŝoj, nek nazoj. Ili havis nur okulojn, kadritajn per arkoj de brovoj kaj de longaj densaj okulharoj. Dio misis, kiam kreis por homo buŝon kaj orelojn. Kiam ili mankas, buŝo ne povas eligi banalaĵojn, kaj oreloj ne povas ilin aŭdi.

Kiam oni alkutimiĝas komuniki per rigardoj, la okuloj perdas kapblon trompi. Kaj same okazis kun tiuj du. Ĉu vi memoras historiojn pri magia lumo, kiu torente fluas de okuloj, kvazaŭ ili estas du truoj en Brilan Universon, tra kiuj lumo de malproksimaj steloj, kunfluanta en unu solan koncentritan radion trovas sian eliron en tiuj du abismoj? Abismo. Ĉu eblas kredi, ke okuloj iĝis abismo? Sed rigardinte en ilin vi dronis, falis kaj flugis tra pensoj, tra esenco, tra animo de ilia posedanto? Absoluta sincero. Absoluta vero. Se, certe, en tia situacio daŭre aktualas nocioj de vero kaj malvero.

Puloverulo turnis kapon. En okuloj de la silka ombro ŝvebis amo. La vojaĝo en sin finiĝis. Puloverulo eliris nur por fumi, nur por reveni. Reveni al si mem kaj al la silka ombro.

Баварське забуття

Юра Проскура
Україна

Відень. За п'ятнадцять хвилин десята вечора. Місяць спостерігає відквітання життя у столиці Австрії, бачить втомлений рух австрійців на «Фольксвагенах», кудись у бік Братислави, помічає весь час цікавих людей, що прямують бозна-куди вузькими вулицями. Місто готується до сну. Дехто готується до ремонту автобанів (тут працюють над рихтуванням автотрас переважно вночі, щоб на ранок усе блищало).

Лише дві години тому я прилетів до Відня. Хоча, дві години, виявляється, забагато. Тобто, до вокзалу я дістався, але дорогою встиг побитися з п'яницями, посваритися з контролером у метро, виторгувати мандаринку в турецькому магазині, півмільйона раз нагадати світу, що я українець, та поїсти дешевої шаурми. Тепер от сиджу у привокзальному «Старбаксі», чекаю на Марію.

Маємо два квитки до Гамбурга. По-перше, там живуть наші спільні друзі, по-друге, я люблю великі міста та річки (Гамбург — велике місто, яким протікає річка), по-третє, Марія пообіцяла мені, що зводить на рок-концерт. Відмовити я не зміг, ще й квитки на потяг я отримав безкоштовно, назвемо це онуцтвом льгот для українських мігрантів. Поки чекав на Марію, думав про різні, на мою думку, цікаві речі і писав вірші. Натхнення було, надихали мене люди з різнокольоровими валізками. Куди прямують вони? Яка мета їх подорожей? Які думки в їхніх головах? Що в них за душею? Якщо уважно дивитися на людину, можна багато зрозуміти. Очима можна побачити серцебиття її болю, у розмові почути пробоїни в її душі, за дотиками зрозуміти, що їй від тебе треба.

Марія прибула за півгодини. Принесла гральні карти, книжку з віршами (на жаль, автора вже було не впізнати), і якийсь

дешевий алкоголь. До алкоголю я ставлюся оригінально. Сам не п'ю, але люблю, коли п'ють інші. Чесними стають. Тому, пляшці цієї рідини я дуже зрадів (потім з'ясувалося, що це кріпле-не вино). Марія мала типове для себе вбрання. Чорна спідниця, «Мартінси», жовтий пуховик та битий роками капелюх, не знаю, якого він кольору. Схоже на червоний. Колись, це точно був червоний.

Об одинадцятій сорок, сіли на потяг. Їхати нам 13 годин. Хоча, знаючи Марію, впевнений, що ми вийдемо у Мюнхені та пробудемо день там і після знайомства з духами та стригами Баварії, поїдемо далі, до Гамбурга. Десь поряд із Лінцом вона відкоркувала вино — пішов аромат дешевого алкоголю. Марія повеселішала. Почала розпитувати про життя, я невміло переводив тему, це не залишилося непоміченим. Марія дуже вміло читає людей, відчуває, що ховають від неї, у повітрі винюхує твій біль та, наче шеф-кухар, за запахом розуміє, що тут не так, чим хворіє серце і чим забито мозок та душу твою. Розумна жінка. Тактично вибила словами всі мої думки з мене, забрала собі, як книжку з бібліотеки. Казала: «Не бентежся, скоро віддам». І віддавала. Віддавала мені мої думки, зі своєю редакцією. Після цього вони не болять. У відповідь на подяку посміхалася. Посміхалася так, що за це також хотілося подякувати. І не тільки їй, а й усім богам яких я знаю.

З Марією я знайомий давно, дуже давно. Разом вчилися в школі, потім подорожували, воювали з усім світом і, тому, захищали переможений нами світ від зла та шкідливих звичок. Якщо коротко, то життя без неї я не пам'ятаю.

Марія допивала вино. Почалась вистава у нічному вагоні (чомусь, майже порожньому). Я намагався її зупинити, попросити, щоб не показувала свої таланти, хоч на цей раз, та коли вона почала читати вірші вголос, мені перехотілося зупинити її. Читала Марія неймовірно. Настільки неймовірно, що на третьому вірші з вагона пролунало прохання — «читай ще, Маріє! Читай! Не зупиняйся!». Готові були благати її. На жаль, на дев'ятому вірші я заснув. Друга ночі. Розбудила мене сварка

моєї супутниці з прикордонником. Вирішив спитати про те, що сталося. Отримав ляпаса від Марії. «Мовчи, — каже, — старші розмовляють.». Затих, почав слухати. Говорили вони про дружину прикордонника. Поцікавитись, чому мова йде саме про це, я побоявся. За півгодини прикордонник пішов геть, заплаканий та дуже вдячний. Біда була в тому, що паспорт Марічка не хотіла діставати, більше хотілося їй поговорити. У поглядах, спрямованих на неї, читалося, що вона не просто зірка вагону, вона — королева всього потягу. Але, о третій ранку, в Мюнхені, вимушена була королева полишити своє королівство. Хтось на прощання поклав їй у кишеню двадцять євро, інші просто аплодували.

Ніч брутално лежала на Мюнхені, накриваючи собою будівлі. Темрява жила між будинками, під зачиненими магазинами, біля смітників. Тут усе тобі погрожувало. Всюди сиділи жахливі створіння, зароджені нічним повітрям і місячним сяйвом у спільній лабораторії. Навіть асфальт і рейки виглядали так, ніби намагаються забрати твою душу. Ковтнути її та віками перетравлювати.

«Доїдемо потім» — сказала мені Марія, посміхнулась і дала, що треба ще випити або йти спати. За п'ять хвилин ми спали. На вокзалі, в обіймах одне одного. Розуміли, що нікого дорожче на світі немає. Розуміли, що більше нікого нам не треба. Коли вона поряд, мене не лякають ні привиди, ні тигри, ні, навіть, сама смерть.

Снилися мені поля України. Мабуть, це те, що сниться мігрантам. Мабуть, саме там, гуляють ночами українці, там читають листи, там наспівують народні пісні, як на футбольних матчах. Ніхто не знає, що буде завтра; не кожен згадає, що було сьогодні, але всі продовжують співати свої патріотичні пісні, продовжують любити, продовжують ненавидіти.

Bavara forgeso

Iura Proskura

Ukrainio

Vieno, dek kvin minutoj antaŭ la dudekdua. La luno kontemplas la floradon de la vivo en la ĉefurbo de Aŭstrio, observas la lacan movadon de aŭstroj en iliaj *Volkswagen*, ie en la direkto de Bratislavo, ĉiam rimarkas interesajn homojn irantajn ien sur la mallarĝaj stratoj. La urbo pretiĝas al dormo. Iuj prepariĝas por renovigi aŭtovojojn (ĉi tie oni laboras pri rektigo de vojoj ĉefe nokte, por ke ĉio brilu matene).

Mi flugis al Vieno antaŭ nur du horoj. Tamen, du horoj ŝajnas esti tro por mi. Fakte mi alvenis al la stacidomo, sed survoje havis tempon batali kun ebruloj, kvereli kun kontrolisto en la metroo, marĉandi pri mandarino en turka vendejo, rememorigi al la mondo por la duonmiliono fojo, ke mi estas ukraino, kaj manĝi malmultekostan ŝavarmon. Nun mi sidas en la stacidoma *Starbucks*, atendante Marian.

Ni havas du biletojn al Hamburgo. Unue ĉar niaj komunaj amikoj loĝas tie. Due ĉar mi amas grandajn urbojn kun riveroj (Hamburgo estas granda urbo tra kiu fluas rivero). Trie ĉar Maria promesis al mi, ke ŝi kondukos min al rokkoncerto. Mi ne povis rifuzi, des pli ke mi ricevis la trajnbiletojn senpage, ni nomu tion privilegio de ukrainaj migrantoj. Atendante Marian, mi pensis pri diversaj miaopinie interesaj aferoj kaj verkis poemojn. Mi estis inspirita de homoj kun buntaj valizoj. Kien ili iras? Kio estas la celo de iliaj vojaĝoj? Kiaj pensoj en iliaj kapoj? Kio estas en ilia menso? Se vi atente rigardas homojn, vi povas kompreni multon. Per viaj okuloj, vi povas vidi la korbatojn de ilia doloro. En konversacio aŭdi la truojn en ilia animo. Per tuŝo kompreni, kion ili bezonas de vi.

Maria alvenis post duonhoru. Ŝi alportis ludkartojn, libron de poemoj – bedaŭrinde kun aŭtoro nereconebla – kaj iom da malmultekosta alkoholaĵo. Mi havas nekutiman sintenon al alkoholo: mi ne drinkas mem, sed ŝatas kiam aliaj drinkas. Ili fariĝas honestaj. Tial mi estis tre

feliĉa kun la botelo de ĉi tiu likvo (kiu poste evidentiĝis esti forta vino). Maria havis siajn tipajn vestaĵojn: nigra jupo, “Dr. Martens” botoj, flava duonvesto kaj ĉapelo portita de jaroj. Mi ne scias, de kiu koloro ĝi estas. Ŝajnas esti ruĝa. Iam, ĝi certe estis ruĝa.

Je la dudektria kaj kvardek, ni eniris la trajnon. La vojaĝo daŭros 13 horojn. Tamen, konante Marian, mi certas, ke ni eltrajniĝos en Munkeno por pasigi tagon tie, kaj koninte la parfumojn kaj barbirojn de Bavario, ni iros al Hamburgo. Ne for de Linz, Maria malŝtopis la vinbotelon – flareblis aromo de malmultekosta alkoholo. Maria gajiĝis. Ŝi decidis enketi pri mia vivo. Mi mallerte ŝanĝis la temon, sed tio ne estis nerimarkita. Maria tre lerte tralegas homojn, sentas kion ili klopodas kaŝi al ŝi. Ŝi flaras vian doloron en la aero kaj, same kiel ĉefkuiristo, ŝi komprenas flare kio estas malĝusta, kio dolorigas vian koron kaj kio ŝtopas vian cerbon kaj animon. Saĝa virino. Ŝi takte eltiris ĉiujn miajn pensojn per vortoj, forprenis ilin kiel libron el la biblioteko. Ŝi diris: “Ne maltrankviliĝu, mi baldaŭ redonos ilin.” Kaj redonis. Ŝi redonis al mi miajn pensojn, de ŝi redaktitaj. Post tio, ili ne plu doloras. Ŝi ridetis responde al la danko. Ŝi tiom ridetis, ke ankaŭ pri tio mi volis danki ŝin. Kaj ne nur ŝin, sed ĉiujn diojn de mi konataj.

Mi konatiĝis kun Maria antaŭ longa tempo, tre longa tempo. Ni studis kune en la lernejo, poste vojaĝis, batalis kontraŭ la tuta mondo, kaj poste protektis la de ni venkitan mondon kontraŭ malbonaj kaj neutilaj kutimoj. Resume, mi ne memoras la vivon sen ŝi.

Maria fintrinkis sian vinon. Ŝia spektaklo komenciĝis en la nokta vagono (ial ĝi estis preskaŭ malplena). Mi provis haltigi ŝin, peti ŝin, ke ŝi ne montru siajn talentojn, almenaŭ ĉi-foje. Sed kiam ŝi komencis laŭtlege poemojn, mi ne plu deziris haltigi ŝin. Maria legis nekredible bone. Estis tiel nekredible, ke je la tria poemo aŭdiĝis peto el la vagono – “legu plu, Maria! Legu! Ne haltu!” Ili estis pretaj petegi ŝin. Bedaŭrinde mi ekdormis je la naŭa poemo. Je la dua matene. Vekis min la kverelo de mia kunvojaĝantino kun la limgardisto. Mi demandis pri kio okazas. Maria respondis per vangofrapo. “Silentu, kiam parolas la pliaĝuloj”, ŝi diris. Mi obee silentiĝis kaj do aŭskultis. Ili parolis pri la edzino de la limgardisto. Mi elektis ne demandi kial. Post duonhoro, la limgardisto foriris ploranta kaj tre dankema. La problemo estis, ke

Maria ne volis repreni sian pasporton, ŝi volis interparoli pli. En la rigardoj al ŝi, oni povis legi, ke ŝi ne estis nur la stelo de la vagono, ŝi estis la reĝino de la tuta trajno. Sed, je la tria matene, en Munkeno, la reĝino devis forlasi sian regnon. Iu adiaŭis ŝin metante en ŝian poŝon dudek eŭrojn, aliaj simple aplaudis.

La nokto abrupte kuŝiĝis super Munkeno, kovrante ĉion tie konstruitan. Mallumo instaliĝis inter domoj, sub fermitaj butikoj, apud rubuoj. Ĉio estis minaca ĉi tie. Ĉie sidis teruraj estaĵoj, naskitaj de nokta aero kaj lunlumo en komuna laboratorio. Eĉ la asfalto kaj reloj aspektis kvazaŭ ili provis ŝteli vian animon. Gluti ĝin kaj digesti ĝin dum jarcentoj.

“Ni alvenos tien baldaŭ”, Maria diris al mi, ridetis kaj aldonis, ke ni devus ĉu trinki alian trinkaĵon ĉu enlitiĝi. Post kvin minutoj ni dormis, en la stacidomo, en la brakoj unu de la alia. Ni komprenis, ke neniu estas pli valora en la mondo. Ni komprenis, ke ni bezonas neniun alian. Kiam ŝi estas apud mi, mi ne timas fantomojn, tigrojn aŭ eĉ morton mem.

Mi sonĝis pri la kampoj de Ukrainio. Ŝajne, pri tio sonĝas migrantoj. Eble, tie ukrainoj promenas nokte, legas leterojn, kantas popolkantojn, kiel dum futbalaj matĉoj. Neniu scias, kio okazos morgaŭ. Iuj ne memoros pri kio okazis hodiaŭ, sed ĉiuj daŭre kantas siajn patriotajn kantojn, daŭre amas, daŭre malamas.

L'ultimo viaggio di Cesare

Emanuela Pellicciaro

Italia

Cesare amava la notte. Quando calava il buio, c'erano poche persone in giro, e anche di automobili e mezzi pubblici ne passavano pochi. Sempre troppi, secondo Cesare, che preferiva la tranquillità alla confusione, le strade semideserte della notte al traffico diurno.

Non amava particolarmente il quartiere romano nel quale viveva, non perché avesse qualcosa contro di esso, semplicemente perché aveva vissuto per strada praticamente da tutta la vita, spostandosi di tanto in tanto di zona in zona, senza affezionarsi mai più di tanto a un luogo.

Quella notte Cesare aveva deciso di spostarsi nuovamente. Un po' gli dispiaceva. In quel quartiere aveva trovato brava gente che ogni tanto gli portava qualcosa da mangiare. Purtroppo aveva altresì trovato persone poco raccomandabili che una notte avevano tentato di dargli fuoco con un accendino.

Era ora di cambiare zona.

Quella, forse, non era esattamente la notte giusta per spostarsi. Il cielo era plumbeo e minacciava pioggia. E Cesare odiava la pioggia. Ma preferiva non rimandare oltre, tanto avrebbe potuto cercare rifugio sia una volta arrivato sia durante il viaggio. Gli sarebbe bastato un cornicione sotto il quale ripararsi, o un portone aperto nel quale infilarsi.

Così, quando ormai la maggior parte dei negozi erano chiusi e nelle strade rimanevano i pochi nottambuli come lui, Cesare iniziò il suo viaggio, camminando a passo spedito verso una nuova meta ignota.

Ogni tanto si fermava a rovistare in qualche secchio dell'immondizia alla ricerca di cibo, per poi ripartire una volta messo qualcosa sotto i denti. Non era schizzinoso, mangiava qualunque cosa fosse commestibile. A volte, se non trovava nulla nei secchi e nessuno gli portava qualcosa da mangiare, per placare la sua fame si accontentava anche di

mangiare topi o insetti. La vita di strada era così, doveva adattarsi per sopravvivere.

Mentre percorreva le strade di Roma poco affollate, Cesare si guardò intorno con curiosità, valutando i luoghi, la gente che ancora girovagava, magari in gruppi, ridendo e schiamazzando, il traffico... Sperava di trovare un luogo un po' tranquillo dove stabilirsi, almeno per un po'.

Era ormai notte fonda quando Cesare vide un branco di cani randagi ad alcuni metri di distanza. Lui odiava i cani, ne aveva il terrore. L'ultima cosa di cui aveva bisogno era finire sbranato da cani inferociti che volevano proteggere il loro territorio. Come se Cesare volesse appropriarsi del loro territorio.

A ben pensarci, i cani non erano poi così diversi da alcuni umani. Anche loro si univano in branchi e si facevano la guerra per difendere il loro territorio. Mah.

A Cesare non interessavano tutte queste lotte, lui voleva solo vivere in pace e non morire di fame. Tutto il resto, per lui, era superfluo.

Per evitare il branco di cani, Cesare si infilò in un vicolo e accelerò il passo, sperando di sbucare in una strada tranquilla, e soprattutto priva di cani feroci. E magari non in un vicolo cieco.

I vicoli che stava percorrendo erano un po' un labirinto, ma alla fine Cesare riuscì ad uscirne. Nessun cane in vista, per sua fortuna.

Ormai mancava poco all'alba, e stava iniziando a piovicciare, così Cesare si guardò intorno alla ricerca di un posto dove potersi rifugiare.

Dall'altra parte della strada, vide un portone situato sotto una fila di balconi, che erano perfetti per proteggere l'area sottostante dalla pioggia, quindi Cesare si diresse lì e si fermò a riposare sugli scalini che conducevano al portone.

Fece appena in tempo, perché poco dopo iniziò a piovere a dirotto. Per fortuna l'acqua non arrivava lì sotto, così Cesare si strinse più che poté su se stesso per mantenersi al caldo, e si addormentò.

Dopo un po' la città iniziò a svegliarsi, e la gente iniziò a uscire di casa per andare a lavorare o a scuola.

Anche da quel portone, dove stava ancora sonnecchiando Cesare, iniziarono a uscire diverse persone, che gli rivolsero a malapena uno sguardo, per poi correre via, ombrelli spiegati, verso le loro destinazioni.

A un certo punto, da quel portone uscirono una donna e una bambina di circa 10 anni. La bambina lo guardò, lo guardò veramente, non come avevano fatto tutti gli altri fin ora.

Donna e bambina – madre e figlia – salirono in macchina e partirono. La bimba disse: “Mamma, l’hai visto?”

“Sì, tesoro”, rispose la donna.

“Sta piovendo! Si bagnerà tutto! E avrà anche fame. Possiamo portarlo a casa con noi?”

“Facciamo così, ora ti accompagno a scuola e passo a comprare qualcosa da mangiare. Se quando torno a casa è ancora lì, vediamo se vuole venire a casa con me. Ma non ti prometto niente, probabilmente ha vissuto in strada fino ad ora, magari è uno spirito libero. Se viene con me, poi vediamo se decide di rimanere, OK?”

“OK”, acconsentì la bimba, speranzosa.

Come stabilito, dopo aver accompagnato la figlia a scuola e aver comprato un po’ di cibo, la donna tornò a casa. Cesare era ancora lì, così la donna gli chiese: “Hai fame? Vuoi qualcosa da mangiare?”

Cesare la guardò con interesse e si alzò in piedi.

“Andiamo, scommetto che sei affamato. Vieni, seguimi”, insistette la donna, aprendo il portone e lasciandolo aperto in un chiaro invito.

Cesare era un po’ diffidente, ma la donna sembrava avere buone intenzioni, così la seguì fino al suo appartamento, al primo piano.

Una volta entrati, la donna aprì una scatola di cibo appena acquistato, lo mise in un piatto e lo porse a Cesare, che lo mangiò avidamente, per la gioia della sua benefattrice.

“A mia figlia Sara sei piaciuto subito”, gli disse la donna. “Che ne dici di restare a vivere con noi? Non ti faremo mai mancare cibo e cure, e potrai dormire al sicuro e all’asciutto. Allora, che ne dici?”

Cesare la guardò e ci rifletté. Alla fine decise che non aveva nulla da perdere. Era stanco di vivere in strada, alla mercé di delinquenti e cani feroci, sempre affamato, in balia dei capricci del tempo. Era ora di stabilirsi con qualcuno che potesse prendersi cura di lui.

Così guardò la donna e miagolò in assenso.

“Spero che sia un sì”, gli disse la donna, accarezzandolo. “Sara ne sarà davvero felice. Vai pure ad esplorare la casa, io intanto sbrigo un

po' di faccende. Più tardi, quando vado a riprendere Sara a scuola, passo a comprarti altro cibo in scatola, croccantini, una cuccia e un tiragraffi. Non fare che poi scappi appena ne hai la possibilità, OK? A Sara dispiacerebbe molto. Va bene, vai, esplora!"

Cesare fece proprio questo. Esplorò un po' la casa, poi, sazio e stanco, salì sul divano del salone, si acciambellò e si addormentò.

Aveva fatto bene a cambiare nuovamente zona, pensò il gatto. Dopo tanti viaggi notturni in cerca di un luogo migliore, forse aveva finalmente trovato quello giusto, un posto da chiamare casa, dove poteva vivere al sicuro e amato.

Ora poteva smettere di viaggiare, e poteva lasciarsi il passato, fatto di pericoli e stenti, alle spalle. Non poteva chiedere di più.

E sperava che quello fosse stato davvero il suo ultimo viaggio.

La lasta vojaĝo de Cezaro

Emanuela Pellicciaro

Italio

Cezaro ŝatis nokton. Kiam ne estis lumo, malmultaj homoj vagadis surstrate kaj ankaŭ malmultaj aŭtoj kaj publikaj transportiloj pasis. Tro multnombraj, opiniis Cezaro, kiu preferis la trankvilon al la konfuzo, la duon-malplenajn noktajn stratojn al la dumtaga trafiko.

Li ne aparte ŝatis la kvartalon de Romo en kiu li vivis, ne ial aparte, simple ĉar li pasigis preskaŭ sian tutan vivon surstrate, moviĝante de tempo al tempo, sen vere al kutimiĝi al unu specifa loko.

Tiun nokton, Cezaro decidis denove translokiĝi. Li ne tre ĝojis pri tio. En tiu kvartalo, li konis bonajn homojn, kiuj kelkfoje donis al li manĝaĵon. Malfeliĉe, li trovis ankaŭ malrekomendindajn personojn, kiuj unu nokton provis incendiigi lin per fajrilo.

Alvenis tempo translokiĝi.

Eble tio ne estis precize la plej bona punkto por moviĝi. Estis nuboj en la ĉielo kaj pluvo minacis. Cezaro malŝatis pluvon. Sed li preferis ne plu prokrasti. Li povus serĉi rifuĝejon ĉu surloke, ĉu dum la vojaĝo. Sufiĉus al li kornico sub kiu kaŝiĝi, aŭ malfermita pordo, tra kiu li povus enŝoviĝi.

Do, kiam la plejmulto de la butikoj jam estis fermitaj, kaj restis surstrate nur kelkaj noktemuloj kiel li, Cezaro komencis sian vojaĝon, vigle paŝante al nova nekonata celo.

De tempo al tempo li haltis por traserĉi rubujojn celante ion por manĝi, kaj manĝinte poste reekiris. Li ne estis elektema, akceptante ĉion manĝeblan. Kelkfoje, se li ne trovis ion en la rubuoj kaj neniu donis al li manĝaĵon, li kvietigis sian malsaton per musoj aŭ insektoj. Tia estas surstrata vivo, oni devas adaptiĝi por pluvivi.

Dum li pasis sur la senhomaj stratoj de Romo, Cezaro scivoleme ĉirkaŭrigardis, taksante la lokojn, la homojn (kiuj ankoraŭ vagadis, kelkfoje en grupoj, ridante kaj bruante), la trafikon... Li esperis trovi iom trankvilan lokon por loĝi, almenaŭ portempe.

Estis jam tre malfrue, kiam Cezaro ekvidis grupon de vagantaj hundoj kelkajn metrojn for. Li malamis hundojn, ili timigis lin. La lasta afero, kiun li bezonis, estis vundiĝi pro ferocaj hundoj, protektantaj sian teritorion. Kvazaŭ Cezaro volus preni ilian teritorion...

Fakte, hundoj ne estas tiom malsamaj ol iuj homoj. Ankaŭ ili grupiĝas kaj batalas por defendi sian teritorion. Nu.

Cezaro ne interesiĝis pri tiaj bataloj, li simple volis vivi en paco kaj ne morti pro malsato. Ĉion alian li taksis superflua.

Por eviti la hundaron, Cezaro eniris en strateton kaj rapidigis la paŝon, esperante veni al iom pli trankvila kaj, ĉefe, senhunda strato. Kaj laŭeble ne fini en senelira aleo.

La aleoj, kiujn li trairis, iom labirintis, sed fine Cezaro sukcesis trovi eliron. Neniu hundo en videbla distanco, bonŝance por li.

Estis preskaŭ sunleviĝo kaj komencis pluveti, tial Cezaro serĉis lokon por rifuĝi.

Trans la strato, li vidis pordon sub vico de balkonoj, kiuj estis perfektaj por protekti de la pluvo ĝian malsupran areon. Cezaro iris tien kaj haltis por ripozi sur la ŝtupoj kondukantaj al la pordo.

Ĝustatempe, ĉar kelkajn minutojn poste forte ekpluvegis. Je lia feliĉo, la akvo ne alvenis tien suben, do Cezaro kunpremis sin kiel eble plej multe, por resti varma, kaj finfine endormiĝis.

Post iom da tempo la urbo ekvekiĝis kaj homoj komencis forlasi siajn hejmojn por iri al laborejo aŭ lernejo.

Eĉ el tiu pordo, antaŭ kiu Cezaro ankoraŭ dormis, komencis eliri diversaj homoj, kiuj apenaŭ ĵetis al li rigardon, kaj poste forkuris, kun ombreloj etenditaj, al siaj destinoj.

Fine, el tiu pordo eliris virino kaj pli-malpli dekjara knabino. Cezaro estis rigardata de la knabino, vere rigardata, ne kiel de ĉiuj aliaj ĝis nun.

Virino kaj knabino – patrino kaj filino – eniris en la aŭton kaj forveturis. La knabino diris: “Panjo, ĉu vi vidis?”

“Jes, kara”, respondis la virino.

“Pluvegas! Tiu tute malsekiĝos! Kaj ankaŭ probable malsatas. Ĉu ni povas kunporti ĝin hejmen kun ni?”

“Ni faru tiel. Nun mi akompanos vin al la lernejo kaj poste iros aĉeti mangajon. Se li ankoraŭ estas tie, kiam mi revenos hejmen, ni vidos,

ĉu li volas veni hejmen kun mi. Sed mi nenion promesu al vi. Verŝajne li ĝis nun loĝis surstrate, eble li estas libera spirito. Se li venos kun mi, tiam ni vidos ĉu li decidus resti, ĉu bone?”

“Bone”, konsentis la knabino, esperplena.

Kiel interkonsentite, la virino akompanis la filinon al la lernejo, aĉetis iom da manĝaĵo kaj revenis hejmen. Cezaro ankoraŭ estis tie, do la virino demandis: “Ĉu vi malsatas? Ĉu vi volas ion por manĝi?”

Cezaro rigardis ŝin kun intereso kaj ekstaris.

“Ni iru, mi kredas, ke vi malsatas. Venu, sekvu min”, insistis la virino, malfermante la pordon kaj lasante ĝin malfermita kiel klara invito.

Cezaro estis iom malfidema, sed la virino ŝajnis havi bonajn intencojn, do li sekvis ŝin al ŝia apartamento, ĉe la unua etaĝo.

Enirinte, la virino malfermis skatolon de ĵus aĉetita manĝaĵo, metis ĝin sur pladon kaj donis al Cezaro, kiu manĝis avida, kio ĝojigis lian bonfaristinon.

“Vi tuj plaĉis al mia filino Sara”, diris la virino. “Kion vi opinias pri restado kun ni? Ni neniam lasos vin malsata kaj neprizorgita, kaj vi povos dormi varme kaj sekure. Do kion vi pensas?”

Cezaro rigardis ŝin kaj pensis pri tio. Fine li decidis, ke estas nenio por perdi. Li estis laca vivi surstrate, atakebla de krimuloj kaj ferocaj hundoj, ĉiam malsata, lasita al la kaprico de la vetero. Estis tempo por fiksiĝi kun iu, kiu pretus zorgi pri li.

Do li rigardis la virinon kaj miaŭis konsente.

“Mi esperas, ke tio signifas jes”, diris la virino, karesante lin. “Sara vere tre ĝojos pri tio. Iru esplori la domon, mi intertempe iom purigos. Poste, kiam mi prenos Saran el la lernejo, mi haltos por aĉeti pli da enladigitaj manĝaĵoj, krakmanĝaĵon, katnecesejon kaj skrapilon. Ne profitu forkuri kiam vi havos la eblon, ĉu bone? Sara tiam tre tristus. Bone, iru, esploru!”

Cezaro faris ĝuste tion. Li iom esploris la domon, kaj poste, sata kaj laca, li grimpis sur la sofona de la salono, kunruliĝis, kaj li endormiĝis.

Estis bona decido ŝanĝi kvartalon, pensis la kato. Post tiom da noktaj vojaĝoj serĉante pli bonan lokon, li finfine trovis la ĝustan por vivi, nomi ĝin hejmo, kie li vivos sekure kaj amate.

Nun li povis ĉesi vojaĝi, kaj lasi post si la pasintan, danĝeran kaj mizeran surstratan vivon. Li ne povis postuli pli.

Kaj li esperis, ke tio vere estis lia lasta vojaĝo.

Ultima corsa

Mauro Barbetti

Italia

Faccio spesso l'ultima corsa, quella del 42, che termina alle nove e trenta.

Molti colleghi la odiano.

Odiano il fatto di girare per una città semivuota mentre tutti se stanno ormai al caldo delle quattro mura domestiche, odiano l'umidità che spira dal mare a tarda ora e ti si infila dentro la giacca, odiano di finire il giro in uno squallido quartiere periferico di una città in piena recessione.

A me invece piace l'ultima corsa.

Sarà che non soffro l'umidità, né il buio o il silenzio e che odio, anzi, il rumore e il caos cittadino all'ora di punta.

Sarà poi che non c'è più nessuno che mi aspetti nell'appartamento che ho preso in affitto da quando ho vinto il concorso in Azienda, un appartamento che speravo di dividere con lei, transitata in queste quattro mura per qualche mese, senza lasciare di sé, né abiti, né quadretti, né chiodi per fissarli su.

L'unico chiodo rimasto mi si è conficcato dentro, ma passerà anche quello, prima o poi.

Il capolinea del 42 si trova nella piazza principale del quartiere, una di quelle piazze nate per favorire l'aggregazione, la partecipazione, il sentirsi parte di una stessa comunità.

Per lo meno questo nelle intenzioni del progettista.

A fondo piazza c'è la chiesa, un brutto edificio di cemento armato dalle forme tortili lanciate contro il cielo, nulla che sembri accordarsi all'idea di una fede sicura e piena di speranze, più facile pensarlo come effimero baluardo di una fede tormentata, la fede di questo periodo difficile in cui le distanze tra uomo e Dio sembrano aumentare, inficiate da qualche disturbo di trasmissione, da segnali sempre più deboli e precari.

Sul lato destro sorge invece il palazzo squadrato del Consiglio di Circoscrizione, frequentato di quando in quando da sparuti gruppi per incontri politici o culturali.

O viceversa, tanto le poche persone che vi partecipano sono sempre le stesse.

Sul lato opposto, invece, l'altro edificio religioso, di una religione apparentemente più gaia e promettente, il grande Centro Commerciale, che nonostante la crisi, ha sempre i suoi fedeli e i suoi riti manifesti fino all'ora di chiusura: le ventuno.

Quando arrivo io alle nove e trenta, di solito intravedo gli ultimi clienti svicolare dall'unica porta rimasta aperta per consentirne l'uscita, quella sul retro.

E intravedo lui che, all'arrivo del bus, prende da terra il suo cestino, volge le spalle al mondo e se ne va.

Sembra quasi che il suo commiato si porti dietro tutta la vita della piazza, che sprofonda di lì a poco, nella desolazione e nel silenzio.

È allora che metto il cartello FUORI SERVIZIO e riparto verso il deposito.

Per un lungo periodo lui è stato per me solo una consuetudine, una sorta di orologio che stabilisce il giusto ordine delle cose e la conclusione del mio turno di lavoro.

Poi una sera di settembre successe, mi spiegò che fu a causa di alcuni lavori in corso, che me lo ritrovai davanti lungo la via verso il deposito.

Non so perché lo feci, non sempre la vita è logica, in altri mille casi avrei tirato dritto come da regolamento.

Ma quella sera l'aria era tiepida e accattivante, io avevo due minuti d'anticipo sulla tabella di marcia o forse fui colto da quel senso di gratitudine che si deve ai punti fermi della propria vita.

Mi accostai e gli chiesi dov'era diretto.

Per arrivare a casa sua c'erano circa settecento metri e una minima deviazione sul mio percorso.

Lo invitai a salire e mi offrii di accompagnarlo a casa.

Fu lungo il tragitto che cominciò a narrarmi la sua storia.

Il bisogno di raccontarsi mordeva i freni.

Era un ex-ingegnere che aveva per anni lavorato ai pozzi petroliferi in giro per il mondo. Aveva avuto una moglie e un figlio, una bella casa fuori città e una vita serena per ciò che può esserlo una vita, con un lavoro gratificante che lo aveva portato in luoghi e latitudini diverse, dal Mare del Nord al Golfo del Messico, dagli Emirati Arabi al sud America.

Aveva apprezzato quella vita, a mezza strada tra stanzialità e nomadismo, tra stabilità e avventura.

Poi, come in un libro scritto male, l'evento che spezza l'ordine scontato delle cose: la moglie e il figlio erano morti in un incidente stradale.

Il resto diventò una caduta continua verso il basso, senza più la voglia o la possibilità di riprendersi.

Da quella sera presi la consuetudine di riportarlo a casa.

E pian piano le solite, note strade di città si trasformarono nelle mille vie del mondo: il vecchio mi raccontava storie di paesi in cui era stato, storie vissute o soltanto udite, storie lontane di deserti e mari che aveva attraversato.

Presi così ad aspettare con ansia la fine dell'ultima corsa, solo per ritrovarmi in quei mondi sconosciuti che si adattavano ai miei umori, mondi tristi per grigi giorni di pioggia o vividi e caldi, altre volte, come il sole dei tropici, mondi pieni di uomini buoni o cattivi, di donne sensuali o minimali a seconda dei destini.

Era diventato per me un momento speciale, l'unico che dava senso a quel mio mondo anonimo di passeggeri affrettati e giornate uguali.

Ma quella nostra consuetudine non passò inosservata, qualcuno fece una denuncia in ditta e mi comminarono un provvedimento di sospensione dal servizio per qualche settimana.

Quando poi ripresi i turni, inizialmente non mi riaffidarono l'ultima corsa del 42.

Devo ammettere che all'inizio mi sentii quasi sollevato: nessun conflitto ulteriore tra regola e sentimento, tra desiderio e dovere, dal momento che sapevo di non potermi più permettere quella deviazione sul percorso fisso della mia vita, a inseguire strade e storie lontane, chissà poi se reali o meno.

Tornato infine al turno solito, per diversi giorni non lo vidi al termine del mio giro.

Se n'è andato, mi risposero quando chiesi informazioni, l'avevano trovato morto una sera, lungo il percorso verso casa, solo come un cane, riverso accanto ad un portone.

Eppure, io continuo a vederlo, continuo a intuirne la presenza nella penombra dei portici e a immaginarlo che si alza al mio arrivo e si porta via tutta la vita dalla piazza.

Devo ammettere che non provo pietà per lui, non doveva essere gran che tirare avanti una vita così, forse starà molto meglio là, dove ora si trova.

Nutro invece un senso di gratitudine, gratitudine per averlo conosciuto, per i mondi che mi ha spalancato e per i visi incontrati dentro qualche angolo di terra a me sconosciuto, così diverso da quello che vedo nel mio viaggio sempre uguale, su strade percorse centinaia di volte, tra fermate predefinite e passeggeri, con il divieto di parlare.

Ma se non c'è più nessuno adesso a raccontarmi storie, a confortarmi con le parole e la fantasia, forse è giunto il momento di raccontarcele da solo, di prendere un foglio e di scrivermele da solo, quelle storie.

Comincerò stasera. Prenderò un foglio e una penna e la mia prima storia sarà la sua.

Lasta veturo

Mauro Barbetti

Italio

Mi ofte ŝoforas la lastan veturon, la 42, kiu finiĝas je la dudek-unua kaj duono.

Multaj kolegoj abomenas ĝin.

Ili abomenas la fakton vagi tra la duonmalplena urbo dum ĉiuj tiam estas en la varmo de la kvar hejmaj muroj. Ili abomenas la humidon, kiu blovas el la maro malfrue en la nokto kaj eniras en vian jakon. Ili abomenas fini la vojon en kaduka antaŭurbo de urbo en plena recesio.

Sed mi ŝatas la lastan veturon.

Eble estas ĉar mi ne suferas pro humideco, mallumo aŭ silento kaj ke mi malŝatas la bruon kaj kaoson de la urbo dum pinthoroj.

Eble ankaŭ estas tio, ke neniu atendas min en la apartamento, kiun mi luas de kiam mi gajnis la konkurson en la firmao. Apartamento, kiun mi esperis dividi kun ŝi, kiu pasis tra tiuj kvar muroj dum kelkaj monatoj, sen lasi ion, nek vestojn, nek kadrojn, nek najlojn por pendigi ilin.

La restanta najlo enŝoviĝis en min, sed ankaŭ tio pasos, frue-malfrue.

La finstacio de la linio 42 situas sur la ĉefplaco de la kvartalo, unu el tiaj placoj kreitaj por instigi al kunigado, partopreno, kaj sentiĝo esti en la sama komunumo.

Almenaŭ ĉi tio estis en la intencoj de la dezajnistoj.

Ĉe la fino de la placo troviĝas la preĝejo, malbela konstruaĵo de ferbetono kun torditaj formoj ĵetitaj kontraŭ la ĉielon. Nenio, kio ŝajnas kongrui kun la ideo de sekura kaj esperplena kredo. Pli facile pripensi ĝin kiel efemeran bastionon de turmentita kredo, la kredo de ĉi tiu malfacila periodo, en kiu la distancoj inter la homo kaj Dio ŝajnas kreski, infektita de iuj interferoj de transsendo, de signaloj ĉiam pli malfortaj kaj nefirmaj.

Dekstre staras la kvadrata palaco de la Distrikta Konsilio, frekventata de tempo al tempo de grupetoj por politikaj aŭ kulturaj kunvenoj.

Ĉiel, la malmultaj homoj kiuj partoprenas ĉiam estas la samaj.

En la kontraŭa flanko tamen estas la alia religia konstruaĵo, de religio ŝajne pli gaja kaj promesplena: la granda Komerca Centro, kiu malgraŭ la krizo, ĉiam havas siajn fidelulojn kaj siajn ritojn malfermitaj ĝis la fermhoru, la dudek-unua.

Kiam mi alvenas je la dudek-unua kaj duono, mi kutime ekvidas la lastajn klientojn, kiuj eskapas tra la nura pordo lasita malfermita por ebligi ilin eliri, tiu ĉe la malantaŭa flanko.

Kaj mi ekvidas lin, kiu, kiam la buso alvenas, deprenas sian korbon de la tero, turnas la dorson al la mondo kaj foriras.

Preskaŭ ŝajnas, ke lia foriro kunportas la tutan vivon de la placo, kiu baldaŭ sinkas en afiktadon kaj silenton.

Ĝuste tiam mi metas la ŝildon SERVOFINO kaj reiras al la deponejo.

Longe li estis por mi nur kutimo, ia horloĝo, kiu establas la ĝustan ordon de la aferoj kaj la konkludon de mia labordeĵoro.

Sed en septembra vespero okazis io: li klarigis al mi, ke tio estas pro iu nuna konstruejo, ke mi trovis lin antaŭ mi, survoje al la deponejo.

Mi ne scias kial mi faris tion, la vivo ne ĉiam estas logika, en mil aliaj kazoj mi estus nur sekvinta la regulojn.

Sed tiun vesperon la aero estis varma kaj alloga. Mi estis du minutojn pli frue ol la hortabelo aŭ eble kaptis min tiu sento de dankemo, kiun oni ŝuldas al fiksjaj punktoj en sia vivo.

Mi haltis kaj demandis lin, kien li iras.

Por atingi lian domon estis ĉirkaŭ sepcent metroj kaj iomete ĉirkaŭvojo sur mia vojo.

Mi invitis lin supreniri kaj proponis veturigi lin hejmen.

Survoje li komencis rakonti al mi sian historion.

La bezono sin rakonti superis liajn parolbremsojn.

Li estis iama inĝeniero, kiu laboris dum jaroj en naftoputoj tra la mondo. Li havis edzinon kaj filon, belan domon ekster la urbo kaj pacan vivon por kio povas esti vivo, kun gratifikanta laboro, kiu kondukis lin al diversaj lokoj kaj latitudoj, de Norda Maro ĝis la Golfo de Meksiko, de la Arabaj Emirlandoj ĝis Sudameriko.

Li ĝuis tiun vivon, duonvoje inter loksidismo kaj nomadismo, inter stabileco kaj aventuro.

Iam, kiel en malbone verkita libro, okazis la evento, kiu rompas la rutinan ordon de la aferoj: lia edzino kaj filo mortis en trafikakcidento.

La resto fariĝis konstanta falo malsupren, sen deziro aŭ eblo restariĝi.

Ekde tiu vespero, mi kutimiĝis lin konduki hejmen.

Kaj iom post iom, la kutimaj, konataj urbaj stratoj transformiĝis en la mil vojojn de la mondo: la maljunulo rakontis al mi rakontojn pri la landoj, kiujn li vizitis, anekdotojn, kiujn li travivis aŭ nur aŭdis, forajn rakontojn pri dezertoj kaj maroj, en kiuj li vojaĝis.

Do mi komencis sopire atendi la finon de la lasta veturo, nur por trovi min en tiuj nekonataj mondoj, kiuj konvenis al miaj humoroj, malgajaj mondoj por grizaj pluvaj tagoj aŭ helaj kaj varmaj, alifoje, kiel la suno de la tropikoj, mondoj plenaj de bonaj aŭ malbonaj homoj, de voluptaj aŭ ordinaraj virinoj laŭ la destinoj.

Fariĝis speciala momento por mi, la sola, kiu donis sencon al mia anonima mondo de hastaj pasaĝeroj kaj ĉiuj samaj tagoj.

Sed tiu kutimo nia ne restis nerimarkita. Iu plendis ĉe la firmao kaj ili suspendis min de la servo dum kelkaj semajnoj.

Kiam mi tiam rekomencis deĵori, komence ili ne donis al mi la lastan veturon de la 42.

Mi devas konfesi, ke komence mi sentis min preskaŭ liberigita: neniun pluan konflikto inter regulo kaj sento, inter deziro kaj devo, ĉar mi sciis, ke mi ne plu povas permesi al mi tiun devion de la fiksita vojo de mia vivo, postkurante malproksimajn vojojn kaj rakontojn, kiu scias, ĉu realaj ĉu ne.

Fine reveninte al la kutima veturo, dum pluraj tagoj mi ne revidis lin je la fino de mia rondo.

Li forpasis, oni al mi respondis, kiam mi petis informojn. Oni trovis lin mortinta iun vesperon, survoje hejmen, sola kiel hundo, kuŝanta apud pordo.

Sed mi daŭre vidas lin, mi daŭre perceptas lian ĉeeston en la duonlumo de la arkadoj kaj imagas lin leviĝante ĉe mia alveno kaj kunprenante la tutan vivon el la placo.

Mi devas konfesi, ke mi ne kompatas lin. Travivi tian vivon verŝajne ne estis tiom agrable. Eble li nun multe pli feliĉas, kie li estas.

Anstataŭe, mi havas senton de dankemo. Dankemo pro tio ke mi konis lin, pro la mondoj, kiujn li malkovrigis al mi, kaj pro la vizaĝoj, kiujn mi renkontis en iu angulo de la tero de mi nekonata, tiel malsama ol tio, kion mi vidas dum mia ĉiam sama vojaĝo, sur stratoj traveturitaj centojn da fojoj, inter antaŭdifinitaj haltoj kaj pasaĝeroj, kiuj ne rajtas alparoli min.

Sed se nun restas neniu por rakonti al mi rakontojn, por konsoli min per vortoj kaj fantazio, eble venis la tempo rakonti ilin al mi, preni folion kaj mem skribi ilin, tiujn rakontojn.

Mi komencu ĉi-vespere. Mi prenos skribilon kaj paperon kaj mia unua rakonto estos lia.

Somera promenado

Tatjana Terehova

Rusio

Ŝi vekigis meze de la nokto. Malantaŭ la fenestro trapasis aŭto, la hela strio trakuris la plafonon. Ŝi sentis sin tute vekiginta sed tamen iomete strange. Temas pri la doloro – subite komprenis ŝi. La doloro kiu ne forlasis ŝin dum tre longa tempo ne malaperis, sed malfortiĝis. Kvazaŭ ne doloro ĝi estis nun, sed ombro de la doloro aŭ memoro pri ĝi. Ŝi faris profundan spiron – tio kion ŝi antaŭ delonge ne sukcesis fari, kaj eksentis fortan soifon. Per malforta voĉo ŝi vokis flegistinon, sed ne niu alvenis. Ĉu ŝi provu atingi akvon memstare? Devas esti glaso sur la apudlita tableto. Ŝi moviĝis sed la tableto estis tro malproksima. Ŝi denove flustris en la ĉirkaŭantan malhelon: “Bonvolu helpi min!” La pordo malfermiĝis kaj en la ĉambron eniris iu alta, kiu tuj ŝaltis dormolampon. En ĝia malforta lumeto ŝi ekvidis ke tiu estis tre juna viro, kiun ŝi neniam vidis antaŭe. “Ĉu nova flegisto?”, demandis sin ŝi kaj denove flustris: “Bonvolu, trinki...” La junulo lerte levis ŝian kusenon, helpis al ŝi sidiĝi, donis glason kaj subtenis ĝin dum ŝi trinkis. Kun grandega plezuro ŝi fortrinkis la akvon. Ŝajnis ke la nova kuracilo ja helpas. Sed ĉiuj lastaj estis senutilaj, do kompreneble ŝi dubis. Tamen nun la doloro preskaŭ malaperis, ŝi kapablas spiri kaj senti la guston de la akvo. Neni- on pli bongustan ŝi havis de tre longa tempo.

“Dankon!”, diris ŝi, kaj ĉifoje ŝia voĉo sonis pli forte.

La flegisto ridetis kaj metis la malplenan glason sur la tablon. “La pluvo finiĝis”, diris li milde kaj malfermis la fenestron. En la ĉambron penetris odoroj – de la humida tero, de siringo, jasmeno, de io alia kiun ŝi ne rekonis. Ŝi spiradis – profunde, facile, kvazaŭ trinkante tiun freŝan miksaĵon, same bongustan kiel la akvo kiun ŝi ĵus trinkis.

“Jam estas somero”, diris ŝi malrapide. Kiam oni transportis ŝin en la malsanulejon estis vintro. Kaj ŝi ege ekvolis forlasi tiun ĉambron, vidi ion alian krom tiuj muroj kaj plafono, eĉ la plej malgranda fende-

to de kiuj estis jam konataj al ŝi, kaj plu spiradi tiun vivigan someran aromon. Se ŝi nur povus atingi la benkon en la korto... Ŝi eĉ ekploris, tiom granda kaj nerezistebla estis la deziro. La flegisto tuj turnis sin al ŝi.

“Bonvolu pardoni min, tio ne gravas”, provante rideti, eldiris ŝi. “Mi nur komprenis kiom da tempo mi ne estis ekstere. Estus bone promeni iomete. La nokto estas mirinda.

“Sed tio tute ne estas problemo”, diris li trankvile. “Mi ja estas ĉi tie por helpi. Mi akompanos vin.”

“Ĉu tio ne estas kontraŭ la reguloj?”, jam volis demandi ŝi, kaj ankaŭ: “Ĉu la doktoro permesos?” Sed lia trankvileco sendubigis ŝin. Li certe konas la regulojn kaj kio estas permesata, kio ne.

Li helpis al ŝi sidiĝi kaj alportis ion similan al malpeza hela mantelo. “Povas esti vento”, klarigis li.

Ŝi singarde leviĝis kaj eksentis kapturton. “*Sed mi ne povas paŝi*”, subite rememoris ŝi. “*Jam delonge mankas al mi fortoj. Mi tuj falos, kial li ne prenis rulseĝon?*”

“Ne timu”, firme diris li. “Mi helpos.”

La longa koridoro estis duonlumigita kaj silenta. Nenion renkontinte ili atingis ĉefenirejon.

Ŝi eksentis sin tute malgranda sub la ĉielo kovrita per larĝaj strioj de arĝentkoloraj nuboj, inter kiuj videblis kvazaŭ ĵus lavitaj per la pluvo brilegaj steloj. La kapo denove ekturniĝis kaj ŝi pli forte premis la manon de sia helpanto. Ili atingis benkon, ĉirkaŭatan per arbustaro. La folioj en la malhelo ŝajnis nigraj. “Strange, tiom longan vojaĝon mi faris kaj preskaŭ ne laciĝis”, diris ŝi. “Mi eĉ ne kredis ke mi ankoraŭ kapablus pri tio. Dankon!”

“La vojaĝo nur komenciĝas”, ekridis la junulo. “Sed ripozu iomete kaj poste ni iros pluen.”

“*Eble mi dormas*”, supozis ŝi, “*tiuokaze ĝi estas tre bona sonĝo kaj mi ankoraŭ ne volas vekigi.*” Sed la impeto de vento ŝancelis la branĉojn de siringo, kaj sur ŝian vizaĝon ekfalas kelkaj gutoj de pluvakvo. Tio estis tro reala por sonĝo. Tute proksime aŭdiĝis sireno.

“Ĉu estas fervojo proksime?”, demandis ŝi. Ŝia akompananto enpeniĝis.

“Ne”, finfine respondis li. “Mi pensas ke tio estas kajo. Ĉu ni iru? Estas preskaŭ tempo.”

Ŝi volis diri kelkajn aferojn samtempe, sed kapablis nur: “Mi surhavas pantoflojn...”

“Ĉu tio gravas?”, demandis li serioze.

“Tute ne”, ekridis ŝi. “Kien ni iru?”

“Al la rivero certe.”

Ŝi komprenis ke nek demandi, nek miri ŝi plu volas. Ŝi simple ĝuis senhastan promenadon kaj maleston de la doloro, kiu tute malaperis. Nun ŝia kuniranto ne plu subtenis ŝin sed iris iomete antaŭe. La urbo dormis, nur maloftaj aŭtoj zumadis, blindigadis ilin por unu momento per siaj lumĵetiloj kaj malaperadis en la malhelo.

Ili malsupreniris al la rivero. Ĉe la kajo staris ŝipeto, simila al tiuj kiuj transportas ekskursantojn aŭ iam servis al loĝantoj de proksimaj urbetoj kaj vilaĝoj, al kiu la rivera vojo estis pli oportuna ol fervojo aŭ aŭtobusoj. Iam junaj, ŝi kaj ŝia edzo ŝatis preni biletojn al tiu rivera tramo kiel oni nomis la ŝipetojn, kaj navigi ne per pompaj turistaj itineroj sed per tiuj praktikaj, kiuj iris tra la dorsa flanko de la urbo. La vidaĵoj estis ne malpli interesaj, la pasaĝeraro konsistis ne el ebrietaj grupoj sed el dormetantaj vilaĝanoj. Kaj krom la fakto ke la biletoj estis multe pli malmultekostaj, ĝojigis ilin la malesto de la surdiga muziko, kiu malhelpis kaj al senhasta babilado kaj al kuna silento. Ili ambaŭ ege bedaŭris kiam tiuj modestaj riveraj tramoj ĉesis navigi.

Ŝia gvidanto surkuris balanciĝantan surŝipiran tabulon kaj etendis la manon por helpi ŝin. Ŝi singarde supreniris, per alia mano brakumante sian mansakon, postiris lin laŭ malhela koridoreto kaj poste per mallarĝa ŝtuparo sur la supran ferdekon, lumigitan per malgrandaj lanternoj. Ŝi sidiĝis sur la malmolan benkon kaj metis la mansakon apud ŝi. “*Strange*”, pensis ŝi, “*mi tute ne memoras ke mi prenis sakon.*” Sed ĝi certe estis ŝia mansako. Ŝi bonege memoris aĉeti ĝin dudek jarojn antaŭe. Ŝi uzis ĝin ĝis la sako tute triviĝis, kaj neniam poste kapablis trovi alian kiu same plaĉus al ŝi. “*Sed ne tiom kaduka ĝi aspektas*”, diris ŝi al si mem. “*Ĉu mi ne tre hastis forigi ĝin en la formetejon? Fakte ĝi aspektas preskaŭ nova...*” Ŝi malfermis la sakon kaj tuj ekvidis flavan pluŝanasiidon. “*Jen kie vi kaŝiĝis!*”, surpriziĝis ŝi. Tiun anasidon ĉiam portis kun si

ŝia filo ekde li komencis paŝeti ĝis, unu malfeliĉan tagon, ili perdis ĝin en la parko. Ŝi karesis la pluŝbeston kaj remetis ĝin en la sakon. Kaj jen estas la abocolibro, per kiu ŝia patrino instruis ŝin legi. La oranĝkolora kovrilo kun ardeo staranta apud granda litero A estis tiel brila kaj nova kiel ŝi memoris ĝin. Ŝi fingrumadis la enhavon de la sako – leteroj, fotoj, figureto de hundo malantaŭ kiu estis varmega suna tago, fabela urbeto de antikvaj lignaj dometoj, belaj preĝejoj kaj amuzaj butikoj. Ĉio restos kun ŝi. La lanternoj sur la ferdeko estingiĝis. Sed la malhelo jam ne plu estis. En la antaŭmateniĝa duonlumo ŝi klare distingis la vizaĝon de tiu kiu sidis apud ŝi.

“Bonvolu helpi min”, flustris ŝi kaj denove aŭdis: “Ne timu!” Li prenis ŝian manon. El trans la horizonto aperis la unua suna lumo.

La flegistino, dormetanta sur la seĝo en la duonlumigita malsanuleja ĉambro, vekigis kvazaŭ iu puŝetis ŝin. Ĉio estis kvieta. Tro kviete – subite komprenis ŝi, ĉar ŝi ne plu aŭdis sonon al kiu ŝi jam al kutimiĝis – penan spiradon de sia maljuna pacientino.

Antaŭakuŝa nokto

Paulo Sergio Viana

Brazilo

Estas jam la noktomezo, kaj mi devas dormi. Sed kiel fari tion? Mi sentas min ekscitita. Marko dum jaroj admonis min regi mian ekscitigemon, sed mi neniam atingis tion. Li diris, ke tio malhelpas min en pluraj aspektoj. Li tion ripetadis en iom predika maniero, sekve ĝi ne tre konvinkis min. Predikoj ĝenerale ne estas konvinkaj.

Tamen, morgaŭ estos sufiĉe emocioplena, energioelĉerpiga tago, kaj mi devos esti plena de forto je la vekiĝo. Mi havos multajn defiojn, ekde la mateno. Morgaŭ naskiĝos mia unua bebo. Longe atendita, longe planita, longe prirevita bebo. Mi kreis ĉirkaŭ ĝi tutan mitologion, laŭ kiu ĝi fine devos doni sencon al mia vivo. Marko diras, ke estas tro riske atribui al tia aĵeto tiel gravan postenon en onia vivo – postenon de vivosencodonanto. Mi ne povis eviti tion. Oni diris al mi, ke la vivo devas havi sencon, sekve mi ne vidas alian eblecon ol elekti taŭgan, sufiĉe valoran objekton, kiu entenu tian signifon. Mi elektis mian unuan bebon, kaj mi devas rekoni, ke ĝi eble estos ne nur la unua, sed la sola. Tio ĉi dependos de ĝia rolo en la mondo. Se ĝi naskiĝos kun ia difekto, kompreneble tio fendos por ĉiam ĝian sukceson en katastrofa maniero, tiel ke mia vivo plu ne havos sencon. Eble mi neniam trovos alian objekton, al kiu transdoni tiun malfacilan mision. Jen kial mi estas en ĉi tia ekscitita mensostato: iamaniere mi troviĝas en vojdisluiĝo.

(Subite venis al mi la ideo inviti la fuĝeman dormon per muziko. Mi ŝaltis la telefonon kaj elektis gitaran muzikon, kiu trankviligu min. La preludojn de Villa-Lobos. Jes, ili lulas min kvazaŭ la karesoj de Marko sur mia kapo, la delikata masaĝo de liaj fingroj inter miaj haroj, kiu ĉiam endormigis min. Marko havas molajn kaj samtempe firmajn fingrojn, similajn al versoj de mistika poeto. La fascinaj kordoj de gitaro lulas min, sed mi rezistas. Ho kiel feliĉe estus, se Marko estus ĉe mi dum ĉi tiu antaŭakuŝa nokto, kun siaj fingroj hipnotaj.)

Mi rifuzas konsulti la horloĝon, ĉar la konstato, ke la nokto treniĝas malrapide sed fatale, certe pliintensigus mian angoron. Kial tiom da angoro? Kial tia pezo de la destino pro simpla bebo, kiu naskiĝos, kiel miloj da aliaj similaj beboj, tra la tuta mondo, precize morgaŭ, kiu estos tute ordinara tago? Ne faras sencon, ke mi atribuas al mia akuŝoto tiom da graveco. Ĝi estos simple nur unu plia en la mondo.

Sed mi ne povas eviti tiun dramon spiritostaton dum mia atendado. Mi scias, kial. Ĉar mi investis mian mensosanon je tiu nasko. Dum naŭ monatoj mi konstruis ĝin, tagon post tago, kaj ĉiu tago gutis laŭlonge kiel akvo, kiu devos formi torenton. Kompreneble, mi scias, ke torento formiĝas depende de pluraj, ofte neantaŭvideblaj faktoroj. Sed neracie mi atendas majestatan torenton, grandegan, inundan, sovaĝe sendigan. Absurdaĵo, mi scias. La estonteco de mia bebo ne dependas de mi, mi scias. Estas tro da pretendemo kaj ĉiopova iluzio. Sed kiel eviti tion?

(Mi decidis spekti filmon, ĉar jam estas malfrua nokto, kaj dormemo rifuzas enveni en mian dormoĉambron. Eble filmo venigos ĝin. Pro ia konfuza kialo mi ekpensis, ke mi ŝatus spekti, por la centa fojo, "Persona", de Bergman. Misa elekto, mi scias, ĉar post ĉiu fojo, kiam mi spektis ĝin, mi fariĝis terure ekscitita, tiel ke sekvis sendorma nokto. Nu, ne gravas, mi re-spektos ĝin, mi ripetos la jam parkeritajn dialogojn inter tiuj du virinoj, kiuj simile serĉis la sencon de la vivo. Se mi devas resti hodiaŭ sendorma, almenaŭ mi rigardu tiujn du vizaĝojn, kiuj en iu momento fariĝas unu sola. Marko klopodis montri al mi multfoje, ke tiu filmo estas nekomprenebla, tial oni emas spekti ĝin ree, kaj ree, kaj ree. Hodiaŭ, en ĉi tiu senfina nokto, mi spektis ĝin centan fojon. Vane. Dormemo vagas ie for, malproksime de mi. La aktorino, en la filmo, ne trovis sian vojon, ankaŭ ne la flegistino; same mi.)

En profunda nokto, meze de angora longa dubo, mi ekmemoras la okulojn de Marko. Mi neniam vidis similajn okulojn. Ili neniam riproĉis, se mi bone memoras. Foje ili malleviĝis kaj fikse rigardis al la planko, foje al la plafono, en melankolia maniero. Helaj okuloj, plenaj de komprenemo, malhavantaj ian aŭtoritatecon, ian solvon. Marko neniam ambiciis trovi la sencon.

Mi memoras promenon, kiun ni faris laŭlonge de rivero, sur malpeza rembarko. La akvo fluis serene, kaj li karesis la torenteton per sia

remilo. Mi demandis, kien ni iros, li respondis: Ni ne iros, la rivero iras. Nenien. Nenion ĝi celas.

Dum nia promeno mi eksoifis. Marko prenis el la poŝo pomon kaj mi manĝis ĝin avide. Sukoplenan frukton. Mi ĉiam avidis la sukon, la intenan guston, la mordon. Dum mia ĝuoplena maĉado, mi rimarkis, ke Marko palpebrumas, dezirante kompreni.

Okaze de tiu promeno mi gravediĝis de tiu bebo, kiu naskiĝos morgaŭ. Marko ne volis ĝin, sed ne kontraŭis mian deziron. Li diris: tro riske, tro riske. Mi kontraŭargumentis, ke la homaro konstante faras tion, de jarmiloj, kaj tamen neniu suferegis pro tia aŭdaco. Li replikis: temas pri nevidebla sufero, jen ĝia mistero.

Nun mi pensas, ke eble mia angoro venas de la timo, ke mi ne faris ĉion eblan por ke mia bebo naskiĝu destinita al sukceso. Ĉi tion oni povas nomi kulposento, anticipa kulposento. Stulta kulposento, ĉar kiel antaŭvidi ĉiajn rifojn kaj kaptilojn, kiuj minacas novkreiton?

(Kvazaŭ pikita de insekto, mi ellitiĝas preskaŭ per salto. Mi iras al la libroŝranko kaj hazarde prenas libron. Hazarde? Mi senkonscie prenis mian malnovan, eluzitan volumon de Donkiĥoto. Mi malfermis la unuan paĝon kaj glitigis la rigardon sur la paĝo. Propravole, ĝi fiksiĝis sur unu frazofragmento: “Oni sciu do, ke la supre menciita hidalgo, en siaj horoj de neniofarado, t.e., dum la pli granda parto de la tago, sin fordonis al la legado kun tiom da persisto kaj plezuro, ke li preskaŭ tute neglektis ĉasi kaj eĉ administri sian bienon...” Tiu frazo skuis min. Estis, kiel se mi vidus grandan sunan panoramon antaŭ mi, kun vasta kampo, disaj arboj, bovoj kaj ŝafoj. Vizion de pejzaĝa paco. Tiu sceno ne enhavis atendojn, dezirojn, aŭ planojn. La kampo simple kuŝas, la brutoj simple maĉas, la suno simple sunas.)

Subite mi konscias, ke ĉi tiu nokto estas kvazaŭ longa, sencela vojaĝo. Mi fakte ne maldormemas pro mia morgaŭa akuŝo, nek pro la estulo, kiu naskiĝos. Mia angoro devenas de io pli kaŝita. De la bezono regi la vivon, mian vivon, kaj precipe la vivon de ĉio, kion mi kreas. Kia infanaĵo! Kiu devigas min dormi, en ĉi tiu obstina nokto? Kial ne resti sendorma?

Mi iras al la kuirejo, prenas botelon da vino kaj detiras la korkon kun komika eksplodeto. Ia cerebro. Mi ne estas devigata dormi kaj su-

feri. Morgaŭ naskiĝos mia unua bebo, kaj tio jam ne apartenas al mi. Mi jam povas fari nenion, krom amuze akompani ĝian propran iradon. Ĝi estas mia unua libro, romano. Ĉu eble la sola? Mi ne scias, kion la homoj pensos kaj diros pri ĝi. Ne eblas scii, ĉar mi mem ne scias tion. Ĝi estas senornama rakonto pri la vivo de melankolia homo, kiu dum sia vivo serĉadis sencojn.

Ekde morgaŭ, mia verko, skribita dum precize naŭ monatoj, havigos al si propran vivon, kaj mi povos fari nenion rilate al tio. Mi povos nek feliĉigi, nek detrui ĝin. Ĝi sekvos sian vojon, tute sendepende. Libro estas vivanta estulo.

Morgaŭ okazos la anoncita lanĉo, en konata librovendejo. Se oni petos min diri kelkajn vortojn, mi simple diros, ke ĉi tiu verko similas al granda kampo, kun arboj, bovoj kaj ŝafoj. Kaj mi amuziĝos pro la miro de la aŭskultantoj. Nur Marko komprenos mian blagon, sed liaj melankoliaj okuloj nenion esprimos pri tio.

Nu, finfine mateniĝas.

Ratih, karega mia

Ilia Sumilfia Dewi

Indonezio

Matene je la 5-a horo, Rusmini vekigās kiel kutime. Ŝi pretigas sin por la matena preĝo. Subite ŝi ekserĉas ion sur la lito kaj sub la kuseno. “Ho! Mi trovis vin.” Enmane ŝi tenas foton de bela knabineto. Longe ŝi rigardas la foton, “Mi ege sopiras vin.” Kaj larmoj venas el ŝiaj okuloj. Ŝi sentas sin tiel emociiĝinta rigardante la foton. “Vi eble ne povas kompreni, kial mi devis forlasi vin kaj ne povas akompani vian kreskadon, pardonu min!” Rusmini surmetas sian blankan preĝrobon kaj sidiĝas sur malgrandan tapiŝon. Ŝi praktikas la solenan preĝon, kiun ŝi ĉiumatene faras. En sia dekstra mano, ŝi daŭre tenas la foton kaj elparolas sian esperon: “Mi tre feliĉas, ke venas la tempo renkonti vin.” Ŝi forte tenas la memoron, kiam ŝi naskis sian filinon sen ĉeesto de sia edzo. Estis la plej malĝoja tempo por Rusmini, ĉar ŝia edzo forpasis unu monaton antaŭe pro akcidento. Ŝi konfuziĝis: “Kion mi devas fari por daŭrigi mian vivon? Mi ne havas laboron, mi kapablas fari nenion.” Sed ŝi mem devis kreskigi sian filinon kaj daŭrigi la vivon. Tagon post tago, Rusmini klopodis serĉi laboron. “Mi devas labori, perlabori monon.” Ne estis facile trovi laboron en la hejmvilaĝo, sed ŝi daŭre klopodis. Kvin monatoj pasis, sed Rusmini ankoraŭ trovis neniun laboron. Ŝi sentis sin senespera kaj malfeliĉa.

En tiu vespero, Rusmini alvenas en sian domon, kaj trovas sian panjon sidantan kun la bebo. “Ĉu vi sukcesis trovi laboron?”, la panjo demandas. “Mi ne plu scias, kion ni devas fari, se vi daŭre ne havus laboron. Memoru, ke vi havas nun grandan respondecon kreskigi vian infanon.” Subite Rusmini prenas malgrandan paperon el sia sako kaj donas ĝin al la patrino. “Vidu! Estas laborposteno por labori eksterlande. Oni mencias, ke estas laboro por esti hejma servisto en Sauda Arabio. Eble tion mi provos.” La panjo tuj komentas: “Estas fora lando! Kio pri Ratih? Ŝi estas ankoraŭ tre juna. Vi ne forlasos ŝin, ĉu ne?”

Rusmini silentas, ŝi ne scias kiel respondi al la demandoj de sia patrino. Ŝi detale legis la priskribon de la laborposteno kaj kontaktis la agenton. Oni povas doni al ŝi la laboron postulante ke ŝi akceptu sepjaran laborkontrakton. Tio signifas, ke ŝi devos forlasi Ratih kun la patrino. Ŝi ne povos mem kreskigi la filinon, ŝi ne povos vidi kiam Ratih komencos stari, marŝi, paroli, kaj ŝi ne povos akompani ŝin al la lernejo. “Rusmini! Kion vi pensas? Vi daŭre ne respondas al miaj demandoj”, la patrino atentigas ŝin. Ŝi turnas la kapon al la patrino: “Pardonu, mi ne bone aŭdis vin. Sed mi pensas, ke mi akceptos la laboron. Vi pravus ke mi nun havas grandan respondecon.” Rusmini forlasas sian patrinon en la vivĉambro kaj iras lavi sin. Rigardante la filinon, la patrino ankoraŭ ne bone komprenas ŝian decidon.

Meze de julio, Rusmini pretas flugi al Sauda Arabio por labori. Ŝi devas adiaŭi siajn patrinon kaj filinon; ili disiĝos dum la sekvaj jaroj. “Kara mia Rusmini, mi scias, ke estas malfacila decido, sed mi komprenas, ke vi devas fari tion ĉi pro via karega filino. Prizorgu vin tie!” Rusmini forte brakumas sian patrinon kaj flustras ĉe la oreloj: “Dan-kon panjo, ke vi komprenas mian decidon. Bonvolu zorgi pri Ratih kaj helpi al ŝi kreski kun memfido.” Rusmini milde kisas Ratih, kiu estas en la brakoj de la patrino. “Mia karega Ratih, mi amegas vin. Mi ĉion faras nur por vi. Memoru, ke vi estas tre grava parto de mia vivo. Mŭah, mŭah, mŭah!”, lasta kiso ĉe la frunto de Ratih antaŭ iro de Rusmini en la atendoĉambron de la flughaveno.

“Rusmini, kie vi estas?”, iu krias de ekstere. “Mi estas ĉi tie!”, respondas Rusmini. Almira eniras la ĉambron kaj trovas Rusmini sidantan sur tapiŝo. “Ĉu vi finpreĝis?”, Almira demandas. “Jes! Mi ege ĝojas, ke hodiaŭ tagmeze mi forflugos al Indonezio. Jam pasis sep jaroj, mi sopiras renkonti Ratih, mian filinon!” La okuloj de Rusmini klare montras ĝojon el sia koro. “Mi jam delonge atendas por brakumi ŝin, ludi kun ŝi, akompani ŝin al la lernejo. Mi volas ĉion fari por Ratih”, diras Rusmini. Ŝi stariĝas kaj pretigas sian pakajon. “Ĉu vi revenos?”, Almira demandas. “Ne! Mi jam plenumis la laborkontrakton. Mi volas komenci ion en mia hejmvilaĝo, eble mi vendos manĝaĵojn aŭ ion alian. Mi vidos! Sed mi ne plu volas perdi tempon, kaj mi volas tuj revidi Ratih. Ŝi rajtas havi mian korinklinon.” Rusmini daŭre enpakas sian valizon

kaj pretigas ĉion por sia vojaĝo. Je la 8-a horo matene ŝi forveturos al la flughaveno.

Post naŭhora flugo, Rusmini alvenas al Ĝakarto. “Mi alvenas”, pensas Rusmini kun ĝojo. Ŝi devas daŭrigi la vojaĝon al sia hejmvilaĝo per trajno kaj buso. Restas ankoraŭ longa vojaĝo. Rusmini aĉetis bileton por nokta trajno. En la atendoĉambro ŝi sidas kaj ripozas atendante la trajnon. Ŝi prenas la foton de Ratih: “Kiel vi nun aspektas? Vi certe estas bela filino mia.” Dum ŝia restado en Sauda Arabio, Rusmini malofte havis novaĵon pri Ratih. Nur kelkfoje ŝi ricevis poŝtleterojn de sia patrino.

La nokta trajno venas en la stacidomon. Ĉiuj pasaĝeroj eniras la trajnon kaj ankaŭ Rusmini. Ŝi trovas sidlokon apud la fenestro. “Pardonu! Ĉu estas via?”, iu virino, kiu sidas apud Rusmini, demandas ŝin, kaj donas la foton, kiu falis sur la plankon. “Ha, jes! Estas foto de mia filino. Dankon! Mi baldaŭ renkontos ŝin”, respondas Rusmini. “Beleta knabino! Kiom ŝi aĝas?”, demandas la virino. “Tiam ŝi havis ses monatojn. Sed nun ŝi aĝas sep jarojn. Mi tamen ne scias kiel ŝi aspektas nun, sed mi kredas ke Ratih estas tre bela”, respondas Rusmini. Poste, ili daŭre babilas. Dum tiu nokta vojaĝo, Rusmini sentas sin tre feliĉa sciante, ke ŝi baldaŭ renkontiĝos kun sia karega filino, kvankam ŝi ankaŭ sentas sin laca pro la longa vojaĝo. Ŝi daŭre tenas la foton de Ratih.

Post ok horoj, la trajno alvenas al la stacidomo de Jogjakarto, kiu troviĝas en centra Javo. Estas tempo adiaŭi la novan amikinson, kiun Rusmini renkontis en la trajno. “Mi esperas ke vi sekure alvenos en vian hejmvilaĝon kaj renkontos vian filinon”, diras la amikino. Ili brakumas unu la alian kaj ĝisas. Rusmini devas daŭrigi la vojaĝon per buso. Post mallonga atendo, ŝi enbusiĝas kaj vojaĝas al sia hejmvilaĝo dum tri horoj. Estas nur kelkaj pasaĝeroj en la buso kaj ĉiuj endormiĝas. Rusmini rigardas sian brakhorloĝon, la montriloj proksimiĝas al la kvina. Ŝi sentas sin dormema, sed ŝi ne povas dormi. La buso rapide veturas sur la trankvila vojo en la mateniĝo.

Rusmini alvenas kun granda ĝojo kaj granda laceco. “Finfine!”, ŝi murmuris. Ŝi staras antaŭ la malgranda domo, kiun ŝi forlasis antaŭ sep jaroj. Ŝi iras al la pordo kaj frapas ĝin. “Saluton, panjo! Estas mi, Rusmini”, ŝi krias. Ŝi frapadas la pordon ĉar neniu respondas. Post iom

da tempo, iu maljunulino eliras. “Panjo! Mi ege sopiris vin!” Rusmini tuj forte brakumas sian patrinon kaj kisas ŝin. Ŝi ege ĝojas. “Ratih estas dormanta, ĉu ne? Mi ne volas ĝeni sed mi ege volas vidi ŝin. Ni eniru!” La patrino nur silentas kaj subite ŝi esploras. “Ho, mi ne scias kiel diri...”, plorsingultante la patrino diras. “Estas mia kulpo! Ratih ne estas ĉi tie, mi ne bone prizorgis ŝin. Pardonu min, pardonu min!” Rusmini provas trankviligi la patrinon. “Karega panjo, diru al mi! Kio okazis al Ratih? Kie ŝi estas? Mi ege volas revidi ŝin.” La patrino iom trankviliĝas kaj donas la kolĉenon, kiun Rusmini donis por Ratih. “Via karega Ratih forpasis antaŭ tri semajnoj. Ŝi malsaniĝis pro denngo.” Aŭskultante la patrinon, Rusmini sentas grandegan ŝokon. Kriante la nomon de sia filino, ŝi ege tristas kaj ploregas, “Ratiiihh, mia karega filino...!!! Kial vi ne atendis min?”

Kosmonaŭtoj

James Bridge

Kanado

Ĝis nun, post ĉi ĉiom da jaroj, mi ankoraŭ ne scias kiom en ĉi tio estas reala.

Ŝi vekis min iam en la nokto, ĉirkaŭvolvante min per la litotuko. Ŝi levis min de la lito, tenis min al sia brusto, kaj susure flustris ke ni veturos. Ŝi flustretis ke mi dormadu kaj ne bruu. Mi memoras ke ŝi paŝis tro rapide en la mallumo de la domo en kiu brilas neniu alia lampo, kaj sonas nenioj aliaj familianoj.

Mi memoras la plankon de la aŭto, kaj la aŭton lule skueti min. Ĉu ne estas strange ke en junaĝo oni povas dormi ĉie ajn? Mi memoras la firman, malmolan tapiŝeton planke de la aŭto.

Mi memoras ruligi sableron inter la fingroj de la maldekstra mano. Ju pli longe mi ruligis ĝin, des pli peza ĝi fariĝis, ĝis kiam mi trovis min sola kaj drivanta en la senstela mallumo de vastega kosmo pinĉante ion pli pezan ol la tuto de la kreaĵo. Mi memoras ke min plenigis miriga timo pri la perdiĝo de tiu eta grajno inter la ĉirkaŭpremega, senviva senenhaveco de la mallumo.

Mi memoras la skuegadon. Ne temas pri la ritma skueto de la aŭto, aŭ la detempaltempaj skuoj post kiam panjo nevide veturigis nin sur trueton en la strato. Temas pri la skuegado, kiu vibrigis miajn ostojn. Mi supozas ke vi povus imagi vin kuŝi sub rapideganta vartrajno, sed eĉ tio ne komprenigus al vi la surdigan zumadon, kiu sonis kvazaŭ de preter la plej foraj limoj de scipovo, preter la senfinco kaj de malantaŭ la lasta trono sur kiu sidas dio, kies ekzisto estos ankoraŭ ne konsciita de la homaro en la lasta tago de la lastaj tagoj, kaj al kiu oni ne aŭdacus eĉ ekrigardeti pro timo ke eĉ iomete vidinte tiun dion malestigis la vidinton. De malantaŭ la trono de tiu eternulo venas la zumegado, de loko al kiu ankaŭ tiu stultiga lastulo ankoraŭ ne esploris.

Kiom longe la skuegado daŭris mi ne scias. Vi volos ke mi diru al vi ion kompreneblan, sed vi supozas ke ĉi ĉion mi komprenas. Mi neniam diris ke mi komprenas, nur ke mi memoras.

Skuite de la zumado de preter la fino de la senstela kosmo, mi faligis la sableron. Mi penis helpkrii, sed trovis min nemovipova. Senhelpe mi flosis sola en la nenieco timante ke mi neniam refoje trovus la vojon hejmen, sed ĝuste kiam mi sentis min perdonta esperon mi sentis ankaŭ la tiron.

Ne povante turneti la kapon, mi perokule serĉis la fonton de la tirado sed vidis nenion ĝis kiam ĝi sufiĉe ĉirkaŭturnis min kaj ĝustadirekten frontigis min. Ĉu surprizus vin ekscii ke min tiras la sablero? En la kosmo ĝi gravite tiradis min, kiel planedo orbitigas sateliton.

Ju pli longe mi rigardadis la sableron, des pli movipova mi fariĝis. Fine, mi etendis la manon por rekapti la valoregan sableron, sed trovis la distancon tro granda. Mi naĝe baraktis en la nenieco por pliproksimiĝi min al ĝi, sed vane. Mi fiksiĝis en orbito ĉirkaŭ neeble peza sablero.

Vi diros ke ĉi ĉio estas ia sonĝo, sed mi neniam antaŭe aŭ refoje sonĝis ĉi tion. Eĉ dormante mi havas sufiĉan konscion por rekoni ke mi sonĝas, kaj kvankam ĉi ĉio sendube ŝajnas al vi fantazio, mi ĵuras ke mi pasigis jarojn enorbite de tiu planedo.

Tagon post tago mi pliproksimiĝis, kaj evidentiĝis ke la orbito difektiĝas. La sablero ne tenadas min je konstanta distanco, sed leĝere tiradas min al si. Ju pli mi proksimiĝis, des pli klariĝis ke mi proksimiĝas al planedo. Tagon post tago mi vidis montojn leviĝi kaj valojn profundiĝi. Vastaj maroj plaŭdegis, kaj sufiĉe proksimiĝinte mi rimarkis ke mi efikas al la tajdoj. Ŝajnis al mi nekredeble ke mi estas sufiĉe granda por altigi kaj malaltigi la tajdojn, tamen la gravita tirado estis fariĝinta reciproka.

Timon anstataŭis miro. Mi antaŭe kredis ke perdi la sableron estus la plej terura afero kian mi povus imagi, sed vidinte ĉi ĉion mi time ekmiris kio okazus se mi ne estus perdinta ĝin. Jaron post jaro enorbite ni tiradis unu la alian, kaj mi rigardadis la planedon ĉiam pli maturiĝi. Post nekalkulebla paso de tempo, mi trovis min tiel proksima ke mi povis etendi la manon kaj karesi la lanugajn nubojn kiuj kirladis antaŭ mi.

Ĉu vi memoras tiun faman pentraĵon en kiu Dio etendas manon al Adamo? Mi supozis ke estas same ĉe mi, sed mi forgesis ke mi ne estas

dio. Trude puŝinte unu fingron en tiun delikatan, bluan atmosferon la froto estigis teruran varmon. Mi tuj retiris la manon por ke mi ne brulvundiĝu, sed tiu ektuŝeto sufiĉis por fine rompi la orbiton, kaj la gravita tiro de la sablero fine eltiris min de la kosmo.

La kosmonaŭtoj ŝirmas sian ŝipon kontraŭ la danĝeroj de reenirado per specialaj kontraŭvarmaj paneloj, kaj juste ĉar reeniri ŝirmita nur de piĵamo kaj litkovrilo estas tute alia afero. Mi ardiĝis en la frota atmosfero kaj brilis stele, kaj la magraj ŝirmiloj kiujn mi surhavis ĉifoneriĝis en sekundoj. Nuda mi falis tra fajro, sed mi rifuzis krii ne volante malfermi la buŝon ene de la sovaĝa infero fare de mia ĉeesto.

Mi memoras ke mi trapasis la atmosferon kaj brulvunde falis tra la samaj nuboj kies beleco tiel tentis min. La frida aero sentigis min, kaj ne plu povante teni la spiron mi gapis la nekredeblan mondon kiu rapidege leviĝis responde. Mi faladis ĉiam malsupren al plaĝo kies ŝtonkovrita strando nevole bonvenigis min. Kaj, neeble eviti la destinon, mi ĉirkaŭbrakume etendis la brakojn al la planedo, kiu iam estis mia sablero al kiu mi neniam antaŭe donis eĉ la plej malgrandan atenton. Kaj kial mi atentu sablerojn? Ili estas tiel multaj kaj neniel diferencas unuj de la aliaj. Sed mi supozis ke la diferenco estis ke ĉi tiu ekssablara planedo estis la mia.

Lastmomente mi flaris la salan odoron de la maro kaj la fetoron de putriĝantaj fiŝoj. Mi aŭdis la plaŭdadon de la ondoj, kaj la kriojn de la birdoj kiuj manĝas la fiŝojn. Mi vidis milionojn (se ne miliardojn) da sableroj bakiĝi en la suno kaj dormeti sub la tajda ŝaŭmo. Kaj fine, mi sentis la rompan halton de la korpo kontraŭ la tero.

Ĉio finiĝis. Vi verŝajne supozos min diri ke la sonĝo finiĝis, sed vi erarus ĉar unue tio supozas ke mi scias kie la realeco komenciĝas kaj la sonĝo finiĝas (kion mi jam diris ke mi tute ne scias). Due, vi erarus ĉar vi miskomprenas la difinon de “ĉio”. Kiam mi diras “ĉio”, mi celas ĉion, kaj ĉio enhavas min. Tiumomente, mi mortis, kaj ĉio finiĝis. Mi sentis mian korpon malaperi. La planedo malaperis. La nigra senfinco de la tuta kosmo malaperis. En nenieco mi troviĝis sen eĉ la plej malgranda kaj malpeza sablero por akompani min. Eĉ miaj pensoj forlasis min kaj mi povis nur rigardadi en la mallumon kvazaŭ io estus tie trovebla.

Post tio, mi memoras nenion ĝis kiam mi trovis min sekvmatene ĉe la manĝotablo en la kuirejo, manĝante bovlon da avenkaĉo. Mi memoras ĉion kio okazis antaŭ tiu momento, kaj mi memoras ĉion kio okazis post tiu momento, sed la intero estas mistero. Mi ne memoras kien panjo kaj mi iris tiunokte. Mi ne memoras kial la aliaj familianoj mankis. Mi ne memoras kiel mi evidente hejmenvenis. Mi eĉ ne memoras vekigi, vesti min, aŭ eniri la kuirejon.

Tridek naŭ jarojn poste, mi ankoraŭ neniam demandis panjon pri kio vere okazis tiunokte. Tian aferon ŝi sendube ne forgesus, sed mi neniam petos la veron pri tiu nokto. Kion ŝi dirus? Ĉu ŝiaj memoroj kongruus al la miaj? Ial mi kredas ke ne.

Vi rajtas miri ĉu ĉio ĉi vere okazis, ĉar ankaŭ mi miras pri la vero, sed ĉi ĉion mi memoras kaj mi ne aŭdacas malestigi la memoron.

І настала ніч

Вадим Грін

Німеччина

Щоразу, коли настає ніч, і я готуюся до чергової вилазки в Зовнішній світ, я думаю про смерть. Я намагаюся дивитися на неї, як на невіддільну частину життя. Ми йдемо туди, аби повернутися зі здобиччю і прогудувати своє плем'я. Або ж прийнятий бій та, можливо, зустріти смерть. І так ми існуємо з покоління в покоління, століття за століттям. Бо інакше бути не може.

— Побратими! — почав свою промову командир, — Темрява, наш добрий та вірний союзник, знову кличе нас у подорож. Вона обіцяє нам прихисток. Вона подбає про нас!

Чому ми, вид, що існує тисячі років, так і не змогли винайти кращого способу існування, ніж грабунок і життя коштом інших? Що ж, виходить, ми не вміємо інакше. Не можемо уявити собі життя за інших умов, бо тільки так ми вміємо виживати... Але чому тоді все одно так страшно?

— Пам'ятайте, — продовжив командир, — Ви обрані й від вашого успіху залежить виживання всього нашого племені. Геть зайві питання! Геть сумніви! Смирення та віра — наша правда. Вперед!

Орда схвально загомоніла бойовим кличем. Радіють. Не їм йти першими. Першими йдуть такі, як я — найменші та найспритніші. Ті, хто може прослизнути усюди, продертися, розвідати шляхи та переконатися в безпеці.

— Награт! Поведеш першу трійку. — пролунав наказ командира.

Вперед і не оглядатися. Ми вибігли крізь портал. Спочатку розвідка — треба переконатися, що все безпечно й тоді подати сигнал для інших.

Kelvin estis en la malantaŭo de la malplena kunsido, kiu estis nur sufiĉe granda por enteni longan, ovalan tablon ĉirkaŭ kiu povus sidi maksimume dek homoj. Kelvin umis de kelkaj minutoj provante konekti kaj funkciigi surtablan projekciilon al apuda tekkomputilo antaŭ ol la kunsido komenciĝos. Tion farinte, li sidiĝis sur apudmuran seĝon, ne tro for, okaze ke estos ia bezono ĝustigi ian tehnikajon.

Ekzakte unu minuton poste, la pordo malfermiĝis kaj deko da alt-ranguloj, ĉiuj surhavantaj sian armean uniformon, envenis la ĉambron kaj silente sidiĝis ĉirkaŭ la tablon, provante ne tro atenti Kelvin, finfine nuran teĥnikiston.

Nu, tio ne estis la tuta vero. Kelvin ne estis nura teĥnikisto, sed fakte oficiro kies familia deveno tenis lin en sufiĉe bonaj postenoj en la armeo – nur tial li havas la rajton ĉeesti kunsidon kiel ĉi tiun, kie gravaj ŝtataj sekretoj estas diskutataj.

Kiam la lumoj malheliĝis, la generalo kiu estris la kunsidon, memoriginte ĉiujn pri la nepro pri absoluta sekreteco, klarigis, ke la registaro estis finfine decidinta invadi Zargujon – la longe sopiratan najbaran landon en la oriento, kiu finfine donus al Milhujo aliron al la Suda Maro kaj pligrandigus la povon kaj gravecon de Milhujo en la regiono. La lavango de vortoj surverŝiĝis sur Kelvin, kaj kiam la kunsido finfine finiĝis horon poste, li fakte bedaŭris, ke li scias tiom, kiom li scias pri la venonta milito.

17:05

Kelvin kaŭĉukkrure ŝanceliĝis al sia oficejo, arigis siajn aĵojn kaj pretigis sin por tuja reveno hejmen. Li estis ankoraŭ tiel ŝokita, ke li senvorte eliris el la konstruaĵo, adiaŭante neniun, atingis sian aŭton en la parkejo kaj aŭtomate, kvazaŭ ensonĝe, stiris hejmen.

Jam en sia eta apartamento, miloj da pensoj sieĝis lin. Ĉu li avertu siajn amikojn pri tio, kio okazos morgaŭ? Aferoj ja iĝos tre danĝeraj en la lando: ĉar ĉiu civitano estas aŭtomate rekrutigita en la armeon, tio signifas, ke ĉiuj, kiuj ankoraŭ estas en taŭga aĝo estos alvokitaj partopreni la militon kontraŭ Zargujo. Sed kion liaj amikoj faru, eĉ se ili sciis ĉion? Ĉu eskapi okcidenten, al la neŭtrala, eĉ se ne plene amika najbara lando Helmujo? Ankaŭ tio estus tre danĝera kaj por li kaj por ili, do li decidis silenti.

Kiu estas lia devo kiel civitano, kiel oficiro en la armeo? Lian postenon en la armeo li havas nur pro tio, ke lia patro estas alte taksata emerita generalo, sed Kelvin neniam vere sentis sin fakta militisto. Malgraŭ tio, ke la sinteno de la registaro ĉiam emfazas patriotismon kaj sindonecon al la patrujo, kaj ke lia propra patro ĉiam instruis al li la gravecon

esti fiera milĥo kaj, se bezonate, kuraĝa batalanto por la hejmlando, Kelvin mem neniam sentis tiun ŝovinisman ardon, kiu brulis en la koro de liaj samaĝuloj. “Estas grave esti kuraĝulo, mia filo”, estis la ofte aŭdata patra devizo, “kaj neniam poltrono”.

Post multe da pripensado, Kelvin findecidiĝis. Li preparis sin, metis ĉion, kion li bezonis en la kofrujon de sia aŭto, kaj komencis sian vojaĝon okcidenten... Helmujen...

23:32

Kiam nur duonhoru restis antaŭ ol la doganistoj fermos la stacion kaj devigos ĉiujn reveni la sekvan matenon, ankoraŭ sufiĉe da aŭtoj estis antaŭ Kelvin en la vico.

Li koncentriĝis pri tio, kion li devos diri al la staciaj deĵorantoj por sukcese trapasi la landlimon. Li ja ne havis laborvizon, do lia sola eblo estis uzi la nomojn de ŝajnaj helmaj parencoj, kiujn li supozeble estis vizitonta; tial sur eta slipo estis notitaj la nomoj de fakta familio kiu loĝas en Helmurbo, kiujn li klopodis parkerigi. Li esperis, ke la doganistoj ne fakte vokos liajn “familianojn” por kontroli ĉu ili fakte ekzistas kaj atendas lin, ĉar tiam la tuta afero fiaskus antaŭ ol ĝi eĉ komenciĝus. Li ankaŭ esperis, ke oni ne kontrolos lian kofrujon, ĉar ties enhavo nepre kontraŭdirus lian rakonton pri rapida kaj simpla unutaga vizito al familianoj.

La atendotempo donis al Kelvin pli da tempo por cerbumi ĉu li agas ĝuste. Kion pensos pri li liaj amikoj kiam ili ekscios? Ĉu ili komprenus lin, aŭ kondamnu lin? Pri lia patro, tamen, Kelvin eĉ ne devis pensi: lia sinteno prie estas tute antaŭvidebla.

23:59

Kelvin estis jam la sekva en la vico, kaj li nerveze fikstrigardis la horloĝon kiu pendis de la kontrolstacia budo. Li vidis, kun frostiĝanta sango, kiel la deĵoranto mallevis la moveblan barilon, supozeble por fermi la kontrolstacion por la tago.

Kelvin tuj mallevis la fenestron de sia aŭto kaj diris: “Bonvolu, *freĉjo!*”, uzante la helman slangon por “amiko”. “Mi nepre devas viziti mian *granjon* hodiaŭ! Paĉjo ĵus vokis al mi por diri, ke ŝi estas mortan-

ta, kaj ke se mi ne vidos ŝin jam hodiaŭ, mi verŝajne ne plu vidos ŝin vivanta!”

La viro ĉe la budo respondis, ĝentile sed tamen oficiale: “Nu, se via avinjo estas malsana, vi nepre iru viziti ŝin, ĉu ne? Vian identigilon kaj vian plenigitan enirformularon, mi petas.”

Kelvin elspiris senŝarĝiĝinte kaj transdonis al la doganisto la petitajn dokumentojn. Tiu ekzamenis la identigilon de Kelvin, rigardis lian vizaĝon, kaj kontrolis la formularon kun la falsita informo. “Via *granjo* loĝas en Helmurbo, ĉu? Kelkaj horoj da stirado ankoraŭ atendas vin, *freĉjo*: espereble vi atingos ŝin ĝustatempe. Malfermu vian kofrujon, mi petas.”

Kelvin glutis, provante resti trankvila, kaj estis respondonta kiam alia doganisto vokis de ie malantaŭ en la doganejo: “Hej, Mirko! La ludo jam komenciĝas! Ĉu vi ankoraŭ ne fermis la budon? Venu jam!”

La deĵoranto elspiris, redonis la dokumentojn al Kelvin, levis la barilon, kaj silente mansvingis por ke Kelvin pluiru. Tiu bezonis nenian kroman spronadon kaj stiris antaŭen, kie granda apudstrata ŝildo anoncis verdlitere: “Bonvenon en Helmujo”.

08:16, la sekvan tagon

Kelvin trastiris la tutan nokton por povi atingi Helmurbon tagiĝe. Laca, sed feliĉa esti jam fininta sian vojaĝon, li trovis parklokon en privata flankstrateto proksima al la centra placo, kiu staris tuj antaŭ la impona trietaĝa ŝtadomo. Li eliris en la freŝan matenan aeron, oscedante dum li streĉis la brakojn super la kapon.

Li malfermis sian kofrujon, eltiris el sia valizo vestaĵojn por anstataŭigi la ĉifitajn, kiujn li surhavis, kaj ŝanĝis sin ene de la aŭto, kie feliĉe neniu povis gvati enen.

Nun kun pli taŭga aspekto, li vagis tra la placo, kiu havis belajn arbojn laŭ la randoj, kaj etan altaĵon en la mezo kie eta kiosko frontis al la ŝtadomo. Jam tiuhore homoj komencis laŭiri la stratojn, kaj kelkaj turistoj komencis promeni tra la skvaro. Kelvin supreniris la larĝan marmoran ŝtuparon fronte al la registara konstruaĵo, kaj haltis antaŭ ties altaj lignaj ĉefpordoj.

Jen la elkovita plano komenciĝu.

En la hieraŭa kunsido, la altranguloj rivelis, ke la milĥa registaro decidis, ke ĝi neniel povus rekte ataki Zargujon: la internacia komunumo nepre estus kontraŭ Milĥujo, kaj estus nenia ŝanco venki en tia milito. Tamen... se zarga fanatikulo ial atakus la paceman Helmuĵon, kompreneble Milĥujo devus enmiksiĝi por helpi sian najbaran landon, kaj kune, la venko estus certa.

Kelvin, la elektita nesuspektinda propeka kapro por efektivigi tiun mision, enspiris profunde kaj laŭte kriis, por certigi, ke ĉiuj aŭdu lin: “Helmuĵo ĉesu esti neŭtrala fronte al la agresemo de Milĥujo kontraŭ Zargujo!” Li suprentiris sian ĉemizon por vidigi la bombon kiun li estis surmetinta, enmanigis la ruĝan butonon kiu pendis de ŝnuro, kaj levis ĝin minace, je kio la ĉeestantaro en la placo kaj sur la trotuaro anhelis plena je ŝoko, kaj kriis, timigite. “Vivu mia patrolando!”, li laŭte diskriis. “Vivu Zargujo!”

Kelvin premis la ruĝan butonon, kaj komencis la militon.

Rapimento

Anna Bonardi

Italia

Mi trovo al buio rinchiuso nel retro di un camion. Sto realizzando solo ora di essere stato rapito.

Tutto è avvenuto qualche ora prima. Questa sera, come di consuetudine, sono andato al solito posto, all'angolo della strada alla fine di due viali residenziali di villette bifamiliari tutte uguali, a mangiare qualche avanzo della cena, sulla panchina al di sotto del lampione vicino ai cassonetti. Era una serata estiva come tante e gli unici suoni che si sentivano erano il rumore delle cicale e qualche risata proveniente dai giardini delle abitazioni di qualcuno che si attardava ad andare a dormire. Arrivavo tardi proprio per evitare di incontrare gente e poter godermi in santa pace il pasto. Non notai nulla di diverso dal solito, ad eccezione di un camioncino bianco parcheggiato al bordo della strada, a una ventina di metri di distanza da me, ma non gli diedi molta importanza.

Stavo quindi facendo il mio tanto amato spuntino notturno quando, all'improvviso, fui afferrato alle spalle e bloccato a pancia in giù sulla panchina da un uomo. Essendo dietro di me non potevo vederlo. Cercai di liberarmi da quella presa con tutte le mie forze, ma senza successo.

Senti una portiera chiudersi e dei passi avvicinarsi. Avvertì una puntura e piano piano le forze mi abbandonarono e, in uno stato tra il sogno e la veglia, vidi i volti di due uomini che mi portavano verso il loro veicolo. Erano vestiti in modo uguale, con un'uniforme scura che riportava un logo.

Mi hanno poi rinchiuso in una gabbia di metallo, all'interno del camioncino bianco. Hanno chiuso i portelloni e, una volta che si sono seduti davanti, hanno avviato il mezzo. Volevo rimanere attento al percorso che avremmo fatto, ma la sostanza che mi avevano iniettato fece completamente effetto e mi addormentai.

Ed eccomi qua, in balia di due rapitori verso una destinazione ignota. Non ho idea di quanto abbia dormito, so solo che da quando mi sono risvegliato il camion sta proseguendo la marcia lungo un tratto rettilineo e vedo che fuori è ancora buio poiché c'è una finestrella che mette in comunicazione il retro del mezzo con l'abitacolo dove siedono i due uomini. Sento che ogni tanto parlano, ma non riesco a capire ciò che dicono.

Hanno avuto la premura di sparpagliare della paglia sul pavimento della gabbia. Probabilmente si aspettano che me la faccia addosso dalla paura, ma si sbagliano, io ho la mia dignità.

Hanno fatto un grosso errore se pensano che rimanga qui ad aspettare come un docile coniglietto. Combatterò con le unghie e con i denti. Non hanno idea contro chi si sono messi. Ho sofferto la fame, il freddo e le intemperie per anni, accettando stoicamente la mia condizione, mentre questi due rammolliti erano al calduccio nelle loro case con il frigorifero stracolmo di ogni bene.

No, non resterò qui impassibile. La sonnolenza sta svanendo e, quindi, è venuto il momento di cercare un modo per fuggire. Per prima cosa devo capire come uscire da questa gabbia.

Non sono un grande scassinatore. Mi limito a rubacchiare ciò che viene lasciato incustodito. Raramente entro nelle abitazioni, approfittando di una finestra lasciata aperta.

Cerco di rubare lo stretto necessario. Il mio obiettivo è non morire di fame, per tale ragione mi accontento anche del cibo che trovo tra i rifiuti. Eh sì, il mio spuntino serale consiste negli avanzi che trovo nei cassonetti. Non mi vergogno di quello che faccio. È il cibo più facile che riesco a guadarmmi, per me è una fortuna che ci siano delle persone che buttano via sacchi di alimenti ancora commestibili, come panini non finiti e verdure che spesso i mocciosi avanzano e i genitori gettano nella spazzatura. Mi fa imbestialire il pensiero che questi due imbecilli mi abbiano sequestrato proprio nel momento in cui mi gustavo una deliziosa mezza anguria che avevo trovato in un grande sacchetto che non era stato per niente facile aprire. Se lecco i baffi sento ancora il sapore dolciastro del frutto.

Chissà perché mi hanno rapito, non possiedo assolutamente niente. Ammetto che sono stato una facile preda, ho abbassato stupidamente la

guardia. Quando ero più giovane, sono certo che non avrei commesso un errore del genere. L'uomo che mi ha catturato si dev'essere appostato al buio, nei cespugli dietro la panchina, in modo che non mi accorgessi della sua presenza. Secondo me non è la prima volta che lo faceva.

Comunque, è inutile che mi perda nei miei pensieri perché il tempo passa. La macchina sta proseguendo la sua marcia e fuori è ancora notte.

Guardandomi attorno noto che ci sono una serie di attrezzi appesi che oscillano leggermente, alcuni penso servano a immobilizzare le loro vittime.

Improvvisamente il veicolo sta rallentando e curvando a destra. Ora si è fermato. I due uomini sono scesi. È passato un po' di tempo, ma non sono ancora tornati. Ne sto approfittando per capire come è fatto il meccanismo che chiude la gabbia, tastandolo attentamente.

Sento dei passi avvicinarsi. Il cuore mi batte all'impazzata. Uno dei due uomini, quello che mi ha bloccato, ha appena aperto il retro del camion. Mi sta parlando in un linguaggio incomprensibile e mi guarda tutto sorridente. Mi sta prendendo in giro per caso? Sono io che dovrei ridere della sua brutta faccia, pallida e con due occhi piccoli e ravvicinati. Ma forse se la ride perché devo avere fatto un'espressione terrorizzata quando ha aperto improvvisamente le ante. Questa cosa mi fa infuriare e deve essere ben evidente perché, mentre urlo e sbraito, il suo ghigno ha lasciato il posto a un'aria spaventata.

È arrivato pure quell'altro. Spero non mi somministri ancora quella sostanza. Per fortuna sembra mi lasceranno in pace, stanno richiudendo i portelloni. Ora sono risaliti e hanno ripreso la strada di prima proseguendo ancora dritti.

Mi sto impegnando con tutte le mie forze per fuggire da questa prigione, ho cercato di allargare le sbarre e mi sono pure arrampicato ma non sembra che la struttura abbia punti deboli.

Non so più cosa pensare. Il tempo passa e non ho concluso niente. Per giunta ora vedo che fuori le tenebre stanno lasciando spazio a una tenue luce soffusa, segno che l'alba sta per sopraggiungere. Meglio che mi calmi. Speravo di riuscire a fuggire col buio della notte perché è più facile mimetizzarsi, ma ce la posso fare anche di giorno, devo solo

riuscire ad uscire dalla gabbia e poi, non appena riapriranno il retro del camion, salterò addosso a uno dei tizi sfigurandogli quella brutta faccia che si ritrovano e correrò più forte che riesco nella boscaglia.

Percepisco che il veicolo sta nuovamente rallentando e svoltando a destra. Dev'essere una curva molto ampia. Il percorso adesso si è fatto più lento e ogni tanto il veicolo svolta da una parte o dall'altra.

Chissà cosa hanno in mente questi due. In generale le persone non mi sono mai piaciute molto, mi hanno sempre respinto e allontanato; dal canto mio io non ho mai capito cosa pensassero di me, per cui mi sono sempre tenuto a debita distanza. Un'eccezione è una signora del quartiere che ogni tanto si avvicina a me e mi offre qualcosa da mangiare. Ho sempre cercato di procurarmi il cibo nel bosco come frutti e piccoli animali che riesco a catturare da solo, ma la costruzione di nuovi edifici porta via sempre più alberi e restano sempre meno risorse. Quindi, per necessità, mi sono spinto a cercare il cibo nella spazzatura.

Finalmente penso di aver capito come posso aprire il sistema di chiusura. Intanto sento che il mezzo sta proseguendo lungo un percorso disestato. Fuori ormai starà per sorgere il sole.

La macchina ha appena svoltato.

Ci sono quasi ad aprire la serratura.

Il camion sta rallentando.

Ancora un piccolo sforzo e riuscirò ad uscire dalla gabbia.

Il veicolo si è fermato.

Mi manca pochissimo.

I portelloni del camion si sono aperti e di fronte a me si stagliano le sagome dei due uomini illuminati alle spalle dall'alba.

Non ho fatto in tempo ad aprire la serratura.

I due tizi stanno portando la gabbia tenendola ai lati. Sto cercando di mordergli le mani ma hanno indossato degli spessi guanti per cui ogni mio sforzo è inutile. Mi stanno portando in un bosco. Sulla destra c'è un grande cartellone con lo stesso stemma dei loro abiti.

Ho ancora un'ultima possibilità, devo solo aspettare che aprano loro la gabbia e poi li attaccherò con tutta la forza che mi rimane in corpo.

Davanti a noi c'è una donna che ci sta aspettando. Sorride. Ha in mano qualcosa, una scodella credo.

Una volta avvicinati lei indica qualcosa a terra. Finalmente i due appoggiano la gabbia al suolo.

L'uomo che mi ha catturato sta aprendo la serratura. Poi raggiunge correndo gli altri che si sono allontanati di una ventina di passi.

Ho un po' paura ad uscire, non mi fido. Poco più avanti vedo che per terra sono riposti vari frutti, delle ghiande e la ciotola che aveva in mano la donna. Mi sembra di scorgervi al suo interno dei lombrichi.

Ecco che dalla boscaglia arrivano dei miei simili. Allora corro verso gli altri procioni prima che mangino tutto loro. Mi volto a dare un'ultima occhiata ai tre esseri umani che si stanno allontanando tutti sorridenti verso il sole che illumina una nuova giornata.

Kidnapado

Anna Bonardi

Italio

Mi trovas min en la mallumo, ŝlosita en la malantaŭo de kamioneto. Nur nun mi konscias, ke mi estis kidnapita.

Ĉio okazis antaŭ kelkaj horoj. Ĉi-vespere, kiel kutime, mi iris al la kutima loko, en la stratangulo ĉe la fino de du aleoj de vicaj domoj, ĉiuj samaspektaj, por manĝi kelkajn vespermanĝajn restaĵojn sur la benko sub la stratlamparo apud la rubuoj. Estis somera vespero kiel multaj aliaj, kaj la nuraj sonoj aŭdeblaj estis la bruoj de la cikadoj kaj kelkaj ridoj el la ĝardenoj de loĝantoj ankoraŭ ne enlitaj. Mi alvenis malfrue nur por eviti homojn kaj povi trankvile ĝui la manĝon. Mi rimarkis nenion alian ol kutime, krom blankan kamioneton parkita ĉe la vojo ĉirkaŭ dudek metrojn for de mi, sed mi ne aparte ĝin atentis.

Do, mi estis trankvile ĝuanta mian tre ŝatatan malfruan vespermanĝon, kiam viro subite kaptis min de malantaŭe kaj blokis min sur la benko, kun mia ventro malsupren. Ĉar li estis malantaŭ mi, mi ne povis vidi lin. Mi provis liberiĝi de tiu kaptado per ĉiuj miaj fortoj, sed sen sukceso.

Mi aŭdis pordon fermiĝi kaj paŝojn alproksimiĝi. Mi sentis pikon kaj iom post iom miaj fortoj forlasis min. En stato inter sonĝo kaj maldormo, mi vidis la vizaĝojn de du viroj, min portantaj al sia veturilo. Ili estis same vestitaj per malhela uniformo portanta logotipon.

Ili poste enfermis min en metalan kaĝon en la blanka kamioneto. Ili fermis la pordojn, sidiĝis antaŭe, kaj ekveturis. Mi volis resti atenta pri la vojo, kiun ni veturos, sed la substanco, kiun ili injektis al mi, plene efikis kaj mi ekdormis.

Kaj jen mi, en la manoj de du kidnapistoj al nekonata destino. Mi tute ne scias, kiom longe mi dormis. Mi nur scias, ke de kiam mi vekigis, la kamioneto daŭre veturas rekte kaj mi vidas, ke ekstere ankoraŭ estas mallume, ĉar estas malgranda fenestro, kiu ligas la malantaŭan parton

de la veturilo kun la loko, kie la du viroj sidas. Mi aŭdas ilin paroli de tempo al tempo sed mi ne povas kompreni kion ili diras.

Ili zorgeme disŝetis pajlon sur la plankon de la kaĝo. Ili verŝajne atendas, ke mi timu kaj necesejumu sur ĝi, sed ili eraras, mi havas mian dignon.

Ili faris grandan eraron, se ili pensas, ke mi restos ĉi tie atendante kiel obeema kuniklito. Mi batalos per ungoj kaj dentoj. Ili ne konscias, kontraŭ kiu ili engaĝiĝis. Mi suferis pro malsato, malvarmo kaj malbona vetero dum jaroj, stoike akceptante mian kondiĉon, dum tiuj ĉi du viretoj sidis varme en siaj hejmoj kun fridujo superplenigita de ĉiuj bongustaĵoj.

Ne, mi ne restos ĉi tie senreage. Dormemo forvelkas kaj venas tempo serĉi manieron eskapi. Unue mi devas eltrovi kiel eliri el ĉi tiu kaĝo.

Mi ne estas granda rompŝtelisto. Mi nur ŝtelas tion, kio estas lasita neprizorgata. Malofte mi eniras loĝejojn profitante de malfermita fenestro.

Mi provas ŝteli nur tion, kio estas strikte necesa. Mia celo estas ne morti pro malsato, tial mi kontentiĝas eĉ pri manĝaĵo, kiun mi trovas en la rubujo. Ho jes, mia vespermanĝo konsistas el la restaĵoj, kiujn mi trovas en ruboj. Mi ne hontas pri tio. Ĝi estas la plej facila manĝaĵo, kiun mi povas akiri, kaj mi bonŝancas, ke ekzistas homoj, kiuj forĵetas sakojn da plu manĝeblaj manĝaĵoj, ekzemple nefinitaj sandviĉoj kaj legomoj, kiujn infanetoj ofte postlasas kaj iliaj gepatroj ĵetas en la rubujon. Kolerigas min pensi, ke ĉi tiuj du stultuloj kidnapis min ĝuste kiam mi ĝuis bongustan duon-akvomelonon, trovitan en granda sako, kiun mi penis malfermi. Se mi lekas miajn lipharojn, mi ankoraŭ sentas la dolĉan guston de la frukto.

Kiu scias kial ili kidnapis min, mi posedas absolute nenion. Mi konfesas, ke mi estis facila predo, mi malsaĝe mallevis la gardon. Kiam mi estis pli juna, evidentas ke mi ne estus farinta tian eraron. La viro, kiu kaptis min, verŝajne kaŝis sin inter la arbustoj malantaŭ la benko en la mallumo, por ke mi ne rimarku lian ĉeeston. Laŭ mi, ne estas la unua fojo, ke li faris tion.

Tamen estas senutile por mi perdiĝi en miaj pensoj ĉar la tempo kuras. La veturilo pluiras kaj estas ankoraŭ nokto ekstere.

Ĉirkaŭrigardante, mi rimarkas, ke ekzistas serio da pendantaj iloj, kiuj iomete swingiĝas. Por kelkaj mi opinias, ke ili estas uzataj por senmovigi iliajn viktimojn.

Subite la veturilo malrapidiĝas kaj sin turnas dekstren. Nun ĝi haltis. La du viroj eliris. Pasis iom da tempo sed ili ankoraŭ ne revenis. Mi profitas por klopodi kompreni, kiel funkcias la mekanismo, kiu fermas la kaĝon, zorgeme palpante ĝin.

Mi aŭdas paŝojn alproksimiĝi. Mia koro bategas freneze. Unu el la du viroj – tiu, kiu blokis min – ĵus malfermis la malantaŭon de la kamioneto. Li parolas al mi en nekomprenebla lingvo kaj rigardas min kun granda rideto. Ĉu li primokas min? Mi estus tiu, kiu devus ridi pri lia malbela vizaĝo, pala kaj kun du malgrandaj kaj proksimaj okuloj. Sed eble li ridas ĉar mi certe aspektis terurita, kiam li subite malfermis la pordojn. Tio min furiozigas, kaj ŝajnas esti tre evidenta, ĉar dum mi krias kaj koleras, lia rideto anstataŭiĝis per tima mieno.

Ankaŭ la alia alvenis. Mi esperas, ke li ne donos al mi tiun substancon denove. Feliĉe, ŝajnas ke ili lasos min sola. Ili fermas la pordojn. Nun ili reiris supren kaj prenis la saman vojon kiel antaŭe, veturante rekte antaŭen.

Mi provas elĉerpi ĉiujn miajn fortojn por eskapi el tiu malliberejo. Mi provis deformi la stangojn kaj eĉ grimpis supren sed ŝajnas ke la strukturo ne havas malfortajn punktojn.

Mi ne plu scias, kion pensi. La tempo pasas kaj mi ne sukcesis fari ion ajn. Cetere, nun mi vidas, ke la mallumo ekstere cedas lokon al milda lumo, signo ke la tagiĝo alproksimiĝas. Mi trankviliĝu, prefereble. Mi esperis eskapi profite de nokta mallumo, ĉar estus pli facile kaŝi sin, sed mi povas tion fari eĉ dumtage. Mi nur devas sukcesi eliri el la kaĝo kaj, tuj kiam ili remalfermos la malantaŭaĵon de la kamiono, mi saltos sur unu el tiuj viroj, difektante lian malbelan vizaĝon, kaj mi kuros en la arbaron tiel rapide, kiel mi povas.

Mi sentas, ke la veturilo denove malrapidiĝas kaj sin turnas dekstren. Ŝajnas esti tre larĝa kurbo. La vojo nun iĝis pli malrapida kaj fojfoje la veturilo sin turnas en unu aŭ alian direkton.

Kiu scias, kion tiuj du havas en menso. Ĝenerale, mi neniam tre ŝatis homojn, ili ĉiam forpuŝis min. Aliflanke, mi neniam kompre-

nis, kion ili pensas pri mi, do mi ĉiam konservis sekuran distancon. Escepto estas sinjorino el la kvartalo, kiu foje alproksimiĝas al mi kaj proponas manĝaĵon al mi. Mi ĉiam provis manĝi en la arbaro fruktojn kaj malgrandajn bestojn, kiujn mi povas kapti per mi mem, sed la konstruado de novaj domoj forprenas pli kaj pli da arboj, kaj restas malpli kaj malpli da vivrimedoj. Do pro neceso mi iras serĉi manĝaĵon en la rubujo.

Fine mi pensas, ke mi eltrovis kiel malfermi la ŝlossistemon. Dume mi sentas, ke la kamioneto daŭrigas la vojon sur malbona tereno. Ekstere la suno baldaŭ leviĝos.

La veturilo ĵus sin turnis.

Mi preskaŭ sukcesis malfermi la seruron.

La kamioneto malrapidiĝas.

Ankoraŭ iom da peno kaj mi sukcesos eliri el la kaĝo.

La veturilo haltis.

Mankas tre malmulte.

La pordoj de la kamioneto malfermiĝis kaj antaŭ mi staras la siluetoj de la du viroj, lumigitaj el malantaŭe de tagiĝo.

Mi ne havis sufiĉe da tempo por malfermi la seruron.

La du uloj portas la kaĝon tenante ĝin flanke. Mi provas mordi iliajn manojn sed ili surmetis dikajn gantojn do mia peno estas vana. Ili transportas min en arbaron. Dekstre estas granda afiŝtabulo kun la sama blazono kiel iliaj vestoj.

Mi havas ankoraŭ unu lastan ŝancon: mi nur devas atendi, ke ili malfermu la kaĝon kaj poste mi atakos ilin per la tuta forto, kiu restas en mia korpo.

Antaŭ ni estas virino, kiu atendas nin. Ŝi ridetas. Ŝi tenas ion en la mano, bovlon mi pensas.

Kiam ni alproksimiĝas, ŝi montras ion sur la tero. Fine, la du metas la kaĝon sur la grundon.

La viro, kiu kaptis min, malfermas la seruron. Tiam li kuras al la aliaj, kiuj foriris ĉirkaŭ dudek paŝojn for.

Mi iomete timas eliri, mi ne fidas. Iom pli malproksime vidas mi, ke sur la tero estas diversaj fruktoj, glanoj kaj la bovlo, kiun la virino tenis. Mi ŝajnas vidi lumbrikojn interne.

Jen el la arbaro alvenas samspeculoj miaj. Do mi kuras al la aliaj procionoj antaŭ ol ili manĝu ĉion. Mi turnas min por lasta rigardo al la tri homoj, kiuj foriras ridetante al la suno iluminanta novan tagon.

Perseo

Maria Rosaria Spanò
Germanio

Nokta trajnvojaĝo. Direkto: la Sudo.

Nenio novas por mi: tiu feraodoro, tiu ritma bruo de trajno antaŭeniranta surrele.

Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum.

Dudek sep somerojn mi tiel vojaĝis al la devenregiono de miaj gepatroj, Kalabrio. Poste, ne plu.

La kialoj de tiu interrompo ne gravas, kaj eĉ malpli gravas nun, ĉar kiel antaŭ dek kvin jaroj, mi vojaĝos denove, kaj finfine, al vi.

Mi elektis longan noktan veturadon, ĉi-foje, ĉar mi volas tempon por pensi kaj ripozi: tial mi mendis litvagonan kajuton. Mi kuŝas, sed dormo ne venas, kaj supozeble ĝi entute ne venos.

Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum. La trajna bruo vane lulas min.

Tiu ĉi nokta vojaĝo daŭros ĝis la kokokrio.

Rapida rideto spontanee naskiĝas, ĉar kokoj krias en tute hazardaj tempoj: ĉe mia avo aŭdeblis koko krianta jen matene, jen vespere, jen dum la plej varmaj horoj de la tago, senenergie, ĝeme, kvazaŭ temus pri neevitebla tasko. Mia gaja mieno ekviglas je la penso ke, se la evangelia koko estintus tia, la profetaĵo de Jesuo al Petro pri lia malkonfeso iĝus tute malpreciza. Ankaŭ la vortumoj de la kvar evangeliistoj ne kompletcoincidas. Ili sinsekvas en mia menso: *antaŭ ol krios koko, vi trifoje malkonfesos min; antaŭ ol dufoje krios koko, vi trifoje malkonfesos min; koko ne krios hodiaŭ, antaŭ ol vi trifoje malkonfesos, ke vi min konas; la koko ne krios, antaŭ ol vi min malkonfesos tri fojojn.* Petro, fonda roko, unue rekonis Kriston en Jesuo kaj poste forneis lin. Spite la postan penton kaj martiriĝon de la apostola princo, kaj la sekvan forlavon de lia kulpo, mi tre ofte konjektamis ke malkonfeso, forneo estas la vera praelemento de kristanismo. Petro terurigiĝis, do li perfidis Jesuon: temas

pri trajto homa, tro homa, kaj cetere kristanismo tute ne imageblas sen karno.

Suspire mi pensas ke ankaŭ mi, antaŭ la kokokrio – nu, supozante ke kokoj krias aŭrore – forneis vin.

Via pasio por mi sendube estis tro forta, malfacile reciprokebla. Via devoteco estis por mi balzamo, paliativo, io danke al kio mi rompis – aŭ almenaŭ, tion mi volis kredi – la katenojn kiuj opresis min. Via aspekto, simila al tiu statuo de Benvenuto Cellini, Perseo – kies glavo, kies harmonia krueleco malkvietigas kaj altiras min ekde kiam mi admiris ĝin unufoje en Florenco – kompletigas la kadron. Mi ensorĉiĝis en vian vatumitan neston kaj nek povis nek volis liberiĝi: vi protecece adaptiĝis al mi, anticipe komprenis miajn dezirojn, trenis min en viajn. Via speciala kapablo ĝui la nunon ĝis perdo de memrego, por poste reakiri ĝin kvazaŭ vi estingus incendion per glaso da akvo, pli kaj pli dominis min.

Al vi mi aparte ŝuldis la perditan parton de mi: mian sudecon. Jes, ĉar post la subita perdo de mia origina Sudo, mi postkuris ĝiajn spurojn en la vivo de aliaj. Estas io, kion mi obsede serĉis, en kio mi tordite reflektiĝis, transprenante ĉiufoje la aspekton de tio, kion mi observis. Jen varmaj, humidaj noktoj ĉe la marbordo, jen ŝajndormantaj vulkanoj, jen dancantaj satirusoj reelakvigitaj el nekonataj markoloj, jen akĉentoj kiujn mi senespere strebis alpreni, jen mia maro – la Ionia Maro – kiun mi rekonis de ĝiaodoro, de ĝia profundeco, la nuran someron kiun ni pasigis kune en via denaska Salento, en tiu loko el sango, frenezo kaj rimorso, kies ruĝan teron iam iu difinis finistera. Tie mi neniam vidis tiun misfaman *taranta* – iam mi tutcertis, ke temas pri araneo, sed fakte ĉu ĝi estas tarantulo, geko, serpento, aŭ skorpio, malfacilas diri – kiu laŭtradicie trakuras somerajn noktojn kaj dionize delirigas per sia veneno, tamen mi ĉiam malkvietiĝis pensante pri ĝia insida mordo. Kio se unu el tiuj bestoj kaŝus sin en tiu ĉi malluma kupeo?

Tum. La trajno haltas, abrupte. Mi eksidas.

Stulta supozo. Verdire, stultaj supozoj. Veras nur, ke mi ne estas sudano: mi naskiĝis kaj kreskis en la Nordo, en Torino, tiu senmara postindustria urbo kie ni interkonatiĝis. Mia akĉento sonas iel mik-sita, malfacile identigebla, sed certe ne suda. Mi ne plu memoras la

lokojn kie mi pasigis miajn infanaĝajn somerojn: ĉiuj konturoj malnetiĝis, ĉiuj voĉoj kaj bruoj fadis. Plie, miaj internaj bremsoj hontigas min, retenas min de plena esprimiĝo. Vi, kaj via libereco kiun mi ĉiam enviis, estis unu el la multaj fetiĉoj ligitaj al mia perdita Sudo, al la elpensita Sudo kiun mi obstine klopodis rekonstrui kungluante malkongruajn pecojn per idealigitaj, foraj impresoj. La rezulto estis patosa himero.

Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum. La trajno reekiris, kaj nun monotone litanias. Mi rekuŝiĝas.

Nian simbiozon iam, post tiu kuna somero, ekminacis io, io kio laŭgrade malebligis al vi nete distingi veron disde malvero, realon disde viaj angoroj, viaj manioj, viaj obsedoj. Sufiĉis tute neglektebla epizodo, sensignifa preteratento, neprokrastebla okupo, por ŝanceli vian ekvilibron, por skui vian fidon je mi. Kaj je vi mem.

En frukristana teksto legeblas ke, en monaĥinejo situanta en la egipta regiono Tebaido, iam vivis senhelpa mizerulino, nomata greklingve *salé*, la idiotino, funkcianta kiel monaĥineja spongo: ŝi estis mistraktata de ĉiuj siaj spiritaĵoj, kiuj danke al tiuj negativaj elverŝoj sukcesis konservi sian aleksteran respektindecon. Simile, mi ensorbis vian venenon – jen tio, kion ni ambaŭ tiam kredis amo – guton post guto, enprofundiĝante en obskuran flusablon, sed sekrete, honte, dum vi aspektis al la aliaj ĉiam pli ĝua, vigla, luma. Ĉio volupte miksiĝis kun sia malo, pasio kun detruemo. Kaj memdetruemo.

Tum. Plia halto.

Kiam la suferado transpasis eltensojlon, mi revekiĝis, kiel post longa torporo.

Antaŭ la kokokrio, mi forneis vin. Perfide.

Kvankam mi faris tion por supervivi, mi surprenis respondecon pri ĉio: pri la amo – la via – kiun mi forĵetis, pri la fiero – la via – kiun mi vundis, kaj pri la gigantaj internaj demonoj – la viaj – kiuj jam ekzistis antaŭ mi, kaj pluekzistos post mi.

Jen la monstro, la diablo; mi akceptis vian verdikton kaj vian niam anoncitan kondamnon.

Paŝon post paŝo, mia vivo iĝis stabila, respektinda. Via ombro tamen aperas en miaj sonĝoj, intermite, senatende, por turmenti min per

surprizaj, furiozaj atakoj. Viaj manifestiĝoj trapikas min ĉiam pli funde – tiu doloro disŝiras mian karnon, mi sensas ĝin – per la kulposento kaj la korpa deziro de kiuj mi neniam sukcesis sentoksiĝi. En mi la certeco ke vi forrabis – kaj regos por ĉiam – la plej profundan parton de mi, estas ĉiam pli firma.

Via ŝtona, nedisbatebla silento fortimigis min pli ol via ebla malgrabra reago: tial mi eĉ ne provis rekontakti vin. Mi eĉ ne sciis kie vi loĝas nun, kaj ne kuraĝis demandi tion de niaj komunaj konatoj.

Tio daŭris ĝis vi, tute neatendite – kaj surprize, ĉar miamemore vi neniam manifestis apartan verkemon – sendis al mi tiun vian longan rakonton, en kies ĉefrolulo rekoneblas vi. Ĝi instrospektas, senindulgas, ferocas. Unuvorte, ĝi konfesas. Vi dediĉis ĝin al mi, kvankam vi diskrete prisilentas mian identecon: *Al Vi, kiu jetis min en la abismon*. Nu, prikonsiderante interalie vian nomon de ĉefanĝelo – de tiu armita per glavo – inter ni du estas sendube vi la specialisto pri enabismigoj, mi tuj pensis, ironie. Tamen, via verko pruvis al mi, definitive kaj senapelacie, ke mi komprenis nenion pri vi kaj pri viaj sentoj por mi, kiuj malgraŭ ĉio titanas, preter ajna imago, kaj kiuj kun la tempopaso maturiĝis. Fine klaris al mi, ke pluraj vundoj ne cikatriĝis, ke io daŭre sangas.

Ni longe interskribis pri tiu rakonto, kiu kaŭzis al mi plurajn sendormajn noktojn, kaj pri ni, ĉiam pli funde kaj intense, ĝis via propono revidiĝi.

Antaŭ la kokokrio mi forneis mian nunan vivon, kaj decidis renkonti vin denove, por avide readmiri vian persean belecon kaj finfine fermi la paseajn kontojn.

Mi ne elektis hazardan tagon, sed daton simbole signifan: la 29-an de septembro, vian nomfeston.

Tiu antaŭĝoja pensofluo karesas min dum tiu ĉi plia sendorma nokto, dum la trajno voras la restantajn kilometrojn ĝis la urbo kie vi atendos min. La kurba larĝiĝo de la fendo inter la fenestro-kurteno kaj la vitro silente atestas kiom ofte mi senpacience flankenŝovetis ĝin dumvojaĝe.

Tum tu-tum tu-tum. Tum tu-tum tu-tum. Tum... tutum... tum... tutum... tum...

Iam mi ekkonscias, ke la trajno laŭgrade malakceliĝas: aŭdeblas tiu aparta bremsa knarado kiun mi instinkte rekonas. Laŭ la horo klaras, ke ni preskaŭ atingis la finan cellokon.

Aŭroras, kiam la trajno eniras la stacidomon de Lecce; ĝia halto, ĉi-foje, estas tre delikata.

Mi eltrajniĝas kaj antaŭĝojas vidi vian rideton dum vi kuras al mi, kiel okazis antaŭ dek kvin jaroj, tiun someron.

Inter pluraj atendantoj, salutoj, brakumoj, kisoj, kaj haste forirantaj pasaĝeroj sur la kajo, vi tamen ne staras.

Ŝtonigite, mi atendas ĝis la kajo malpleniĝas, sed vi ne aperas.

En neeltenebla silento, kiun neniu kokokrio rompos, racio sufloras al mi la veron, kaj imago jam ekvidas vin, efebano kaj teruran kiel Perseo, dum vi alte levas per via maldekstra mano mian sangantan kapon, ĵus dehakitan de via glavo.

Ĉe viaj piedoj kuŝas via metala ŝildo, la bronza spegulo kiu trompis min.

Найди меня

Валентина Барачевская

Россия

Он выехал в ночь. После перекрёстка разогнался до ста двадцати — время дорого. Когда он отправлял сообщение инфоргу, было без пятнадцати час, десять минут ушло на сборы, две — чтобы отыскать ключи от джипа (случайно завалились за трюмо в коридоре), ещё минута, чтобы объяснить жене, куда он собрался. Последнее оказалось совсем просто, — он боялся, что Лида начнёт задавать вопросы, будет отговаривать, или, что ещё хуже, не поверит ему и устроит скандал. Но жена выслушала его спокойно. Молча, не отрываясь от экрана ноутбука, она покивала головой, а потом, когда он был полностью одет и собирался выйти за дверь, так же молча подошла к нему и погладила по плечу. Нет, скорее просто дотронулась до него, прикоснулась, но это лёгкое, секундное прикосновение было первым за много месяцев.

Игорь уже забыл, когда они с женой обнимались или разговаривали по душам последний раз. Всё их общение сводилось к редким обыденным фразам, без которых два человека не могут жить вместе в одном помещении. Они даже спали теперь в разных комнатах: жена засыпала в зале перед работающим телевизором, — он проводил вечера в спальне.

После того, как погиб её сын от первого брака, пятнадцатилетний Серёжа, они с женой все больше отдалялись друг от друга. Два года прошло с тех пор, как Серёжа с товарищем пропали в лесу, — поехали на велосипедах за черникой и заблудились. Друга нашли на следующий день, испуганным, голодным, но, главное, живым. Поиски Серёжи продолжались пять дней. С субботы по четверг они с женой жили надеждой: ссорились, искали виноватых, потом успокаивали друг друга и заново ссорились. Игорь сам участвовал в спасательной операции, тогда

и познакомился с волонтерами — поисковиками. Лида в это время обзванивала больницы, ругалась с полицией, печатала и расклеивала листовки. В четверг их надежда умерла — в заливе около леса Серёжку обнаружили водолазы.

Игорь совершенно не помнил, что происходило в первые дни после гибели сына. На похороны он не попал — переохладился в лесу и три недели пролежал в больнице с абсцессом лёгкого. Когда вернулся домой после операции, с трудом узнал свою Лиду. Вместо ухоженной молодой жены его ждала исхудавшая, неопрятная женщина. Да и не ждала она его вовсе — Лида как будто забыла о его существовании. Он не обиделся. Старался поддерживать жену, как мог, но разговаривать о гибели сына она наотрез отказывалась. И тогда он решил на время оставить её в покое. Вместо этого стал ходить к теще — помогал на огороде, возил её в поликлинику и просто коротал с ней вдвоём вечера на кухне, когда дома становилось совсем тягостно. Ему казалось, что жена превратилась в робота — утром уходила на работу, возвращалась поздно и сразу садилась перед телевизором с ноутбуком на коленях. Она не готовила, не вязала свои любимые корзинки, разбрасывая пряжу по всей квартире, как раньше, не ходила с подругами по субботам в баню. Иногда разговаривала с кем-то по телефону, но делала это так, чтобы Игорь её не слышал. Он сам занимался бытом, сам готовил нехитрые блюда и старался накормить ими жену. Лида ела очень мало и за последний год похудела килограммов на десять. Знакомый психотерапевт оказался бессилён — жена наотрез отказалась от лечения, а принуждать её у Игоря не хватило смелости. Он ждал. Всё ещё надеялся, что однажды жена очнётся, закроет ноутбук и они наконец поговорят по душам. Пусть даже поссорятся, потому что любая ссора лучше этого холодного молчания. Но время шло, а в их семье ничего не менялось. Кроме посиделок с тещей, отдушиной для Игоря стало волонтерство. Каждый раз, когда он включал ноутбук, — обязательно заходил на сайт отряда, который два года назад занимался поисками Серёжи. Он внимательно следил за новостями, рассматривал фотографии,

читал статьи. Каждый раз, когда он видел оповещение «Внимание! Поиск!», у него потели ладони. Хотелось помогать, быть полезным, нужным. Он часто видел на сайте заметки инфорга о поисках и всегда с интересом их читал. Инфорг, девушка с позывным «Сова», писала очень ёмкие, грамотные и в то же время какие-то душевные статьи о поисках, правилах поведения в лесу и тонкостях техники. Иногда Игорь переписывался с ней в чате, спрашивал, какая нужна помощь, и обеспечивал штаб запасом бумаги, налобными фонарями или аккумуляторными батарейками. Денег было не жалко, он получал гораздо больше, чем тратил. Игорь познакомился с некоторыми добровольцами, его стали узнавать в штабе, но вступить в ряды поисковиков, несмотря на приглашение и внутреннее желание, он не решался, — переживал, как Лида отнесётся к тому, что он стал волонтером отряда, который искал её сына. Искал, но не спас.

Сегодня вечером, когда он уже собирался закрыть ноутбук и лечь спать, ему пришло новое оповещение. Внимание! Поиск! Лес!

Дедушка и мальчик восьми лет потерялись в лесу. Игорь смотрел на фотографию ребёнка: широко поставленные глаза, прямой нос, густая чёлка — мальчик был похож на Серёжу. Когда они с Лидой поженились, Серёжке как раз исполнилось восемь лет. На роль отца Игорь не претендовал, но относился к ребёнку с добротой. Они даже ни разу не поссорились серьёзно за всё это время, хотя Лида обоих называла упрямыми.

Хватит сидеть у монитора! Игорь написал инфоргу короткое «буду!», надел камуфляжку, закинул в рюкзак фонарь, термос с горячим кофе и отправился в лес. Полчаса по пустой трассе, потом поворот у электростанции на просёлочную дорогу. Обогнул деревню и по краю поля направился к лесу. Наконец впереди показалась буханка со знакомыми наклейками — штабной автомобиль поисковиков.

— Алексей, координатор поиска. Позывной «Зевс». — Высокий молодой мужчина пожал ему руку, другие последовали его примеру.

— Игорь, я впервые на поисках.

— Понятно. Вот карта. Лес небольшой, но недавно прошёл ураган, полно ветровала, ходить будет сложно. Экипировка есть?

— Налобный фонарь есть.

— Прекрасно. Сейчас разобьёмся на лисы и начнём. Кот, дай ещё раций!

Бородатый мужчина принёс из машины несколько раций и раздал их тем, кто недавно приехал.

— В воздухе работает квадрокоптер, но на него надежды мало, лес высокий, связь слишком слабая. Будем работать на отклик.

Поисковая лиса — группа из трёх человек. Игоря объединили с крупным широкоплечим мужчиной и худым высоким юношей, почти подростком. Олег и Евгений — отец с сыном уже несколько лет участвовали в лесных поисках. Их группа получила задание закрыть работой «на отклик» квадрат леса номер шесть. Мощные фонари хорошо освещали лес, но перелезть через поваленные деревья, как и обещал координатор, было трудно. Лиса двигалась крайне медленно.

— Лиса номер три работает на отклик, — сообщил юноша по рации. Потом он остановился, сложил ладони рупором и громко закричал. — Пе-тя! Ко-ля! Николай!

На сорок секунд все замерли, надеясь услышать какой-нибудь ответ, но посторонних звуков не было.

Они снова двинулись через бурелом, каждые двести метров останавливаясь для работы на отклик.

— Квадрат закрыт. Возвращаемся. — Олег вытащил рацию.

— Лиса номер три работу на отклик закончила, — сообщил он координатору.

Назад шли ещё медленнее. С непривычки Игорю хотелось спать, а резиновые сапоги вдруг ужасно потяжелели. Пока пробирались через бурелом, в лесу начало светлеть. Горячего кофе бы сейчас.

— Игорь, ты сейчас на работу?

— Нет. Сегодня выходной.

— Тогда остаёмся. Передохнём немного и возьмём ещё квадрат. Утром должны подъехать кинологи.

Рация в кармане Олега затрещала.

— Тишина в эфире! Найдены! Живы! Квадрат 14. Идут сами.

— Ура!!! — закричал Олег, размахивая палкой, с которой ходил по лесу.

— Слава Богу! — улыбнулся Евгений.

Казалось, что даже пробираться через бурелом стало легче. Наконец они вышли к штабному автомобилю. Там уже собрались вернувшиеся с поисков «лисы». Уставшие мужчины сидели на траве, курили, пили горячий чай. Через несколько минут приехали врачи скорой помощи, и как только дедушка с внуком вышли из леса — их сразу увезли в городскую больницу. Игорь только мельком увидел на руках у Зевса закутанного в красное одеяло ребёнка.

— Спасибо. — Игорь подошёл к координатору, чтобы попрощаться. — Я поехал.

— Тебе спасибо. Отдыхай. Отпишись инфоргу, когда будешь дома. — Зевс пожал ему руку. — Слушай, подожди, давай я вас познакомлю. Сова говорила, что вы общались в чате. Она сегодня тоже первый раз на поиске. Хватит сидеть за компьютером, да, Сова? — Высокая девушка в большой не по размеру мужской куртке низко склонилась над бумагами, лежавшими на капоте автомобиля.

— А? — девушка перестала писать и сняла капюшон.

— Познакомься, говорю, это Игорь. Ты его заочно знаешь.

— Здравствуй, Сова! — Игорь легко сжал холодную ладошку жены. — Рад тебя видеть! — Лида молча смотрела на него, и глаза её наполнялись слезами. Вот одна медленно скатилась вниз по щеке. — Я...

Зевс с удивлением хмыкнул и тактично отошёл к буханке.

— Я... Прости меня.

Игорь сделал шаг вперёд, вынул из замёрзших пальцев ручку и крепко прижал к себе жену.

— Я тебя нашёл. Поехали домой, родная.

Trovu min

Valentina Barachevskaia

Rusio

Li forveturis dumnokte. Post la vojkruciĝo, li akcelis ĝis cent dudek – la tempo estas altvalora. Kiam li sendis mesaĝon al la informistino, estis dek kvin minutoj antaŭ la unua: dek minutoj por pretiĝi, du minutoj por trovi la ŝlosilojn de la ĵipo (malbonvenege falintaj malantaŭ la meblon de la koridoro), plia minuto por klarigi al la edzino kien li iris. Tio lasta montriĝis sufiĉe simpla – li timis, ke Lida komencus demandadi, malinstigi lin aŭ, eĉ pli malbone, ne kredus lin kaj farus skandalon. Sed lia edzino trankvile aŭskultis. Silente, ne forturnante sin de la ekrano de la tekkomputilo, ŝi kapjesis, kaj tiam, kiam li estis tute vestita kaj pretis eliri tra la pordo, ŝi silente alproksimiĝis al li kaj karesis lian ŝultron. Pli ĝuste, ŝi nur tuŝis lin, tuŝetis, sed ĉi tiu malpeza, momenta tuŝo estis la unua ekde multaj monatoj.

Igor jam forgesis, kiam li kaj lia edzino lastfoje brakumis aŭ havis plenkoran diskuton. Ilia tuta interago reduktiĝis al maloftaj banalaj ĉiutagaj frazoj, sen kiuj du homoj ne povas vivi kune en la sama ĉambro. Ili eĉ dormis nun en malsamaj ĉambroj: la edzino kutimiĝis endormiĝi en la salono antaŭ funkcia televidilo, dum li pasigis la vesperojn en la dormoĉambro.

Post la morto de ŝia filo el unua geedziĝo, dekkvinjara Serĝo, ili estis pli kaj pli for unu de la alia. Du jaroj pasis de kiam Serĝo kaj kamarado malaperis en la arbaro – ili biciklis por kolekti mirtelojn kaj perdiĝis. La amikon oni trovis la sekvan tagon, timigita, malsata, sed plej grave, viva. La serĉado por Serĝo daŭris dum kvin tagoj. De sabato ĝis ĵaŭdo, li kaj la edzino vivis esperante: ili kverelis, serĉis kulpulojn, poste trankviliĝis kaj denove kverelis. Igor mem partoprenis en la savoperacio, kaj tiam konatiĝis kun volontulaj serĉistoj. Dume, Lida telefonadis al hospitaloj, kvereladis kun la polico, prin-

tadis kaj algluadis flugfoliojn. Ĵaŭde mortis ilia espero: Serĝon trovis subakvaj plonĝistoj en golfeto proksime de la arbaro.

Igor tute ne memoris, kio okazis dum la unuaj tagoj post la morto de la filo. Li ne povis ĉeesti dum la entombigo ĉar, malvarmiĝinte en la arbaro, li pasigis tri semajnojn en la hospitalo kun pulma absceso. Kiam li revenis hejmen post la operacio, li apenaŭ rekonis sian Lidan. Anstataŭ prizorgita juna edzino, nun magra, neglektita virino atendis lin. Kaj ŝi tute ne atendis lin. Lida ŝajne forgesis pri lia ekzisto. Li ne ofendiĝis. Li provis subteni sian edzinon kiel eble plej bone, sed ŝi tute rifuzis paroli pri la morto de sia filo. Tiam li decidis lasi ŝin sola por momento. Anstataŭe, li komencis viziti sian bopatrinojn, helpis en la ĝardeno, veturigis ŝin al la kliniko kaj simple pasigis vesperojn kun ŝi en la kuirejo, kiam hejme fariĝis tute dolore. Al li ŝajnis, ke lia edzino fariĝis roboto: ŝi foriris matene al laboro, revenis malfrue kaj tuj sidiĝis antaŭ la televidilo kun tekkomputilo sur la genuoj. Ŝi ne kuiris, ne teksis siajn plej ŝatatajn korbojn – disĵetinte fadenon tra la tuta apartamento – kiel antaŭe, ne iris al la saŭno kun siaj amikinoj sabate. Foje ŝi parolis kun iu per telefono, sed ŝi faris tion tiel, ke Igor ne aŭdu ŝin. Li mem okupiĝis pri ĉiutaga vivo, li mem kuiris simplajn pladojn kaj provis nutri sian edzinon per ili. Lida manĝis tre malmulte kaj dum la pasinta jaro perdis proksimume dek kilogramojn. Konata psikoterapiisto montriĝis senpova: la edzino tute rifuzis terapion, kaj Igor ne havis la kuraĝon devigi ŝin. Li atendis. Li ankoraŭ esperis, ke iutage la edzino vekigis, fermos sian komputilon, kaj ili fine parolos intime. Eĉ se ili kverelos, ĉar iu ajn kverelo estus pli bona ol tiu ĉi malvarma silento. Sed la tempo pasis kaj nenio ŝanĝiĝis en ilia familio. Krom la momentoj kun la bopatrino, volontulado iĝis spirado por Igor. Ĉiufoje kiam li ŝaltis sian komputilon, li iris al la retejo de la taĉmento, kiu antaŭ du jaroj serĉis Serĝon. Li atente sekvis la novaĵojn, rigardis fotojn, legis artikolojn. Ĉiufoje, kiam li vidis la avizon “Atentu! Serĉado!”, liaj polmoj ekŝvitis. Li volis helpi, esti utila, necesa. En la retejo, li ofte vidis notojn de la informistino pri serĉado kaj ĉiam legis ilin kun intereso. La informistino, junulino kun la voknomo Strigo, skribis tre ampleksajn, kompetentajn kaj samtempe sincerajn artikolojn pri serĉado, la reguloj de konduto en la arbaro kaj teknologiaj subtilaĵoj. Kelkfoje Igor interŝanĝis mesaĝojn kun ŝi, demandis, kian helpon oni bezonas, kaj provizis

la stabon per papero, lampoj aŭ reŝargeblaj baterioj. Elspezi monon ne ĝenis lin, li ricevis multe pli ol li elspezis. Igor renkontis kelkajn volontulojn, oni pli kaj pli konis lin en la stabo, sed malgraŭ la invito kaj interna deziro, li ne kuraĝis aliĝi al la vicoj de la serĉistoj – li maltrankviliĝis pri la reago de Lida al tio, ke li fariĝus volontulo en la taĉmento, kiu serĉis ŝian filon. Serĉis, sed ne savis.

Hodiaŭ vespere, kiam li estis fermonta la komputilon kaj enlitiĝonta, li ricevis novan sciigon: “Atentu! Serĉado! Arbaro!”

Avo kaj okjara knabo perdiĝis en la arbaro. Igor rigardis la foton de la infano: larĝe fiksitaj okuloj, rekta nazo, densaj haroj – la knabo aspektis kiel Serĝo. Kiam li kaj Lida geedziĝis, Serĝo estis ĝuste okjara. Igor ne emis anstataŭi la patron, sed bonkore traktis la infanon. Ili neniam eĉ havis seriozan kverelon dum la tuta tempo, kvankam Lida nomis ilin ambaŭ obstinemuloj.

Finis sidi antaŭ la ekrano! Igor skribis mallongan mesaĝon “Mi partoprenu!”, surmetis kamufloveston, ĵetis en sian dorsosakon poŝlampon kaj termoson de varma kafo, kaj ekveturis al la arbaro. Duonhoro sur malplena aŭtovojo, poste turniĝo ĉe la elektrocentralo sur kamparan vojon. Li ĉirkaŭiris la vilaĝon kaj laŭ la rando de la kampo iris al la arbaro. Fine, aperis antaŭe la ŝildo kun konataj glumarkoj: la stabaŭto de la serĉistoj.

“Aleksej, serĉkunordiganto, voknomo Zeŭso.” La alta juna viro premis lian manon, kaj la aliaj same faris.

“Igor. Tio estas mia unua serĉado.”

“Bone. Jen la mapo. La arbaro estas malgranda, sed okazis uragano antaŭnelonge, estas multaj falintaj arboj, estos malfacile marŝi. Ĉu vi havas ekipaĵon?”

“Mi havas fruntlampon.”

“Bonege. Ni disiĝu nun en grupojn kaj komencu. Kat’, disdonu pli da portofonoj!”

Barbulo alportis plurajn portofonojn el la aŭto kaj ilin disdonis al tiuj, kiuj ĵus alvenis.

“Kvadroptero operacias en la aero, sed estas malmulte da espero tiuflanke. La arbaro estas alta, la konekto estas tro malforta. Ni klopodos serĉi per voĉresponda tekniko.”

Ĉiu serĉgrupo enhavas tri homojn. Igor estis akompanata de granda, larĝsultra viro kaj maldika, alta junulo, preskaŭ adoleskanto. Oleg kaj Evgenij, patro kaj filo, jam de pluraj jaroj partoprenis en arbaraj serĉadoj. Ilia grupo ricevis la taskon serĉi voĉresponde en la arbara kvadrato numero 6. Potencaj lanternoj bone lumigis la arbaron, sed grimpante super falintaj arboj, kiel antaŭvidis la kunordiganto, estis malfacile. La grupo moviĝis tre malrapide.

“Grupo numero 3 serĉas voĉresponde”, diris la junulo per radio. Poste li haltis, kunmetis la manojn kiel megafonon kaj laŭte kriis “Pe-tja! Ko-lja! Nikolaj!”

Dum kvardek sekundoj ĉiuj senmoviĝis, esperante aŭdi ian respondon, sed ne aŭdeblis eksteraj sonoj.

Ili denove moviĝis tra la amasoj da falintaj arboj, haltante ĉiujn ducent metrojn por serĉi respondon.

“La kvadrato estas kompletigita. Ni revenu.” Oleg eliris portofonon. “Grupo numero 3 finis la respondserĉadon”, li diris al la kunordiganto.

Revenante, ili iris eĉ pli malrapide. Pro nekutimo, Igor sentis sin lacega, kaj la kaŭĉukaj botoj fariĝis terure pezaj. Dum ili moviĝis tra la amasoj da falintaj arboj, la arbaro komencis heliĝi. Varmega kafo estus bonvena nun.

“Igor, ĉu vi devas iri al laboro nun?”

“Ne. Hodiaŭ estas libera tago.”

“Do ni restu. Ni faru paŭzon kaj prenu alian kvadraton. Serĉhundoj devus alveni matene.”

La radio en la poŝo de Oleg kraketis.

“Silento en la radioondoj! Trovitaj! Vivantaj! Kvadrato 14. Ili venas per si mem.”

“Hura!!!”, kriis Oleg, svingante la bastonon, per kiu li iris tra la arbaro.

“Dankon al Dio!”, diris Evgenij ridetante.

Ŝajnis, ke eĉ moviĝi tra la amasoj da falintaj arboj fariĝis pli facile. Fine, ili iris al la staba aŭto. La grupoj, kiuj revenis de la serĉado, jam kolektiĝis tie. Lacaj viroj sidis sur la herbo, fumis, trinkis varman teon. Kelkajn minutojn poste alvenis ambulancoj, kaj kiam la avo kaj nepo elvenis el la arbaro, oni tuj kondukis ilin al la urba hospitalo. Igor

ekvidis nur dum momento infanon envolvitan en ruĝa kovrilo en la brakoj de Zeŭso.

“Dankon.” Igor alproksimiĝis al la kunordiganto por ĝisi. “Mi rehejmiĝu.”

“Dankon. Ripozu. Sciigu al la informistino, kiam vi estos hejme.” Zeŭso premis lian manon. “Aŭskultu, atendu, mi prezentu vin al ŝi. Strigo diris, ke vi jam babilis. Hodiaŭ estas ankaŭ ŝia unua fojo en la serĉado. Ŝi finfine ĉesis sidi ĉe la komputilo, ĉu ne, Strigo?” Alta knabino en granda vira jako estis malalte klinita super la paperoj kuŝantaj sur la kapoto de la aŭto.

“Kio?” La knabino ĉesis skribi kaj demetis sian kapuĉon.

“Renkontiĝu, jen Igor. Vi jam konas lin koresponde.”

“Saluton, Strigo!” Igor facile premis la malvarman manon de sia edzino. “Mi ĝojas vidi vin!” Lida silente rigardis lin, ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj. Jen unu malrapide ruliĝis laŭ ŝia vango. “Mi...”

Zeŭso ridis surprizite kaj takte marŝis al la aŭto.

“Mi... Pardonu min.”

Igor faris paŝon antaŭen, elprenis la skribilon el ŝiaj frostigitaj fingroj kaj forte premis sian edzinon al si.

“Mi trovis vin. Ni iru hejmen, kara.”

Incontro in punta di luna

Lori Marchesin

Italia

L'uomo raggiunse la sommità del promontorio. Seduto su di un masso, si accese la pipa, si guardò intorno, alzò gli occhi stregato da una falce di luna che danzava sulle punte in precario equilibrio tra roccia e cielo. Era tanto tempo che non tornava a casa.

Lisa si alzò di scatto.

“Io vado a casa. Sono quasi le due e sono stanca.”

“Dai Lisa, non fare la guastafeste. Si sta così bene qui, accarezzati dal vento e sotto un cielo carico di stelle.”

Toni la guardava con gli occhi spalancati e un sorriso sghembo. Stava usando immagini care alla moglie per convincerla a fermarsi con loro. Il tono scherzoso la irritò; erano seduti a quel tavolo da ore. Una cena eccellente con spaghetti alla *busara* e grigliata di pesce azzurro e tanto, tanto vino.

Ora gli amici la stavano guardando con rimprovero per aver interrotto l'allegria, non avevano alcuna intenzione di sollevare il sedere dalle scomode sedie di legno e rompere l'atmosfera godereccia.

“Lisa, non hai paura di andartene all'albergo da sola? Devi percorrere un bel tratto e attraversare la pineta.”

Toni cercava di intimorirla ma non finse neppure di alzarsi per accompagnarla.

“C'è ancora gente in giro, le luci delle barche e degli alberghi sulla cosata, in dieci minuti raggiungerò il Drazica. Non è il caso di essere preoccupati, ma non credo tu lo sia.”

Il tono era stizzito ma Toni era già immerso in scambi di battute con gli amici.

Lisa raccolse i lunghi capelli biondi in una coda che fermò con un elastico e s'incamminò; percorse tutto il centro di Krk ancora affolla-

to di gente che rideva, coppie che camminavano abbracciate; i piccoli ristoranti ancora aperti proiettavano scacchiere di luce, risate e grida rimbalzavano da un lato all'altro della strada, spina dorsale dell'isola.

Lisa camminava veloce, era infastidita dal rumore, dalle luci e sospirò di sollievo quando raggiunse il viottolo che costeggiava il mare.

Era come entrare in un mondo diverso dove lo sciabordio delle onde si mescolava alla melopea del vento tra i pini. Lisa sentì che la tensione si stava attenuando, lasciando il posto a sensazioni marine che accarezzavano l'udito, riempivano le narici del profumo salmastro mentre gli occhi spalancati ammiravano la luna in bilico sul promontorio e stelle tra origami di cielo.

Questo era il mondo che lei amava, che la faceva sentire in pace con se stessa e con gli altri.

Sorrise tra sé pensando a Toni. Era sicura che in breve l'avrebbe raggiunta in albergo; per lui questa vacanza era anche rilassarsi e divertirsi con gli amici. Forse era stata troppo brusca, ma il bisogno di stare sola era prevalso. Ne avrebbero riso insieme.

Ricordava che c'era una deviazione, un viottolo nella pineta che accorciava il percorso. Girò a sinistra, ora solo i pini delimitavano quel sentiero. L'oscurità era più densa, il suo vestito bianco l'unica macchia chiara.

Incespicò su un masso e sentì un acuto dolore alla caviglia. "Spero che sia una storta. Ci mancherebbe una frattura qui da sola al buio", borbottò. Seduta su di uno spuntone di roccia, si massaggiò con cautela, sembrava una storta ma non vedeva niente, con le dita cercò di capire se c'era gonfiore, non osava rimettersi in piedi e un brivido di paura le percorse la schiena. Doveva alzarsi e continuare a camminare fino all'albergo. Sentì gli occhi appannarsi e una stretta allo stomaco; tutta la sua determinazione stava sparendo lasciando posto alla paura.

Alzando gli occhi scorse una sagoma bianca avvicinarsi; non riusciva a distinguere i lineamenti della persona; si era cacciata in un bel guaio, non poteva muoversi, scappare, le lacrime ora scendevano copiose.

"Cosa ci fa una bella signora in questa stradina deserta?"

Il tono era gentile. Lisa sollevò lo sguardo e vide un uomo di età avanzata con una lunga barba in mezzo alla quale spuntava una pipa contornata da sbuffi di fumo.



“Sono inciampata. È successo qualcosa alla mia caviglia, spero non sia una frattura.”

“Mi lasci vedere.”

Con delicatezza prese la caviglia tra le mani, toccò in vari punti, poi con un gesto deciso la torse. Un dolore forte che durò pochi secondi.

“Era una semplice storta. Adesso è a posto, può camminare. La faserò per sicurezza con la fusciccia del suo abito. Mi dice come mai si trova qui? Questo è un viottolo cieco, non porta da nessuna parte, solo al mio rifugio.”

“Stavo tornando al mio albergo, il Drazica, So che a un certo punto della stradina bisogna girare a sinistra e poi a destra. Devo aver sbagliato.”

“Sì, c'è una deviazione, ma è a destra e poi a sinistra.”

Lisa osservava l'uomo con curiosità. Il volto bruciato dal sole era percorso da fitte rughe. Ma erano gli occhi, di un azzurro chiaro, a spiccare nonostante la poca luce, occhi che ti leggevano dentro. Indossava casacca e pantaloni bianchi, la lunga barba scendeva fino alla base del collo. La voce incantava, leggermente roca ma musicale e il tono carezzevole.

“Ora provi ad alzarsi e camminare. La sostengo io.”

Lisa si alzò, posò il piede infortunato e sentì una fitta ma niente di preoccupante, poteva camminare.

“Non so come avrei fatto senza il suo aiuto. Le sono grata, non sa quanto.”

“Come potevo non soccorrere una damigella in pericolo? Per fortuna ho deciso che avevo bisogno di una passeggiata in questo eden prima di tornare al mio riposo. Ma come mai qui da sola?”

Lisa gli raccontò cosa era successo al ristorante in centro. Sentiva che poteva essere sincera con lui, lui avrebbe capito.

L'uomo sorrise annuendo con la testa. Capiva. Le spiegò che lui non amava il frastuono; nel silenzio della notte i pensieri prendevano forma, colore e suoni fondendosi con la natura intorno.

“L'accompagno sulla strada per l'albergo. Si appoggi a me, non sforzi troppo la caviglia.”

Il tragitto non era lungo. Una volta girato a destra si trovarono sul percorso che portava a destinazione. Si vedevano le luci degli alberghi.

“Ancora cento metri e vedrà l'insegna del Drazica. Posso fidarmi di lasciarla qui da sola?” disse ridendo.

“Ancora grazie per l'aiuto. Non so neppure il suo nome.”

“Neppure io so il suo. Non è importante; la chiamerò bianca luna come la falce che sta danzando sul picco lassù.”

Si salutarono con una stretta di mano. Lisa s'incamminò, poi si girò per un ultimo saluto ma vide solo una macchia bianca fondersi tra le ombre dei pini.

In pochi minuti arrivò all'albergo e vide Toni correre verso di lei il viso serio, preoccupato.

“Ero spaventato. Non eri per strada, non eri in albergo. Ti ho seguita poco dopo la tua partenza dal ristorante, convinto di trovarti qui. Ti

ho chiamata al cellulare che poi ho trovato in camera. Mi spiace Lisa. Dovevo alzarmi subito e venire con te. Ma cosa è successo?”

Si abbracciarono, dimentichi degli screzi, felici di essere insieme. Non avevano più sonno, si sedettero in riva al mare e Lisa gli raccontò della caviglia e dell'incontro con il vecchio.

Toni era incuriosito; conosceva bene viottoli e stradine tra rocce e pinete, era un escursionista e non aveva mai sentito parlare di una baita, bivacco o rifugio abitabile nelle vicinanze.

Decisero che il giorno dopo avrebbero fatto un'escursione e sarebbero andati a trovare il saggio vecchio della montagna. Lisa precisò che voleva tornarci con il buio.

La sera seguente, in calzoncini, T-shirt e scarpe comode e una pila, si misero in cammino; non fu difficile trovare la deviazione che aveva tratto in inganno Lisa. Il percorso era stretto e accidentato con spuntoni di roccia mimetizzati tra l'erba.

“Il mio soccorritore ha detto che questo viottolo è cieco.”

“Sì, lo riconosco, conduce a dei ruderi... Non c'è altro. Arrivati lassù si deve tornare indietro.”

“Guarda!” disse Lisa inginocchiandosi a raccogliere un cartello seminascosto tra l'erba, “Proprietà Privata.”

“Forse un tempo, adesso non appartiene a nessuno, fa parte del Demanio. Dai, Andiamo lassù. Vedrai che non è possibile ci abiti anima viva.”

Lisa si mordicchiava il labbro pensierosa. Non aveva senso. Il vecchio era reale; la caviglia, ancora un po' dolorante era reale; sentiva il tocco delle sue mani, la sua presenza salvifica.

Seguì Toni in silenzio, la mente colma di pensieri e immagini della notte precedente: quel viso rugoso, la barba bianca macchiata di nicotina, gli occhi sorridenti e quel tocco gentile e poi deciso.

Arrivarono allo spiazzo. Circondato da pini, ciuffi di campanule gialle e viola, c'era quel poco che rimaneva di una fatiscante abitazione: due pareti sbilenche di roccia e i resti di un focolare, il tutto invaso da erbe e arbusti aggrovigliati. La falce di luna galleggiava tra le stelle.

“Qui non abita nessuno da decenni, Lisa. Ci sono stato altre volte, è un promontorio dal quale domini il cielo e il mare, puoi incontrare escursionisti curiosi, amanti di scorci incantevoli.”

“Allora non mi credi,” disse Lisa, “pensi mi sia inventata il mio incontro.”

“No! Credo che qualcuno ti abbia aiutata, ma di certo non l’abitante di questi ruderi.”

Lisa continuava a mordersi il labbro, perplessa ma non convinta di quello che diceva Toni.

Si aggirò tra le rovine, toccò i pezzi di roccia della parete sgretolata e le sue dita toccarono qualcosa che sporgeva da una fessura. Con cautela inserì le dita ed estrasse qualcosa: era una pipa; il fornello conteneva un miscuglio umido di tabacco e cenere. Lisa non disse nulla, mise la pipa nel marsupio e sorrise: quello era un ricordo per lei. Alzò gli occhi verso il picco dove la notte prima la luna danzava: sulla sommità ondeggiavano sbuffi di fumo.

Renkonto ĉe la pinto de la luno

Lori Marchesin

Italio

La viro atingis la supron de la promontoro. Sidante sur roko, li ekbruligis sian pipon, ĉirkaŭrigardis, levis la okulojn, sorĉita de duonluno dancanta sur la pintoj en danĝera ekvilibro inter roko kaj ĉielo. Jam de longe li ne revenis hejmen.

Lisa subite leviĝis.

“Mi iras hejmen. Estas preskaŭ la dua kaj mi estas laca.”

“Venu Lisa, ne estu festorompanto. Estas tiel agrable ĉi tie, karesate de la vento kaj sub ĉielo plena de steloj.”

Toni rigardis ŝin kun larĝaj okuloj kaj kurba rideto. Li uzis bildojn karajn al lia edzino por konvinki ŝin resti. La ŝercema tono agacis ŝin. Ili sidis ĉe tiu tablo ekde pluraj horoj. Bonega vespermanĝo kun spagetoj *alla busara* kaj kradrostita blua fiŝo. Kaj multe da vino.

Nun la amikoj rigardis ŝin kun riproĉo pro interrompo de la gaja momento. Ili tute ne intencis levi siajn postaĵojn de la malkomfortaj lignaj seĝoj por rompi tiun agrablan etoson.

“Lisa, ĉu vi ne timas iri sola al la hotelo? Vi devas marŝi dum longa vojo kaj transiri la pinarbaron.”

Toni provis timigi ŝin sed li eĉ ne ŝajnis ekstarti por akompani ŝin.

“Ankoraŭ estas homoj ĉirkaŭe, la lumoj de la boatoj kaj hoteloj ĉe la marbordo, post dek minutoj mi atingos la *Dražican*. Ne necesas esti maltrankvila. Kvankam mi pensas, ke vi ne estas.”

La tono estis acida, sed Toni estis jam reveninta al interŝanĝo de ŝercoj kun la amikoj.

Lisa aranĝis siajn longajn blondajn harojn en ĉevalvoston, kiun ŝi tenis per kaŭĉuka rubando kaj ekiris. Ŝi trairis la tutan centron de la insulo Krk ankoraŭ plenplena de ridantaj homoj, paroj promenantaj brakumante. La malgrandaj restoracioj ankoraŭ malfermitaj elsendis

ŝaktabulojn de lumo. Ridado kaj krioj saltis de unu flanko de la strato al la alia, laŭ la spino de la insulo.

Lisa marŝis rapide, ĝenita de la bruoj kaj de la lumoj, kaj ekspiris per kvietigo kiam ŝi atingis la vojeton laŭ la marbordo.

Estis kiel eniri alian mondon, kie la plaŭdado de la ondoj miksiĝis kun la melopeo de la vento inter la pinoj. Lisa sentis, ke la streĉiĝo malpliĝis, cedante lokon al maraj sentoj, kiuj karesis la aŭdon, plenigis la naztruojn per la salaodoro, dum la larĝaj okuloj admiris la lunon en ekvilibro sur la promontoro kaj steloj inter la origamioj de la ĉielo.

Tio estis la mondo, kiun ŝi amis, kiu pacigis ŝin kun si mem kaj kun aliaj.

Ŝi ridetis al si mem, pensante pri Toni. Ŝi estis certa, ke li baldaŭ kuniĝos kun ŝi en la hotelo. Por li, ĉi tiu ferio temis ankaŭ pri malstreĉiĝo kaj amuziĝo kun amikoj. Eble ŝi estis tro abrupta, sed superis la bezono esti sola. Ili kune ridos pri tio.

Ŝi rememoris, ke estas ĉirkaŭvojo, vojeto en la pinarbaro, kiu mallongigis la vojon. Ŝi turnis sin maldekstren. Nun nur la pinoj limis tiun vojon. La mallumo estis pli densa, ŝia blanka robo la sola hela makulo.

Ŝi falis sur ŝtonon kaj sentis akutan doloron en la maleolo. “Mi esperas, ke temas nur pri tordo. Dio malpermesu frakturon ĉi tie, sola en la mallumo”, ŝi murmuris. Sidante sur pinto de roko, ŝi zorge masaĝis sin. Ŝajnis esti tordo, sed ŝi nenion vidis. Per la fingroj, ŝi provis scii, ĉu estas ŝvelo. Ŝi ne kuraĝis reekstari, kaj tima fridotremo trakuris ŝian spinon. Ŝi devis leviĝi kaj plu marŝi al la hotelo. Ŝi sentis la okulojn nebletiĝi kaj la stomakon ŝveliĝi. Ŝia tuta decidemo malaperis, cedante lokon al timo.

Levante la okulojn, ŝi rimarkis blankan silueton alproksimiĝantan. Ŝi ne povis distingi la trajtojn de la persono. Ŝi metis sin en fuŝan situacion, ne povis moviĝi, forkuri. Ŝiaj larmoj nun abunde fluadis.

“Kion faras bela sinjorino en ĉi tiu dezerta vojeto?”

La tono estis afabla. Lisa levis la rigardon kaj vidis maljunan viron kun longa barbo, el kiu elstaris pipo ĉirkaŭita de fumblovoj.

“Mi stumblis. Io okazis al mia maleolo. Mi esperas, ke ne temas pri frakturo.”

“Lasu min rigardi.”



Delikate li prenis ŝian maleolon en la manoj, tuŝis ĝin diversloke, poste per decida gesto tordis ĝin. Forta doloro, kiu daŭris kelkajn sekundojn.

“Ĝi estis simpla tordiĝo. Nun ĝi fartas bone, vi povas marŝi. Mi bandaĝos ĝin por sekureco per la skarpo de via robo. Ĉu vi dirus al mi, kial vi troviĝas ĉi tie? Ĉi tio estas senelira vojeto, ĝi kondukas nenien, nur al mia rifuĝo.”

“Mi estis revenanta al mia hotelo, la *Dražica*. Mi scias, ke je iu punkto de la vojeto oni devas turni maldekstren kaj poste dekstren. Mi certe eraris.”

“Jes, ekzistas kromvojo, sed ĝi estas dekstren kaj poste maldekstren.”

Lisa rigardis la viron scivoleme. La sunbruligita vizaĝo estis trakrucigita de densaj sulkoj. Sed estis la okuloj, helbluaj, kiuj elstaris malgraŭ

la malforta lumo, tiaj okuloj kiuj legas en vi. Li portis blankajn jakon kaj pantalonon. Lia longa barbo atingis la bazon de lia kolo. La voĉo ĉarma, iomete raŭka sed muzika kaj karestona.

“Nun provu leviĝi kaj marŝi. Mi subtenos vin.”

Lisa ekstaris, metis la vunditan piedon malsupren kaj sentis doloron tamen ne maltrankviligan. Ŝi povis marŝi.

“Mi ne scias kiel mi farus sen via helpo. Mi estas dankema al vi, vi ne scias kiom.”

“Kiel mi povus ne helpi junulinon en danĝero? Bonŝance mi decidis, ke mi bezonas promanon en ĉi tiu edeno antaŭ ol reveni al mia ripozo. Sed kial tie ĉi sole?”

Lisa rakontis al li, kio okazis en la restoracio en la urbocentro. Ŝi sentis, ke ŝi povas esti sincera kun li, ke li komprenus.

La viro ridetis kaj kapjesis. Li komprenis. Li klarigis, ke li ne ŝatas bruon. En la nokta silento, pensoj prenas formon, koloron kaj sonojn, kunfandiĝante kun la ĉirkaŭa naturo.

“Mi kondukos vin sur la vojon al la hotelo. Apogu vin sur mi, ne tro streĉu vian maleolon.”

La vojaĝo ne estis longa. Turninte sin dekstren, ili troviĝis sur la vojo, kiu kondukis al ŝia celo. Ili povis vidi la lumojn de la hoteloj.

“Ankoraŭ cent metrojn kaj vi vidos la ŝildon *Dražica*. Ĉu mi povas fidi kaj lasi vin ĉi tie sola?”, li diris ridante.

“Dankon denove pro la helpo. Mi eĉ ne scias vian nomon.”

“Ankaŭ la vian mi ne konas. Ne gravas, mi nomu vin blanka luno kiel la kreskanta lunarko, kiu dancas sur la pinto tie supre.”

Ili adiaŭis per manpremo. Lisa foriris, poste turniĝis por lasta adiaŭo sed vidis nur blankan makulon fandiĝi en la ombrojn de la pinoj.

Post kelkaj minutoj, ŝi alvenis al la hotelo kaj vidis Toni kuri al ŝi kun serioza, maltrankvila vizaĝo.

“Mi timis. Vi ne estis sur la strato, vi ne estis en la hotelo. Mi sekvis vin iom post via foriro el la restoracio, konvinkita, ke mi trovos vin ĉi tie. Mi vokis vin per poŝtelefono, kiun mi tiam trovis en la ĉambro. Pardonu, Lisa. Mi devintus tuj leviĝi kaj veni kun vi. Sed kio okazis?”

Ili brakumis, forgesante la malakordon, feliĉaj esti kune. Ili ne plu dormemis, ili sidiĝis apud la maro kaj Lisa rakontis al li pri la maleolo kaj la renkontiĝo kun la maljunulo.

Toni estis scivola. Li bone konis vojetojn kaj stratetojn inter rokoj kaj pinarbaroj. Li ekskursemis kaj neniam aŭdis pri kabano, bivako aŭ loĝebla rifuĝo proksime.

Ili decidis, ke la sekvantan tagon ili ekskursos kaj vizitos la saĝan maljunulon de la monto. Lisa precizigis, ke ŝi volas reveni je la krepusko.

La sekvantan vesperon, en pantalonetoj, T-ĉemizoj, komfortaj ŝuoj kaj kun poŝlampo, ili ekiris. Ne estis malfacile trovi la kromvojon, kiu erarigis Lisan. La pado estis mallarĝa kaj malplena, kun rokaj pintoj kamuflitaj en la herbo.

“Mia savanto diris, ke ĉi tiu vojo estas senelira.”

“Jes, mi rekonas ĝin, ĝi kondukas al ruinoj... Estas nenio alia. Alveninte tien supren, oni devas reveni.”

“Rigardu!”, diris Lisa, genuiĝante por preni ŝildeton duone kaŝitan en la herbo: *Privata proprieto*.

“Eble iam, nun ĝi apartenas al neniuj, ĝi estas parto de la Ŝtataj Posedaĵoj. Venu, ni iru supren. Vi vidos, ke ne eblas por vivanta animo loĝi tie.”

Lisa mordetis sian lipon penseme. Tio ne havis sencon. La maljunulo estis reala, la maleolo, ankoraŭ iom dolora, estis reala, ŝi sentis la tuŝon de liaj manoj, lian savan ĉeeston.

Ŝi sekvis Toni silente, la menso plena de pensoj kaj bildoj de la antaŭa nokto: tiu sulkiĝinta vizaĝo, la blanka barbo makulita de nikotino, la ridetantaj okuloj kaj tiu milda kaj poste decida tuŝo.

Ili alvenis al la maldensejo. Ĉirkaŭita de pinarboj, masivoj de flavaj kaj purpuraj hiacintoj, estis tio, kio restis de ruiniĝinta domo: du mal-konkordaj rokaj muroj kaj la restaĵoj de kameno, ĉio invadita de interplektitaj herboj kaj arbustoj. La duonluno floris inter la steloj.

“Neniuj loĝas ĉi tie ekde jardekoj, Lisa. Mi estis tie alifoje, estas promontoro de kie oni regas la ĉielon kaj la maron. Eblas renkonti scivolemajn ekskursantojn, amantojn de sorĉaj pejzaĝoj.”

“Do vi ne kredas min”, diris Lisa, “vi pensas, ke mi fantaziis mian renkonton.”

“Ne! Mi pensas, ke iu helpis vin, sed certe ne la loĝanto de ĉi tiuj ruinoj.”

Lisa daŭre mordetis sian lipon, perpleksa sed ne konvinkita pri tio, kion Toni diris.

Ŝi vagadis tra la ruinoj, tuŝis la rokpecojn de la diseriĝanta muro kaj ŝiaj fingroj tuŝis ion elstarintan el fendo. Singarde, ŝi enmetis la fingrojn kaj eltiris ion: estis pipo. La brulujo enhavis malsekan miksaĵon de tabako kaj cindro. Lisa diris nenion, metis la pipon en la saketon kaj ridetis: tio estus memoro por ŝi. Ŝi levis la okulojn al la pinto, kie la luno dancis pasintnokte: fumblovoj flugis super ŝi.

Stelle

Ugo Filippo Cavallo

Italia

Mio padre non è mai stato un uomo di tante parole, è sempre stato un uomo con gli artigli, come i cani selvatici che accogli in casa, li nutri, provi a insegnarli qualcosa ma continuano a comportarsi esattamente come se fossero ancora là fuori da qualche parte a scavare nel terreno e lottare per sopravvivere. Questa descrizione non è venuta molto bene. Lui non è mai stato di molte parole e io non sono mai stato un buon scrittore, però entrambi amavamo e avevamo un cuore ferito e con i denti digrignati per trovare pace. La nostra pace aveva due nomi, io la chiamavo Mamma, lui la chiamava Livia.

Quel giorno eravamo in macchina dopo aver seppellito Mamma nel cimitero locale, sulla strada per tornare a casa. Le nuvole erano basse e sporche come i piccioni da strada ed il cielo era scuro. Ero stanco morto e quello era forse il giorno più lungo di tutta la mia vita. Soprattutto perché, lo ripeto, mio padre non è mai stato un uomo di tante parole.

“A quanto sei di benzina?”

Guardai la lancetta. Ero in riserva.

“Ce la facciamo.”

“A quanto sei?”

“Ce la facciamo, tranquillo.”

“Che testa...”

Lo sentì abbassare il finestrino, l'aria pulita che entrava portandosi sulla schiena la pioggia, pioggia sporca, aria pulita. Con papà era così, per qualsiasi cosa dovevi trattenere il fiato per paura di ricevere un'artigliata, potevi rilassarti solo quando lui non c'era o quando era in un'altra stanza. Non trovavo pace. Ascoltai le ruote che frizionavano sull'asfalto, il tergicristallo sul vetro, alla fine accesi la radio.

Non ce la facevo più.

Le ragazze che cantano in radio hanno sempre delle voci belle che pare di sentirle spogliare qualsiasi cosa, alzai il volume ma poi qualcosa troncò la magia, mio padre spense la radio. Per lui era troppo rumorosa.

Tornai con la mente sulla strada, fino a quel momento avevo osservato la strada senza avervi prestato attenzione, ero alla guida ma non stavo guidando. Ero lì ma non ero con lui. La cenere aveva una consistenza strana, non era olio e non era farina però toccandola avevi l'impressione di toccare qualcosa di sostanzioso e allo stesso tempo scivoloso.

“A quanto sei di benzina?”

“Me l’hai già chiesto.”

“Non mi hai risposto.”

“Ce la facciamo.”

Qualcosa volò sopra le nostre teste, perché non potevo essere in mezzo a loro?

“Fermati alla prossima stazione.”

“Manca poco a casa, ce la facciamo ti dico.”

Guardai l’asticella, era giù, non ce l’avremmo fatta, non con questo andazzo. Accelerai, il pedale era d’accordo con me, mio padre no.

Misi la quinta. Le nuvole erano basse come colline, accesi di nuovo la radio, mi sarebbe bastato sentire qualcosa, qualsiasi cosa che fosse amichevole in un modo o nell’altro. Qualsiasi cosa. Quella mattina eravamo stati al cimitero per la donna che ci aveva uniti e anche se il tempo alla fine passò in fretta, sapevo che entrambi eravamo rimasti ancora lì in piedi, davanti alla lapide, con gli occhi persi nel vuoto. Sai che ricorderai quella mattinata per il resto della tua vita, che tu lo voglia oppure no.

Mi sentii solo. Mi sentii solo quando versarono le ceneri nel buco scavato nella ghiaia e quando guardai mio padre, l’uomo che mi aveva cresciuto, mi sentii ancora più solo, per lui.

Lui aveva perso un paio di fratelli in battaglia, i genitori nella malattia e il sorriso nella tasca vecchia di un giaccone. Perso quest’ultimo, non lo ritrovò mai più.

Non vidi mai piangere mio padre, eccetto al funerale. Ora la famiglia riunita era in macchina nello stesso tetto: io, lui e il suo silenzio.



Mi sentii solo e volli arrivare a casa ancora più in fretta.

“A quanto sei?”

“Uffa.”

“C'è la stazione tra cento metri.”

Volevo tornare a casa, chiudere gli occhi e non aprirli più. Con la coda dell'occhio lo vidi grattarsi con nervosismo i capelli d'acciaio. Svoltai.

“La strada è sbagliata, Hughes.”

“Tutto è sbagliato.”

Sentii il suo sguardo pieno di disapprovazione bruciarmi la pelle come olio bollente. Abbassai il finestrino anch'io, era novembre. Andai più veloce di quanto potessi, così veloce da vedere i campi trasformarsi in persone, animali, auto, fabbriche, civiltà venture e passate, niente strade ma atomi, velocità, spazio e tempo. Tempo, quello che doniamo e che mai più ci ritornerà.

Un senso dall'allarme mi tirò i capelli, qualcosa non andava. La macchina aveva smesso di correre. Eravamo soli in mezzo alla strada.

Spinsi la macchina fino alla corsia di emergenza, vidi papà sbirciare la lancetta del carburante, sapevo che mi avrebbe detto qualcosa, era uno che non si lasciava sfuggire nulla, mio dio.

“Perché mi hai fatto questo? La giornata non è stata lunga abbastanza per te?”

Le sue interrogative relative erano come coltelli che mi foravano le interiora. Aprii il cofano e guardai il motore. I suoi silenzi mi ferirono. Mi feriva qualsiasi cosa facesse, non mi sono mai spiegato il perché. Sapevo che se avesse trasformato i suoi silenzi in parole mi avrebbe ucciso. Così come si uccide qualcuno a parole.

Come faceva mamma ad amare un uomo così?

Misi il triangolo d'emergenza dietro. Qualcuno sarebbe passato di lì prima o poi.

“Ti costa tanto ascoltarmi?”

Un'ora dopo non era ancora passato nessuno. Abbassammo i finestrini, nessuno voleva respirare l'odore dell'altro.

“Perché non ascolti mai? Cristo.”

“Perché tu mi dai solo ordini. Ormai ho ventisei anni.”

“E Allora? Alla tua età ero già sposato e con dei figli”

“Alla mia età non avevi un sogno.”

“Quale!? Scrivere?”

“Scrivere.”

“Nessuno vive di scrittura.”

“Io ce la farò.”

“Così come noi siamo riusciti a tornare a casa, vero?”

“Ce la faremo.”

“Bah...”

Venne fuori che ero troppo. Troppo lento, troppo veloce, troppo io, troppo qui, troppo lì, troppo su, troppo giù. Troppo bianco, troppo nero, troppo “sì”, troppo “no”. Troppo-*qualcosa*. Ero io, e forse era troppo essere me e forse l’unica cosa che avrebbe accettato sarebbe stato crescermi a sua immagine e somiglianza. Ma per fortuna papà non è mai stato Dio e io non sono mai stato d’argilla.

Scesi. Sarei tornato indietro a piedi a prendere il carburante alla stazione. Mi guardò. Non disse nulla.

Gli voltai le spalle e sentì la pioggia tra i miei capelli.

Vi siete mai trovati a camminare per strada da soli, con le scarpe piene d’acqua e con le orecchie piene di pensieri?

Quella mattina seppellimmo mamma e quella sera camminavo sotto la pioggia con i vestiti bagnati, mamma non ne avrebbe mai più usati, devi vestiti.

Misi le mani in tasca per il freddo. Misi il cuore in testa, pioveva e volevo ascoltare qualcosa di felice. Non potevo crederci, più pensavo e più non ci credevo, quelle ceneri una volta erano un corpo, organi, unghie, ossa, denti, colori, sconfitte, vittorie. I capelli di mamma erano ragnatele nel vento, gli occhi stanchi e ciechi invece erano belli e quando glielo dicevo, soffocava nelle sue risate. Il suo sorriso allegro era la mano calda sotto le coperte. Questo era mamma, non quel mucchio di polvere. Le piacevano le canzoni e la nostalgia, forse è per questo che è diventata cieca? Si dice che chi piange troppo, finisce con il perdere la vista. Aveva due occhi incantevoli. Guardai il cielo, forse mamma era lì da qualche parte, sopra il distributore. Mi piangevano i piedi dal freddo, riempii la tanica e mi sentii in colpa. La benzina ha un odore delizioso. Quell’odore di corruzione ed estasi come di chi sa di farla franca dopo aver commesso un crimine, sapete di cosa parlo.

Mi sedetti sulla tanica, la mia vita era appena iniziata ed ero al capolinea.

Mi venne un'idea ma non era nulla in confronto a tutto quello che avrei voluto dalla vita. Mi tremarono le mani e mi sentii perso. Valeva la pena vivere? Lo sconforto mi aprì una voragine nel petto e poi la paura pensò al resto.

La benzina ha un odore unico, odora di peccato e di meraviglia. Non posso definirlo puzza e nemmeno profumo, ha un odore che incanta. Perché è tanto distruttivo quanto inebriante. Al resto ci pensò la paura, quella che arriva alle caviglie con le mani fredde e le afferra con forza. Che ne sarà di me?

Mamma ha sempre creduto nella vita, anche se significava soffrire giorno dopo giorno.

Mamma adesso è morta e tocca a noi se credere nella vita, o nella paura. Presi la tanica, la benzina aveva un odore delizioso...

Tornai in macchina. Mi accorsi che papà stava annusando l'aria.

“Perché puzzi di benzina?”

“Perché purtroppo ho ventisette anni, non posso sognare e non so perché vivere...”

“Alla tua età...”

“Alla mia età eravate tutti migliori di ciò che siete adesso.”

Non ne potei più e mi sentii in colpa. In colpa per tutto, per la pioggia, per la mamma, per la benzina, per la macchina, per i graffi, per il grano maturo tagliato dai campi, per le piante morte avvelenate, per gli animali portati al macello, per gli insetti calpestati e per il silenzio che ascoltiamo nell'universo nella speranza che qualcuno ci possa parlare. Tacqui ma la mia mente urlava.

“Dovremmo imparare dalle stelle e continuare a brillare, anche se sono morte o tutto quello che c'è attorno che sta morendo...”

Non avevo notato quante stelle fossero lì sopra le nostre teste a guardarci. Erano in alto, nella nostra macchina, sui finestrini, nei cassetti, sotto i sedili, sui riflessi e nelle gocce di pioggia sulla lamiera.

Ricordo che non parlai. Ero troppo piccolo e arrabbiato per capire. Girai la chiave ma nemmeno il motore volle partire.

Non parlai più, ero stanco, mamma era morta e trovai le stelle le cose più belle da guardare insieme a mio padre.

Steloj

Ugo Filippo Cavallo

Italio

Mia patro neniam estis viro parolema. Li ĉiam estis viro kun ungegoj, kiel la sovaĝaj hundoj, kiujn oni akceptas en domo, nutras, provas instrui ion al ili, sed ili daŭre kondutas precize kvazaŭ ili ankoraŭ estus tie, ie, fosante en la tero kaj batalante por pluvivi. Ĉi tiu priskribo ne estas tre bona. Li neniam estis parolema kaj mi neniam estis bona verkisto, sed ni ambaŭ amis unu la alian kaj havis koron vunditan, sed dentojn kunpremitajn por trovi pacon. Nia paco havis du nomojn, mi nomis ŝin Panjo, li nomis ŝin Livia.

Tiun tagon ni estis en la aŭtomobilo enteriginte panjon en la loka tombejo survoje hejmen. La nuboj estis malaltaj kaj malpuraj kiel stratkolomboj, kaj la ĉielo estis malhela. Mi estis tute laca kaj tio estis eble la plej longa tago de mia vivo. Ĉefe ĉar, mi ripetas, mia patro neniam estis viro parolema.

“Kiom da benzino vi havas?”

Mi rigardis la indikilon: sufiĉe da rezervo.

“Ni sukcesos.”

“Kiom da vi havas?”

“Ni sukcesos, ne maltrankviliĝu.”

“Kia malmolkapulo...”

Mi aŭdis lin mallevi la fenestron. Pura aero envenis portante sur sia dorso la pluvon, malpuran pluvon, puran aeron. Kun paĉjo estis tiel por ĉio, ke oni devis reteni la spiron pro timo vundiĝi de ungego. Oni povis malstreĉiĝi nur kiam li ne ĉeestis aŭ kiam li estis en alia ĉambro. Mi ne povis trovi pacon. Mi aŭskultis la radojn frapi la asfalton, la ŝprucilon sur la vitro. Finfine mi ŝaltis la radion.

Mi ne plu povis elteni la pezan etoson.

Knabinoj, kiuj kantas en la radio, ĉiam havas belajn voĉojn, kiuj ŝajnigas ilin senvestiĝi. Mi plialtigis la laŭtecon, sed poste io rompis la magion, mia patro malŝaltis la radion. Estis tro brue por li.

Mi remetis mian menson sur la vojon. Ĝis tiu momento, mi rigardis la vojon sen atenti pri ĝi, mi stiris sen vere stiri. Mi estis tie sed mi ne estis kun li. La cindro havis strangan konsistencon, ne estis oleo kaj ne estis faruno, sed tuŝante ĝin, oni sentis, ke oni tuŝas ion substancan kaj samtempe glitigan.

“Kiom da benzino restas?”

“Vi jam demandis.”

“Vi ne respondis al mi.”

“Ni sukcesos.”

Io flugis super niaj kapoj. Kial mi ne povus esti en la aero kun ĝi?

“Haltu ĉe la sekva benzinstacio.”

“La domo estas proksima. Jes. Ni sukcesos, mi diras al vi.”

Mi rigardis la gaŭĝon, ĝi estis malsupre, ni ne sukcesos, ne kun ĉi tiu rapido. Mi akcelis, la pedalo konsentis, mia patro ne.

Mi metis la kvinan rapidecon. La nuboj estis malaltaj kiel montetoj. Mi denove ŝaltis la radion, mi kontentus aŭdi nur ion, ion ajn amikan. Ion ajn. Tiun matenon ni estis ĉe la tombejo por la virino, kiu kunigis nin, kaj kvankam la tempo finfine rapide pasis, mi sciis, ke ni ambaŭ ankoraŭ staras tie, antaŭ la tomboŝtono, kun okuloj perditaj en la vakuon. Vi anticipe scias, ke vi memoros tiun matenon dum via tuta vivo, vole-nevole.

Mi sentis min sola. Mi sentis min sola, kiam ili verŝis la cindrojn en la truon fositan en la gruzon. Kaj kiam mi rigardis mian patron, la homon, kiu min edukis, mi sentis min eĉ pli sola, pro li.

Li perdis paron da gefratoj en milito, siajn gepatrojn pro malsano, kaj la rideton en malnova poŝto de jako. Perdinte ĉi-lastan, li neniam retrovis ĝin.

Mi neniam vidis mian patron plori, krom dum la entombigo. Nun la reunuiĝinta familio estis en la aŭtomobilo sub la sama tegmento: mi, li kaj lia silento.

Mi sentis min sola kaj volis des pli rapide reveni hejmen.



“Kiom restas?”

“Ve.”

“Estas stacio cent metrojn for.”

Mi volis reveni hejmen, fermi miajn okulojn kaj neniam plu malfermi ilin. El la okulrando mi vidis lin nerveze grati siajn ŝtalecajn harojn. Mi turnis min.

“Tio ne estas la bona vojo, Hughes.”

“Nenio estas bona.”

Mi sentis lian malaproboman rigardon bruligi mian haŭton kiel bolantan oleon. Ankaŭ mi mallevis la fenestron. Estis novembro. Mi iris tiel rapide kiel eble, tiel rapide ke mi vidis la kampojn transformiĝi en homojn, bestojn, aŭtojn, fabrikojn, pasintajn kaj estontajn civilizaciojn, neniujn vojojn sed atomojn, rapidecon, spacon kaj tempon. Tempo, kiun ni donas kaj neniam revenos al ni.

Sento de timo tiris miajn harojn, io misfunkciis. La aŭto ĉesis funkcii. Ni estis solaj meze de la strato.

Mi puŝis la aŭton al la urĝvojrando, vidis paĉjon kaŝrigardi la benzinmezurilon. Mi sciis, ke li dirus ion al mi. Li estis tiu, kiu nenion lasis eskapi, mia dio.

“Kial vi faris tion al mi? Ĉu la tago ne estis sufiĉe longa por vi?”

Liaj relativaj demandoj estis kiel tranĉiloj trapikantaj miajn internajojn. Mi malfermis la kapoton kaj rigardis la motoron. Liaj silentoj vundis min. Ĉio, kion li faris, vundis min, mi neniam klarigis kial. Mi sciis, ke se li transformus siajn silentojn en vortojn, li mortigus min. Same kiel oni mortigas iun per vortoj.

Kiel povis patrino ami tian viron?

Mi metis la avertan triangulon malantaŭen. Iu eventuale preterpasos.

“Ĉu tiom penas al vi aŭskulti min?”

Unu horon poste, ankoraŭ neniu pasis. Ni mallevis la fenestrojn, neniu volis spiri la odoron de la alia.

“Kial vi neniam aŭskultas? Kristo.”

“Ĉar vi donas al mi nur ordonojn. Mi estas dudeksesjaraĝa nun.”

“Do? En via aĝo mi jam estis edziĝinta kaj kun infanoj.”

“En mia aĝo vi ne havis revon.”

“Kiun? Verki?”

“Verki.”

“Neniu vivtenas per skribado.”

“Mi povas fari tion.”

“Same kiel ni sukcesis reveni hejmen, ĉu ne?”

“Ni sukcesos.”

“Bah...”

Montriĝis, ke mi estis tro. Tro malrapida, tro rapida, tro mi, tro ĉi tie, tro tie, tro supre, tro malsupre. Tro blanka, tro nigra, tro “jes”, tro “ne”. Tro-*io*. Mi estis mi, kaj eble jam estis tro esti mi. Kaj eble la sola afero, kiun li akceptus, estus kreskigi min laŭ sia bildo por ke mi aspektu kiel li. Sed feliĉe paĉjo neniam estis Dio kaj mi neniam estis farita el argilo.

Mi eliris. Mi iru piede por akiri benzinon ĉe la stacio. Li rigardis min. Li diris nenion.

Mi deturnis min de li kaj sentis la pluvon en miaj haroj.

Ĉu vi iam trovis vin sola marŝanta laŭ strato, kun ŝuoj akvoplenaj kaj oreloj pensoplenaj?

Tiun matenon ni enterigis panjon, kaj tiun vesperon mi promenis sub la pluvo kun malsekaj vestaĵoj. Panjo neniam plu bezonus ilin, oni devas vesti sin.

Mi metis miajn manojn en miajn poŝojn pro malvarmo. Mi metis mian koron en mian kapon. Pluvigis kaj mi volis aŭdi ion feliĉan. Mi ne povis kredi tion. Ju pli mi pensis, des pli mi ne kredis ĝin. Tiuj cindroj estis iam korpo, organoj, ungoj, ostoj, dentoj, koloroj, malvenkoj, venkoj. La haroj de panjo estis araneaĵoj en la vento, sed ŝiaj lacaj, blindaj okuloj estis belegaj, kaj kiam mi tion diris al ŝi, ŝi sufokiĝis pro ridado. Ŝia gaja rideto estis la varma mano sub la kovriloj. Ĉi tio estis panjo, ne tiu amaso da polvo. Ŝi ŝatis kantojn kaj nostalgion, ĉu eble tial ŝi blindiĝis? Oni diras, ke tiuj, kiuj tro ploras, perdas la vidon. Ŝi havis du belajn okulojn. Mi rigardis la ĉielon, eble panjo estis tie ie, super la benzinstacio. Miaj piedoj ploris pro la malvarmo. Mi plenigis la benzinladkruĉon kaj sentis min kulpa. Benzino odoras delice. Tiuodoro de korupto kaj ekstazo de tiu, kiu scias, ke li sukcesos post krimo. Vi scias, pri kio mi parolas.

Mi sidis sur la ladkruĉo. Mia vivo ĵus komenciĝis kaj mi estis elĉerpita.

Ideo venis al mi, sed ĝi estis nenio kompare kun ĉio, kion mi volis el la vivo. Miaj manoj tremis kaj mi sentis min perdita. Ĉu valoris vivi?

La malespero malfermis abismon en mia brusto, kaj tiam la timo zorgis pri la cetero.

Benzino havas unikan odoron, ĝi odoras kiel peko kaj miro. Mi povas nomi ĝin nek malbonodoro nek parfumo, ĝi havas sorĉan odoron. Ĉar ĝi estas same detrua kiel ebriga. Pri la cetero zorgis la timo. Tiu, kiu atingas la maleolojn per malvarmaj manoj kaj kaptas ilin perforte. Kio fariĝos mi?

Panjo ĉiam kredis je la vivo, eĉ se ĝi signifis ĉiutagan suferadon.

Panjo nun estas mortinta. Kaj dependas de ni, ĉu kredi je la vivo aŭ je la timo. Mi prenis la ladkruĉon, la benzino havis delican odoron...

Mi revenis al la aŭto. Mi rimarkis paĉjon flarante la aeron.

“Kial vi odoras benzinon?”

“Ĉar bedaŭrinde mi havas dudek ses jarojn, mi ne povas revii kaj mi ne scias kial vivi...”

“Je via aĝo...”

“Je mia aĝo, vi ĉiuj estis pli bonaj ol tio, kio vi estas nun.”

Mi ne plu povis elteni kaj mi sentis min kulpa. Kulpa pro ĉio, pro la pluvo, pro la panjo, pro la benzino, pro la aŭto, pro la vundetoj, pro la matura tritikoj tranĉita el la kampoj, pro la venenigitaj mortintaj plantoj, pro la bestoj kondukataj al la buĉejo, pro la piedpremitaj insektoj. Kaj pro la silento, kiun ni aŭdas en la universo, esperante, ke iu povu paroli al ni. Mi silentis sed mia menso kriegis.

“Ni devus lerni de la steloj kaj daŭre brili, eĉ se ili estas mortintaj aŭ se ĉio ĉirkaŭe mortintas...”

Mi ne antaŭe rimarkis kiom da steloj estas super niaj kapoj nin rigardantaj. Ili estis supre, en nia aŭtomobilo, sur la fenestroj, en la gantujo, sub la seĝoj, en la reflektaj kaj en la pluvogutoj sur la lado.

Mi memoras, ke mi ne parolis. Mi estis tro malgranda kaj kolera por kompreni. Mi turnis la ŝlosilon sed denove la motoro rifuzis ekfunkcii.

Mi ne plu parolis, mi estis laca, panjo estis mortinta kaj mi trovis ke la steloj estas la plej belaj aferoj rigardindaj kune kun mia patro.

В погоне за мечтой

Анастасия Пушкарева

Россия

1

«Рядом с обрывом цветёт прекрасная и вечная сирень. Она дала начало удивительному миру грез, который расположен на глубине того обрыва. Гордый народ Тутовани живет на протяжении многих лет там. Дышат солёной водой и веселятся на берегу моря...»

Эту сказку я слышал множество раз от моей бабушки. Как только ложился спать, она подходила ко мне, садилась на ближайший стул и читала. Как же я хотел увидеть эту сирень и гордо носить имя «Поселенец Тутовани»! Я вечно допрашивал бабушку об этом месте, но в ответ лишь слышал: «Как только тебе стукнет шестнадцать, я сразу расскажу тебе». И я с нетерпением ждал этого дня! Ребята с моего двора называли меня странным ребенком, потому что мне не нужна была новая игрушка и я не любил играть с ними в рыцарей, а всё, что я хотел, — это попасть в волшебную страну...

2

Бабушка умерла, когда мне было пятнадцать. Я не находил себе места от боли и негодования. Мне пришлось смириться и проститься со своей мечтой, поэтому я подружился с ребятами и стал обычным подростком. Каждый день я возвращался домой поздно, отчего и сердился дедушка. После смерти бабушки он стал чёрствым и злым, и я всё норовил сбежать из дома, но меня находили. Он был единственным родным человеком, который мог меня воспитывать, но делал это специфично. Видимо, из-за боли он спрятал все бабушкины дневники и вещи, включая недовязанный шарф, предназначавшийся

мне. В доме я говорил всегда шёпотом и ходил на цыпочках, и за любую пакость он лишал меня обеда. Наш ветхий дом пропитался скорбью, а сад давно уже не приносил плоды, именно поэтому ели мы мало. Наша веранда опустела, цветы все засохли и превратились в труху, а трава перестала расти. Жизнь для нас остановилась и стала непрекращающейся мукой. Ссорились мы часто, так же часто мы и мирились. После очередного душераздирающего вопля и обвинения в мой адрес, я бежал в свою тёмную, покрытую плесенью комнатку, где тут же закрывал шторы и ложился на кровать. Единственное, что у меня осталось от бабушки, — это книжка со сказкой. Та самая, которая помогала мне заснуть холодными вечерами и улыбнуться после сложного дня. Я закрывал глаза и представлял себя стоящим около сирени. Она своими длинными и пахучими ветками гладила меня по голове и подталкивала к обрыву. И вот я медленно подходил к краю, вдыхал солёный воздух и глупо улыбался. Долго собираясь с мыслями и не решаясь сделать шаг в неизвестность, я ронял слезу, после чего прыгал в пучину приключений. В падении мои руки игрались с потоками ветра, а ноги поджимались в страхе упасть на камни. И я просыпался. Вздрагивал и подносил руку ко лбу, на котором выступал холодный пот. Меня мучала жажда, поэтому я тихо открывал дверь, дабы не разбудить дедушку, и шёл на кухню, где стоял кувшин с пресной прохладной водой. Как бы я ни пытался налить воду беззвучно, в следующую же секунду слышал шаги в мою сторону. Дедушка смотрел на меня угрюмо и с сожалением. Он не умел просить прощения, поэтому просто наливал мне молока вместо воды и целовал макушку. Эти действия мы повторяли будто роботы. Но не в этот раз...

3

Я вернулся поздно, когда уже стемнело. Дедушка ждал меня на кухне и мерно отбивал ритм ногой. Я вошёл в дом и сразу уловил нарастающую угрозу.

— Ты где был? — тихо, будто через зубы спросил дедушка.

— С друзьями гулял, — спокойно попытался объяснить я, хотя и понимал, что это не поможет.

— Я что тебе говорил? Во сколько ты должен быть дома? Мои слова для тебя пустой звук?!

Тут он уже сорвался на крик, и я не мог утаить нарастающий страх. На глаза набежали слёзы, и я вспомнил бабушку. Её тёплые и нежные руки, улыбку, что дарила спокойствие, и как она относилась ко мне, да и к людям в целом.

— Была бы здесь бабушка, она бы поняла меня! — сквозь обиду закричал я.

— Не смей её вспоминать! Бабушки больше нет! А мы с тобой есть! И без уважения ко мне я даже не позволю тебе взглянуть на её могилку!

Моё сердце судорожно забилося. Мне не дали проститься с бабушкой из-за слабости и болезни. А после дедушка и вообще не говорил со мной на эту тему. В слезах я быстро побежал в комнату. Книжка меня не радовала как обычно. В моей голове было много мыслей, которые сдавливали мою грудную клетку и живот.

«Всё это неправда! Всё ложь! Нет никакой сирени и обрыва! Я просто так мечтал о невозможном...»

Я был обижен на бабушку за тайну, которую я никогда не узнаю. Я собрал вещи и убежал из дома искать эту удивительную страну, ориентиром которой была сирень.

4

Sarei tornato indietro e avrei avvertito i soldati alla frontiera, era quella la cosa migliore da fare. Mi ero liberato dell'insensata idea e ne comprendevo solo adesso la totale irragionevolezza. Convinto da questi argomenti e placata la mia voglia di sconclusionato eroismo cominciai a strisciare a ritroso. Indietreggiando sentii un ramo spezzarsi. Mi voltai di scatto e nello stesso attimo fui accecato da una luce, seguita da un fragore.

Con sorpresa sentii il sangue caldo bagnarmi le mani e colare giù. Non era dolore, quello che avvertivo, ma sgomento e sorpresa. Che stava succedendo? Un freddo improvviso mi pervase e mi resi conto di essere stato colpito al petto.

La luce di una torcia mi fulminò. “Ha la nostra divisa” – disse qualcuno. “Ma è uno dei nostri!” – aggiunse un'altra voce.

In quel preciso istante capii di essere arrivato, che il mio viaggio terminava dove ne iniziava un altro.

Ciò che avevo desiderato era lì a portata di mano; potevo chiudere gli occhi e non pensare più a niente.

La pace che avevo tanto cercato era finalmente arrivata, venendomi incontro.

Molto più vicina di quanto pensassi.

Serĉante pacon

Carlo Simonelli

Italio

Mi estis marŝanta dum horoj, kaj nun la laceco komencis sentiĝi. Super mi, la arboj blokis la ĉielon kaj la valo subite malheliĝis en la neevitebla sunsubiro. Baldaŭ venos la nokto, kun ĝia malkvieto kaj pento.

Mi haltis por serĉi rifuĝon. Mi devis trovi unu antaŭ ol mallumiĝos kaj mi estis kaptita en mia sencela fuĝo el la mallumo, malliberigita de ĝiaj kaptiloj kaj ĝiaj malvarmoj.

Mi rimarkis ĉaledon ĉe la rando de la arbaro, super la deklivo de la valo, ne malproksime de la landlimo. Tie mi serĉus ŝirmejon kaj eble eĉ trovus manĝon, sed mi devis rapidi.

La tutan tagon mia sola penso estis foriri kiel eble plej malproksimen, daŭre rigardi super mia ŝultro je ĉiu bruoj por esti certa, ke neniu plu postkuras min.

Mia taĉmento estis atakata ĝuste antaŭ tagmezo. La malamiko amase atakis, venante kontraŭ nin el ĉiuj flankoj. Multaj kamaradoj falis teren, vunditaj kaj mortigitaj. Kaj en la konfuzo kiu sekvis, la malmultaj pluvivantoj disiĝis, ĉiu malespere serĉante ŝirmejon. La lasta samarmeano, kiun mi vidis, falis antaŭ mi, trafita en la dorso, kaj mi stumblis sur lia korpo kaj daŭrigis mian kuron, tretante lin. En la hororo de la momento, mi pensis nur pri eskapo sen zorgi pri li. Tiu bildo ofte revenis al mi poste kaj malvarmigis mian sangon ĉiufoje, sed mi ne sentis min kulpa. Tiu knabo certe mortis kaj mi nenion povis fari por li.

Mi kuris pli ol unu horon antaŭ ol trovi ŝirmejon kaj la kuraĝon serĉi postkurantojn.

Ĉio ŝajnis trankvila tie for, sed sciante ke ni estis surprizitaj en la tendaro, sen rimarki ion, do tial, eĉ tie, en la grizo de la arbaro, povus kaŝiĝi nevidebla kaj silenta malamiko. Efektive, li certe estis malantaŭ tiuj arboj, serĉante la lastajn fuĝintojn.

Mi devis rapidi. La suno ĵus malaperis, englutita de la mondo, kiu, indifera al la malamo de la homoj, daŭrigis sian kurson.

Mi ne sukcesis superi la teruron de la tago. Mi ĉiam memoros ĝin, sed kio plej timigis min nun estis scii, ke la nokto alportos nekapteblan inferon, sed pli viva kaj surda ol iam ajn.

Miaj kruroj ŝajnis moviĝi pro inercio, miaj sensoj iĝis pli akraj kaj ĉiu brueto de folioj pligrandigis mian maltrankvilon.

Ankoraŭ ne komenciĝis la funebraj kaj ululantaj koncertoj de noktaj bestoj, kiujn ni en la tendaro aŭdis kvereli pri la predoj, kiujn ili sukcesis surprizi. En tiu vojaĝo, mi devis defendi min kontraŭ pli timindaj malamikoj ol tiuj de la tagmezo, kontraŭ la nevideblaj malamikoj de tiu malamika teritorio, ĉasata de homoj kaj bestoj, kaj eble eĉ de mi mem. Kvankam, la oficiroj diris al ni, ke la loĝantaro atendas nin kiel heroojn, ke ili atendas nian alvenon por bonvenigi nin triumfe, ni estis salutitaj per malbonaj vortoj kaj ŝtonbatoj.

Mi devis rapidi, eĉ pli, se mi volis alveni antaŭ ol la mallumo malhelpu min trovi la ĉaledon, kaj dum la kurado, subite, mi rememoris mian hejmon, miajn proksimulojn kaj ŝin.

Mi surprizis min pensante pri ŝi sub tiu plumba ĉielo. Nun ŝi estis kara por mi kiel neniam antaŭe, dum sen iu videbla kialo, simila al sonĝo, mi rememoris signifajn faktojn spertitajn kune, kiuj prezentigis antaŭ miaj okuloj.

Se ne por mi, por ŝi mi devis reveni. “Kion ŝi farus sen mi? Kiel ŝi povus daŭri?”, mi diris al mi. Ĉu eble ĉi tiuj kialoj donis al mi la forton por ne cedi, kaj mi mensogis al mi mem? Ĉar mi certe volis reveni, sed por mi kaj por neniu alia.

La malvarmo de la nokto nun komencis sentiĝi, eĉ se mi ne rimarkis ĝin pro la ekscito de la kurado ĝis tiu momento. Estis tia malvarmo, kiu eniras la ostojn por resti ene, kaj nenio povas mildigi ĝin, eĉ ne tagoj da hejtigitaj ĉambroj kaj varmaj duŝoj. Mi estos portinta ĝin en mi, kiel feton en patrina utero, kiel tiun malbenitan militon, kiun mi ne volis. Sed kiu volis ĝin?

Mi estus povinta rifuzi, kompreneble. Se ni ĉiuj rifuzus batali, ne okazus milito. Sed neniu havis la kuraĝon kontraŭstari, kaj eble neniu vere volis tion, estis pli facile batali ol rifuzi. Kiel malgrandaj multaj

sferoj sur klinita ebena, ni ruliĝis en inferon kaj estis obeemaj kaj pretaj labori en nia sensenca celo liberigi tiujn, kiuj ne intencis liberiĝi.

Kion ŝi estus dirinta, se ŝi sciis, kion ni faris kaj kion faras la soldatoj ĉiutage? Sed kiu povas juĝi la soldatojn, se ne la soldatoj mem? Milito havas siajn perversajn regulojn, kiujn oni devas respekti, kaj ŝi absolvus min.

Milito ne povas esti farita nur per armeoj. Inter ili troviĝas urboj, homoj kaj ilia ĉiutaga vivo. Milito parolas nur unu lingvon, komunan al ĉiuj popoloj, en kiu oni rekonas sin. Ni estis konvinkitaj, ke perforto kontraŭ civiluloj kaj virinoj, ĉiam junaj, estas nur puno, reprezalio. Tiuj homoj subtenis la malamikojn, ili estis iliaj partianoj, ili mem estis malamikoj, kaj estis necese kontraŭbatali ilin per ĉiuj rimedoj, silentigi ilin, montri sian forton, perforti ilian dignon, estingi ĉian deziron al ribelo. Ŝi estus fiera pri mi, sciante kun kia kuraĝo mi batalis kontraŭ la malamikoj, kun kia entuziasmo mi estis la diligenta defendanto de nia nacio.

Nun mi devis esti proksime de la dometo. En la ĉiam pli densa mallumo mi ne povis trovi ĝin, sed ĝi estis tie, mi estis certa.

Mi ne havis precizan planon. Mi trovos rifuĝon ĝis la mateno kaj poste mi pluiros, mi ne sciis kien, sed for, en vojaĝo, kiu kondukos trans la landlimon. For de milito.

Dum mi marŝis, mi aŭdis bruojn kaj haltis, kurbiĝante. Nun oni aŭdis nenion krom la blovon de la arboj, kiuj spiris la venenojn de la nokto gardantaj tiujn lokojn.

Mi staris senmove dum kelka tempo, mi ne scias kiom longe, kaj en certa momento la bruoj denove aŭdiĝis. Levante la kapon, mi estis frapita de la ekbrilo de lumo. Mi komencis rampi kiel salamandro, kaj kiam mi proksimiĝis, mi trovis la malamikojn en la tendaro, kun nur unu deĵoranta gardisto. En la centro de la kampo estis amasigitaj kestoj, sendube plenaj de armiloj.

De ĉi tiu pozicio inter la vaporoj de la vegetalaro, mi povis vidi la landliman turon. La distancoj estis malfacile takseblaj en la mallumo, sed devis esti kelkcent metroj aŭ iomete pli.

Eble la soldatoj en la tendaro ne estis tiuj, kiuj atakis nin, kaj ili ne serĉis la postvivantojn, kaj tute ne sciis, ke mi estas tie. Identigin-

te la limon, nun mia vojaĝo havis celon, plenan signifon, kaj tio estis kuraĝiga.

Mi repensis pri ŝi. Mi vidis la momenton, kiam mi brakumos ŝin kaj rakontos al ŝi pri tiuj teruraj momentoj. Ankoraŭ en la memoroj, pri kiuj oni ne rimarkas, ĉu ili apartenas al la pasinteco aŭ al la estonteco, aŭ ĉu ili apartenas nek al la pasinteco nek al la estonteco.

La sentinelo moviĝis, venante en mian direkton. Kiam li alproksimiĝis, li haltis, balancante la kapon, kvazaŭ por serĉi pli bone en la mallumo. Li aŭdis la ne retenitan spiradon. Lia mano karesis la fusilon sur lia ŝultro kaj kaptis ĝin, celante ĝin necerte en la mallumo. Ĉirkaŭe la silenton rompis la batado de mia koro, kiu nun ŝajnis la sola sono de tiu loko. La gardisto movis sian kapon ankoraŭ kelkajn fojojn, penante rigardi pli bone en mian direkton, antaŭ ol sin turni kaj daŭrigi al la tendaro. Mi estis savita. Malrapide la angoro ŝajnis forlasi min kaj mi rekomencis rampi kun metoda malrapideco, fiksrigardante la limon.

La vojaĝo al libereco daŭris. Mi postlasis la malamikojn kaj iris for de la tendaro.

Antaŭ miaj okuloj, mi ankoraŭ havis la turon, kiu, kiel Norda Stelo, montris al mi la sekvendan direkton. Ĉiu movo estis malrapida kaj kalkulita, atenta al ĉiu plej eta bruoj por ne esti malkovrita ĝuste nun. Tuj kiam mi estis inter la turo kaj la tendaro, mi decidis halti. La streĉo rigidigis ĉiun mian muskolojn kaj mi devis paŭzi antaŭ ol daŭrigi.

Ĝuste en tiu momento venis al mi la absurda ideo reiri kaj detruigi la armilojn ĉe la tendaro, kiuj estus uzataj por mortigi aliajn kamaradojn, dum antaŭ miaj okuloj ankoraŭ reaperis la korpo de la mortinta soldato kaj mi grimpante sur li kaj plu kurante. Mi tuj flankenmetis tiun ekstravagancon, mirante ke mi povus pensi pri ĝi. Kial diable mi devus fari ion tian? Kial diable mi devus ĵeti min en la brakojn de la malamiko ĝuste nun kiam mi estis savita? Ĝuste nun, kiam mi estis certa, ke mi baldaŭ povos denove brakumi ŝin, post kiam ĉio ŝajnis perdita?

Mi estis plenuminta mian devon, neniu postulis pli de mi, kaj mi ne estas martiro.

La turo staris morne inter la arboj, kiuj levis siajn branĉojn al la ĉielo kiel skeletoj en preĝado. Ankoraŭ kelkaj metroj. Kiam mi atingos la landlimon, mia vojaĝo estos finita kaj mi povos ripozi. Fermi la okulojn

kaj ne pensi pri io ajn, trovi pacon, kio esence estas la nura afero, kiun mi vere volis nun, sed ĝi estis io malproksima.

Mi kredis aŭdi voĉon. Ĝi petis min reveni. Fakte, ĝi postulis tion. Kaj eĉ pli surprizis min la penso, ke reiri nun ne plu ŝajnis al mi tiel freneze.

Nedecidemo volis min kapti, provis min superforti, konfuzi min, sed estis klare, ke mi devis daŭrigi, ke ne havis sencon reveni sole. Sufiĉos alarmi la limgardistojn kaj ili organizos patrolon.

Estis klare. Tamen, estis petola kaj ĝena voĉo, kiu turmentis min.

Mi devis ŝtopi miajn orelojn por ne aŭskulti ĝin, sed dum mi daŭrigis al la turo, ĝi insistis kaj iĝis postulema. Mi vidis antaŭ miaj okuloj kiam la kamarado falis kaj mi tretis lin. Sed ĉi-foje mi reagis, mi turnis min por eviti lian korpon kaj revenis helpi lin.

Neracia forto transprenis mian estaĵon kaj puŝis min fari sensencaĵon, sed mi ne povis seniĝi de ĝi kaj ribeli.

Mi reiris al la vojo malantaŭen, kaj kiam mi estis proksime de la tendaro, mi ĵetis min teren, ekrampis. La sentinelo ne plu deĵoris. Mi estis ĝuste en la sama loko, kie mi vidis la armilojn, tamen en la ekscito de la eventoj mi ankoraŭ ne estis naskinta planon kun minimume da logiko. Pensoj dancis antaŭ mi serĉante raciecon, kiu helpis min, kaj mi decidis rezigni.

Mi revenus kaj avertus la soldatojn ĉe la landlimo, tio estis la plej bona afero farenda. Mi liberiĝis de la malsaĝa ideo kaj nur nun konstatis ĝian tutan senracion. Konvinkita de ĉi tiuj argumentoj kaj kvietiginta mian deziron al delira heroeco, mi komencis rampi malantaŭen. Retroirante mi aŭdis branĉon rompiĝi. Mi turniĝis kaj en la sama momento mi estis blindigita de lumo, sekvita de bruego.

Mi mire sentis la varman sangon malsekigi miajn manojn kaj flui malsupren. Tio, kion mi sentis, ne estis doloro, sed teruro kaj surprizo. Kio okazis? Subita malvarmo invadis min kaj mi konstatis, ke mi estis pafita en la brusto.

La lumo de poŝlampo fulmis al mi. “Li havas nian uniformon”, iu diris. “Sed li estas unu el niaj!”, aldonis alia voĉo.

En tiu preciza momento mi sciis, ke mi alvenis, ke mia vojaĝo finiĝis, kie alia komenciĝis.

Tio, kion mi deziris, estis tie ĉe mane. Mi povis fermi miajn okulojn kaj pensi pri nenio plu.

La paco, kiun mi tiom longe serĉis, finfine alvenis, veninte renkonti min.

Multe pli frue ol mi imagis.

Autostrade senz'alba

Davide Bacchilega

Italia

La prima cosa che faccio è provare a telefonarle. Lascio squillare il telefono una decina di volte senza avere risposta. I messaggi di testo sembrano partire, ma non arrivare a destinazione. Nessun problema di connessione: forse sono io a essere scollegato, emano cattive vibrazioni.

Decido allora di rimettermi in macchina e andare direttamente da lei. Non voglio proprio credere che sia successo veramente.

Basteranno un paio d'ore di autostrada, a quest'ora della notte. Mi faranno compagnia i tir che trasportano surgelati e i bagliori aranciati dei pannelli luminosi. Non ricordo nemmeno chi mi ha prestato quest'auto.

Se buttassi il cellulare fuori dal finestrino, chi lo trova vivrebbe la mia vita?

Dopo appena mezz'ora di viaggio scivolando nel sonno delle campagne, mi pizzica il familiare stimolo di andare al bagno. Come un istinto primordiale conficcato nel cervello. Metto allora nel mirino il prossimo autogrill e con la freccia lampeggiante segnalo la virata.

Piscio alla toilette, accarezzo un peluche, bevo un caffè, pago alla cassa. Faccio tutte queste cose, ma già non so più in che ordine.

Quando esco dall'edificio, c'è un uomo seduto sui gradini che scendo al parcheggio. Capelli argento su un volto giovane. Potrebbe essere un trentenne invecchiato male, o un cinquantenne fuori dal tempo. L'aria affaticata, il completo stropicciato. "Ho chiesto quel taxi quasi un'ora fa. Un'ora fa!" lamenta al telefono. "È possibile che nessuno riesca a venire qui a prendermi?"

Dopo un altro paio di battute, interrompe la comunicazione. Sembra stravolto.

"Problemi?" gli chiedo.

"Lo vede quel Suv parcheggiato di fronte?"

Non vedo alcun Suv nei paraggi. “No, a dire il vero.”

“Appunto, me l'hanno fregato. Dieci minuti appena lì dentro” accenna all'autogrill, “e quando sono uscito non c'era più.”

“Se vuole, posso darle un passaggio.”

Per un attimo mi guarda come se fossi matto. L'attimo dopo con timore, come se avesse a che fare con un maniaco. Alla fine, il suo volto si allarga in un sorriso. “Per Dio, sì” mi fa.

Gli chiedo dove deve andare. Risponde che va nello stesso posto in cui vado io. Un minuto dopo ho un compagno di viaggio che scivola con me fra le pieghe della notte. Uno spicchio di luna calante, stelle sbiadite, foschia rurale.

Per venti minuti buoni, non ci diciamo nulla. Per di più non riesco a trovare una stazione radio che mantenga il segnale. È tutto un fruscio indistinto di suoni, voci e jingle. Gli unici intermezzi chiaramente percepibili sono spot pubblicitari di prodotti mai sentiti.

“Sei gentile” fa lui a un certo punto.

“È una nottata strana.”

“Perché? Sei gentile solo nelle nottate strane?”

“In te, piuttosto, c'è qualcosa che non mi torna” dico. “Sembri un autostoppista fantasma.”

“Un modo come un altro per fare conoscenza.”

“Cosa fai nella vita?”

“Cosa facevo, vorrai dire.”

“Sei già in pensione?”

“Una specie.”

“Fammi indovinare” dico io. “Agente di commercio.”

“Ingegnere.”

“Io, invece...”

“Quella è la mia macchina!” mi interrompe alzando la voce. Punta il dito verso una berlina davanti a noi duecento metri.

“Sei sicuro?”

“Avvicinati.”

Mi sposto allora dalla seconda corsia alla prima, accodandomi a quella che dovrebbe essere la sua auto rubata.

“È la mia targa, è la mia auto!” grida. “Stagli dietro.”

Mastico un “ci provo” poco convinto, irritato per essere stato risucchiato nella storia di qualcun altro. Come se non avessi già abbastanza grane. Comunque, pesto il piede sull’acceleratore per non perdere di vista il nostro obiettivo.

Dopo pochi chilometri, l’automobile davanti a noi sterza all’improvviso senza mettere la freccia per imboccare l’entrata di un altro autogrill. Non mi faccio sorprendere e la tallono. Le stiamo alle calcagna nel parcheggio, finché non la vediamo arrestarsi in una piazzola. Ne esce un signore anziano dal passo sciancato.

Il mio compagno di viaggio balza fuori dalla mia auto e si avvicina alla sua berlina. “Mi sono sbagliato” dice scuotendo la testa. “Il modello è quello, ma la targa ha una cifra diversa.”

“E ora?” gli faccio io dal finestrino aperto.

“Andiamo a mangiare qualcosa, offro io.”

La tentazione è quella di allontanarmi e abbandonarlo, ma ormai è troppo tardi. Non si fa il buon samaritano per poi piantare in asso colui che hai salvato. E poi effettivamente mi è venuto un discreto appetito. Ancora una vecchia abitudine dura a morire.

Così ci ritroviamo a mangiare hamburger con patatine fritte, a quest’ora della notte. Il cibo non sa di nulla, ma intuisco che potrebbe essere un problema mio. Prendo un altro caffè per stare sveglio, anche se non mi sento stanco.

“Devo svuotare la vescica” fa lui allontanandosi verso il bagno.

Lo aspetto cinque minuti, poi dieci. Lo aspetto un quarto d’ora.

Quando perdo la pazienza mi metto a cercarlo. Senza esito. Penso che sia la volta buona per tagliare la corda e liberarmi di lui.

Esco allora nel parcheggio, ma la mia auto non c’è più. Al suo posto, un foglietto su cui compare una scritta vergata a mano: “*Il viaggio è finito, rassegnati*”.

Inizio a imprecare contro qualche dio locale. Maledico l’estraneo che mi ha ingannato. Insulto me stesso per la mia ingenuità.

Solo, derubato, nella notte. Su un’autostrada di desolazione.

Provo a chiamarla ancora. Lei mi spiegherebbe cosa sta accadendo. Mi conforterebbe come ogni volta che non sono bastato a me stesso. Verrebbe qui a prendermi, salvandomi da questa follia.

Ma il telefono squilla ancora a vuoto. I messaggi non vengono ricevuti. La connessione Internet svapora nell'aria. Una lacrima di rabbia casca sui miei jeans.

“Brutta nottata?” fa una voce femminile.

Mi guardo attorno e intercetto la fonte sonora della domanda. È una donna dai capelli rossi e mossi, la faccia piena da madonna rinascimentale, la silhouette sinuosa avvolta in un abito da sera nero. Non proprio il dress code per andare all'autogrill. Non posso non notare che le manca un braccio.

“La peggiore” le dico.

“Allora d'ora in poi potrà andare solo meglio.”

“Stai andando o tornando?” le chiedo.

“Da dove?”

“Dalla festa” dico io. “Vestita così.”

“Si torna sempre da un luogo per raggiungerne un altro.”

“Beata te che puoi muoverti” le faccio. “Io sono bloccato qui.”

“Se vuoi ti do uno strappo.”

“Sei un angelo.”

“Non mi conosci affatto.”

Mentre salgo sulla sua macchina sportiva, non posso fare a meno di guardarle il braccio mancante. Una pilota monca mi mancava.

“Preoccupato?” chiede.

“Solo di non arrivare da lei” dico.

“È per questo che sei in viaggio?”

Faccio cenno di sì, mentre la rossa fa rombare il motore spingendo l'auto fuori dal parcheggio.

Nonostante il braccio solo, se la cava bene con il suo bolide. La notte vuota ci invita a riempirla, così le sfrecciamo dentro senza prudenze. Ignorando i limiti di velocità, mangiamo l'asfalto che ci viene incontro, liquidando camion stanchi e utilitarie svogliate.

Nella nostra corsa superiamo anche un vecchio catorcio con cinque ragazzi dentro. Dai finestrini aperti li sentiamo stonare canzoni d'amore, mentre la musica dell'autoradio sovrasta ogni tristezza.

“E quando sarai da lei, cosa accadrà?” chiede la mia autista notturna.

“Ci consoleremo.”

“Farete l'amore?”

“Non ci stavo pensando.”

“Sì, invece.”

Rispondo alla sua provocazione con un'altra. Allungo le dita verso di lei e le sfioro una coscia. Le sue gambe sono snelle e lisce, perfettamente candide. Mentre continua a guidare con una mano sola, con l'altra, quella che non ha, scosta le mie dita dal suo corpo.

“Sei una donna dalle mille risorse” osservo.

“Te l'avevo detto che non mi conoscevi affatto.”

“Ehi, quella è la mia uscita!” le faccio. “Rallenta, vai a destra.”

Invece lei tira dritto. A rallentare non accenna nemmeno.

“Così non arriverò mai.”

“Lei non ti sta più aspettando.”

Tiro un pugno al cruscotto e le urlo di fermarsi, di lasciarmi nella corsia d'emergenza, di tornarsene da dove diavolo è venuta. Ma lei prosegue, senza dire più nulla.

Finché non scorgiamo un'altra auto che ci precede: la mia auto, quella che mi hanno appena rubato.

“Seguila!” ordino alla donna, con nessuna speranza che lei mi ascolti.

Eppure, fa cosa le chiedo e si accoda alla vettura a distanza di sicurezza, non perdendola di vista nemmeno quando mette la freccia per svoltare nell'area di sosta.

Mentre smontiamo dall'auto, scorgo l'ingegnere infilarsi nell'edificio. Ci tuffiamo anche noi tra le mura di quel non-luogo.

Dentro, però, non lo vediamo più. Sparito. Per quanto mi agiti alla ricerca di quel bastardo non riesco a trovarlo. Tra gli scaffali dei dolciumi, niente. Tra quelli dei giocattoli, niente. Nel reparto dei best seller, nulla. Nei cessi, idem.

Quando ripasso davanti al bar, la rossa senza un braccio mi aspetta con due cocktail appoggiati su un tavolino rotondo.

“Datti pace” mi fa. “Gin tonic” continua, invitandomi a bere con lei.

“Vendono alcolici a quest'ora?” chiedo io, sapendo che di notte sarebbe vietato.

“Adesso si può.”

Controllo l'orario: le lancette hanno ormai tagliato da un pezzo il traguardo delle sei.

“È mattino, ma il cielo fuori è ancora nero” le dico come per chiedere una spiegazione.

“Su quest'autostrada non sorge mai il sole.”

“Dunque, è proprio successo?” chiedo.

Con la mano che ha lei afferra il suo bicchiere e con quella che non ha mi porge il mio.

“Brindiamo” dice.

E così facciamo: il suono del vetro contro altro vetro, un sorso rinfrescante, una leggera ebbrezza.

“Non mi pare un evento di cui rallegrarsi” le dico.

“Festeggiamo il fatto che ne hai preso coscienza.”

“Come è stato possibile?”

“Ti sei comportato male con lei, ti sentivi in colpa, eri agitato. Avresti voluto raggiungerla subito, chiederle scusa. Hai corso un po' troppo, una distrazione. E ora sei qui a bere con me.”

“Quando uscirò da questa dannata autostrada?”

“Nel momento esatto in cui te ne sarai fatto una ragione. In cui l'avrai serenamente accettato. Fino ad allora resterai a vagare senza una meta, convinto di poter uscire al prossimo casello. Come tutti gli altri che hai incontrato stanotte, me compresa.”

Finisco di bere il cocktail e osservo attorno la gente di passaggio. Volti anonimi come il mio. Vite anonime come la mia.

“Ma io non posso restare qui, non posso” mi dispero. “Devo tornare da lei!”

La rossa piega la bocca in un sorriso comprensivo da madonna rinascimentale, tira fuori le chiavi dell'auto dalla borsetta e le getta sul tavolino fra noi. “Se vuoi prendile, fatti un giro. Credi di saperli gestire tutti quei cavalli?”

Afferro le chiavi come un drogato afferrerebbe l'eroina. Le bacio le labbra gelide e poi esco da lì con l'idea di volere tornare a com'ero prima, ma con la sensazione di non conoscere strade per farlo.

Giro le chiavi nel quadro, accendo il motore e fuggo via.

Non voglio proprio credere che sia successo veramente.

Divoro quest'autostrada senz'alba e senza caselli come se avessi fretta, come se avessi ancora una direzione. Non ricordo nemmeno chi mi ha prestato quest'auto.

La prima cosa che faccio è provare a telefonarle. Lascio squillare una decina di volte senza avere risposta. Molto probabilmente starà ancora dormendo.

Stringo forte le mani al volante e affondo il piede sull'acceleratore. Presto sarò di nuovo da lei, mi dico.

Aŭtovojoj sen tagiĝo

Davide Bacchilega

Italio

La unua afero, kiun mi faras, estas provi telefoni al ŝi. Mi lasas la telefonon sonori ĉirkaŭ dek fojojn senresponde. La tekstmesaĝoj ŝajnas foriri, sed ne atingi sian celon. Neniu konjektproblemoj: eble mi mem estas malkonektita, elsendante malbonajn ondojn.

Do mi decidas reiri en la aŭton kaj veturi rekte ĉe ŝin. Mi simple ne volas kredi, ke tio vere okazis.

Sufiĉos du horoj de aŭtovojo je ĉi tiu horo de la nokto. La kamionoj transportantaj frostigitajn manĝaĵojn kaj la oranĝa brilo de la lumaj paneloj akompanos min. Mi eĉ ne memoras, kiu pruntedonis al mi ĉi tiun aŭton.

Se mi ĵetus mian poŝtelefonon tra la fenestro, ĉu tiu, kiu trovas ĝin vivus mian vivon?

Post nur duonhoro da vojaĝado, glitante en la dormon de la kampero, pinĉas min la konata impulso iri al la necesejo, kiel praa instinkto enkodigita en la cerbo. Do mi metas la sekvan aŭtovojan benzinstacion en la celilon kaj per la blinkanta sago mi signalas la turniĝon.

Mi pisas en la necesejo, karesas pluŝan beston, trinkas kafon, pagas ĉe la kaso. Mi faras ĉiujn ĉi aferojn, sed mi jam ne plu scias en kiu ordo.

Kiam mi forlasas la konstruaĵon, estas viro sidanta sur la ŝtupoj kondukantaj malsupren al la parkejo. Arĝentaj haroj sur juna vizaĝo. Li povus esti tridekjaragulo aĉe maljuniĝinta, aŭ ekstertempa kvindekjaragulo. La laca aspekto, la sulkiĝinta kompleto. “Mi petis tiun taksion antaŭ preskaŭ unu horo. Antaŭ horo!” plendas li telefone. “Ĉu eblas, ke neniu povas veni ĉi tien por preni min?”

Post kelkaj pliaj frazoj, li interrompas la komunikadon. Li ŝajnas konfuzita.

“Ĉu estas problemoj?”, mi demandas lin.

“Ĉu vi vidas tiun SUV-on parkitan antaŭe?”

Mi ne vidas iun ajn SUV-on en la proksimeco. “Ne, fakte.”

“Ĝuste, oni ŝtelis ĝin de mi. Nur dek minutojn ĝuste tie”, li mencias la restoracion de la benzinstacio, “kaj kiam mi eliris, ĝi ne plu estis tie.”

“Se vi volas, mi povas veturigi vin.”

Dum momento li rigardas min kvazaŭ mi estus freneza. La sekvan momenton kun timo, kvazaŭ li renkontus maniulon. Fine, lia vizaĝo larĝiĝas en rideton. “Je Dio, jes”, li diras al mi.

Mi demandas al li, kien li iru. Li respondas, ke li iras al la sama loko kien mi. Minuton poste, mi havas kunvojaĝanton, kiu glitas kun mi tra la faldoj de la nokto. Malfortiĝanta lunhelo, paliĝintaj steloj, kampara nebuleto.

Dum ja dudek minutoj, ni nenion diras unu al la alia. Krome, mi ne sukcesas trovi radiostacion, kiu konservas la signalon. Ĉio estas neklara susuro de sonoj, voĉoj kaj ĵingloj. La nuraj klare percepteblaj interludoj estas reklamoj por neniam aŭditaj produktoj.

“Vi estas afabla”, li diras iam.

“Estas stranga nokto.”

“Kial? Ĉu vi estas afabla nur dum strangaj noktoj?”

“Prefere, estas io pri vi, kio ŝajnas ne ĝusta”, mi diras. “Vi aspektas kiel fantoma petveturanto.”

“Maniero kiel ajna alia por konatiĝi.”

“Kion vi faras en la vivo?”

“Kion mi faris, vi volas diri.”

“Ĉu vi jam emeritiĝis?”

“Iaspece.”

“Lasu min diveni”, mi diras. “Komerca agento.”

“Inĝeniero.”

“Mi, male...”

“Tio estas mia aŭto!”, li interrompas min, plilaŭtigante la voĉon. Li fingromontras kabinaŭton antaŭ ni je ducent metroj.

“Ĉu vi certas?”

“Alproksimiĝu.”

Mi tiam moviĝas de la dua trako al la unua, viciĝante ĝis antaŭ tiu, kiu devus esti lia ŝtelita aŭto.

“Estas mia numerplato, estas mia aŭto!”, li krias. “Sekvu ĝin.”

Mi maĉas nekonvinkitan “Mi provas”, ĉagrenita esti trenita en ies afero. Kvazaŭ mi jam ne havus sufiĉe da problemoj mem. Tamen mi premas la akcelilon por ne vidperdi nian celon.

Post kelkaj kilometroj, la aŭto antaŭ ni subite deflankiĝas sen uzi la turnsignalon kaj uzas la enirejon al alia aŭtovoja benzinstacio. Mi ne lasas min surpriziĝi kaj sekvas ĝin. Ni estas malantaŭ ĝi en la parkejo, ĝis ni vidas ĝin halti en parkloko. Maljuna neglektaspekta sinjoro aperas.

Mia kunvojaĝanto elsaltas el mia aŭto kaj alproksimiĝas al sia kabin-aŭto. “Mi eraris, li diras, balancante la kapon. La modelo estas tio, sed la numerplato havas alian numeron.”

“Kaj nun?”, mi demandas el la malfermita fenestro.

“Ni iru manĝi ion, mi pagos.”

Venas tento foriri kaj forlasi lin, sed nun estas tro malfrue. Vi ne ludas la bonan Samarianon kaj poste forlasis tiun, kiun vi savis. Kaj fakte mi sentas iometan malsaton. Ankoraŭ malnova kutimo malfacile mortas.

Do ni trovas nin manĝante hamburgeron kaj frititajn terpomojn, en tiu ĉi horo de la nokto. La manĝaĵo gustas kiel nenio, sed mi supozas, ke eble estas nur mi. Mi prenas alian kafon por resti sendorma, kvankam mi ne sentas min laca.

“Mi devas malpleniĝi mian vezikon”, li diras, forirante al la necesejo.

Mi atendas kvin minutojn, poste dek. Mi atendas lin kvaronhoron.

Kiam mi perdas paciencon, mi komencas serĉi lin. Senrezulte. Mi pensas, ke estas la ĝusta tempo por foriri kaj liberigi min de li.

Mi do eliras al la parkejo, sed mia aŭto ne plu estas tie. Anstataŭe, paperaĵo kun skribaĵo manskribita: “La vojaĝo finiĝis, rezignu”.

Mi komencas blasfemi iun lokan dion. Mi malbenas la fremdulon, kiu min trompis. Mi insultas min pro mia naiveco.

Sola, rabita, en la nokto. Sur aŭtovojo de afliktado.

Mi provas telefoni al ŝi denove. Ŝi klarigus al mi kio okazas. Ŝi konsolus min kiel ĉiufoje kiam mi ne estas sufiĉe forta por elteni mem. Ŝi venus ĉi tien por preni min, savi min el tiu frenezo.

Sed la telefono ankoraŭ sonoras vane. Mesaĝoj ne estas ricevitaj. La interreta konekto vaporiĝas en la aeron. Larmo de kolero falas sur mian ĝinzon.

“Ĉu malbona nokto?” , diras ina voĉo.

Mi ĉirkaŭrigardas kaj kaptas la sonfonton de la demando. Ŝi estas virino kun onda rufa hararo, la plena vizaĝo de renesanca madono, la sinua silueto envolvita en nigra vesperrobo. Ne ĝuste la vestokodo por iri al aŭtovoja benzinstacio. Mi ne povas ne rimarki, ke al ŝi mankas brako.

“La plej malbona”, mi diras al ŝi.

“Do, de nun, ĝi povas nur pliboniĝi.”

“Ĉu vi iras aŭ revenas?” , mi demandas ŝin.

“De kie?”

“De la festo”, mi diras. “Tiel vestite.”

“Oni ĉiam revenas de unu loko por atingi alian.”

“Feliĉa vi, ke vi povas moviĝi, mi diras. Mi estas blokita ĉi tie.”

“Se vi volas, mi povas vin veturigi.”

“Vi estas anĝelo.”

“Vi scias nenion pri mi.”

Dum mi eniras en ŝian sportaŭton, mi ne povas ne rigardi ŝian mankantan brakon. Mankis al mi kripla piloto.

“Ĉu vi maltrankviliĝas?” , ŝi demandas.

“Nur pro tio ke mi ne sukcesos alveni al ŝi”, mi diras.

“Ĉu tial vi vojaĝas?”

Mi kapjesas, dum la rufulino muĝigas la motoron, elpuŝante la aŭton el la parkejo.

Kvankam unubraka, ŝi bone mastrumas sian sportaŭton. La malplena nokto invitas nin pleniĝi ĝin, do ni rapide veturas tra ĝi sen prudento. Ignorante la rapidlimojn, ni englutas la asfaltan renkontiĝantan vojon, forpasante lacajn kamionojn kaj apatiajn utilaŭtojn.

En nia vetkuro ni ankaŭ preterpasas malnovan aŭtaĉon kun kvin knaboj interne. De la malfermitaj fenestroj ni aŭdas ilin kantaĉi neagorde amkantojn, dum la muziko de la aŭtoradio superfortas ĉian malĝojon.

“Kaj kiam vi estos kun ŝi, kio okazos?”, demandas mia nokta kondukanto.

“Ni konsolos unu la alian.”

“Ĉu vi amoro?”

“Mi ne pensis pri tio.”

“Tutmale, kompreneble.”

Mi respondas al ŝia provoko per alia. Mi etendas miajn fingrojn al ŝi kaj tuŝas ŝian femuron. Ŝiaj kruroj estas sveltaj kaj glataj, perfekte blankaj. Ŝi plu stiras per unu mano, sed per la alia, tiu, kiun ŝi ne havas, ŝi forpuŝas miajn fingrojn de ŝia korpo.

“Vi estas virino kun mil rimedoj, mi observas.”

“Mi jam diris al vi, ke vi scias nenion pri mi.”

“Hej, tiu estas mia elirejo!”, mi diras al ŝi. “Malrapidu, turnu dekstren.”

Tamen, ŝi daŭras rekten. Ŝi eĉ ne montras malrapidigemon.

“Do mi neniam atingos ŝin.”

“Ŝi ne plu atendas vin.”

Mi pugnobatas la instrumentpanelon kaj krias al ŝi, ke ŝi haltu kaj lasu min sur la urĝvojo, reiru al kie diable ŝi elvenis. Sed ŝi daŭrigas, ne plu parolante.

Ĝis ni vidas alian aŭton antaŭ ni: mian aŭton, tiun, kiun oni ĵus ŝtelis de mi.

“Sekvu ĝin!”, mi ordonas al la virino, sen espero, ke ŝi aŭskultos min.

Tamen ŝi faras tion, kion mi petas kaj sekvas la aŭton je sekura distanco, ne vidperdante ĝin, eĉ kiam ĝi uzas la turnosignon por turni en la ripozejon.

Kiam ni eliras el la aŭto, mi vidas la inĝenieron eniri en la konstruaĵon. Ankaŭ ni plonĝas en la murojn de tiu ne-loko.

Interne, tamen, ni ne plu vidas lin. Li malaperis. Kvankam mi agitas min serĉante tiun bastardon, mi ne sukcesas trovi lin. Inter la bretoj de sukeraĵoj, nenio. Inter tiuj de la ludiloj, nenio. En la aleo de la plej vendataj libroj, nenio. En la necesejoj, same.

Kiam mi preterpasas la trinkejon, la rufulino sen brako atendas min kun du kokteloj starantaj sur ronda tablo.

“Kvietiĝu”, ŝi diras al mi. “Ĝintoniko”, daŭrigas ŝi, invitante min kuntrinki.

“Ĉu oni vendas alkoholaĵon je ĉi tiu horo?”, mi demandas, sciante, ke estus malpermesita nokte.

“Nun vi rajtas.”

Mi kontrolas la horon: la montriloj jam delonge transpasis la markon de la sesa horo.

“Estas mateno, sed la ĉielo ankoraŭ estas nigra ekstere, mi diras al ŝi kvazaŭ petante klarigon.”

“La suno neniam leviĝas sur ĉi tiu aŭtovojo.”

“Do, ĉu vere okazis?”, mi demandas.

Per la mano, kiun ŝi havas, ŝi kaptas sian glason kaj per tiu, kiu mankas, ŝi donas al mi la mian.

“Ni tostu”, ŝi diras.

Kaj tiel ni faras: la tinta de glaso kontraŭ glaso, freŝiga gluto, ioma ebrico.

“Ne ŝajnas esti ĝojinda evento”, mi diras al ŝi.

“Ni festu la fakton, ke vi ekkonsciis pri tio.”

“Kiel tio eblis?”

“Vi kondukis malbone kun ŝi, vi sentis vin kulpa, vi estis malserena. Vi volis atingi ŝin tuj, peti pardonon. Vi veturis iom tro rapide, senatente. Kaj nun vi trinkas ĉi tie kun mi.”

“Kiam eliros mi el ĉi tiu diabla aŭtovojo?”

“En la preciza momento, kiam vi akceptos tion trankvile. Ĝis tiam, vi restos sencele vaganta, konvinkita, ke vi povas eliri ĉe la sekva voj-impostejo. Kiel ĉiuj aliaj, kiujn vi renkontis ĉi-vespere, inkluzive de mi.”

Mi fintrinkas la koktelon kaj observas la pasantajn homojn. Anonimaj vizaĝoj kiel la mia. Anonimaj vivoj kiel la mia.

“Sed mi ne povas resti ĉi tie, mi ne povas, mi malesperas. Mi devas reiri al ŝi!”

La rufulino kompreneme ridetas kiel renesanca madono. Ŝi elprenas la aŭtoŝlosilojn el sia sako kaj ĵetas ilin sur la tablon inter ni. “Se vi volas preni ilin, ekveturu. Ĉu vi pensas, ke vi kapablas mastrumi tiom da ĉevaloj?”

Mi kaptas la ŝlosilojn kiel drogulo kaptus heroinon. Mi kisas ŝiajn malvarmajn lipojn kaj poste mi foriras kun la ideo reveni al tio, kio mi estis antaŭe, sed kun la sento, ke mi ne konas vojojn por fari tion.

Mi turnas la ŝlosilon en la ŝaltilo, ekfunkciigas la motoron kaj forveturas.

Mi simple ne volas kredi, ke tio vere okazis.

Mi englutas ĉi tiun aŭtovojon sen tagiĝo kaj sen voj-impostejoj kvazaŭ mi hastus, kvazaŭ mi ankoraŭ havus direkton. Mi eĉ ne memoras, kiu pruntedonis al mi ĉi tiun aŭton.

La unua afero, kiun mi faras, estas provi telefoni al ŝi. Mi lasas sonori ĉirkaŭ dek fojojn senresponde. Ŝi verŝajne ankoraŭ dormas.

Mi forte premas miajn manojn sur la stirilo kaj puŝas mian piedon sur la akcelilon.

Mi baldaŭ estos denove kun ŝi, mi diras al mi.

El la nigro

Sten Johansson

Svedio

*(inspirita de sia romano Falaflo en maco,
eldonejo Mondial, 2023)*

Ĉiuvespere, kiam Simon enlitiĝas, Panjo kutimas rakonti aŭ laŭtlegi al li fabelon. Plej multe ŝi ŝatas legi la fabelojn de Andersen, sed okaze de festoj ŝi kelkfoje rakontas ion pri la izraelidoj, precipe pri la naskiĝo de Moseo. Simon mem tamen preferas ke ŝi rakontu pri Paĉjo. Li ne plu certas, ĉu li memoras lin aŭ nur la rakontojn de Panjo. Laŭ ŝi Paĉjo havis malbonajn pulmojn sed bonan koron. Bedaŭrinde oni bezonas ambaŭ por vivi.

Jam de kelka tempo Panjo kaj Simon kutimas fari promenojn kun sinjoro Larsen, ŝia kolego, en la Reĝa Ĝardeno aŭ en alia parko. Tiam la sinjoro kutime alportas bombonojn al Simon. Jakob, la pli aĝa frato de Simon, neniam akompanas ilin en tiuj promenoj. Li ne ŝatas sinjoron Larsen. Laŭ Jakob, la sinjoro volas edziĝi al Panjo, kaj tio estus hontinda. Sed Jakob estas dekkvinjara, kaj Simon ne multe atentigas lian opinion.

De kvar jaroj, post kiam Paĉjo mortis en la sanatorio, Simon, Jakob kaj Panjo loĝas kun la geavoj en ties apartamento. En la unua tago de oktobro fariĝas granda malkvieto en la loĝejo. La telefono kelkfoje sonoras, oni interparolas ekscitite kaj maltrankvile, kaj vespere alvenas sinjoro Larsen. Oni komencas paki aferojn en valizojn, sed dumlonge neniu klarigas ion ajn al Simon. Fine tamen Panjo sidiĝas kun li kaj komencas rakonti, pri kio temas.

“Ne timu, sed ni devos rapide forlasi Kopenhagon. Pro la germanoj ne eblas plu resti ĉi tie. Sed ni iros kune dum la tuta vojaĝo, kaj ankaŭ la geavoj. Do, ĉio estos en ordo.”

“Ĉu ankaŭ sinjoro Larsen?”

“Nu, sinjoro Larsen helpos nin, sed poste li reiros ĉi tien.”

“Kial?”

Ŝi rigardas lin kun hezita mieno. Poste ŝi diras:

“Ĉar li ne estas judo.”

“Ĉu nur judoj rajtas vojaĝi?”

Ŝi ridetas en iel stranga maniero.

“Jes, ŝajnas tiel.”

Kiam la germanaj soldatoj alvenis en Danlandon antaŭ pli ol tri jaroj, la tuta familio ege nervozigis, timante kio okazos al la judoj. Sed baldaŭ preskaŭ ĉio refariĝis kiel antaŭe. Ĉi tiun aŭtunon oni tamen denove ektimis. Panjo klarigis ke ne plu restas dana registaro, kaj tial la germanoj fariĝis pli danĝeraj ol antaŭe. Simon ne komprenas tion, sed ial nun necesos forlasi la hejmon.

Estas malpermesate eliri nokte, do ili devas atendi ĝis tre frue matene. Dume la plenkreskuloj plu diskutadas, pakas, malpakas kaj repakas. La telefono dufoje sonoras eĉ meze de la nokto, vekante lin. Fine estas tempo ekiri, kvankam plu mallumas ekstere. Panjo helpas lin vesti sin per pluraj tavoloj da varmaj vestaĵoj. Poste ili subeniras. Sur la strato staras kovrita ŝarĝaŭto. Oni almetas ŝtupetaron al ĝi, kaj Avo, Avino, Panjo, Jakob kaj Simon devas supreniri en ĝin. Ene li flaras odoron de tero, venantan el kestoj de terpomoj starantaj tie, sed ili ĉiuj devas ekŝidi malantaŭ baŝo sur kelkaj feltaĵoj sternitaj sur la planko. Oni fermas la baŝon, kaj fariĝas tute mallume. La aŭto ekiras.

La veturado daŭras longe. Eble horon aŭ pli. La aero en la senluma ŝarĝejo estas malfreŝa kaj odoras iomete putre. Jen kaj jen li faletas antaŭen aŭ dorsen, kiam la aŭto turniĝas. Panjo ĉirkaŭtenas lin kaj parolas trankvilige al li tra la motorbruo. Li flaras ŝian konatan parfumon, kio donas al li senton de sekureco meze de la timiga mallumo.

“Ĉio estos en ordo”, ŝi diras. “Sinjoro Larsen aranĝis ĉi tiun transporton kaj espereble sukcesos ankaŭ pri la sekvo.”

“Kien iras la aŭto?”

“Al hotelo ĉe la markolo, unue. Poste ni espereble pluiros al Svedio.”

Simon surpriziĝas. Al Svedio, ĉu? Li scias ke antaŭ la milito oni kelkfoje ekskursis tien per pramo. Sed li ne komprenas kial necesas sidi en

malluma ŝarĝaŭto. Nek kial la veturado daŭras tiel longe. La pramo al Svedio ja iras de la urbocentro. Li kelkfoje vidis ĝin tie.

Kiam oni finfine haltas kaj li povas eliri el la nigro de la ŝarĝaŭto, la lumo preskaŭ blindigas lin. Duonfermante la okulojn, li tamen videtas grandan domon kaj malantaŭ tiu la grizan maron. Sed ili ĉiuj devas rapide eniri tra flanka pordo.

“Ĉu ĉi tio estas Svedio?”, li demandas, venante en ĉambron kun vidaĵo al pinaro.

“Stultulo!” diras Jakob. “Svedio estas trans la akvo. Ĉi tio estas la pensiono Hvide Strand en Hellebæk. Ĉu vi ne rekonas ĝin?”

Li pripensas. Jes, de la antaŭa somero li ja memoras la strandon kaj la ondojn, sed ne ĉi tiun domon. Tiam oni vidis Svedion de la strando ĉi tie. Sed ekde kiam germanaj soldatoj alvenis en Danlandon, tute ne eblas ekskursi tien.

“Ĉu ni iros al la strando?”

“Kia stultulo vi estas!”, murmuris Jakob ripete kaj ekfosas en sia sako.

“Nu, almenaŭ ne por naĝi, mi esperas”, diras Panjo.

Kompreneble. Aŭtune oni ne naĝas. Estus ege tro malvarme.

Nekonata sinjorino alportas matenmanĝon sur pleto.

“Bedaŭrinde vi devas manĝi en la ĉambroj”, ŝi diras. “En la salono sube vi estus tro videblaj de ekstere.”

“Jes, kompreneble”, diras Panjo. “Koran dankon pro via helpemo, sinjorino.”

“Ne menciinde. Espereble mia edzo sukcesos interkonsenti kun fiŝisto.”

Panjo kapjesas, metante la manon antaŭ la buŝon, kvazaŭ ŝi ekplorus. Poste ili ekmanĝas, sidante iom malkomforte ĉe eta tablo. Simon scivolas, pri kio oni interkonsentos kun fiŝisto. Ĉu pri manĝo el fiŝaĵo? Li tamen ne volas demandi pri tio, timante ke Jakob denove nomos lin stultulo.

“Kie estas Avo kaj Avino?”, li anstataŭe demandas.

“En alia ĉambro. Bonŝance ĉi-sezone la pensiono ne havas aliajn gastojn. Fakte ĝi estas fermita.”

Post la matenmanĝo Panjo kuŝiĝas surliten por dormi. Ĉi tio similas inversan mondon, pensas Simon.

“Restu en la ĉambro, knaboj. Tio gravas. Ĉiuokaze ne montru vin eksterdome. Prefere ankaŭ vi ripozu, ĉar vi bezonas ĉiujn fortojn.”

Jakob restas sur sia seĝo kun libro, dum Simon kuŝiĝas surlite kaj eklegas magazinon kun bildstria rakonto, kiun li ricevis de sinjoro Larsen. Apude Panjo endormiĝas plene vestite sub plejdo.

Li enuas. Kelkatempe li ja dormetas, ĉar en la pasinta nokto lia dormo estis malkvieta. Aliokaze li sidas ĉe la fenestro, rigardante eksteren, dum Jakob sur sia seĝo plene profundiĝas en ian aventuron kun indiaĵoj. Estas griza aŭtuna tago kun pluveto kaj blovado. Ekstere kelkaj malhelverdaj pinoj balanciĝas pro la vento. Simon cerbumas pri tio, kiel longe necesos resti ĉi tie, kaj ĉu ili neniam plu revenos hejmen.

Vespere ili ricevas manĝon, kaj ĝi efektive konsistas el frititaj fiŝokneloj. Poste plu daŭras la atendado, dum oni tre malmulte eklumigas la ĉambrojn, kovrinte la fenestrojn per la kutimaj nigrumaj kurtenoj. Aŭdiĝas diskutado kaj ĝenerala malkvieto. Sinjoro Larsen intertraktas kun nekonata viro, kaj Avino sidas ripozante sur fotelo.

Fine estas tempo ekiri. Simon ne scias, kioma horo estas, sed eksterdome jam regas plena mallumo. Ili kolektiĝas en la vestiblo. La viro el la pensiono petas ilin resti tute silentaj kaj sekvi lin en vico. Poste li kondukas ilin laŭ apenaŭ videbla vojeto tra la malluma arbaro. Simon paŝas inter sinjoro Larsen kaj Panjo, iom rigide pro la pluroblaj vestaĵoj. De temp' al tempo li turnas la kapon por certigi ke Panjo plu paŝas tuj malantaŭ li kiel nigra ombro. Post ŝi sekvas Jakob kaj la geavoj.

Irinte sufiĉe longe, ili venas al strando iomete malpli nigra ol ĉio alia. Simon aŭdas la plaŭdadon de la ondoj kaj la susuradon de la vento, kaj tiu vento estas plena de salo el la markolo.

“Restu inter la arboj”, diras la nekonata viro. “Jen kuŝas la boato.”

“Bone”, diras sinjoro Larsen. “Ni faros, kiel vi diras.”

La viro foriras.

“Do ni simple atendu”, diras sinjoro Larsen. “Sed nun ni donu la dormigilon al la knabo.”



“Atendu”, tiam diras Panjo. “Simon jam estas okjara kaj sufiĉe prudenta.”

Poste ŝi turnas sin al li.

“Ĉu vi kapablos resti tute silenta, kio ajn okazos?”

Li elpremas sufokitan jeson per la seka buŝo.

“Kion ajn vi aŭdos, ĉu kriojn, ĉu pafojn, restu absolute silenta kaj fikstenu mian manon! Ĉu en ordo?”

Sinjoro Larsen ŝajnas malkontenta, sed finfine Simon ne devas gluti ion ajn. Do li restas muta, dum la plenkreskuloj daŭre flustras en la mallumo.

Li premas la manon de Panjo, kaj ŝi repremas la lian.

“Ĉu vi malvarmiĝas?”, ŝi flustras.

Li kapneas sed malgraŭ tio premas sin kontraŭ ŝia flanko. Li flaras odorojn de la maro kaj de la pinoj ĉirkaŭ ili, sed nenio videblas, kaj aŭdeblas nur plaŭdado de ondoj kaj susurado de vento tra la pinoj. Ĉio estas nigra ĉirkaŭ li. Nigras la tero, la ĉielo, la maro. Plej nigras la arbaro

malantaŭ li. Simon timas, kio kaŝiĝas en la nigro. Li volas baldaŭ trairi ĝin, eliri el ĝi. Sed necesas atendi.

Post kelkaj eternoj li ekaŭdas obtuzan motorbruon el la malluma maro. Sinjoro Larsen stariĝas, paŝas sur la strandon kaj kelkfoje intermite eklumigas poŝlampon, direkte al la maro. Kaj tiam el la nigro videblas kelkaj respondaj ekbriloj de lampo.

“Jen ĝi. Ni ekiru”, li diras.

Do, man-en-mane kun Panjo, Simon paŝas sur la strandon, ĝis la akvorando, kie ondoj siblante mordas la sablon. Tie li ekvidas boaton, kaj ili ĉiuj eniras en ĝin kaj sidiĝas dense kune sur la sidbretoj, metinte la valizojn sur la boatfundon. Sinjoro Larsen sidiĝas ĉe la remiloj, kaj baldaŭ la boato survojas foren, balanciĝante sur la ondoj. Jen kaj jen Simon sentas malvarmajn akvogutojn trafi la vizaĝon, lasante salan guston en lia buŝo.

Malantaŭ la dorso de la sinjoro li nun ekvidetas nigran ombron, kiu iom post iom kreskas, ĝis la boato atingas ĝin. Iu levas lin supren, Panjo grimpe postsekvas, kaj ankaŭ la aliaj supreniras, krom sinjoro Larsen, kiu devas remi reen al la tero.

Evidente ili venis en alian boaton, kiu balanciĝas sur la ondoj, kvankam ĝi estas pli granda. Ili subeniras per ŝtupetaro en ian ejon, kie odoras tre intense de fiŝoj, dum ie apude denove ekbruas la motoro.

“Estas fiŝista barko”, flustras Panjo en lian orelon. “Nun memoru fari neniun sonon.”

Li kapjesas, premante ŝian manon. Li ekkomprenas ke necesas silenti, por ke la germanoj ne kaptu ilin.

Kiom daŭras la navigado tra la nokto? Eble horon, aŭ pli longe. La balanciĝado kaj la fiŝodoro naŭzas lin, sed li eltenas tion sen vomo. Ili ne rajtas eliri ekster la ejon, kiun Panjo nomas “holdo”. Malgraŭ la fetoro la motorbruo efikas dormige, sed Simon nur somnolas, kliniĝante al ŝia flanko. Li cerbumas, kio okazus, se la germanaj soldatoj trovus ilin. Antaŭe, en la pensiono, Jakob diris ke ili havas militŝipojn kun kanonoj. Ĉu ili mortigus ilin ĉiujn? Kion signifus morti? Ĉu li venus en alian mondon, kie estas Paĉjo?

Fine tamen la fiŝisto, kiu stiras la barkon, aperas dum momento por diri ke ili jam rajtas eliri.

“Ne plu necesas kaŝi vin. Ni jam estas sur sveda akvo.”

Ili ĉiuj grimpas supren por spiri freŝan aeron. La sveda akvo estas same nigra kiel la dana. Ĉu ankaŭ la aero estas sveda? Verŝajne jes, ĉar ĝi estas pli malvarma kaj odoras pli freŝe ol la kutima aero. Simon tremas pro ekscito, aŭ eble pro la malvarmo.

Antaŭ si li ekrimarkas pli malhelan randon super la akvo. Tio devas esti Svedio. Li gapas al ĝi por trovi ion, kio distingas ĝin de ĉiu alia nigro, sed trovas nenion specifan.

Post kelka tempo la barko malrapide glitas en etan havenon kaj al-bordiĝas. La fiŝisto helpas ilin elbarkiĝi kun siaj valizoj. Tuj poste li denove stiras la barkon foren, sendube reen al Danlando. Dume la familio hezite paŝas for de la kajo, portante sian malmultan bagaĝon. Simon mem portas sakon kun kelkaj libroj kaj ludiloj. Estas same mallume ĉi tie, kiel sur la dana strando. Li sopiras la lumon. Li volas jam eliĝi el la nigro.

Baldaŭ ili venas inter dormantajn domojn. Nenio aŭdiĝas; nenio moviĝas; krom ili kaj timema nigra kato, kiu ŝteliras tra barilo kaj foren.

“Kie ni estas?”, diras Avino en duba tono. “Ĉu fakte en Svedio?”

“Evidente”, diras Avo. “Rigardu, jen poŝkesto flava anstataŭ ruĝa. Do ne dubu. Baldaŭ mateniĝos. Restas nur sperti, kiel la svedoj akceptos nin, kiam ili vekigiĝos el sia trankvila dormado. Nu, ili estu feliĉaj ke venas nur ni kaj ne la germana armeo.”

Вторая премия
Категория начинающих

Найти дорогу

Ксения Кормыш
Россия

Сначала Васька Скоков увидел силуэт. Он был огромный, черный, словно вырезанный из бумаги, и стремительно надвигался из подворотни, вздрагивая и меняя свои очертания каждый раз, когда по бульвару проезжала машина и освещала арку фарами. Васька приподнялся на скамейке и напрягся. Лишние свидетели ему были совсем не нужны. Тревога оказалось ложной — зловещие очертания обернулись невысокой тоненькой девушкой в легком летнем плаще. Она шла, озираясь по сторонам, словно видела первый раз этот бульвар и этот двор.

Васька откинулся на спинку скамейки и расслабился. Эта девчонка ему не помеха. Да и вахта его на сегодня закончена. Уже третью ночь подряд угловые окна на третьем этаже оставались темными. Значит, профессор со своей семейкой отчалил надолго, что и было понятно по тому количеству чемоданов, которые они загружали в такси в пятницу. Но Скокарь потому и гулял который год на свободе, что не любил глупого риска и перестраховывался перед каждым делом. Он пас эту квартиру уже месяц, а последние два вечера просидел во дворе, лениво перелистывая страницы «Известий».

Скоков лениво потянулся, натянул поглубже на уши потрепанную кепку и поднялся со скамейки. Пора двигать отсюда, завтра можно будет приходиться уже на дело. Он направился в сторону подворотни и понял, что девушка так и стоит посередине двора. Худенькая, невысокая, в полумраке лица не разглядеть. Васька надеялся, что она его тоже не запомнит, поэтому взял правее, чтобы обогнуть девушку на расстоянии и нырнуть в арку.

— Простите, пожалуйста! — внезапно окликнула его девчонка.

Васька сделал вид, что не услышал, но девушка уже шагнула к нему и взяла за рукав.

— Простите, пожалуйста, — повторила она — Мне очень неудобно, но я заблудилась, и никак не могу найти дорогу. Тридцать восьмая больница далеко отсюда? Это же Садовая улица?

Скоков молча разглядывал это непредвиденную помеху. Светлые волосы заплетены в две растрепанные косы, на щеке маленькая родинка, цвет глаз не разобрать. Похожа на маленького взъерошенного воробья. Какой черт принес ее в полдвенадцатого ночи в чужой темный двор?

— Девушка, это не Садовая, а Петровский бульвар. До тридцать восьмой минут сорок пешком.

— Как сорок? — она совсем растерялась и, видимо от испуга, еще крепче сжала край Васькиного рукава.

Ваське стало смешно. Бывают же такие дуры, что ходят по ночам в одиночку и еще пристают к незнакомым парням. А потом заливаются слезами и катают заявки в отделении, что лишились колечек-сережек или ещё чего посущественнее.

— Куда вас понесло на ночь глядя? Да еще дороги не знаете.

— Ой, я вам сейчас всё объясню. Вы же на бульвар идете? Можно я с вами пока пройду, а то в темноте страшно. — Не дожидаясь ответа, девушка шагнула к арке, и Васька невольно подался за ней.

На бульваре было светлее, фонари рассеивали вокруг себя густую августовскую ночь и бросали желтые круглые пятна света на тротуары. Девушка остановилась на углу дома и посмотрела Скокову в лицо.

— Понимаете, мы с мамой недавно в этот район переехали, а раньше за железкой жили. Мама — медсестра, перевелась работать в тридцать восьмую, сегодня у нее дежурство. Она ужин себе собрала, но дома забыла, позвонила мне, чтобы я занесла.

В доказательство своих слов девушка протянула вперед небольшой бумажный сверток, который до этого прижимала к груди.

— Я из дома выскочила, а потом сообразила, что дороги толком не знаю. Вот и заплутала, хорошо, что на вас наткнулась.

Действительно повезло, подумал Скокарь. Он таких пичуг никогда не трогал, рук не марал. А другой кто мог и не побрезговать. Взять с нее, конечно, нечего — только на тонкой шее поблескивала серебряная цепочка. И не красотка, пройдешь — не оглянешься.

— Ладно, девушка, я вас понял. Вам вон туда — до перекрестка, потом направо.

Девушка стояла и почему-то не спешила двигаться к перекрестку.

— Молодой человек, а вам в какую сторону? — вдруг спросила она. Васька напрягся.

— Можно я вас попрошу? Если вы не очень торопитесь, вы могли бы меня проводить? Просто так темно...

Скоков застыл. Он, конечно, никуда не торопился, но связываться с незнакомыми девицами совсем не входило в его планы.

— Меня зовут Нина.

— Василий, — буркнул Скокарь.

— Вы, наверное, думаете, что я круглая дура, раз брожу по ночам одна? — Васька в принципе так и думал, поэтому неопределенно хмыкнул.

— Я часто к маме на дежурства захожу, ей скучно там одной. Просто в старом районе близко было, и места все знакомые. А сегодня мы с мамой договорились по привычке, она, наверное, тоже не поняла, что дорога совсем другая, сейчас ждет меня, волнуется. Я вас задерживаю, вас дома ждут?

— Не ждут, я один живу, — успокоил спутницу Скоков. — Так и быть, доведу вас до тридцать восьмой.

— Спасибо вам огромное. Мама часто говорит, что я слишком наивная, а мне кажется, что людям надо доверять. И просить о помощи тоже надо — если человек занят, то откажется, ну а вдруг поможет?

Васька никогда никого о помощи не просил, он знал, что рассчитывать можно только на себя и, в крайнем случае, на пару надежных пацанов.

Они прошли бульвар и свернули на широкий проспект, где даже в этот поздний час проезжали последние запоздавшие автомобили. Васька прикидывал, что у профессора есть «Москвич», сейчас мирно припаркованный во дворе. Если в квартире всё пройдет гладко и быстро, вполне можно будет напоследок вскрыть машину и отогнать в гаражи на окраине.

Нина шла рядом, постукивая каблучками.

— Вам не кажется, что ночью даже знакомые улицы выглядят совсем по-другому?

Скокарю так не казалось, потому что ориентироваться в темноте он давно привык, и вообще всегда мог даже с закрытыми глазами понять, где он находится и в какую сторону рвать когти.

— У нас, конечно, ночи северные, светлые. Вот на юге — сразу резко такая темень наступает. Вы бывали на юге, на море? — продолжала Нина.

— Нет, не бывал, — ответил Васька.

— Даже в детстве? А я маленькая один раз ездила, когда еще папа был жив. Мы в Алуште отдыхали. Я мало что запомнила, мне лет пять было. Ночь быстро наступала, и меня спать укладывали, а мне казалось, что еще рано. И помню виноград, который папа с рынка приносил.

Скокову тоже хотелось бы поделиться каким-то воспоминанием, но ничего светлого из его детдомовского детства не приходило в голову.

— Вы, значит, с мамой вдвоем?

— Папа утонул, десять лет назад, — ответила Нина. — Они в речке плавали, мальчик соседский стал тонуть. Папа его на берег вытолкнул, а сам выбраться не смог, затянуло.

Скоков не знал, что ответить. Соболезнования высказывать было поздно, а никакие другие слова в голову не приходили.

— Так мы с мамой и живем, — объясняла Нина. — Я в следующем году швейный техникум заканчиваю, работать пойду. Василий, а вы чем занимаетесь?

— Слесарь я, — не соврал Васька. У него действительно была корочка ПТУ, и своему умению вскрывать замки он

был обязан старому Семенычу, преподававшему слесарное дело.

— Это, наверное, очень интересно, в механизмах разбираться? А я вот хочу после техникума пойти в театр, в костюмерный цех. Там, конечно, конкурс большой, но у меня и эскизы уже собраны — я хорошо умею наряды придумывать. В спектакле ведь не только игра актеров важна, ещё и как они одеты, какой костюм, прическа...

Они свернули на Садовую улицу, и впереди засветился большой новый корпус тридцать восьмой больницы. Нина повеселела и прибавила шаг.

— Вася, может, вы со мной к маме зайдете? Просто ей так спокойнее будет, если она увидит, что я с провожатым.

Скоков молча кивнул и подумал, что впервые в жизни чьей-то матери будет спокойнее от его присутствия. Эта мысль вызвала у него странные противоречивые чувства, и он опять ничего не ответил Нине, просто пошел следом за ней к проходной.

Нинина мать оказалась очень молодой и такой же говорливой. Она радостно обняла Нину и стала сумбурно объяснять, что уже думала выходить навстречу, но с дежурства так просто не уйти, сегодня особенно сложный день, в реанимации сразу трое, и потом — она же не знала, где искать. Нина что-то отвечала невпопад и все время кивала в сторону Васьки, объясняя, что только благодаря ему она нашлась. Вася стоял в сторонке и изумленно наблюдал за бурными эмоциями женщин.

Встреча, к счастью, оказалась недолгой. Мать Нины сообразила, что теперь главное — это доставить дочь домой. Она посмотрела на Скокова и словно спросила его глазами — я могу вам доверять? Васька молча кивнул, подошел к Нине и взял ее за руку.

— Нам пора, Нина, до дома не меньше часа пешком.

Нина спокойно подчинилась, как будто с самого начала было понятно, что Васька проводит ее обратно. Она поцеловала еще раз на прощание мать и пошла за Скоковым.

«Дурные какие-то, они что, каждый раз так встречаются и прощаются?» — думал Скоков. Нина шла рядом, держалась за его руку, и молчала, что для Васьки было уже удивительно.

— Нина, скажи мне точный адрес. Я должен сообразить, как напрямую пройти.

— Липецкая, 43. Такие пятиэтажки новые, знаешь?

Скокарь знал, хотя не изучал этот район досконально. Липецкая улица его интересовала мало, в новых домах по ордерам получали жилплощадь учителя из соседней школы и такие же медработники, как Нинина мать. Чистить их нищие квартиры не было никакого смысла.

Нина снова замолчала, и они долго шли в тишине, сквозь теплую августовскую ночь, слушая шорохи шин редких автомобилей. На подходе к дому Нины стало ясно, что квартал действительно очень новый и приспособить его для пешеходов пока не успели. После перекрестка Липецкой со Смоленской тротуар резко оборвался огромной канавой, перейти через которую можно было только по небрежно перекинутым деревянным мосткам.

Нина бодро ступила на качающуюся доску, сделала шаг и тут же с легким ойканьем упала на Ваську.

— Кажется, каблук застрял, — прошептала она.

Скоков приподнял Нину и увидел, что ее правая нога провалилась между досками. Он наклонился, вынул Нину из щели и аккуратно поставил босыми ногами на газон. Нина тихо охала, но не мешала. После извлечения туфель из дощатого помоста стало ясно, что один каблук сломался под корень.

— Как же я дойду? — задумчиво спросила Нина.

Васька осмотрелся вокруг и понял, что они почти пришли. До желтой пятиэтажки с криво намалеванными четверкой и тройкой оставалось не больше двухсот метров.

— Горе ты моё луковое, — вздохнул Скоков. Он вспомнил, что так его маленького называла бабушка, когда после беготни по лужам промокали ноги и он приходил домой босой, прижимая ботинки к груди. Он впервые за много лет вдруг подумал

о бабушке. В детдоме, куда он попал после ее смерти, Васька упрятал такие воспоминания поглубже и старался не ворошить.

— Держись крепче, — приказал Васька, сунул Нине в руки туфли и подхватил ее на руки. Она опять ойкнула и доверчиво обхватила его за шею.

Скоков шел по газону, обходя кучи строительного мусора, и думал, что Нина легкая и он смог бы нести ее очень долго. Но глазомер его не подвел — двести метров резко окончились у крыльца дома.

Вася опустил Нину на ступеньки и вынул из ее рук туфли.

— Дальше босая дойдешь?

— Дойду, а туфли...

— Завтра почию и занесу, хорошо?

— Да, ой, спасибо. Восьмая квартира.

Скоков дождался, пока загорелось крайнее окно на втором этаже, и пошел обратно, перепрыгивая с доски на доску над извилистой канавой. Ему было легко и весело. Он размышлял о том, что в его богатом наборе слесарных инструментов обязательно найдутся клещи и небольшой молоток, чтобы приколотить каблук Нины.

Trovi la vojon

Ksenia Kormysh

Rusio

Komence, Vaska Skokov vidis la silueton. Ĝi estis grandega, nigra, kvazaŭ eltranĉita el papero. Ĝi rapide alproksimiĝis el la strateto, tremante kaj ŝanĝante siajn konturojn ĉiufoje kiam aŭtomobilo veturis laŭ la bulvardo kaj lumigis la arkadon per siaj reflektoroj. Vaska sidiĝis sur la benkon kaj streĉiĝis. Li ne bezonis pliajn atestantojn. La alarmo montriĝis falsa: la minacaj konturoj transformiĝis en malditan, maldikan junulinon vestitan de malpeza somera mantelo. Ŝi paŝis, ĉirkaŭrigardante, kvazaŭ vidinte la unuan fojon ĉi tiun bulvardon kaj ĉi tiun korton.

Vaska kliniĝis malantaŭen sur la benkon kaj malstreĉiĝis. Tiu knabino ne ĝenis lin. Jes, kaj lia kontrolado estas finita por hodiaŭ. Dum la tria nokto sinsekva, la fenestroj de la angulo de la dua etaĝo restis mallumaj. Tio signifis, ke la profesoro kaj lia familio forvojaĝis por longa tempo, kio evidentiĝis el la nombro da valizoj, kiujn ili ŝarĝis vendredon en taksion. Sed la kialo, kial Skokov restis libera dum pluraj jaroj, estis ke li ne ŝatis stultajn riskojn kaj estis ege singarda antaŭ ĉiu laboro. Li estis observinta ĉi tiun loĝejon dum monato, kaj la lastajn du vesperojn li sidis sur la korto, pigre turnante la paĝojn de “Izvestija”.

Skokov pigre etendiĝis, pli profunde tiris sian trivitan kaskedon super la orelojn kaj leviĝis de la benko. Estis tempo foriri de ĉi tie, morgaŭ li povos reveni por la afero. Li direktis sin al la strateto kaj rimarkis, ke la knabino ankoraŭ staras meze de la korto. Maldika, malgranda. En la duonlumo, la vizaĝo ne videblas. Vaska esperis, ke ankaŭ ŝi ne rememoros lin, do li flankeniĝis dekstren por distance ĉirkaŭiri la knabinon kaj plonĝis sub la arĉpordegon.

“Pardonu, mi petas!”, subite vokis la junulino.

Vaska ŝajnis ne aŭdi, sed la knabino jam paŝis al li kaj prenis lin je la maniko.

“Pardonu, mi petas”, ŝi ripetis. “Estas tre ĝene por mi, sed mi perdiĝis kaj ne trovas la vojon. Ĉu la tridek-oka hospitalo estas malproksima de ĉi tie? Ĉu ĉi tio estas la strato Sadovaja?”

Skokov silente ekzamenis tiun ĉi neantaŭviditan obstaklon. Blonda hararo estas plektita en du disvolvigitaj harplektaĵoj. Estas malgranda haŭtmakulo sur la vango, la koloron de la okuloj ne eblas distingigi. Ŝi aspektas kiel malgranda hirtpluma pasero. Kiu diablo alportis ŝin je la dudek-tria kaj duono en nekonatan malhelan korton?

“Fraŭlino, ĉi tio ne estas la strato Sadovaja, sed bulvarado Petrovskij. Ĝis la tridek-oka hospitalo vi bezonos kvardek minutojn piede.”

“Kiel... kvardek?” ŝi tute konfuziĝis kaj, ŝajne pro timo, eĉ pli forte premis la randon de la maniko de Vaska.

Vaska sentis sin amuzata. Estas tiaj malsaĝulinoj, kiuj promenas solaj nokte kaj ankoraŭ algluiĝas al nekonataj junuloj. Kaj poste ili iros plori kaj deponi plendon al la polica stacio, ke ili perdis ringojn, orelingojn aŭ ion alian ankoraŭ pli esencan.

“Kien vi iras nokte? Kaj vi eĉ ne konas la vojon.”

“Ho, mi klarigu al vi. Vi ja iras al la bulvarado, ĉu ne? Ĉu mi povas iri kun vi dum kelka tempo? Mi timas en la mallumo.” Ne atendente respondon, la junulino paŝis al la arĉpordego kaj Vaska nevole sekvis ŝin.

Sur la bulvarado estis pli da lumo. La stratlampoj dispersis ĉirkaŭ si la densan aŭgustan nokton kaj ĵetis flavajn rondajn lummakulojn sur la trotuarojn. La knabino haltis ĉe la angulo de la domo kaj rigardis Skokov en la vizaĝon.

“Vidu, mia patrino kaj mi lastatempe translokiĝis al ĉi tiu kvartalo, kaj antaŭe ni loĝis aliflanke de la fervojo. Panjo estas flegistino, ŝi estis alilokita por labori en la hospitalo tridek-oka, ŝi deĵoras hodiaŭ. Ŝi preparis por si vespermanĝon, sed forgesis ĝin hejme. Ŝi telefonis al mi por ke mi alportu ĝin.”

Por pravi siajn vortojn, la knabino montris malgrandan paperfaskon, kiun ŝi ĝis nun premis kontraŭ sia brusto.

“Mi elkuris el la domo, kaj rapide konstatis, ke mi ne vere konas la vojon. Do mi perdiĝis, sed feliĉe mi renkontis vin.”

Vere bonŝanca, pensis Skokov. Li neniam tuŝis tiajn birdetojn, li neniam malpurigis siajn manojn. Alia persono eble ne estus tiel delikata. Kompreneble, estis nenio por preni de ŝi. Nur arĝenta ĉeno brilis ĉirkaŭ ŝia maldika kolo. Kaj ne vere belulino: se oni pasus, ŝin oni ne retrorigardus.

“Bone, fraŭlino, mi komprenas vin. Vi devas iri tien ĝis la vojkruciĝo, poste dekstren.”

La knabino staris kaj ial ne hastis moviĝi al la vojkruciĝo.

“Juna sinjoro, kien vi iras?”, ŝi subite demandis. Vaska streĉiĝis.

“Ĉu mi rajtas peti de vi? Se vi havas tempon, ĉu vi povus akompani min? Estas tiel mallume...”

Skokov rigidiĝis. Kompreneble, li ne hastis ien, sed interagi kun nekonataj knabinoj tute ne estis parto de liaj planoj.

“Mi nomiĝas Nina.”

“Vasilij”, grumbletis Skokov.

“Vi verŝajne pensas, ke mi estas plena malsaĝulino, ĉar mi vagas nokte sola, ĉu?” Vaska fakte tiel pensis, do li malklare ridis.

“Mi ofte iras al mia patrino kiam ŝi deĵoras, ŝi enuas tie sola. Estis proksime en la antaŭa kvartalo, kaj ĉiuj lokoj estis konataj. Kaj hodiaŭ mia patrino kaj mi interkonsentis kiel kutime. Ankaŭ ŝi, verŝajne, ne konsciis, ke la vojo estas tute alia, nun ŝi atendas min, maltrankvila. Ĉu mi retenas vin, ĉu oni atendas vin hejme?”

“Mi ne estas atendata, mi loĝas sola”, trankviligis Skokov sian akompanantinon. “Bone, mi akompanu vin ĝis la tridek-oka.”

“Multan dankon. Panjo ofte diras, ke mi estas tro naiva, sed ŝajnas al mi, ke oni devas fidi homojn. Kaj oni ankaŭ devas kapabli peti helpon. Se la persono estas okupata, tiu rifuzos... aŭ eble helpos?”

Vaska neniam petis helpon de iu ajn. Li sciis, ke oni povas fidi nur sin mem kaj, en ekstremaj kazoj, kelkajn fidindajn knabojn.

Ili transiris la bulvardon kaj turnis sin sur larĝan avenueon, kie eĉ en tiu malfrua horo pasis la lastaj malfruj aŭtoj. Vaska pensis, ke la profesoro havas “Moskviĉ” aŭton, nun pace parkitan en la korto. Se ĉio iros glate kaj rapide en la apartamento, eblos fine malfermi la aŭton kaj forŝteli ĝin al garaĝoj en la periferio.

Nina marŝis apud li, frapante per la kalkanumoj.

“Ĉu vi ne opinias, ke eĉ konataj stratoj aspektas tute aliaj dum nokto?”

Ne ŝajnis tiel al Skokov, ĉar li jam delonge kutimis orientiĝi tra la mallumo, kaj ĝenerale li ĉiam povis diveni, eĉ kun okuloj fermitaj, kie li estas kaj en kiun direkton forfuĝi.

“Ĉe ni, kompreneble, la noktoj estas nordaj, helaj. Tie en la sudo, tuj tia mallumo akre eniras. Ĉu vi jam estis en la sudo, ĉe la maro?” , daŭrigis Nina.

“Ne, mi ne estis”, respondis Vaska.

“Eĉ dum infanaĝo? Mi unufoje veturis tien kiam mi estis pli juna kaj paĉjo ankoraŭ vivis. Ni ripozis en Aluŝto. Mi ne memoras multon, mi aĝis ĉirkaŭ kvin. La nokto rapide falis kaj oni enlitigis min por dormi, sed ŝajnis al mi, ke estis ankoraŭ frue. Kaj mi memoras la vinberojn, kiujn paĉjo alportis el la merkato.”

Skokov ankaŭ ŝatus kunhavigi kelkajn memorojn, sed nenio brila el lia orfeja infanaĝo venis al lia menso.

“Vi volas diri, ke vi vivas duope kun via patrino?”

“Paĉjo dronis, antaŭ dek jaroj”, respondis Nina. “Ili naĝis en la rivero, knabo de la najbaro komencis droni. Paĉjo sukcesis puŝi lin ĝis la bordo, sed li mem ne povis eliri, li estis ensuĉita de la akvo.”

Skokov ne sciis, kion respondi. Estis tro malfrue por esprimi kondolencon, kaj neniuj aliaj vortoj venis al lia menso.

“Tiel vivas mia patrino kaj mi”, klarigis Nina. “Mi diplomigis en kudrolernejo venontjare kaj iros labori. Vasilij, kio estas via profesio?”

“Mi estas seruristo.” Vaska ne mensogis. Li vere havis profesion lernejan diplomon kaj li ŝuldis sian kapablon dirkumi al la maljuna Semeniĉ, kiu instruis seruristan metion.

“Verŝajne estas tre interese kompreni la mekanismojn, ĉu ne? Miaflanke mi volas labori en teatro post la teknika lernejo, en la kostumejo. Kompreneble, tie estas granda konkurenco, sed mi jam kolektis skizojn, mi bone scias elpensi vestaĵojn. En spektaklo, ja gravas la aktorado, sed ankaŭ kiel ili estas vestitaj, kia kostumo, la hararango...”

Ili turnis sin al la strato Sadovaja kaj la granda nova konstruaĵo de la tridek-oka hospitalo brilis antaŭe. Nina iomete gajigis kaj plirapidigis siajn paŝojn.

“Vasja, ĉu eble vi venu kun mi al mia patrino? Ŝi simple sentos sin pli trankvila, se ŝi vidos, ke mi estas kun eskorto.”

Skokov silente kapjesis kaj pensis, ke unuafoje en la vivo ies patrino sentos sin pli trankvila pro lia ĉeesto. Tiu ĉi penso vekis en li strangajn konfliktajn sentojn, kaj denove li ne respondis al Nina, li simple sekvis ŝin al la enirejo.

La patrino de Nina estis sufiĉe junakaj samebabilema. Ŝi ĝoje ĉirkaŭbrakumis Ninan kaj komencis kaose klarigi, ke ŝi pensis eliri renkonti ŝin, sed ne estis tiel facile forlasi la deĵoron. Hodiaŭ estis aparte densa tago, kun tri homoj samtempe en la intenskurado, kaj poste, ŝi ja ne sciis kie serĉi sian filinon. Nina respondis sen tro cerbumi kaj la tutan tempon kapsignadis al Vaska, klarigante, ke nur dank’ al li ŝi estis trovinta la hospitalon. Vaska staris flanken kaj rigardis mirigite la fervorajn emociojn de la virinoj.

La renkonto, feliĉe, ne daŭris longe. La patrino de Nina komprenis, ke nun la ĉefa afero estas rekonduki ŝian filinon hejmen. Ŝi rigardis al Skokov kaj ŝajnis demandi lin per ŝiaj okuloj “Ĉu mi povas fidi vin?” Vaska silente kapjesis, iris al Nina kaj prenis ŝian manon.

“Ni iru, Nina, al la domo ni bezonos almenaŭ horon piede.”

Nina trankvile obeis, kvazaŭ estis klare de la komenco, ke Vaska akompanos ŝin reen. Ŝi denove kise ĝisis sian patrino kaj sekvis Skokov.

“Stranguloj, ĉu ili ĉi tiel renkontiĝas kaj salutas sin ĉiufoje?”, pensis Skokov. Nina marŝis apud li, tenante lian manon, kaj silentis, kio jam estis en si mem mirinda por Vaska.

“Nina, diru al mi la precizan adreson. Mi devas eltrovi kiel iri rekte.”

“Lipetskaja, 43. Tiujn novajn kvinetaĝajn konstruaĵojn, ĉu vi konas?”

Skokov konis, kvankam li ne studis la kvartalon detalprofunde. Lipetskaja strato malmulte interesis lin. En la novaj konstruaĵoj, instruistoj el la apuda lernejo kaj kuracistoj, samaj kiel la patrino de Nina, ricevis loĝspacon laŭ ordonoj. Ne havis sencon purigi iliajn malriĉajn apartamentojn.

Nina denove silentis, kaj ili longe marŝis silente, tra la varma aŭgusta nokto, aŭskultante la susuradon de pneŭoj de maloftaj aŭtoj. Alproksimiĝante al la domo de Nina evidentiĝis, ke la kvartalo estas efektive tre nova kaj oni ankoraŭ ne finadaptis ĝin por piedirantoj. Post la vojkruciĝo de Lipetskaja kaj Smolenskaja, la trotuaro abrupte finiĝis en grandega fosaĵo, kiun oni nur povis trairi sur senzorge ĵetitaj lignaj pastabuloj.

Nina vikle paŝis sur la balanciĝanta tabulo, faris paŝon kaj tuj falis sur Vaskan kun eta ĝemo.

“Ŝajnas, ke la kalkanumo blokiĝis”, ŝi flustris.

Skokov levis Ninan kaj vidis, ke ŝia dekstra piedo estis glitinta inter la tabulojn. Li kliniĝis, elprenis Ninan el la breĉo kaj milde metis ŝiajn nudajn piedojn sur la gazonon. Nina mallaŭte ĝemis, sed ne malhelpis. Post la eligo de la ŝuoj de la tabulplatformo, evidentiĝis, ke unu kalkanumo rompiĝis ĉe la plandumo.

“Kiel mi povos atingi mian hejmon?”, demandis Nina penseme.

Vaska ĉirkaŭrigardis kaj konstatis, ke ili preskaŭ alvenis. Restis ne pli ol ducent metroj ĝis la flava kvinetaĝa konstruaĵo kun kurbe pentritaj 4 kaj 3.

“Ve al vi, mia cepo”, suspiris Skokov. Li rememoris, ke lia avino nomis lin tiel dum infanaĝo, kiam kurinte tra la flakoj, liaj piedoj malsekiĝis kaj li venis hejmen nudpieda, premante siajn ŝuojn kontraŭ sia brusto. Li unuafoje post multaj jaroj subite repensis pri sia avino. En la orfejo, kien li eniris post ŝia morto, Vaska kaŝis tiajn rememorojn pli profunden kaj klopodis ne ilin kirli.

“Teniĝu firme”, ordonis Vaska. Li ŝovis ŝuojn en la manojn de Nina kaj prenis ŝin en siajn brakojn. Ŝi denove anhelis kaj konfide ĉirkaŭprenis lian kolon.

Skokov marŝis sur la herbobedo, evitante amasojn da konstru-rubaĵoj, kaj pensis, ke Nina estas malpeza kaj li povus porti ŝin tre longtempe. Sed lia okulmezurilo ne perfidis lin: la ducent metroj abrupte finiĝis ĉe la sojlo de la domo.

Vaska mallevis Ninan sur la ŝtupojn kaj reprenis la ŝuojn el ŝiaj manoj.

“Ĉu vi kapablos nudpiede pluiri?”

“Mi iros, sed la ŝuoj...”

“Mi riparos ilin morgaŭ kaj realportos ilin, ĉu bone?”

“Jes, ho, dankon. La oka apartamento.”

Skokov atendis, ke la lasta fenestro de la dua etaĝo eklumiĝu, kaj reiris, saltante de tabulo al tabulo super la sinueca fosaĵo. Li sentis sin malpeza kaj gaja. Li pensis, ke en lia abunda kolekto de seruristaj iloj, certe troviĝos tenajloj kaj malgranda martelo por ripari la kalkanumon de Nina.

*Unua premio
Sperta kategorio*

La babaŝa preĝkolĉeno

Jorge Rafael Nogueras

Portoriko

Iu frapis je la pordo de la dormoĉambro.

“Ĉu ni rajtas eniri, Panjo?”, susuris ekstere du etaj voĉoj, ĥore.

Klaŭdia ĝis tiam trankvile legis enlite apud la edzo, kiu daŭre dormis; eĉ ne la tri hundetoj kiuj ronkis en la angulo ŝajnis vekigi. Ŝi suspiris, kaj respondis: “Nu, en ordo... envenu.”

La pordo malfermiĝis kviete, kaj envenis knabo kaj knabino, kiuj lerte surgrimpis la liton je la patrino flanko, neniel ĝenante la patron aŭ la hundojn.

“Mi ne povas bone dormi, Panjo”, plendis la brunharulineto.

“Ankaŭ mi ne”, konsentis la knabo. “Ĉu vi povas rakonti al ni unu el viaj historioj de la Antaŭaj Tempoj?” li demandis, celante la tempon antaŭ la Trijara Milito, kiam, laŭ la patrino, “la tuta lando ŝajne freneziĝis de unu tago al la alia.”

“Jes!”, vigliĝis la etulino. “Kio pri la rakonto pri kiel vi ekhavis niajn hundojn, malgraŭ tio, ke vi ne volis havi dorlotbestojn?”, ŝi demandis, fingromontrante al la eta monto de tri vilaj estaĵoj en la angulo, kies kapetoj apenaŭ vidiĝis sub verda litotuko.

“Jes! Tiun, tiun!”, tutkore konsentis ŝia frato.

La patrino denove suspiris, sed ridetante diris: “En ordo... Sed ni ne parolu tro laŭte, kaj poste vi tuj enlitiĝos, ĉu konsentite?” La du infanoj kapjesis sincere, kaj ŝi komencis rakonti jene (nu, eble ne laŭvorte...).

En la Antaŭaj Tempoj mi estis fraŭlino – tio signifas, ke mi ankoraŭ ne konis Paĉjon – kaj mi loĝis sola en eta apartamento. La Trijara Milito ankoraŭ ne estiĝis, sed nia lando jam komencis iom post iom freneziĝi.

Kiel mi klarigu? Nu, iuj homoj kredis – mi eĉ ne povas kompreni kial! – ke kelkaj homoj en la lando, nomataj *babaŝoj*, valoris malpli ol

aliaj; ke ili venigis ĉiun malbonon; kaj ke ili estas nedezireblaj kaj forpelendaj. Kia malsaĝaĵo! Sed tamen, estis tiel.

Kaj la plej malbona afero estis tio, ke la prezidanto – la homo kiu regis la landon kaj supozeble volis, ke ĉiu loĝanto estu sekura – estis unu el tiuj homoj. Do, ajna persono kiu aŭ laŭ deveno estis babaŝo mem, aŭ eĉ havis ligojn kun babaŝoj, povus esti subite arestita senkiale kaj malaperigita kiu scias kien. Terure, ĉu ne?

Do, iun vesperon mi entrajniĝis por iri de la ĉefurbo al la vilaĝo kie loĝis iuj el miaj familianoj, ĉar tie estis ĝenerale pli sekure. Ĉar vidu, mi mem ne estas babaŝo, nek mia familio; sed Oĥalka, la virino kiu prizorgis min kiam mi estis infano, ja estis babaŝo.

Mi tre ege amis Oĥalkan, kvazaŭ ŝi estus mia propra patrino: mi lernis junaĝe, ke la amo, same kiel ĉio valora en ni, ne venas en la sango, sed en la spirito. Miaj familianoj timis, ke se homoj en la urbo ekscius pri ŝi, mi povus esti arestita, do ili sendis al mi trajnbileton por nokta trajno kiu venigos min ĉe ilin.

Mi havis kun mi ununuran valizon, kaj pro tio, ke mi vojaĝis sola, mi serĉis kupeon kiun mi povus dividi kun alia virino. Kiam la trajno jam komencis lante forlasi la stacion, mi trovis kupeon en kiu sidis virino pli-malpli miaaĝa, do mi malfermis la pordon, salutis kaj eniris.

Sidiĝinte, mi rimarkis ke sur la planko, inter la du vizaĝ-al-vizaĝaj benkoj, kuŝis granda korbo en kiu, sub verda litotuko, mi povis vidi tri dormantajn kapetojn – kiujn vi bone konas! – kio videble surprizis min.

“Ho, mi bedaŭras”, diris la virino. “Ili ne ĝenos vin, mi esperas...?”

“Ne, kvankam mi vere ne ŝatas dorlotbestojn”, mi respondis facile kaj senpripense, kiel mi sendube jam respondis multajn fojojn antaŭe. La virino malfermis la okulojn, verŝajne surprizita aŭ eĉ ofendita, kaj mi rapide senkulpigis min: “Ho, pardonon! Mi kompreneble havas nemon kontraŭ ili! Mi simple mem ne aparte...”

“Ne zorgu, ne zorgu”, la virino ridetis kaj trankviligis min per manĝesto. “Mi komprenas: ili ja estas bruaj kaj malpurigaj; ne ĉiuj volas tioman respondecon.”

Mi ridetis mem, kaj etendis mian manon, preta forlasi la temon: “Mi estas Klaŭdia.”

“Kaj mi Ĥe-Ĵulia”, ŝi diris, rapide memkorektante sin, kaj premis mian manon. “Kien vi iras ĉi-nokte?”, ŝi rapide demandis.

“Ĝis Lozebo, kie loĝas la familio de mia patro.”

“Ha, tre bela loko! Mi iam vizitis ĝin en mia junaĝo. Mi memoras, ke estas rivero kun tre bela kajo kun apudaj budetoj, kie oni vendas manĝaĵojn, trinkaĵojn, kaj homoj ludas muzikon vespere.”

“Jes, prave! Ĝi nomiĝas la Dektraba Kajo!”, mi aldonis ekscitite. “Mi havas tiom da belegaj memoraĵoj pri ĝi, kiam mi somerumis en Lozebo. Kia koincido! Kiam vi pasigis tempon tie?”

“Ho, mi ne memoras ekzakte pri kiu jaro temis. Mi tamen certe ne pasigis multe da tempo tie: mia familio transloĝiĝis multon kiam mi estis knabino.” Ŝi haltigis sin, kvazaŭ ŝi volus diri ion pli prie, sed anstataŭe ŝi ŝanĝis la temon. “Estas bone, ke vi eniris mian kupeon! Estas iom timige vojaĝi sola kiel neakompanata virino, aparte nuntempe.”

“Jes, prave! Mi konfesu, ke tial mi decidis sidiĝi ĉi tien kun vi.”

Mi kliniĝis antaŭen por meti mian valizon sub mian benkon, kaj tiam Ĵulia diris ion, kio frostigis mian sangon: “Ĉu... ĉu tio estas babaŝa preĝkolĉeno?”

Ŝi demandis tiel malaltvoĉe, tiel flustre, ke mi scivolis, ĉu mi imagis la demandon, sed ajnokaze mi ne povis ne instinkte meti la manon sur la kolon por ekscii ĉu vere mi surhavis mian kolĉenon; trovinte ĝin tie, mi kaŝis ĝin kiel eble plej rapide sub mian bluzon.

Mi rektiĝis en la seĝo kaj klarigis tuj, serioze kaj aferece: “Mi ne scias pri kio vi parolas, fraŭlino: mi ne estas babaŝo.”

Infanoj, komprenu, ke nun mi hontas pri tia reago. Sed memoru, ke tiuepoke oni povus esti facile subaŭskultita kaj denuncita – tio signifas, akuzita – al la polico. Jen mi, kiu postlasis mian vivon por eskapi ĝuste ĉi tiajn akuzojn, kaj subite alfrontis ilin en la buŝo de fremdulo.

“Mi komprenas”, ŝi diris post nelonge, sentinte mian malkomforton. “Eble mi eraris: mi pardonpetas.”

Mi simple kapjesis, rigardis flanken, kaj laŭte silentis el mia duono de la kupeo.

“Ĉu vi estas preĝema?”, ŝi subite demandis al mi el nenie, kvazaŭ tio estus tute normala demando por fari al nekonato.

Mi rigardis ŝin iom malcerte, sed mi ne povis mensogi: “Nu, jes...”

“Kiam mi estis infano, mia avino instruis al mi mallongan preĝon, kiun mi eĉ hodiaŭ uzas kiam mi sentas min sola. Ĝi jenas: ‘Estu benataj miaj antaŭuloj, kiuj naskis min, por ke mi vivu; estu benataj miaj samtempuloj, kiuj edukas min, por ke mi floru; kaj estu benataj miaj posteuloj, kiuj memoros min, por ke mi daŭru.’ Bele, ĉu ne?”

Mi sentis grandan frostotremon kaj ne sciis tuj kion respondi. Mi kompreneble tute bone rekonis tiun babaŝan preĝon: temis pri tiu, kiun Oĥalka instruis al mi kiam mi estis tre juna; tiu, kiun ni kunpreĝis ĉiunokte kiam mia patrino kuŝis malsana dum jaroj; tiu, kiun la tuta familiano preĝis super ŝia ĉerko kiam ŝi mortis. Kaj tiam, kiel jama plenkreskulo, mi ankoraŭ mallaŭte preĝis ĝin antaŭ ol enlitiĝi, uzante la babaŝan preĝkolĉenon kiun Oĥalka donacis al mi. Eble tial mi ankoraŭ surhavis ĝin: mi preĝis tiun vesperon antaŭ ol foriri, kaj forgesis demeti ĝin kaj kaŝi ĝin en mian valizon.

Mi ekkonsciis al kia danĝero mia kunkupeanino metis sin: kvankam la Preĝo de Dankemo ne estas vaste konata ekster la babaŝa komunumo, mi neniel dubis, ke aliaj *bilĥoj* – alivorte, homoj kiuj ne estas babaŝoj – konas ĝin, kaj povus uzi ĝin kiel kaptilon. Do, la fakto, ke Ĵulia malferme konfesis, ke ŝia avino instruis ĝin al ŝi, estis mem tre danĝera por ŝi.

“Do vi... vi estas babaŝo...?”, mi demandis, malcerte.

“La bona Dio tiel benis min”, ŝi respondis, laŭ la tradicia diraĵo. “Tial mi povas bone rekoni preĝkolĉenojn...”

Mi instinkte denove kovris la kolon per la mano, sed poste mi senstreĉiĝis kaj mallevis ĝin. “Mi... mi tamen ne mensogis al vi: mi ne estas babaŝo...”

“Kaj la kolĉeno...?”

“Iu al mi tre kara donacis ĝin al mi”, mi replikis simple, kaj ĵetis rapidan rigardon al la pordo por certiĝi, ke ĝi estas bone fermita, kaj ke neniuj gvatas aŭ subaŭskultas de ekstere. “Sed mi ne estas babaŝo.”

“En ordo, en ordo”, ŝi diris, kvietige. “La bona Dio ne tiel benis ĉiujn, mi supozas”, ŝi aldonis, kun iom petola, konspira rideto.

Mi tuj sentis kreskantajn admiron al ĉi tiu fremdulino, kiu tiel kuraĝe kaj fiere senvaligis sin antaŭ nekonato, eble koste de la propra vivo. Eble ŝi intuciis ion en mi, kio inspiris en ŝi konfidon kaj sekurecon.

“Do, sendube vi volos iom dormi”, ŝi diris. “Mi ne detenu vin. Kaj ne zorgu: ankaŭ miaj bestetoj silentos kaj dormos almenaŭ unu plian horon.”

Mi ridetis, danka pro la komplezo, kaj fermis la okulojn por kelkaj minutoj. Mi sentis la vagonaron malrapidiĝi pli kaj pli – sendube ni jam atingis la venontan haltejon – kaj poste mi aŭdis ŝin diri al si, laŭ maniero kiu glaciigis mian koron: “Ho ve... Ili trovis min...”

Ŝi estis rigardanta eksteren tra la fenestro de la kupeo en la malluman peronon de la haltejo, kaj sekvante ŝiajn okulojn mi vidis aron da policanoj kiuj montris foton al la konduktoro, kiu fingromontris niadirekten.

Julia kaj mi rigardis unu la alian, teruritaj, dum ni aŭdis en la foro pezajn botojn surirantajn la ŝtuparon de nia vagono, kiuj alproksimiĝis nehaltigeble.

“Klaŭdia”, ŝi diris, rigardante min rekte en la okulojn. “Ne zorgu: ili serĉas nur min, ne vin. Mi diros nenion.” Poste, ŝi ĵetis rigardon malsupren al la tri estaĵoj kiuj ankoraŭ pace dormis en la korbo, feliĉe senciaj pri la teruraĵoj kiujn homoj faras unuj al la aliaj, kaj ŝiaj okuloj ekpleniĝis je larmoj kiam ŝi diris: “Mi scias, ke mi havas nenian rajton peti ĉi tion al vi, sed... Ĉu vi bonvolus prizorgi ilin? Vi scias, ke kien mi iras, ili certe...”

“Jes, jes, kompreneble”, mi konsentis, preta iel ajn helpi tiun fremdulinon kiu ial, post tiom malmulte da tempo, vekis en mi korinklinon kaj respekton.

La pordo de la kupeo knaris grince kiam alta policano, sekvata de aliaj du, ŝovis ĝin flanken. Li rigardis rekte al Julia kaj diris: “Ĥelka Vehalik. Vi venos kun mi.” Lia elparolo estis neŝancelebla: ne temis pri ordono, sed simpla deklaro pri la faktoj.

Ŝi stariĝis malrapide, malcerte; li bruske ekkaptis ŝian brakon kaj suprentiris ŝin. Nur tiam li ŝajnis rimarki mian ĉeeston, kaj ankoraŭ rigardante Julian – nu, Ĥelkan – demandis al ŝi: “Ĉu via kunulino?”

Ĥelka sen ajna malcerteco sputis kun rikano: “Tiu abomena *bilĥo*? Pa! Ŝi pasigis la tutan tempon parolante pri kiel la lando estos denove glora nur kiam ĉiu babaŝo estos for.”

“Kaj tiuj?”, la policano demandis, gestante per la kapo al la korbo.

“Ili estas miaj”, mi rapide aldonis, stariĝante. “Kaj se vi volos fari al mi komplezon, oficiro, ju pli rapide vi forprenos tiun malpuran *ba-baĉon* de ĉi tie, des pli bone!”

Miaj vortoj pikis mian koron: mi tuj malamis min pro tio, ke mi povis eĉ elbuŝigi ilin, eĉ se ili nepris. Hontigite, mi esploris la reagon de Ĥelka; anstataŭ malamon, mi trovis en ŝiaj okuloj komprenemon kaj dankemon.

“Viajn dokumentojn”, la policisto diris al mi, finfine rigardante min en la okulojn; denove, ne temis pri peto.

Mi genuiĝis por trovi mian identigilon en la valizo – singarda neniel vidigi la kolĉenon kiun mi ankoraŭ surhavis – kaj donis la plurpaĝan dokumenton al li. Li studis mian foton en la unua paĝo, studis mian vizaĝon, kontrolis kelkajn postajn paĝojn, kaj senzorge ĵetis la identigilon sur mian benkon.

“Ni iru”, li diris simple al siaj kunuloj, kaj malĝentile tiris Ĥelkan malantaŭ si. Mi aŭdis la samajn bruajn botojn malsupreniri laŭ la ŝtuparo de la vagono, kaj tra la fenestro de la kupeo mi vidis la policianojn trenantajn ŝin trairi la kajon kaj malaperi en la noktan mallumon. Ŝi ne rerigardis, kaj mi neniam vidis ŝin denove.

Kaj jen kiel mi, kiu ĉiam diris, ke mi ne volas havi dorlotbestojn, finfine ekhavis tri samtempe!

Finaŭskultinte la rakonton, la knabino demandis: “Kio okazis poste al Ĥelka?”

“Mi ne scias, karulino. Espereble nenio malbona.”

Subite, alia knabo envenis la ĉambron. “Panjo, mi ne povas dormi: ĉu vi povas...?”

“Ne, ne!”, diris Klaŭdia, afable forpelante la tri sepjarulojn el la ĉambro. “Malfruas jam: enlitiĝu! Diru viajn preĝojn kaj mi iros kisi vin poste.”

Kiam la trinaskitoj foriris senproteste, la patro demandis mallaŭte: “Kiam vi finfine diros al ili, ke en la korbo ne estis tri hundoj, sed...”

“Ankoraŭ ne”, diris la patrino. “Ankoraŭ ne...”

*Quarto premio
Categoria esperti*

Viaggio al termine della notte

Luigi Guicciardi

Italia

Mi chiamo Paolo, e faccio il tassista: part time, abusivamente, per pagarmi l'università. Qui a Modena, specie nel mio quartiere, molti lo sanno e, col passaparola, mi cercano per qualche servizio, con lo sconto. Per questo non mi sono stupito quando, stamattina, sono stato contattato per un viaggio da fare questa notte stessa, il tre gennaio: devo accompagnare il professor Gualtieri a Cavalese, a casa di Diego Grimaldi.

So chi sono, tutti e due. Il primo ora è in pensione, ma per molti anni ha insegnato matematica al liceo che io stesso ho frequentato. Il secondo, invece, gestiva in periferia una discarica di rifiuti, che poi era riuscito a trasformare in inceneritore; ma tutti sapevano che il grosso delle sue ricchezze gli veniva dall'usura. Per tanto tempo aveva prestato soldi a strozzo, poi all'improvviso se n'era andato a stare nel Trentino, cambiando casa e regione.

Immagino il motivo di questo viaggio: per età e problemi di vista, il professore non è uomo che guidi volentieri, e inoltre non se la passa bene economicamente. Deve aver speso molto, pare, per sostenere la carriera artistica dell'unica figlia, Carla, nel mondo dello spettacolo. Carla Gualtieri, sì, avviata a una discreta popolarità col nome d'arte di Adela Campos, nella soap tutta nostrana *Guerra di cuori*. E Grimaldi, sappiamo tutti il mestiere che faceva...

Lo vado a prendere al suo indirizzo, e lui mi aspetta lì, puntuale, sotto casa. Così, partiamo. Prendo l'autostrada da Campogalliano intorno a mezzanotte. Sarà un viaggio tranquillo, penso: di notte, sulla A22, in direzione Brennero. Per i primi chilometri, fino a Carpi, nessuno di noi parla. Lo guardo di sfuggita. È basso, ma robusto e con tanti capelli, tutti bianchi, e un viso quadrato, pallidissimo. I suoi capelli sono cresciuti molto dall'ultima volta che l'ho visto. Sono crespi e tesi all'indietro, come attirati da un campo magnetico.

“Mi ricordo che vi conoscevate, lei e Grimaldi” comincio, “eravate vicini di casa. E le vostre due figlie si frequentavano, erano figlie uniche tutt’è due, no? Poi sono cresciute e le loro strade si sono divise. La sua, Carla, è diventata un’attrice, l’altra è andata in America a studiare...”

“Quante cose sai, Paolo.”

“Eravamo quasi coetanei, e loro erano bellissime. Sua figlia, specialmente. L’abbiamo ammirata in tanti, sa, quando faceva *Guerra di cuori* in TV...”

A un tratto arrossisco, a disagio. E intuisco che anche lui è imbarazzato. Perché mi sono ricordato in ritardo che il personaggio di Adela Campos non c’è più, è stato fatto morire, e Carla è uscita dalla soap ed è tornata a casa, proprio mentre sembrava avviata a una bella carriera...

Intanto siamo arrivati a Pegognaga. La prossima indicazione sarà Mantova. Il traffico è scarso, come previsto. Mi schiarisco la voce:

“Se continua così, arriveremo un po’ prima. Sicuro che la stia aspettando?”

Annuisce. “Gli ho detto che avrei accettato un tasso d’interesse molto alto. E per garanzia un’ipoteca sulla mia casa di Modena. Per questo sono sicuro.”

La voce, adesso, è piuttosto dura, lo sguardo senza sorriso. E io mi concentro sulla guida. Mantova, Nogarole Rocca, Verona Nord. I chilometri scivolano via, come le luci dei fari delle poche auto che ci sorpassano. Intanto penso all’uomo da cui stiamo andando.

“Lo conosci, Grimaldi?” mi chiede, a un tratto, quasi mi abbia letto nel pensiero.

“Solo di vista. Mio padre, però, me ne parlava.”

“E cosa diceva?”

“Che era un brutto grugno, una mezza sega, ma molto pericoloso. Nessuno aveva mai tentato di fregarlo, e nessuno poteva pensare di andarsene coi suoi soldi, in debito con lui. L’avrebbe ritrovato anche se fosse ritornato nella pancia di sua madre.”

“Ah, diceva così?”

Ha una voce sommessa, un poco aspra. E io voglio che parli, ancora, per spezzare quel silenzio insopportabile, scalfito solo dal fruscio delle gomme e dal flebile ronzio del riscaldamento.

“Siamo già al lago di Garda” gli dico. E mentalmente: Affi, Ala Avio, Rovereto, i prossimi cartelli. Poi azzardo: “Come sta sua figlia?”

“Vuoi proprio saperlo?”

“Mi è sempre piaciuta.”

“Ha la sclerosi multipla.”

Per un attimo mi manca il respiro. Non so che cosa dire. Parla lui, invece, quasi automaticamente, mentre dentro gli monta un furore freddo, sordo.

“Le è stata diagnosticata in agosto. E la crisi più recente, un mese fa. Diplopia e intorpidimento delle gambe.”

Continuo a tacere, e a guardare davanti a me, oltre il parabrezza. Prossima uscita, Trento Sud. Il riscaldamento è troppo alto, probabilmente, perché mi sento rosso in faccia, e sudo.

“*Vuoi sapere come mi sento?* m’ha detto proprio ieri. Ce l’aveva pronto, il monologo. Un grumo di parole a premerle in petto. Dal giorno della diagnosi allo scoccare di ogni ora, vi aveva aggiunto qualcosa. Se l’era lasciato crescere nel profondo, frase dopo frase. E ieri voleva liberarsene, dividerlo con me.”

Deglutisce, prende fiato. E dopo:

“Lo scorso luglio, una mattina è scesa dal letto e le gambe le hanno ceduto. Poi ha cominciato a vederci doppio, non riusciva a leggere il copione. Credeva fosse solo un po’ di stanchezza. Il suo medico le rivolse tante domande, le fece esami, la mandò da specialisti, neurologi, cardiologi, però nessuno sembrava avere una diagnosi certa. Finché una mattina, mentre girava una scena, le gambe le s’intorpidirono di nuovo, e stavolta anche le mani. Crollò a terra terrorizzata, ma il medico sembrò quasi sollevato, perché finalmente poteva dare un nome al suo problema.”

Trento Centro, Trento Nord, intanto. Guido in automatico, la gola secca, il cuore gonfio di pena. Perché mi sembra d’averla davanti, adesso. Carla. Il primo amore di ragazzino.

“*Hai la sclerosi multipla, disse, ma non morirai e non sei contagiosa.* Credeva di consolarla, e invece lei provò l’istinto di ucciderlo. Il giorno dopo lo disse al produttore, che riunì gli autori e insieme decisero di inserire una bella malattia nella soap. E fu così che Adela Campos morì di cancro. E a Carla restò solo la rabbia. Pura e semplice rabbia.”

“È per lei, allora, che sta andando da Grimaldi? Per pagarle le cure?”

“Cominciò a odiare i dottori” continua, senza ascoltarmi, “incapaci di capire a cosa era dovuta questa sua condizione. Questa cosa che è in lei, ma non è in lei. Che sta riscrivendo le leggi del suo organismo senza consultarla, che la sta portando a odiare il suo stesso corpo, e a temerlo.”

Abbiamo superato San Michele-Mezzacorona, intanto, e siamo già a Ora. È lì che dobbiamo uscire. Adesso prendo la statale 48, la Strada delle Dolomiti, supero quattro tornanti, entro nel paesino di Montan e passo per una frazione dal doppio nome, Fontanefredde e Kaltenbrunn. Dall'uscita dall'autostrada, avremo incrociato sì e no cinque macchine.

“Dicono che le cause della sclerosi sono tante, ma quelle precise sono ancora un mistero.” Una pausa. “Ma non nel mio caso, nel caso di Carla...”

Di colpo ho un sospetto. Tremendo. Proprio sotto un cartello, San Lugano. Rallento, un occhio alla strada e l'altro a lui, di profilo.

“È stato Grimaldi. Quando ha smesso di seppellire i rifiuti tossici nella sua discarica, ma ha cominciato a bruciarli. Ho pagato un tecnico, che mi spiegasse. Il suo inceneritore non era assolutamente attrezzato per eliminare sostanze tossiche in modo sicuro.”

“E questo ha scatenato la sclerosi...”

“...in persone geneticamente vulnerabili. Ed ecco le conseguenze, per più di uno che abitava vicino alla discarica: sclerosi multipla, ma non solo. Leucemia, cancro, malattie del fegato...”

Sono scosso, sudato, mentre supero il passo di San Lugano, e attraverso una galleria.

“Fermati” mi dice. “Non andiamo a Cavalese.”

“Perché?”

“Quel porco non abita là. Sta in una villa che è quasi un fortino. Isolata, fuori mano. Prima di Calvello, che è un campeggio, da queste parti. E che è vuoto, d'inverno” aggiunge.

Metto il navigatore. Dopo appena un chilometro c'è una frazione, Cela, e un incrocio, con un'indicazione a sinistra per il Villaggio Veronza. Lascio la statale 48 e salgo per la provinciale 126, rischiarata solo dai nostri fari, che costeggia il dosso Veronza e dovrebbe portarci al campeggio.

“Va’ piano, eh...”

La strada non ha illuminazione; ai lati dell’auto intuisco, nel buio, larici e pini. Finalmente vedo un cartello giallo, col simbolo di una tenda. Proseguo su una strada che è ancora asfaltata, ma sempre più stretta.

Finalmente un cartello, grande, *Località Calvello*, e dritta davanti a noi una sterrata, affiancata da cataste di tronchi segati. E la villa è lì, proprio nel mezzo. Spengo il motore e ci fermiamo a guardarla. È nuova di zecca, a due piani, con un impianto di videosorveglianza.

Tutto è spento, dentro. Davanti alla villa si intravede un prato, un bosco e una specie di radura che le piogge dell’inverno hanno riempito d’acqua. L’acqua è buia, per via dell’ora, ma anche di giorno il sole deve penetrare lì solo quando è molto alto, e le ombre degli alberi devono riflettersi a stento, e nugoli di moscerini levarsi in volo, d’estate, come un soffio di fumo di pipa.

Adesso Gualtieri prende fuori il cellulare e fa un numero. Deve attendere a lungo, poi sente una voce raspante di sonno. “Chi è?”

“Gualtieri. T’eri scordato?” dice lui, tutto vuoto dentro, e secco, arido come un deserto.

“Va bene.” Chiude.

“Dormiva, forse. Ma fra poco dormirà per sempre.” Apre la portiera. “Tu aspettami qui.”

Non dico niente, non posso dire niente. Perché gli ho visto in mano una pistola piccola: una calibro 22, probabilmente. Si allontana, mentre nella casa s’è accesa una luce.

Dentro, non è la rivoltella che fa paura in lui, è la voce, eppure lui non urla.

“Non sono qui per i tuoi soldi, ma per Carla. Ha la sclerosi per colpa tua, e non guarirà più. Tu lo sapevi... Eh, rispondi! Lo sapevi?”

L’altro tace e guarda il niente, con occhi che sembrano bottoni, non occhi. Finché lo afferrano i brividi. “Non ammazzarmi.”

“Vieni qui, schifezza.”

L’uomo si avvicina e lui gli sputa in faccia e con la canna della pistola gli fa un cenno imperioso. “No, non ti asciughi, te lo tieni in faccia, se è una faccia, insieme con quest’altro”, e gli sputa ancora, mirando agli

occhi; poi, sempre agitando la canna: “Siediti lì, bravo, che devo parlarti... No, ti ho detto di non pulirti, il mio sputo è molto più pulito del tuo viso.” Posa l’arma sul tavolo e scuote il capo. “Non farti illusioni, anche se non ho la rivoltella in mano sei morto.” All’improvviso gli dà uno schiaffo, e subito quello abbassa la testa. “Non ho voglia di ammazzarti prima del tempo, sta’ zitto, finché sei vivo hai speranza, ma se ti sparo subito è finita” mormora. “Carla aveva una vita da vivere, la salute, il successo, e ora... La tua invece, coi tuoi sporchi soldi, è a studiare in America, e fa la bella vita...”

“Mia figlia ha il cancro.”

C’è un silenzio improvviso, teso. “Che cosa?”

“Non è in America. È in Svizzera, in una clinica. Neanche i miei soldi potranno salvarla.”

Il professore è attonito. Non pensa più alla pistola posata sul tavolo. I bottoni, in quel grugno che è la faccia di Grimaldi, sembrano invece illuminarsi un poco, riprendere vita. E la sua mano si avvicina, lenta, a un posacenere di cristallo.

La denotazione mi scuote di colpo. Esco dall’auto senza riflettere, mi precipito dentro. L’usuraio è ferito a un braccio, il professore è a terra, non respira più, la fronte aperta da uno squarcio profondo, da cui cola sangue. C’è sangue anche sul pavimento, sul posacenere massiccio.

“Ho dovuto difendermi” piagnucola l’uomo. “È entrato qui con l’inganno, ero disarmato, mi ha sparato un colpo...”

A un tratto provo schifo, nausea, rabbia. Tutto insieme. Vedo la rivoltella, lì, sopra il tavolo. La prendo in mano. Sparo due volte.

Non so quanto tempo sia passato. Sono stanco, ho sonno e freddo, e sono infelice. Apro la porta. Un filo di luce pallida sfiora i rami degli alberi. L’ombra verde del bosco all’improvviso si illumina di granuli di sole, mi guardo al polso, sono le nove, dall’alto la luce piove su ogni cosa. Un pettirosso vola vicino a me, per un attimo lo seguo con lo sguardo.

*Kvara premio
Sperta kategorio*

Vojaĝo ĉe la noktofino

Luigi Guicciardi

Italio

Mi nomiĝas Paolo kaj mi estas taksiisto. Partatempe, kontraŭleĝe, por pagi universitaton. Ĉi tie en Modeno, ĉefe en mia kvartalo, multaj scias tion kaj, laŭbuŝe, ili serĉas min por servo, kun rabato. Tial mi ne miris, kiam hodiaŭ matene, oni kontaktis min por vojaĝo farenda ĉi-nokte mem, la 3-an de januaro: mi devas akompani profesoron Gualtieri al Cavalese, al la domo de Diego Grimaldi.

Mi scias, kiuj ili estas, ambaŭ. La unua estas nun emerita, sed dum multaj jaroj li instruis matematikon en la mezlernejo, kiun mi mem frekventis. La dua, aliflanke, administris rubdeponejon en la periferio, kiun li poste sukcesis transformi en forbruligejon. Sed ĉiuj scias, ke la plejparto de lia riĉaĵo devenas de uzuro. Dum longa tempo li pruntis monon per sufokaj interezoj, kaj poste subite foriris por loĝi en Trentino, ŝanĝante domon kaj regionon.

Mi imagas la kialon de tiu ĉi vojaĝo: pro aĝo kaj vidproblemoj, la profesoro ne estas homo, kiu volonte veturas, kaj krome li ne fartas bone laŭ ekonomia vidpunkto. Li certe elspezis multe, ŝajnas, por subteni la artan karieron de sia sola filino, Carla, en la distra mondo. Carla Gualtieri, jes, komencanta diskretan popularecon per la artnomo Adela Campos, en la itala televidserio Milito de Koroj. Kaj Grimaldi, ni ĉiuj scias lian profesion...

Mi iras preni lin ĉe lia adreso, kaj li atendas min tie, ĝustatempe, antaŭ la domo. Do, ni forveturu. Mi prenas la aŭtovojon el Campogalliano ĉirkaŭ noktomezo. Estos trankvila vojaĝo, mi pensas: nokte, sur la A22, al Brenner. Dum la unuaj kilometroj, ĝis Carpi, neniu el ni parolas. Mi rigardas lin flanke. Li estas malalta sed fortika kaj kun multaj haroj, ĉiuj blankaj, kaj vizaĝo kvadrata, tre pala. Lia hararo multe kreskis de kiam mi laste vidis lin. Ili estas frizitaj kaj streĉitaj malantaŭen, kvazaŭ altiritaj de magneta kampo.

“Mi memoras, ke vi konis unu la alian, vi kaj Grimaldi”, mi komencas, “vi estis najbaroj. Kaj viaj du filinoj frekventis unu la alian, ili ambaŭ estis solinfanoj, ĉu ne? Poste ili kreskis kaj iliaj vojoj disiĝis. La via, Carla, iĝis aktorino, la alia iris al Ameriko por studi...”

“Kiom multe vi scias, Paolo.”

“Ili estis preskaŭ samaĝaj, kaj ili estis belaj. Via filino, ĉefe. Multaj admiris ŝin, vi scias, kiam ŝi aktorin en Milito de Koroj en televido...”

Subite mi ruĝiĝas, malkomforta. Kaj mi divenas, ke ankaŭ li estas embarasita. Ĉar mi ĵus rememoris, ke la rolo de Adela Campos malaperis, ŝi estis mortigita, kaj Carla forlasis la televidserion kaj revenis hejmen, precize kiam ŝi ŝajnis komenci belan karieron...

Dume ni alvenis en Pegognaga. La sekva indiko estos Mantuo. Trafiko estas malabunda, kiel antaŭvidite. Mi klarigas mian voĉon:

“Se ĉi tio daŭras tiel, ni alvenos iom pli frue. Ĉu vi certas, ke li atendas vin?”

Li kapjesas. “Mi diris al li, ke mi akceptos tre altan interezoprocenton, kaj kiel garantio hipotekon sur mia domo en Modeno. Tial mi certas.”

La voĉo estas nun sufiĉe severa, la rigardo sen rideto. Kaj mi koncentriĝas pri veturado. Mantuo, Nogarole Rocca, Norda Verono. La kilometroj forglitas, kiel la reflektoroj de la malmultaj aŭtoj, kiuj preterpasas nin. Dume mi pensas pri la viro, al kiu ni iras.

“Ĉu vi konas lin, Grimaldi?”, li demandas min, subite, kvazaŭ li legis mian menson.

“Nur per vido. Mia patro tamen rakontis al mi pri li.”

“Kaj kion li diris?”

“Ke li estis malbona grumblemulo, duonfreneza, sed ege danĝera. Neniu iam provis trompi lin, kaj neniu povis imagi foriri kun la mono, se ŝuldanta al li. Li retrovus vin eĉ se vi estus reveninta en la ventron de via patrino.”

“Ha, ĉu li diris tion?”

Lia voĉo estas milda, iom akuta. Kaj mi volas, ke li parolu, denove, por rompi tiun neelteneblan silenton, interrompita nur de la susuro de la pneŭoj kaj la mallaŭta zumado de la hejtado.

“Ni jam estas ĉe Garda Lago”, mi diras al li. Kaj mense: Affi, Ala Avio, Rovereto, la venontaj ŝildoj. Tiam mi riskas: “Kiel fartas via filino?”

“Ĉu vi vere volas scii?”

“Mi ĉiam ŝatis ŝin.”

“Ŝi havas multoblan sklerozon.”

Dum momento mi ne povas spiri. Mi ne scias kion diri. Anstataŭe, li parolas preskaŭ aŭtomate, dum en li kreskas malvarma, surda kolerego.

“Ŝi estis diagnozita en aŭgusto. Kaj la plej lastatempa krizo, antaŭ unu monato. Diplopio kaj rigidiĝo de la gamboj.”

Mi daŭre silentas kaj rigardas antaŭen, preter la antaŭa glaco. Venonta elirejo, Trento Suda. La hejtado estas probable tro alta, ĉar mi sentas ruĝecon en la vizaĝo, kaj mi ŝvitas.

“Ĉu vi volas scii, kiel mi sentas min? ŝi diris al mi ĝuste hieraŭ. Ŝi havis la monologon preta. Amaso da vortoj premanta ŝian bruston. De la tago de la diagnozo ĝis la fino de ĉiu horo, ŝi aldonis ion. Ŝi lasis ĝin kreski en si profunde, frazo post frazo. Kaj hieraŭ ŝi volis liberiĝi de tio, kunhavigi ĝin kun mi.”

Li glutas, enspiras. Kaj tiam:

“Pasintjule, iun matenon ŝi ellitiĝis kaj ŝiaj kruroj cedis. Poste ŝi komencis vidi duoble kaj ne povis legi sian scenaron. Ŝi pensis, ke ŝi estas nur iom laca. Ŝia kuracisto faris al ŝi multajn demandojn, faris testojn, sendis ŝin al specialistoj, neŭrologoj, kardiologoj, sed neniu ŝajnis havi certan diagnozon. Ĝis iu mateno, tiam ŝi aktorin en sceno, ŝiaj kruroj denove rigidiĝis, kaj ĉi-foje ankaŭ ŝiaj manoj. Ŝi kolapsis teren pro teruro, sed la kuracisto ŝajnis preskaŭ trankviligita, ĉar li finfine povis doni nomon al ŝia problemoj.”

Trento Centro, Trento Norda, dume. Mi veturas aŭtomate, mia gorĝo seka, mia koro ŝvelinta pro doloro. Ĉar ŝajnas al mi havi ŝin antaŭ mi nun. Carla. La unua amo de mia junaĝo.

“Vi havas multoblan sklerozon, li diris, sed vi ne mortos kaj vi ne estas kontaga. Li kredis konsoli ŝin, kaj anstataŭe ŝi sentis emon mortigi lin. La sekvan tagon, ŝi diris al la reĝisoro, kiu kunvenigis la verkistojn, kaj kune ili decidis meti belan malsanon en la televidserio. Kaj tiel estis, ke Adela Campos mortis pro kancero. Kaj al Carla restis nur kolero. Pura kaj simpla kolero.”

“Ĉu do estas por ŝi, ke vi iras al Grimaldi? Ĉu por pagi la kuracadon?”

“Ŝi komencis malami kuracistojn”, li daŭrigas, sen aŭskulti min, “ne kapablaj kompreni la kaŭzon de ŝia stato. Ĉi tiu afero, kiu estas en ŝi, sed ne estas en ŝi. Kiu reverkas la leĝojn de ŝia organismo sen konsulti ŝin, kio igas ŝin malami sian propran korpon kaj timi ĝin.”

Ni preterpasis San Michele-Mezzacorona, dume, kaj ni jam estas ĉe Ora. Tie ni devas eliri. Nun mi uzas la ŝtatvojon 48, la straton de la Dolomitoj, preterpasas kvar turnojn, eniras la vilaĝon Montan kaj trapasas vilaĝeton kun duobla nomo, Fontanefredde kaj Kaltenbrunn. De kiam ni eliris el la aŭtovojo, ni renkontis nur kvin aŭtojn.

“Ili diras, ke la kaŭzoj de sklerozo estas multaj, sed la precizaj ankorau estas mistero – *Paŭzo* – sed ne en mia kazo, en la kazo de Carla...”

Subite mi havas suspekton. Teruran. Ĝuste sub ŝildo, San Lugano. Mi malrapidiĝas, unu okulo al la vojo kaj la alia al li, profile.

“Estis Grimaldi. Kiam li ĉesis enterigi la toksajn rubaĵojn en sian rubodeponejon, li komencis bruligi ilin. Mi pagis teknikiston por klarigi al mi. Lia forbruligilo estis neniel ekipita por elimini toksajn substancojn sekure.”

“Kaj tio kaŭzis sklerozon...”

“... en genetike vundeblaj homoj. Kaj jen la konsekvencoj, por pli ol unu, kiuj loĝis proksime de la rubodeponejo. Multobla sklerozo, sed ne nur: leŭkemio, kancero, hepata malsano...”

Mi estas skuita, ŝvita, kiam mi preterpasas la San-Lugano-pasejon, kaj transiras tunelon.

“Haltu”, li diras al mi. “Ni ne iru al Cavalese.”

“Kial?”

“Tiu porkulo ne loĝas tie. Li loĝas en vilao, kiu estas preskaŭ fortiĉaĵo. Izolita, malfacile atingebla. Antaŭ Calvello, kiu estas kampadejo, ĉi tie. Kaj kiu estas malplena en vintro”, li aldonas.

Mi ŝaltas la navigilon. Post nur unu kilometro estas vilaĝeto, Cela, kaj vojkruciĝo, kun indiko maldekstre por la vilaĝo Veronza. Mi forlasis la ŝtatvojon 48 kaj supreniras laŭ la provinca vojo 126, lumigita nur de niaj reflektoroj, kiu iras laŭlonge de la monteto Veronza kaj devus konduki nin al la kampadejo.

“Iru malrapide, bonvole...”

La strato ne havas lumon. Ambaŭflanke de la aŭto mi sukcesas diveni, en la mallumo, larikojn kaj pinojn. Fine mi vidas flavan ŝildon, kun tendo kiel simbolo. Mi daŭrigas laŭ vojo ankoraŭ asfaltita, sed ĉiam pli mallarĝa.

Fine granda ŝildo, *Calvello*, kaj tera vojo rekte antaŭ ni, flankita de amasoj da segitaj trunkoj. Kaj la vilao estas tie, ĝuste en la mezo. Mi malŝaltas la motoron kaj ni haltas por rigardi ĝin. Ĝi estas tute nova, kun du etaĝoj, kun videogvatsistemo.

Neniu lumo ene. Antaŭ la vilao oni vidas herbejon, arbaron kaj ian maldensejon, kiujn la vintraj pluvoj plenigis per akvo. La akvo estas malhela, pro la horo, sed eĉ dum la tago la suno devas penetri tien nur kiam ĝi estas tre alta, kaj la ombroj de la arboj apenaŭ devas reflektiĝi, kaj svarmoj de muŝetoj leviĝas fluge, somere, kiel blovo de pipa fumo.

Nun Gualtieri elprenas sian poŝtelefonon kaj fingrumas numeron. Li devas atendi longe, kaj poste aŭdas voĉon raŭkan pro dormo. “Kiu estas?”

“Gualtieri. Ĉu vi forgesis?”, li diras, tute malplena interne, kaj seka, arida kiel dezerto.

“Bone.” Li finas.

“Li dormis, eble. Sed baldaŭ li dormos eterne.” Li malfermas la pordon. “Vi atendu min ĉi tie.”

Mi nenion diras, mi nenion povas diri. Ĉar mi vidis malgrandan pistolon en lia mano: kalibro 22, verŝajne. Li foriras, dum en la domo lumo ekbrilas.

Interne, ne estas la revolvero kiu timigas lin, sed la voĉo, kvankam li ne krias.

“Mi estas ĉi tie ne por via mono, sed por Carla. Ŝi havas sklerozon pro vi, kaj ne resaniĝos. Vi sciis tion... He, respondu! Ĉu vi sciis tion?”

La alia silentas kaj rigardas nenion, kun okuloj, kiuj aspektas kiel butonoj, ne okuloj. Nun li estas kaptita de tremoj. “Ne mortigu min.”

“Venu ĉi tien, merdulo.”

La viro alproksimiĝas kaj kraĉas en lian vizaĝon, kaj per la kanono de la pafilo donas al li cedigan signon. “Ne, ne viŝu vin, konservu ĝin

sur via vizaĝo, se tion oni povas nomi vizaĝo, kune kun ĉi tiu plia”, kaj li kraĉas denove, celante la okulojn. Poste, ankoraŭ svingante la kano-non: “Sidu tie, ulo, mi devas paroli al vi... ne, mi diris al vi, ke vi ne purigu vin, mia kraĉo estas multe pli pura ol via vizaĝo.” Li metas la pafilon sur la tablon kaj skuas la kapon. “Ne iluziiĝu, eĉ se mi ne havas revolveron en la mano, vi estas mortonta.” Subite li vangofrapas lin, kaj tuj li mallevas la kapon. “Mi ne volas mortigi vin antaŭ la ĝusta tempo, silentu, dum vi vivas, vi havas esperon, sed se mi tuj pafos vin, finiĝas”, li murmuris. “Carla havis vivindan vivon, sanon, sukceson, kaj nun... La via, aliflanke, dank’ al via putra mono, studas en Ameriko, kaj travivas la bonan vivon...”

“Mia filino havas kanceron.”

Falas subita, streĉa silento. “Kio?”

“Ŝi ne estas en Ameriko. Ŝi estas en Svislando, en kliniko. Eĉ mia mono ne povos savi ŝin.”

La profesoro estas mirigita. Li ne plu pensas pri la pafilo kuŝanta sur la tablo. La butonoj, en tiu muzelo, kiu estas la vizaĝo de Grimaldi, aliflanke, ŝajnas iomete heliĝi, repreni vivon. Kaj lia mano malrapide alproksimiĝas al kristala cindrujo.

La detonacio skuas min subite. Mi eliras el la aŭto sen pripensi kaj rapide eniras la domon. La uzuristo estas vundita je la brako, la profesoro kuŝas sur la tero, ne plu spiras, la frunto malfermita de profunda sanganta fendo. Ankaŭ sur la planko estas sango, sur la masiva cindrujo.

“Mi devis defendi min”, ĝemas la viro. “Li eniris ĉi tien per trompo, mi estis senarma, li pafis al mi...”

Subite mi sentas abomenon, naŭzon, koleron. Ĉiujn kune. Mi vidas la revolveron, tie, sur la tablo. Mi prenas ĝin en la mano, pafas dufoje.

Mi ne scias kiom da tempo pasis. Mi estas laca, mi dormemas kaj malvarmas, kaj mi estas malfeliĉa. Mi malfermas la pordon. Iomete da palhela lumo tanĝas la branĉojn de la arboj. La verda ombro de la arbaro subite lumas per sunaj makuloj. Mi rigardas mian pojnjon, estas la naŭa. Supre, la lumo pluvas sur ĉion. Rubekolo flugas proksime de mi. Dum momento, mi sekvas ĝin per la rigardo.

*Третья премия
Категория начинающих*

ЦВЕТЫ ДЛЯ ПАПЫ

Евгений Зиберт

Россия

«Уф! Успел!» — автобус уже отъезжал.

В прошлый раз я опоздал и пришлось четыре часа прождать следующего. Зато появилось время, чтобы подумать о себе, о друзьях и даже о Боге... Но сегодня это был последний рейс на Приморск. А думать обо всём заново, — желания не было.

Показав билет водителю, я прошёл в салон. Указанное место было у прохода, но, поскольку соседнее пустовало, я с удовольствием устроился у окна, положив свой рюкзак рядом.

Правда, автобус делал ещё одну остановку и забирал пассажиров у метро. Была вероятность того, что придётся не только пересаживаться, но и брать рюкзак на руки.

Мысленно пожелав вероятному попутчику сломать ногу и опоздать, я откинул сиденье и закрыл глаза. Ехать предстояло два с половиной часа.

Она вышла из метро и посмотрела на часы.

«Неужели опоздала?» — невысокого роста девушка с отчаянием оглянулась и, увидев остановку загородных автобусов, быстро засеменила к ней. Огромный чемодан на колёсиках, который она везла за собой, истерично подпрыгивал, каждый раз рискуя завалиться набок.

Автобус уже стоял. Водитель заметил её и вышел, чтобы открыть багажное отделение.

— Спасибо вам! — она выдохнула и помогла загрузить чемодан. — Еле успела!

— Так и не успели бы, — буркнул водитель и кивнул на перекрёсток. — Если б на светофоре не простояли.

— Повезло, значит! — девушка пошла к дверям.

— Заранее надо, дамочка. Заранее...
Но она уже поднялась в автобус.

Я сверху наблюдал за ними. Сразу оценил и размеры чемодана, и красоту девушки. Чуть привстав, оглянулся и осмотрел весь салон.

Да, пустых мест не было, — значит, ко мне.

Я поднялся и вылез в проход. Девушка уже проходила между рядами, держа в руках свой билет. Свернув места, она улыбнулась:

— Моё у окна?

— Ваше у окна, — кивнул я, немного смутившись.

Она уселась на своё место, я сел рядом. Рюкзак решил оставить в проходе.

— Вам бы его тоже в багажное отделение положить, нет?

— Не успел. Влетел в последнюю секунду.

— Я тоже.

Я усмехнулся:

— Видел.

Автобус тронулся.

— Чемодан-то, считай, одного с вами роста, — заметил я, в тысячный раз разматывая купленные на днях наушники. — Труп у вас там, что ли? Размер — в самый раз.

— Почему труп? — она как-то странно взглянула на меня. — Там... цветы.

— Цветы-ы?! — протянул я, искренне удивившись. — Это кому же такой сад в чемодане?

— Это для папы.

Мне вдруг стало неловко, — в её голосе явно прозвучала грусть.

Придерживая наш автобус на каждом светофоре, город нехотя выпускал его на волю. Какое-то время я молча наблюдал, как муравьиные новостройки сменяются торговыми складами, а их, в свою очередь, заменяют небольшие коттеджные поселения. Наконец автобус преодолел последние этапы людской колонии и, окунувшись в загородный простор, глубоко задышал, наполняя салон свежим запахом свободы.

«Огромный чемодан, заполненный цветами, на ночь глядя, везёт за город... Для папы...» — я был по-настоящему заинтригован.

— А вам далеко? — я решился наконец прервать затянувшееся молчание.

— До... — она вздохнула, — до залива.

— Мне тоже.

— Вам тоже на залив?

— Да, — я кивнул на рюкзак. — Порыбачить вот собрался. С утра пораньше.

Судя по тому, что она мне ничего не ответила, я решил, что рыбалка её беспокоила так же, как меня волновало, каким бензином заправлен автобус.

— Ехать ещё часа два. Не хотите рассказать?

— О чём?

— О чём? ... Да вот о папе вашем. Я столько цветов за всю жизнь никому не дарил!

— Папа любил цветы. Очень.

— Он что же, цветоводом, что ли, был?

— А вы знаете, — она наконец рассмеялась, — мне даже сложно сказать! Он был и цветоводом, и селекционером... Но больше всего он любил рисовать свои цветы!

— Так он ещё и художник?

— Прекрасный художник!

Я на секунду задумался:

— Мне нравится, когда рисуют море. И портреты.

Она покачала головой:

— Нет, папа любил рисовать только цветы. Но вы знаете, — она повернулась ко мне, — эти картины вполне можно было назвать портретами!

— В смысле? — я не уловил.

— В прямом! В каждом цветке чувствовался вырисованный образ женщины. К тому же папа слегка добавлял еле видные глаза, губы, нос... А вдоль листьев можно было заметить руки.

— В каждый цветок?

— Да, в каждый! У него, прямо в углу оранжереи, было огороженное ширмами место для рисования. Он едва там помещался со своим мольбертом!

Мы вдруг въехали в короткий тоннель, и разговор на несколько секунд прервался.

— Хотите, я расскажу, как познакомились мои родители? — неожиданно спросила она, как только закат вновь осветил наши лица.

— Ну, конечно, о чём речь!

— Это было лет... сорок назад.

«Бог мой!» — подумал я. — «Сколько же ей лет?»

— Папа тогда всюю занимался скрещиванием цветов. Вот только обычно это делают с двумя сортами одного вида растений. Папа же стремился найти нечто совершенно невообразимое! И он, чтобы получить гибридные семена, в раскрывшийся бутон нарцисса перенёс пыльцу розы.

— Погодите, — прервал я её, — давайте без этих ботанических терминов, от которых меня со школы тошнит!

— Конечно, — Таня легко согласилась. — Семена он потом пересадил в рассаду и стал ждать.

Я покивал. «Посадил дед репку» — так я себе это представил.

— Шли недели, месяцы... — продолжала она. — А надо заметить, что уже начиная с прорастания побега папа обратил внимание на абсолютную несхожесть с другими — обычными ростками!

— Ну надо думать. Гибрид же... — я неопределённо хмыкнул.

— Необыкновенная форма, невероятный цвет стебелька, листьев, бутона...

— И что за цвет?

Она задумалась:

— Скорее бордовый. А вот бутон — тёмно-синий...

— Однако.

Я мало что смыслил в разведении цветов, но синий бутон на бордовом стебле напомнил мне «Тайну третьей планеты».

— По-моему, я догадался. И подарил он этот цветок незнакомой красивой девушке, которая стала вашей мамой!

— Не совсем так, — и снова эта грустная улыбка. — Папа был убеждён, что портрет этого цветка будет его самой удачной работой. Он выбрал холст размером со свой рост. Впрочем, папа был совсем невысоким. Загрунтовал его, подобрал кисти, краски, подготовил палитру и стал ждать раскрытия бутона.

Автобус вдруг отчаянно просигналил и резко затормозил. Я выглянул в проход и через лобовое стекло увидел посреди дороги корову. Она даже не подняла головы. То ли что-то жуя, то ли бормоча про себя коровью молитву, она медленно перешла дорогу и скрылась среди деревьев.

Я позавидовал её беспечности и тут же услышал, как в глубине подсознания меня кольнуло сочувствие к невероятной тупости этого удивительного создания.

— И вот, в одно прекрасное утро, — услышал я, — с первыми лучами солнца, цветок наконец предстал перед папой во всей своей красе!

Я невольно улыбнулся:

— Прямо как сказку слушаю.

— А так и было. Знаете, порой какие-то моменты в нашей жизни, действительно, кажутся сказочными.

— Не знаю, не знаю, — я в сомнении покачал головой. — Кроме того, что я чувствую иногда себя Иванушкой-дурачком... — Я не стал договаривать, — она меня не слышала.

— Целый день он не отходил от мольберта. И с наступлением ночи вдохновение не оставило папу, и он словно одержимый, лихорадочно меняя кисти, мазок за мазком переносил на холст всю глубину красоты своего селекционного творения. К утру всё было закончено. С холста на него смотрела необыкновенной красоты то ли женщина в образе цветка, то ли цветок, удивительно похожий на женщину. Папа мне не раз говорил, что тогда — он не только все силы отдал этой работе, но и словно поделился с ней жизнью.

Чуть помолчав, она продолжила:

— Он уснул прямо на стуле, напротив своего шедевра. И проспал так до обеда, пока не почувствовал сквозь сон чьё-то

присутствие. Открыв глаза, он в изумлении уставился на картину. Её не было.

— Как это?

— Ну, точнее, холст в раме продолжал стоять на мольберте, но он был абсолютно чист.

— Интересно, — пробормотал я, не решаясь спросить, насколько её папа был дружен с алкоголем?

— Когда он окончательно убедился, что не спит, он чуть не расплакался, а вспомнив, что его разбудило, оглянулся. Позади него, на стуле, сидела обнажённая девушка. Сначала ему показалось, что он её знает или где-то видел раньше... Но, взглянув на пустой холст, он внезапно осознал, что перед ним сидит та, которую он рисовал. Глаза, губы, волосы, пальцы рук, — он же помнил всё это вплоть до мельчайших подробностей! Только вместо грациозного стебелька с листьями — изумительной красоты женское тело. Это была...

— Ваша мама, — утвердительно произнёс я.

— Да. — она кивнула. — Я родилась год спустя.

— От цветка.

— Ну... если вам так удобнее думать. — Она пожала плечами.

— Да я, честно говоря, не знаю, что и думать теперь...

— К сожалению, мама прожила ровно столько, сколько живут розы.

— А сколько живут розы? — я вспомнил, что все цветы, которые я дарил маме, вяли буквально через неделю.

— Пять лет.

— Ого! А вы сколько проживёте?

— Думаю — дольше, чем цветок, но меньше, чем живут люди.

Она внимательно посмотрела на меня:

— Чемодан, который в багажном отделении, папа сам сделал. Для себя. А сегодня пришёл мой черёд выполнить его волю. Похоронить его вместе с тем самым пустым холстом. И цветами. Его цветами.

Я боюсь спросить.

— Похоронить...

— Да, в чемодане, — она так просто закончила мою мысль, словно обычно людей хоронили в рюкзаках. А тут вот, не нашлось под рукой...

— Но как... Он же тяжёлый!

— Поэтому на колёсиках.

— Понятно, — выдохнул я.

Это перестало напоминать сказку.

— Я вам помогу, может?

— Спасибо, — она благодарно положила ладонь на мою руку. — Правда, спасибо.

— Не стоит благодарить, уверяю. — Я рассматривал её пальцы.

Девушка взглянула на часы:

— Я посплю немного? Вторые сутки на ногах.

— Лучше на ногах, чем в чемо... Простите.

— Да ладно! — она рассмеялась. — Не совсем стандартная ситуация рождает не совсем адекватный юмор.

Чтобы ещё чего-нибудь не ляпнуть, я просто кивнул головой.

За окном совсем стемнело. Салон освещался лишь слабыми синими лампочками в проходе. Я бы, наверное, тоже подремал, но... Господи, эти художники! Явно — не от мира сего. Он бы ещё завещал, чтоб его в шкафу похоронили! Бедная девушка.

— Осторожнее!

— Погодите. У меня же есть... — я достал из рюкзака фонарь, протянул ей. — Посветите-ка мне.

До песчаной косы у залива можно было дойти за пятнадцать минут, но трава быстро сменилась песком, в котором колёсики вязли и совсем не хотели вертеться.

— Вот как бы... — у меня довольно быстро сбилось дыхание. — Как бы вы сами дотащили... свой чемодан?

— Я совершенно об этом не подумала!

Я видел, что она чувствует себя крайне виноватой.

— Ладно! — подбодрил я её. — Дотащим!

Мы прошли ещё метров пятнадцать.

— Стойте. Вот здесь.

Мы стояли на небольшом возвышении, у невысокой сосны.

— Это папа посадил. — она дотронулась до дерева. — Когда мама умерла.

— Лопата есть?

— Да. В чемодане. Сейчас...

Когда откинулась крышка, я увидел большой чистый холст. Она подняла его и отложила в сторону. Маленький старичок лежал в позе эмбриона. Весь в цветах.

Она протянула мне небольшую лопату.

— Готово!

Я вырыл в песке яму глубиной почти в два метра.

— Достаточно? Как считаете? — я поднял голову наверх, но никого не увидел. — Эй! Где вы?

Быстро выбрался и взял фонарь. Посветил вокруг. Девушки не было.

Что она задумала, — было уже не важно. Времени раздумывать у меня не было. Был я. И был труп. Я захлопнул чемодан, спрыгнул обратно в яму и стянул его за собой. Через несколько минут яма была засыпана.

Я снова взял фонарь. Огляделся...

«Чёрт! Ну как я мог забыть?!»

Недалеко лежал холст. Я сделал к нему шаг и замер. С него смотрели те же глаза, грустная улыбка, волосы и пальцы вдоль листьев, которые так недавно лежали на моей руке!

Я всё понял и поднял голову, пытаюсь загнать обратно выступившие слёзы.

«...дольше, чем цветок, но меньше, чем живут люди».

Взял снова лопату.

Волю папы надо было выполнить до конца.

Floroj por paĉjo

Evgenij Zibert

Rusio

“Uf! Ĝustatempe!” La aŭtobuso forveturis senprokraste.

Lastan fojon, mi malfruis kaj devis atendi kvar horojn ĝis la sekvan-ta. Tio donis al mi tempon por pensi pri mi mem, pri amikoj, kaj eĉ pri Dio... Sed hodiaŭ estis la lasta vojaĝo al Primorsko. Mi ne havis deziron pensi pri ĉio ĉi denove.

Mi montris la bileton al la ŝoforo kaj iris en la koridoron. Mia sid-loko estis je la flanko de la koridoro, sed ĉar la apuda estis libera, mi plezure sidis apud la fenestro, metante mian dorsosakon apud min.

La aŭtobuso devis tamen fari ankoraŭ unu plian halton kaj prenis pasaĝerojn ĉe la metrostacio. Estis risko, ke mi ne nur ŝanĝos sidlokon, sed ankaŭ devos meti mian dorsosakon sur miajn genuojn.

Dum mi image deziris, ke mia eventuala kunvojaĝanto estu rom-pinta sian kruron kaj malfruiĝu, mi klinis malantaŭen mian seĝon kaj fermis miajn okulojn. La vojaĝo devis daŭri du horojn kaj duonon.

Ŝi eliris el la metrostacio kaj rigardis sian horloĝon.

“Ĉu mi vere malfruas?” Malgranda junulino senespere rigardis ĉir-kaŭ si kaj rapide kuris al la busstacio eksterurben. La grandega surrada valizo, kiun ŝi trenis post si, haose saltetis ĉiupaŝe, ĉiam riskante fali flanken.

La buso jam estis tie. La ŝoforo rimarkis ŝin kaj eliris por malfermi la pakajkompartimenton.

“Dankon al vi!”, elspiris ŝi helpante enŝargi la valizon. “Mi sukcesis!”

“Vi eĉ ne sukcesus se ni ne antaŭe atendus ĉe la semaforo, grumblis la ŝoforo kapgestante al la kruciĝo.”

“Bonŝance do!” La knabino iris al la pordo.

“Vi devus veni pli anticipe, sinjorino. Antaŭe...”

Sed ŝi jam eniris la buson.

Mi observis ilin desupre. Tuj mi aprezis kaj la grandecon de la valizo, kaj la belecon de la junulino. Mi iom leviĝis kaj rigardis la tutan koridoron.

Jes, ne estis liberaj sidlokoj – do estos por mi.

Mi stariĝis kaj eliris en la koridoron. La knabino jam venis inter la vicoj tenante sian bileton enmane. Kontrolinte la sidlokojn, ŝi ridetis:

“Ĉu la mia estas ĉe la fenestro?”

“La via estas ĉe la fenestro”, kapjesis mi, iom embarasite.

Ŝi sidiĝis sur sia seĝo kaj mi residis apud ŝi. Mi decidis lasi mian dorsosakon en la koridoro.

“Ankaŭ vi devus meti ĝin en la pakaĵkompartimento, ĉu ne?”

“Mi ne havis tempon. Mi alveturis lastminute.”

“Ankaŭ mi.”

Mi ridetis:

“Mi vidis.”

La buso ekmoviĝis.

“La valizo estas same alta kiel vi”, rimarkigis mi, por la mila fojo malvolvante la aŭdilojn aĉetitaj de mi kelkajn tagojn pli frue. “Ĉu estas kadavro ene? La granda estas tute adekvata.”

“Kial, kadavro?” Ŝi rigardis min strange. “Tie estas... floroj.”

“Flo-oroj?”, diris mi, vere surprizite. “Por kiu estas ĉi tia ĝardeno en valizo?”

“Ĝi estas por paĉjo.”

Mi subite sentis min embarasita. En ŝia voĉo klare sonis malgajo.

Reteninte nian buson ĉe ĉiu semaforo, la urbo kontraŭvole liberigis ĝin finfine. Dum iom da tempo, mi silente observis, kiel la novaj formikecaj konstruaĵoj estas anstataŭigitaj de stokejoj, kiujn siavice anstataŭas malgrandaj domkvartaloj. Fine, la buso preterpasis la lastajn kvartalojn de la homa kolonio kaj, plonĝinte en kamparan vastecon, profunde spiris, plenigante la koridoron per freŝa odoro de libereco.

“Granda valizo plena de floroj, antaŭ noktiĝo, elportita el urbo... Por paĉjo...” Mi estis vere scivolema.

“Ĉu vi veturas malproksimen?” Mi fine decidis rompi la longan silenton.

“Ĝis...”, ŝi suspiris, “... ĝis la golfo.”

“Ankaŭ mi.”

“Ĉu ankaŭ vi iras al la golfo?”

“Jes.” Mi kapjesis direkte al mia dorsosako. “Fiŝkapti, vidu, intencis mi. Frue matene.”

Konstatante ke ŝi nenion respondis al mi, mi sentis, ke ŝin interesas fiŝkaptado tiom kiom min la tipo de benzino uzata por la buso.

“Ni veturo ankoraŭ almenaŭ du horojn. Ĉu vi ne emus rakonti?”

“Pri kio?”

“Pri kio?... Nu, pri paĉjo via. Neniam en mia vivo mi ofertis tiom da floroj al iu ajn!”

“Paĉjo amis florojn. Amegis.”

“Ĉu li estis florkultivisto aŭ kio?”

“Vi scias”, ŝi fine ridis, “eĉ por mi estas malfacila demando! Li estis kaj florkultivisto kaj selektisto... sed pli ol ĉio, li amis pentri siajn florojn!”

“Do, li estis ankaŭ artisto?”

“Mirinda artisto!”

Mi cerbumis dum sekundo.

“Mi ŝatas, kiam oni pentras la maron. Kaj portretojn.”

Ŝi kapneis:

“Ne, paĉjo ŝatis pentri nur florojn. Sed vi scias”, ŝi turnis sin al mi, “ĉi tiujn pentraĵojn oni povis bone nomi portretoj!”

“En kiu senco?” Mi ne komprenis.

“En la rekta senco! En ĉiu floro, oni povis diveni desegnititan bildon de virino. Krome, paĉjo iomete aldonis okulojn, lipojn, nazon... apenaŭ videblajn. Kaj laŭ la folioj, oni povis vidi manojn.”

“Ĉu en ĉiu floro?”

“Jes, en ĉiu! Rekte en la angulo de la forcejo, li havis ŝirmitan areon por pentrado. Li apenaŭ havis sufiĉe da spaco por sia stablo!”

Ni subite enveturis en mallongan tunelon, kio interrompis la konversacion dum kelkaj sekundoj.

“Ĉu vi volas, ke mi rakontu, kiel miaj gepatroj renkontiĝis?”, ŝi neatendite demandis. La sunsubiro denove lumigis niajn vizaĝojn.

“Kompreneble, diru!”

“Tio estis antaŭ ĉirkaŭ... kvardek jaroj.”

“Mia Dio!”, pensis mi, “kiom ŝi aĝas?”

“Paĉjo tiam fervore okupiĝis pri krucado de floroj. Tamen, kutime oni faras tion per du subspecioj de la sama plantospecio. Paĉjo, aliflanke, strebis trovi ion tute neimageblan! Kaj por akiri hibridajn semojn, li transdonis polenon de rozo al malfermita narcisburĝono.”

“Atendu momenton”, mi interrompis ŝin, “ĉu ne eblas forlasi tiujn botanikajn terminojn, kiuj naŭzas min ekde la lernejo?”

“Kompreneble.” Tanja facile konsentis. “La semojn li poste transplantis al potetoj kaj atendis.”

Mi kapjesis. Avo, kiu plantis rapon, tiel mi imagis ĝin.

“Semajnoj kaj monatoj pasis...” daŭrigis ŝi. “Kaj oni rimarku, ke jam ekde la ĝermado de la ŝoso, paĉjo ekde la elteriĝo de la ĝermo priatentis la absolutan malsimilecon kun aliaj... ordinaraj ĝermoj!”

“Nu, sendube. Estas ja hibrido...”, mi murmuris ambigue.

“Neordinara formo, nekredebla koloro de la tigo, de la folioj, de la burĝono...”

“Kaj kia koloro?”

Ŝi pripensis:

“Plej simile al vinruĝa. Sed la burĝono, malhelblua...”

“Ha, jes.”

Mi sciis malmulte pri florselektado, sed la blua burĝono sur ruĝvina tigo rememorigis al mi ‘La misteron de la tria planedo’.

“Mi pensas, ke mi divenas. Li donacis ĉi tiun floron al nekonata bela junulino, kiu fariĝis via patrino!”

“Ne okazis tute tiel.” Kaj revenis tiu malgaja rideto. “Paĉjo estis konvinkita, ke la portreto de ĉi tiu floro estos lia plej sukcesa verko. Li elektis tolon samgranda kiel lia propra alteco. Ĉar paĉjo estis sufiĉe malgranda. Li kovris ĝin per fonfarbo, elektis penikojn, farbojn, pretiĝis paleton kaj ekatendis la malfermon de la burĝono.”

La buso subite hupis kaj abrupte bremsis. Rigardante tra la koridoro kaj la antaŭa glaco, mi vidis bovinon meze de la vojo. Ĝi ne eĉ levadis la kapon. Ĉu maĉante ion, ĉu murmurante bovinan preĝon al si mem, ĝi malrapide transiris la vojon kaj malaperis inter la arboj.

Mi enviis ĝian senzorgecon kaj tuj komprenis, kiel, en la profundo de mia subkonscio, min pikis simpatio pro la nekredebla stulteco de ĉi tiu mirinda estaĵo.

“Kaj jen, unu belan matenon kun la unuaj sunradioj, la floro finfine montriĝis antaŭ paĉjo en sia tuta gracio!”

Mi neintence ridetis:

“Tio aspektas kvazaŭ rakonto el fabelo.”

“Tiel estis. Vi scias, foje, iuj momentoj en niaj vivoj vere ŝajnas fabelaj.”

“Mi ne scias”, mi dube balancis la kapon. “Krom tio, ke mi foje sentas min kiel Ivano la Idioto...” Mi ne finparolis, ŝi ne aŭskultis min.

“La tutan tagon, li ne forlasis la stablon. Kaj komence de la nokto, in-spiro ne forlasis paĉjon, kaj li, kvazaŭ obsedata, febre ŝanĝadis penikojn, tuŝo post tuŝo transdonadis al la tolo la tutan profundecon de la beleco de lia selekta kreitaĵo. Antaŭ la mateno, ĉio estis finita. El la tolo rigardis lin eksterordinara beleco, ĉu virino en formo de floro, ĉu floro surprize simila al virino. Paĉjo diris al mi plurfoje, ke tiam li ne nur dediĉis ĉiujn siajn fortojn al ĉi tiu laboro, sed ankaŭ ŝajne aldonis sian tutan vivforton.”

Post paŭzo, ŝi daŭrigis:

“Li ekdormis rekte sur sia seĝo, antaŭ sia majstroverko. Kaj li tiel dormis ĝis la tagmanĝo, kiam li sentis tra dormo ies ĉeston. Li malfermis la okulojn kaj mirigite rigardis la pentraĵon. Ĝi estis for.”

“Kiel?”

“Nu, pli precize, la tolo en la kadro daŭre staris sur la stablo, sed ĝi estis absolute virga.”

“Interese”, mi murmuris, ne kuraĝante demandi kiom amikema ŝia patro estis kun alkoholaĵoj.

“Kiam li finfine konvinkiĝis, ke li ne dormas, li preskaŭ ekploris, kaj rememorante tion, kio vekis lin, li ĉirkaŭrigardis. Malantaŭ li, sidis sur seĝo nuda knabino. Komence ŝajnis al li, ke li konas ŝin aŭ jam antaŭe vidis ŝin ie... Sed rigardante la virgan tolon, li subite ekkonsciis, ke antaŭ li sidas la pentrita virino. Okuloj, lipoj, haroj, fingroj, li memoris ĉion ĝis la plej malgranda detalo! Nur anstataŭ gracia tigo kun folioj, virina korpo mirinde bela. Estis...”

“Via patrino”, mi senhezite diris.

“Jes”, ŝi kapjesis. “Mi naskiĝis jaron poste.”

“El floro.”

“Nu... Se vi sentas vin komforta pensante tiel.” Ŝi levis la ŝultrojn.

“Jes, sincerdire, mi ne scias, kion pensi nun...”

“Bedaŭrinde, mia patrino vivis ĝuste tiom longe, kiom vivas rozoj.”

“Kiom longe vivas rozoj?” Mi memoris, ke ĉiuj floroj, kiujn mi donacis al mia patrino, velkis nur en semajno.

“Kvin jarojn.”

“Hoho! Kaj vi, kiom longe vivos vi?”

“Mi pensas, pli longe ol floro, sed malpli ol homoj vivas.”

Ŝi atente rigardis min:

“La valizon, kiu estas en la pakajkompartimento, paĉjo faris mem. Por si mem. Kaj hodiaŭ estas mia vico plenumi lian volon. Entombigi lin kune kun tiu virga tolo. Kaj kun la floroj. Liaj floroj.”

Mi timas demandi:

“Entombigi...”

“Jes, en la valizo.” Ŝi tiel simple finis mian penson, kvazaŭ homojn ene de dorsosakoj oni kutime enterigus. Kaj jen, ne plej simple...

“Sed kiel... Ĝi ja estas peza!”

“Tial ĝi havas radetojn.”

“Klare”, mi murmuris.

Tio ne plu similis al fabelo.

“Ĉu mi povas helpi vin, eble?”

“Dankon.” Ŝi dankeme metis sian manon sur mian brakon. “Vere, dankon.”

“Ne dankindas, estu certa.” Mi rigardis ŝiajn fingrojn.

La junulino ekrigardis sian horloĝon:

“Ĉu mi povas dormeti iom? Jam de du tagoj mi staras sur miaj piedoj.”

“Pli bone sur la piedoj ol en vali... Pardonu.”

“Ne zorgu!” Ŝi ridis. “Situacio ne tute norma povas krei humuron ne aparte adekvatan.”

Por ne eldiri plian stultaĵon, mi simple kapjesis.

Estis tute mallume ekster la fenestro. La buso estis lumigita nur per malfortaj bluaj lampetoj en la koridoro. Verŝajne ankaŭ mi dormu,

sed... Dio mia, tiuj artistoj! Evidente, ni ne estas el la sama mondo. Nur mankas, ke li estus testamentinta esti entombigita en ŝranko! Povra junulino.

“Atentu!”

“Atendu. Mi havas...” Mi elprenis pošlampon el mia dorsosako kaj transdonis ĝin al ŝi. “Lumigu por mi.”

Eblis marŝi ĝis la sablolango apud la golfeto en dek kvin minutoj, sed la herbo rapide cedis lokon al sablo, en kiu la radoj algluiĝis kaj finfine rifuzis turniĝi.

“Jen, kiel...” Mi rapide perdis la spiron. “Kiel vi sola trenus vian valizon?”

“Mi tute ne pensis pri tio!”

Mi vidis, ke ŝi sentas sin ege kulpa.

“Bone!”, mi kuraĝigis ŝin, “Ni tiru ĝin!”

Ni plu iris ankoraŭ proksimume dek kvin metrojn.

“Haltu. Jen ĉi tie.”

Ni staris sur altaĵeto, proksime de malalta pino.

“Ĝin plantis Paĉjo”, ŝi tuŝis la arbon, “kiam mia patrino mortis.”

“Ĉu vi havas fosilon?”

“Jes. En la valizo.” Nun...

Kiam la kovrilo malfermiĝis, mi vidis grandan virgan tolon. Ŝi levis ĝin kaj deponis ĝin flanken. Malgranda maljuna viro kuŝis en feta pozicio. Tute kovrita de floroj.

Ŝi donis al mi malgrandan ŝovelilon.

“Farite!”

Mi fosis truon preskaŭ du metrojn profunde en la sablo.

“Ĉu sufiĉe? Kion vi opinias?” Mi rigardis supren, sed vidis neniun. “Hej! Kie vi estas?”

Mi rapide eliris kaj prenis la lampeton. Mi lumigis ĉirkaŭe. La knabino malaperis.

Tion, kion ŝi faris prifajfis mi. Mi ne havis tempon pripensi. Tie estis mi. Kaj ankaŭ estis kadavro. Mi refermis la valizon, resaltis en la truon kaj tiris ĝin al mi. Kelkajn minutojn poste, la truo estis plenigita.

Mi denove prenis la lampon. Mi ĉirkaŭrigardis...

“Diable! Nu, kiel mi povis forgesi!?”

Proksime kuŝis la tolo. Mi faris paŝon al ĝi kaj glaciigis. El ĝi rigardis la samaj okuloj, la malgaja rideto, la haroj kaj fingroj laŭlonge de la folioj, kiuj tiel antaŭnelonge kuŝis en mia mano!

Mi komprenis ĉion kaj levis la kapon penante reteni la larmojn elfluantajn.

“Pli longe ol floroj, sed malpli ol homoj vivas.”

Mi reprenis la ŝovelilon.

La volo de la paĉjo devis esti plenumita ĝis la fino.

Malnova amikino

Akiko Ĵin

Japanio

La planto, kiun ni povas vidi tra la punta kurteno, rimarkinde kreskas ĉe la verando. En la vespera mallumo, la planto ricevante la eksteran lumon de la najbara konstruaĵo montras al ni sian silueton. Ĝi etendiĝas nur supren kaj baldaŭ atingos la supran etaĝon. Ĝi kelkfoje floras, sed tute ne fruktis. Do ni neniam bezonas zorgi pri rikolto. Estas varmege ekstere. Tute ne blovas, eĉ ne estas venteto. Tamen la planto iomete tremas verŝajne pro la varmega aero eliranta el eksterdoma ekipaĵo de klimatizilo. Sentante la ombron de la balanciĝantaj folioj, ni ĝuas la babiladon kun frida vino.

“Toston al la ĉeriztomato vigla, kreskema kaj senfrukta kiel mi!”, memmoke diras mia filino kaj levas sian glason alte. Mi reagas same pe-tote: “Toston por mia kara filino, kiu ankoraŭ estas senedza!” Ni ŝerce ridas mallaŭte. Ambaŭ estas ebrietaj ĉi-vespere.

“Panjo, tamen la vivo sen infanoj ankaŭ valoras, ĉu ne?”

“Kompreneble! La vivostiloj nuntempe diversiĝas. Havi kaj kreskigi idojn ne estas la sola celo de la vivo, ne nur por viroj, sed ankaŭ por virinoj. Ambaŭ vivstiloj havas siajn meritojn. Krome, neniŭ scias kiam kaj kia mirinda renkonto venos al vi. Do, estas tro frue rezigni geedziĝon.”

“Jes, neniŭ scias, kiam aperos mia partnero. Tamen, por la tago nepromesita, mi ne emas frostigi miajn proprajn ovojn por konservi mian DNA-n.”

“Kompreneble! Vi povas decidi mem. Neniam faru, kion vi ne volas. Oni ne certas, kio okazos morgaŭ. Nur certas, ke ĉio havas sian finon. Ni ĉiuj finfine mortos. Mi esperas nur ke vi ne bedaŭros la vivon poste. Ne malŝparu vian tempon tro pensante pri tio, kio tute dependas de via sorto. Sed ne forgesu, kara, kian ajn vojon vi elektas, mi ĉiam estas kun vi.”

Ŝi malklare ridetas kaj dankas. Rigardante ŝian profilon iom solecan, mi rememoras la aferojn, kiuj okazis al mi iun nokton en la fora pa-



sinteco. Fragmentoj de la malnovaj memoroj tamen ne bezonas multe da tempo por elvoki tiaman kompleksan emocijon. Tiuj memoroj eble restis longan tempon kvazaŭ ili atendus ĉi tiun momenton.

Tio okazis en la nokto de malfrua somero antaŭ tridek jaroj. Estis varmege, humide kaj senvente, same kiel hodiaŭ. Telefono eksonoris. La voko estis de s-ino K, mia amikino. Ŝi haste diris, ke ŝi havas peton al mi. Tamen jam estis malfrua nokto kaj mia flineto estis dormanta, do mi rifuzis ŝian peton. Ŝi tamen diris: “Mi alvenos al via domo tuj. Venu malsupren al la vestiblo de via apartamento. Mi parolos pri la

detaloj survoje. Mi volas, ke vi helpu min pri tio, kion mi devas fari ĉi-nokte.” Ŝi aldonis: “Plenumu mian peton, ĉar ĝi estas la unua kaj la lasta.” Ŝi estis obstina tiel ke finfine mi devis cedi. Mi rapidis malsupren kun mia dormanta filino en miaj brakoj. En la lifto mi scivolis pri kia peto ŝi venos al mi dum la nokto. Tio retrorigardigis min al la komenco de nia rilato.

Ŝi estis kelkajn jarojn pli aĝa ol mi kaj laboris kiel flegistino. Niaj filinoj estis samklasanoj en la infanĝardeno kaj niaj hejmoj estis proksimaj, do ni tuj amikiĝis nature same kiel niaj filinoj. Ŝi vivis kun siaj tri familianoj: la filino Akane, tre petolema knabino, la futbalema filo Masato, kaj la edzo, hospitala anesteziisto. Ĉar ŝia edzo revenis hejmen tre malfrue ĉiunokte, ni ofte kune kuiris vespermanĝon kaj pasigis gajan tempon kun niaj infanoj. Tiam ankaŭ mi havis multe da libertempo pro eksgeedziĝo. Niaj personecoj estis tre malsamaj, sed ni iel ŝatis kaj fidis unu la alian.

Ŝia aŭto haltis ĝuste antaŭ la pordo malfermata por ke mi povu tuj envagoniĝi. Apenaŭ mi sidiĝis sur la malantaŭa seĝo, ŝi startigis la aŭton. Tiel komenciĝis la nokta vojaĝo.

En la aŭto mi rapide kuŝigis mian dormantan filinon. La aero en la malgranda aŭto estis sufoke varmega. Frustrate mi demandis ŝin:

“Kio estas via peto? Kien ni iras nun? Kion vi volas fari en tiom malluma nokto?”

Kun iom da hezito, ŝi ekparolis: “Ĉu vi rimarkis, ke mia edzo havas alian virinon kaj ĉesis reveni hejmen? Li enamiĝis al juna flegistino, kiu laboras kun li. Mi volas ke mia edzo revenu de ŝi. Por tio, mi petas vin ŝuti blankan sablon de ĉi tiu sitelo sur la ĝardenon de la virino. Ĉi tio estas ‘la disiga sablo’ kun fortega efiko disigi geulojn.” Dirante tion, ŝi ĵetis sian rigardon al la blua sitelo sur la pasaĝera seĝo.

“Mi ne volas, ke miaj infanoj estu orfoj je patro. Tial lastan nokton mi stiris aŭton ege malproksimen por akiri la specialan sablon. Mi jam malbenis ĉiun sableron per la specifa maniero. La sablo origine estis potenca ŝtonego, oni diras. Kaj nun ĝi fariĝas pli potenca pro mia malbeno. La magia povo plej efike funkcias ĉi-nokte, sub la nova luno, kaj la efiko tamen duoniĝos morgaŭ. Jen kial ni devas fari ĉi tiun taskon hodiaŭ. Mi jam trovis ŝian adreson kaj ni nun iras tien.”

“Haltigu la aŭton”, mi krietis. La aŭto malrapide haltis vojrande.

“Ni estu trankvilaj kaj ni pensu kune”, mi diris malfermiĝante la fenestrojn de la aŭto. La aero el ekstero ankaŭ estis netolereble varmega. Ŝvito senĉese elfluis el poroj tra la tuta korpo. Mia hararo gluiĝis al mia vizaĝo. S-ino K turnis sin al mi kaj petis: “Mi amas lin. Mi ne volas perdi lin. Ni rarafoje kverelis, sed plejparte vivis kontente kaj feliĉe. Mi iel ajn reakiros lin, ĉar li nur eraretis. Tial mi bezonas vian helpon. Ŝutu la sablon anstataŭ mi!”

“Mi ne konsentas tian manieron malsciencan. Eĉ se tiu sablo havas tiun potencon, eniri ies ĝardenon sen permeso estas krimo. Mi eble estos arestita. Feliĉe vi havas financajn rimedojn. Lasu la situacion, kaj li baldaŭ revenos. Eĉ se ne tiel, vi povos komenci alian vivon. Ne ĉio estos malbona. Mi ĉiam prenas eksedziĝon pozitive.” Mi provis malinstigi ŝin, serĉante la vortojn por ne sentigi al ŝi ian mizeron.

Simila demando kaj respondo ripetiĝis en la parkita aŭto. De tempo al tempo proksimiĝis aŭtoj kun la lumoj orflave brilantaj, sed preterpasis tuj. La tempo pasis vane. Ŝi denove diris:

“Verdire, mi havas plian sitelon por vi en mia provizejo. Kiam mia edzo revenos hejmen, mi volonte ŝutos la sablon por ke via edzo revenu al vi. Do, helpu min, mi petas.” Ŝiaj vortoj iritis min kaj mi tamen rezignis persvadi ŝin. Kolertone mi respondis:

“Bone, mi faros. Sed mi ne bezonas la sablon por mi mem. Ni finu tion kaj rapide revenu hejmen kaj ĉion forgesu tuj.” Mi estis preskaŭ freneza pro la varmo kaj ŝia obstineco. Mia moralo cedis. Nia aŭto denove ekmoviĝis al la urbo, kie loĝis ja la virino, kiu ŝtelis la edzon de mia amikino.

La aŭto, kiu veturigas la kunkrimulojn, iris malrapide laŭ la mallarĝa vojo, trapasinte kelkajn urbetojn. En iu dormanta loĝkvartalo, kie la lumoj plejparte estingiĝis, ŝi haltigis la aŭton. Ni alvenis al la celloko. Mi eliris el la aŭto kaj ricevis de ŝi la sitelon de la sablo. Ŝi senvorte fingromontris al la domo ĉe la fino de la vojo. Mi kapjesis kaj ekmarŝis kun peza sitelo.

Benite! Ne estis gardhundo, kiu bojus kontraŭ mi, nek pordego riglita ĉe la ĝardeno de la domo. Mi povis facile eniri. Lumoj estis malŝaltitaj kaj sonis nenio. Plej kredeble, la loĝantoj jam endormiĝis. Mi ŝtele

eniris la ĝardenon kaj disŝutis la sablon el tiu peza sitelo. Mi koncentris mian atenton por egale disŝuti la blankan sablon en la tenebro de la novluna nokto, dezirante ke la edzo revenu al mia amikino. Mi plu klinis mian supran korpon kaj daŭrigis mian laboron. La peza sitelo iom post iom malpeziĝis kaj finfine fariĝis malplena. La streĉa laboro finiĝis antaŭ ol mia koro krevis. Sen retrorigardi, mi trotis al la aŭto, kie mia amikino senpacience atendis.

La aŭto tuj ekmoviĝis. Tra la malantaŭa fenestro mi vidis ke la ĝardeno pale lumetis. Nia aŭto silente forlasis la teritorion kvazaŭ ĝi nur preterpasis farinte nenion.

Nia aŭto revenis al la ĉefstrato. Nur en tiu momento ni trankviliĝis kaj ĝojis pri la sukceso de la tasko.

“Danke al vi, mia edzo baldaŭ revenos al mi. Mi tre ĝojas. Mi ŝatus repagi al vi la ŝuldon de la sablo per la sablo. En la vilaĝo, kie mia patrino naskiĝis, la sablo estis sekreta trezoro kundividita inter virinoj. La virinoj sekrete uzadis ĝin por la prospero de siaj familioj.” Ŝi aldonis: “Jen, mi sciigu al vi tion, kion mi ankoraŭ ne malkaŝis. Temas pri alia uzo de la mistera potenco de la sablo.” Ŝi fiksrigardis min. “Se vi uzas ĝin sub la plenluno, vi povas akiri la koron de iu ajn viro. Se vi vere malŝatus de mi ricevi ĝin, vi povas konservi ĝin por la estonteco de via filino. Se vi ne akceptas mian proponon, certe vi bedaŭros vian decidon, kaj eble via familio malprosperos pro tio.”

Karese rigardante la dormantan filineton, mi respondis, “Mi neniam bedaŭros la decidon, ĉar mi ĉiam revas eĉ malaperi el la mondo. Do, mi...” Antaŭ ol mi finis paroli, ŝi abrupte turnis la stirilon dekstren. La aŭto eniris la apudŝosean parkejon de fermita restoracio, kies pordego estis okulfrapa kiel amuzparko.

Ŝi ne bremsis la aŭton, sed komencis ĉirkaŭiri larĝan, cirklan florbedon en la parkejo. Antaŭ ni aperis multaj azenoj pentritaj sur la muro de la restoracio en la densa mallumo, ĉiufoje, kiam la lumoj de nia aŭto prilumis ĝin. S-ino K laŭtis: “Ne diru tian malĝojan aferon! Ni anstataŭigu memorojn forgesendajn per plezurdonaj. Fermu viajn okulojn kaj imagu, ke ni ludas sur la karuselo en la brita amuzparko. Jen, nia karuselo turniĝas dekstrume, tenante nian korflankon ekstere. Ni ĝuu la vivon, ne forgesu deziron bone vivi. Ni estu kuraĝaj. Vi bezonas

kuraĝon por vivi. Ni fortigu niajn korojn”, kaj ŝi ekzumis gajan valson: “Ruurururuu...”

Tio estis *La valso por glitkurantoj*. Mi imagis, ke mia filino kaj mi, geedzoj K, Akane kaj Masato, respektive duope rajdis la karuselon, kiu cirkulis moviĝante supren kaj malsupren. Ni ĉiuj tenis en la manoj firme la stangon. En la imago ni ĉiuj aspektis tre feliĉaj.

Tiam mi trovis min bonhumore ekzumanta la melodion kune kun ŝi. Ridetante unu al la alia, ni estis ĝuantaj la karuselludon sufiĉe longan tempon. Baldaŭ venis la tempo vekigi el sonĝo. La nia estis la sola aŭto en la vojo. Monopoligante la straton, ĝi trakuris plurajn superpasejojn kvazaŭ onda fervojo. Mi kelkfoje ĝojkriis pro la rapideco. Tra la fenestro eniris agrabla vento, kiu malvarmigis nin ekscititajn. Du aŭ tri horojn poste, finfine ni revenis al nia urbo. Vidiĝis nokta vido de nia konata kvartalo malproksime. De la pinto de la lasta valponto, ni vidis la urbon glimantan. Nia nokta veturado tiel finiĝis duonamare aŭ duondolĉe.

Post nelonge, al la familio K revenis la edzo. Kaj ili translokiĝis al malproksima urbo. Tiamaniere ni fremdiĝis.

Mi ne scias ĉu la magio de la sablo estas vera aŭ falsa. Kaj mi tamen neniam bedaŭros ĝin. Mia familio eble malprosperos kiel ŝi antaŭdiris. Sed ni devas akcepti ke tio estas rezulto de nia decido. La memoroj, kiuj reviviĝis post longa tempo, estis neniel malagrablaj. Male, mi dankis ŝin en mia koro, ĉar ŝi enŝovis belan memoron en la lastan parton de nia rilato.

Sopirante la foran tagon, mi rimarkis ion tre karan. Certe, ŝia karuselludo estis ia rito, kiun ŝi faris por mi senprepare kaj intuicie. Laŭ ŝia unika maniero, ŝi provis doni kuraĝon al mi, kiu obstine rifuzis la sablon. Fakte, mi estis timema kaj emis resti tia por ne rekte vidi miajn proprajn dezirojn en mia koro. Kredeble, mia koro fariĝis pli kuraĝa post ŝia speciala trejnado en la karuselo. Kaj de tiam multaj aferoj iras ĉe mi en ordo. Kial mi neniam rimarkis, nek rememoris ŝian apartan donacon al mi? La mondo estas plena de misteroj. Mi nevole havis rideton.

“Vi ŝajnas tre ĝoja. Diru al mi tion, kio tiel vin amuzas”, mia filino diris al mi.

“Mi rakontos tion al vi iam.”

“Kiam estas iam? Mi volas aŭdi tion nun.”

“Hmm... Kiam vi fariĝos patrino, mi nepre aŭdigos la misteraĵon.”

“Vi estas tre malica, panjo. Do, mi neniam diru al vi ion gravan”, ŝi paŭtis.

Ni, la du eбриulinoj, ridis kune, malstreĉe bablante bagatelaĵojn kiel kutime.

Dume mi ne povis subpremi nostalgian senton, kiu ŝprucis el mia koro. Mi lasis la dolĉamarajn memoraĵojn ekflui. La melodio, kiun sino K ĝoje zumis tiun nokton, eksonis en mia kapo. Mi prenis plian glason da vino por tosti al karaj rememoroj, kiujn mi havis kun la malnova amikino.

Остання перша подорож

Наталія Доляк

Україна

Ніколи раніше я не подорожував. Хіба зі спальні до кухні. Хтось може подумає, що моє життя нецікавей обмежене, але я посперечаюся, при цьому з гордістю назвавши себе інтровертом. Мені цікавіший світ мрій і фантазій. Лежиш собі вдома: тепло, під боком кохана людина, крізь сон слухаєш бубоніння телевізора, смачно пахне їжею, надворі щебечуть пташки чи муха б'ється в шибку. Ліниво почешеш собі ребра, підставиш лоб, аби тебе поцілували і медитуєш. Уявляєш, що ти, до прикладу, рятуєш людство, викликавши на себе вогонь. Помираєш з гідністю і твоє зображення чіпляють в музеях і... і... навіть не знаю, де ще. Всюди, де є люди. Або, що ти летиш у космос. А що такого? Навіть собак запускали в космос. Ось я визираю в ілюмінатор, роздивляючись таку маленьку землю, на яку з нечуваною швидкістю мчить астероїд з вогняним хвостом. Я здригаюся.

— Що таке? Що сталося, котику? — питає кохана й з турботою зазирає мені в очі.

Я потягаюся, посміхаюся і заплющуюся, мовляв, просто дурне наснилося. Кохана — це Христя. В Христі є Ліза, яка лиш недавно перейшла з карачкування на невпевнене ходіння й Максим, в якого повипадали передні зуби. Від дітей багато галасу й вовтузні. Ліза хоч і дрібна, а важить, як мішок. А Максим не проявляє до мене ніжності, як мати. Йому дай погасати чи пострибати, а я застарий для таких розваг.

Люблю згадувати ті благословенні часи, коли жодного разу не подорожував. Кохана з малими бувало від'їздила, але ненадовго. Тоді до мене приходив її знайомий, аби я не почувався самотнім. Я навіть не встигав заскучати до ладу, як вона поверталась.

Цієї зими все змінилось. Почав занюхувати щось кепське, коли кохана, похапцем збираючи рюкзак, поклала туди окрім дитячих, ще й мої особисті речі та їжу для мене. Я — на особливій дісті, не їм те, що інші. У мене засмоктало під ложечкою — значить цього разу і я вирушаю в подорож. Я нервував і почувався щасливим одночасно. Христя не відлипала від телефону й не спускала з рук малу.

Христин телефон відгукувався на завивання знадвору, або передував завиванню: сигнал примушував нас подорожувати. Бігли сходами донизу, тоді вулицею, тоді знову сходами. І усе це для того, аби згодом повернутись в квартиру. Дивні люди, їй-бо. В чім радість таких переміщень? Подумати лишень: кінцевий пункт — підвал. Я ненавиджу підвали. Там смердить мишами. Мене, літнього британця, це дратує й примушує чхати. Ганьбисько!

У нашій хаті неочікувано з'явилась переноска. У мене брови поповзли на лоба. Христина вдавано лагідно назвала цю в'язницю хаткою й підступно запхала мене всередину. Того, хто зроду-віку не знав неволі. Це такий сором, таке глумління. Але це ще не все. Вона винесла мене надвір уночі й при мінусовій температурі. Страшенний стрес! Вночі усі мають спати, а не вештатися вулицями з малими дітьми й домашніми улюбленцями. Дорогою я упевняв себе, що вона йде до подруги в гості. І оце вперше веде й мене. Судячи по запаху — в тієї подруги є кицька. Дурні люди, після клініки мене кицьки не цікавлять.

Над головою скажено засвистіло, напевно у людей знову свято. Бо саме на свята оце так свистить і бахає. Таке буває всередині зими. Люди поночі замість спати чокають склянками і п'ють несмачну воду: я пробував, аж у носі свербіло від бульбашок.

— Не бійся, котику, — муркає до мене Христина, зазираючи в переноску.

Чом би мені боятись? Я навіть не боявся, коли мене в юності носили до клініки, самі знаєте для чого.

— Ма, біжимо, біжимо, — як різаний шепеляво кричить Макс.

Менша верещить і хвицяє ногами, Христина труситься, як не знати що. Я також кричу, не від страху, а щоб заспокоїти своїх. Христина хапає усіх нас. Дивуюсь звідки в неї з'явилась додаткова пара рук. Бо і я в клітці, й діти опинились десь в повітрі — Христина несеться зі швидкістю, якій я позаздрив: подібну розвивав до того, як обріс жиром. Таких пришелепуватих любителів нічних перегонів набралось вдосталь.

— Ой! — це Христина загубила мене.

Я сильно вдарився в хвіст. Якби був без цієї дурної клітки, упав би м'якше — на чотири лапи. Хтось чужий підхопив мене й передав зарюмсаному Максусу. Уже й не пам'ятаю, як ми опинились в машині, де сказано смерділо псами. Авто їхало в повній темряві, якимись лісами й полями. Ми усі підскакували так, що аж Христина кілька разів вдарилась головою об стелю. То в одному, то в іншому вікні після гучного грому, спалахував вогонь. Непоганий квест, адреналіну мені всипало по самі вуха.

Я ніколи до цього не їздив в потягах і навіть не думав, що матиму такий досвід. Якщо одним словом, то мені подобається. Тут краще, ніж в чотириколісному транспорті. Приємно гойдає, розмірено перешіптуються пасажери, аби лиш ці люди не так щільно сиділи один біля одного, й один над одним. Я вже не в клітці, а на руках у Максима. Ніколи раніше так лагідно він мене не притискав до себе. Дивно б'ється його серце — занадто дрібно й часто. Христина хитає Лізу й відсторонено дивиться у вікно. Раз по раз цілує сина в маківку, від чого в нього ще дужче калатає серце.

Я завжди думав, що подорож — це все ж таки більш весела річ. А ці їдуть, як на страту. «Альо, громадо, де пісні? Де танці, де сміх і веселощі?» — питаю я, але ніхто мене не розуміє. І ще дивина — у нашому потязі самі жінки і діти. Жодного дорослого чоловіка. Окрім мене, звичайно. О, хтось взявся розповідати, а Максим аж перестав дихати — слухає. Наслухавшись, шепоче мені:

— Це війна, котку. Страшно, коли війна, котку. Але ти не бійся. Я тебе захищу.

Війна! Що таке війна? Я такого слова не чув. Віскас чув, вітрянка — чув, бо діти хворіли, вітер — чув, ветеринар — чув, навіть віртуальність — чув. А війна — не чув. Що воно таке? Напевно свято, під час якого люди бігцем біжать до потяга, зверху щось свистить і бахає — як гроза, а тоді люди довго, дуже довго їдуть і ніяк не можуть доїхати.

— Ми поїдемо далеко-далеко, щоб уберегтись. Ти не бійся, котку, ми тебе вбережемо, — продовжує шепотіти мені на вухо малий. Я тріпаю головою, бо не люблю, коли він плює мені у вуха.

Я не хочу далеко-далеко, я заскучав за домом. Деру лапою руку Христі — нехай вже кінчає цю подорож. Вдома ж набагато краще. Принаймні не так людно, як тут. Пахне приємніше. І вночі тихо, бо всі сплять, а не патякають. І вдома не таке наелектризоване повітря. У мене від цієї загальної нервозності, аж шерсть дибки.

— Ой! — це скрикнули хором мало не усі в потязі.

Бо той загальмував аж так, що я перелетів з рук мого хлопця до рук тітоньки, що сиділа навпроти. Люди, зойкнувши, затихли й притислись один до іншого. Христина обійняла усіх нас і дихала так, ніби вона довго-довго бігла. І враз почувся такий страшний сильний звук, якого я ще ніколи в житті не чув, і якого волів би не чути взагалі. Від цього звуку, що доносився згори, від неба, забрязкотіли вікна й затрусився вагон.

— Літак, — пояснив мені Максим.

Я бачив літак. І не один. З підвіконня свого помешкання. Він тоді не видавав таких децибелів. Так що не треба брехати. Це напевно астероїд. Ото добре було б... І я поринув у мрії про те, як дивлюсь на землю крізь ілюмінатор свого космічного корабля. До речі, переноска в цім конкретнім випадку — досить непогано виконує роль ракети. Мені не вдалось довго помріяти, бо потягом хитнуло і вся маса людей рвонула до виходу. Усі просили не штовхатись, але при цьому усі штовхались, нама-

гаючись першими вийти надвір. Христина тримала малу і свій наплічник, її син — притискав до грудей клітку.

Натовп сунув до приміщення, далі — сходами донизу, усе нижче й нижче... доки й тут не засмерділо мишами.

— Б'ють по коліях, — пояснював мені Максимко, вийнявши з клітки й гладячи так, ніби хотів здерти з мене шкіру.

Як це б'ють? Я знаю, що таке б'ють. Це коли я бува накладу поза лоток, або, чесно кажучи, на зло — спеціально на ліжко, то мені трохи й тріснуть по-під хвіст. А ще я бачив, як мала біла свого братика. Але усе то не призводило до подібних наслідків.

◇◇◇

Їдемо автобусом. Власне, мені тут більше подобається. В поязі усі були покотом, і на підлозі, і на сидіннях, і аж під стелею. Автобус культурніший вид транспорту. На одному сидінні не більше двох людей. Чи однієї людини і однієї тварини. Я не кажу про парнокопитних. Бо це було б взагалі неестетично: взяти корову чи козу. Їх люди лишили вдома, аби ті за хазяйством придивлялись. В подорожі беруть участь вибрані види — коти, собаки, пташки, черепахи, риби, змії, пауки, ящірки та щурі. Оце дарма: вважаю, що привілею подорожувати на рівні з людьми мають позбутись саме щурі. Вони й без людей нормально подорожують.

Ліза пхинькала, Христина трусилась, а Максим був до мене занадто ніжний, аж я злякався чи не на забій вони оце мене везуть. Може знову в якусь клініку? Де наді мною ставитимуть досліди... Скажу відверто, мені не подобається мандрувати. Дивлячись на людей — їм також це не надто до вподоби. Тоді навіщо? Навіщо вони це роблять? Я від народження підозрював, що світ поза квартирою — не затишний. І тепер я в цьому впевнився. Якби я міг бодай щось сказати, я б сказав: «Христино, люба моя людино, завертай назад. Ну, чому тобі не сиділось вдома? Чим тут краще, ніж там?»

— Я хочу додому, — о, нарешті Максимко, — висловив те, про що я думав. Молодець, хлопче! Зараз вона дослухається та вийде з цього автобуса, аби сісти на зворотній.

Замість відповіді Христина ковтає сльози. Та що із нею таке? Вона вдарилась? Її хтось обравив? Може діти?

— Нашого дому немає.

Що значить немає?

— В наш будинок потрапила ракета, — каже Христина й робиться така бліда, що хочеться її вкусити, аби перевірити чи є в ній ще кров.

Потрапила ракета? Ракета — це ж яка? Космічна? Та, яка з'являлась у моїх мріях, і з ілюмінатора якої я дивився на землю?

Замість того, щоб допитуватись далі, Максим і собі береться плакати. Оцього я не люблю. Він ще й мене зволожує солоним. А мені знай вилизуйся потім.

Я починаю скажено нявкати, бо хочу додому. Хочу на своє ліжко, і щоб телевізор бубонів, і муха — у вікно. Мені остогидла ця нескінченна дорога, це поколихування й зміна транспортів.

Ми знову в потязі. Тут холодно. Якась дурнувата собака зазирає до мене крізь ґрати, висолопивши язика. Дряпнути б її, але не хочу здіймати бучу та й навряд чи вдасться дряпнути до ладу крізь ґрати. Цей потяг більше часу стоїть ніж їде. Немічна бабця дивиться на мене й втирає хусточкою очі. Каже, що довелось залишити під обстрілами трьох моїх одноплемінників. Я не знаю, що таке обстріли, але думаю — це щось погане. Бо чого б цій бабусі так перейматись?

Нарешті, потяг остаточно спинився. Усі вийшли з вагонів, аби потрапити до черги. Христина про щось говорить з чоловіком, що сидить в будці. Його мова звучить по іншому. Чоловік прискіпливо дивиться на мене крізь скло. А тоді різко стукає по книжечці й віддає її Христині.

Ми розташувались у великій залі з височенною стелею. Залою при кожному кроці їде луна. Тут непогано, принаймні нарешті не хилитає. Христина з дітьми лягла на підлогу. Багато хто лежить на підлозі. Я чатую, аби ніхто не порушив сон моїх коханих. Вони здаються мертвими — не ворухнуться й не пере-

вертаються з боку на бік. Я довго придивляюся і прислухаюся до їхнього дихання. Ні, вони не померли, просто дуже міцно сплять. Я ї собі скрутився калачиком і заснув.

Прокинувся від чийогось сміху. Ми знову в автобусі. На зупинках мене годують іншим на смак кормом й гладять усі, кому не ліньки. Я терплю через силу. Мені хочеться погасати квартирою, подерти диван, отримати за це наганяй, заскочити на підвіконня й довго спостерігати за дурнуватими голубами на балконі, а тоді, скрутившись під боком Христини слухати бубоніння телевізора. Натомість я спостерігаю за деревами, які тікають від нас і слухаю розмірене серцебиття Максима. Тепер мої мрії не про космос чи звияжну смерть, а про закінчення подорожі.

Зі страхом подумав, що ця подорож не має кінця. І ще з більшим, що я забуваю, як пахне дім, як він звучить. Тепер я подорожуватиму вічно? Тішить одне: в мене на все про все — сім життів. Вірю, в якомусь з інших — повернусь додому.

*Dua premio
Sperta kategorio*

La unua vojaĝo estas la lasta

Natalia Dolak

Ukrainio

Mi neniam antaŭe vojaĝis. Krom eble inter la dormoĉambro kaj la kuirrejo. Iuj povus opini, ke mia vivo estas seninteresa kaj limigita, sed mi kontraŭdirus ilin, samtempe fiere nomante min introvertito. La mondo de revoj kaj fantazioj pli interesas min. Imagu, vi kuŝas hejme, estas varme, kun amato ĉe via flanko, vi aŭskultas murmuron de la televidilo dum via dormo. Bonodoras manĝaĵo. Birdoj pepas ekstere aŭ muŝo batas la fenestron. Vi pigre gratas viajn ripojn, prezentas vian frunton al kiso, kaj meditas. Vi imagas, ke vi ekzemple savas homaron altirante pafadon al vi mem. Vi mortas dignoplene kaj via bildo estas pendigita en muzeoj kaj... kaj... mi eĉ ne scias kie. Ĉie, kie estas homoj. Aŭ ke vi flugas al la kosmo. Kial ne? Eĉ hundojn oni sendis en la kosmon. Mi imagas, ke mi rigardas tra la lukso tian malgrandan teron, al kiu asteroido kun fajra vosto kuras kun nekredebla rapideco. Mi ektremas.

“Kio? Kio okazis, katido”, demandas la amato, rigardante zorgeme en miajn okulojn. Mi streĉiĝas, ridetas kaj fermas miajn okulojn, dirante, ke mi ĵus havis koŝmaron.

Mia amato nomiĝas Kristja. Kristja havas Lizan, kiu nur lastatempe transiris de rampado al malfirma marŝado, kaj Maksim’, kies antaŭaj dentoj elfalis. Estas multe da bruo kaj moviĝo pro la infanoj. Kvankam Liza estas malgranda, ŝi pezas kiel sako. Kaj Maksim’ montras malpli da korinklino al mi ol la patrino. Li preferas kuradi aŭ saltadi. Mi estas tro maljuna por tiaj amuzoj.

Mi ŝatas memori tiujn benitajn tempojn, kiam mi neniam vojaĝis. Amato kelkfoje foriris kun la infanoj, sed ne por longa tempo. Tiam, konato ŝia venis al mi, por ke mi ne sentu min sola. Mi eĉ ne havis tempon enui antaŭ ŝia reveno.

Ĉi-vintre, ĉio ŝanĝiĝis. Mi komencis flari ion malbonan, kiam mia amato, haste pakis dorsosakon, metis tien, krom la infanajn,

ankaŭ miajn personajn aĵojn kaj manĝaĵojn (mi havas specifan dieton, mi ne manĝas tion, kion aliaj manĝas). Mia koro ekdoloris: ĉi-foje mi vojaĝos. Mi estis samtempe nervoza kaj feliĉa. Kristja ne deiradis de la telefono kaj ne maltenis la bebon.

La telefono de Kristina respondis al la hurlado de ekstere, aŭ antaŭis la hurladon: la signalo devigis nin moviĝi. Ni kuris malsupren laŭ la ŝtuparo, poste laŭ la strato, poste denove malsupren laŭ ŝtuparo. Kaj ĉio ĉi por finfine reveni poste al la loĝejo. Strangaj homoj, vere. Kiun plezuron oni trovas kun tiaj delokiĝadoj? Des pli: la fina celo estas kelo. Mi malamas kelojn. Ili odoras je musoj. Mi estas maljuna brito, tio ĝenas kaj ternigas min. Kia honto!

En nia domo neatendite aperis portebla kaĝo. Miaj brovoj streĉiĝis sur mia frunto. Kristina ŝajnigis mildecon kaj nomis ĉi tiun malliberejon “dometo” kaj perfide enŝovis min enen. Mi, kiu neniam konis malliberecon en mia vivo. Estas honto, estas moko. Sed ne nur tio. Ŝi portis min eksteren dumnokte kaj ĉe subnula temperaturo. Terura streso! Ĉiuj dormu dumnokte, ne vagu sur la stratoj kun malgrandaj infanoj kaj dorlotbestoj. Survoje, mi konvinkis min, ke ŝi iras viziti amikinon. Kaj tiam estas la unua fojo, kiam ŝi ankaŭ min alkondukas. Juĝante laŭ la odoro, tiu amikino havas katinon. Ĉu tiuj stultaj homoj ne komprenis, ke mi ne plu interesiĝas pri katinoj de post la kliniko?

Super mia kapo aŭdeblas frenezaj sibloj. Verŝajne homoj denove havas feston. Ĉar ĝuste dum festoj aŭdeblas tiaj sibloj kaj eksplodoj. Tio kutime okazas meze de vintro. Nokte, anstataŭ normale dormi, homoj tintas per glasoj kaj trinkas malbongustan akvon. Mi provis kaj eĉ mia nazo jukis pro la vezikoj.

“Ne timu, kateto”, murmuris al mi Kristina, rigardante en la portkaĝon.

Kial mi timu? Mi eĉ ne timis, kiam oni portis min dum juneco al la kliniko (vi scias pri kio mi aludas).

“Panjo, ni hastu, hastu”, kriegas Makso lispe.

La plej juna ekkrias kaj svingas siajn piedojn, Kristina tremas kiel mortonta muso. Ankaŭ mi krias, ne pro timo, sed por trankviligi miajn amatojn. Kristina kaptas nin ĉiujn. Mi scivolas de

kie ŝi akiris kroman paron da manoj. Ĉar mi estis en la kaĝo kaj la infanoj ie en la aero, Kristina kuris rapide. Mi envias ŝian kapablon tiom rapidi, kiom mi antaŭ mia dikiĝo. Videblas multe da tiaj algluiĝantaj ŝatantoj de noktaj kurkonkursoj.

“Ho!”, Kristina ellasis min fali sur la plankon.

Mia vosto estas forte frapata. Se mi ne estus en ĉi tiu stulta kaĝo, mi falus pli milde, sur kvar piedoj. Fremdulo kaptis min kaj transdonis min al grumblema Maks'. Mi eĉ ne memoras, kiel ni finiĝis en tiu alia aŭto, kiu freneze odoras je hundoj. La aŭto veturas en kompleta mallumo, tra iaj arbaroj kaj kampoj. Ni ĉiuj saltadas tiom, ke Kristina plurfoje frapas sian kapon kontraŭ la plafono. Foje ekstere, je unu flanko aŭ la alia de la aŭto, post laŭta tondro, ekbruladas fajro. Ne malbona serĉludo. Adrenalino verŝiĝas ĝis miaj oreloj.

Mi neniam antaŭe veturis per trajno kaj neniam pensis, ke mi iam havus tian sperton. Unuvorte, mi ŝatas ĝin. Estas pli bone ĉi tie ol en kvarrada veturilo. Agrable svingiĝas. Modere flustras la pasaĝeroj. Se tiuj homoj ne sidus tiel dense unu apud la alia, kaj unu super la alia... Mi nun ne plu estas en kaĝo, sed en la brakoj de Maksimo. Li neniam antaŭe tenis min tiel milde. Lia koro batas strange, tro delikate kaj ofte. Kristina balancas Lizan kaj rigardas la fenestron indiferente. Ree kaj ree ŝi kisas sian filon sur la verto, kio igas lian koron eĉ pli forte bati.

Mi ĉiam pensis, ke vojaĝo estus tamen pli gaja afero. Sed tiuj vojaĝas, kvazaŭ al ekzekuto. “Saluton, popolo, kie estas la kantoj? Kie estas la dancoj, rido kaj ĝojo?”, demandas mi, sed neniu komprenas min. Kaj la plej stranga afero jenas: en nia trajno, nur virinoj kaj infanoj. Neniu plenkreska viro. Krom mi, kompreneble. Ho, iu komencas rakonti, kaj Maksimo eĉ ĉesas spiri, aŭskultante. Post aŭskultado, li flustras al mi:

“Tio estas milito, kateto. Timigas, kiam estas milito, kateto. Sed ne timu. Mi protektos vin.”

Milito! Kio estas milito? Mi neniam aŭdis tiun vorton. Vorton “amato” mi aŭdis, ĉar tion mi havas, “limon” mi aŭdis, eĉ “milime-

tron”. Sed “militon” mi ne aŭdis. Kio estas tio? Verŝajne estas festo, dum kiu homoj kuras al trajno, dum io siblas kaj eksplodas supre, kiel fulmotondro, kaj tiam homoj veturas longe, tre longe kaj ne sukcesas alveni.

“Ni iros for, por protekti nin. Ne timu, kateto, ni protektos vin”, daŭre flustras la knabo al mia orelo. Mi balancas la kapon, ĉar mi ne ŝatas, kiam li kraĉoŝprucas en miajn orelojn.

Mi ne volas iri for, malproksimen, mi sopiras al hejmo. Mi gratas la manon de Kristja per mia piedo, por ke ŝi finu nun tiun vojaĝon. Hejme estas multe pli bone ol ĉi tie. Almenaŭ ne tiom homplene. Pli agrable odoras. Kaj estas kviete nokte, ĉar ĉiuj dormas, ne babilas. Kaj la aero hejme ne estas tiom elektreca. Ĉi tiu ĝenerala nervozeco surpintigas miajn harojn.

“Ho!”, preskaŭ ĉiuj en la trajno kriegis unuvoĉe.

Ĉar ĝi bremsis tiel subite, ke mi flugis el la manoj de mia knabo al la manoj de onklino, kiu sidis kontraŭe. Ĝemintaj homoj eksilentas kaj brakumas unu la alian. Kristina ĉirkaŭbrakas ĉiujn nin kaj spiras kvazaŭ ŝi estas kurinta dum longa, longa tempo. Kaj subite aŭdiĝas iu terura forta sono, kiun mi neniam antaŭe aŭdis dum mia vivo, kaj kiun mi preferus neniam plu aŭdi. De tiu ĉi sono, venanta de supre, de la ĉielo, la fenestroj krakadas kaj la vagono tremas.

“Aviadilo”, klarigas al mi Maksim’.

Mi jam vidis aviadilon antaŭe. Kaj pli ol unu. De la fenestrobroreto de mia loĝejo. Sed tiuj ne produktis tiom da decibeloj. Do ne mensogu. Ĝi verŝajne estas asteroido, tio estus bone... Kaj mi plonĝas en revojn en kiuj mi rigardas la teron tra la luko de mia kosmoŝipo. Cetere, en ĉi tiu aparta kazo, la portkaĝo sufiĉe bone plenumas la rolon de raketo. Mi ne sukcesas longe revii, ĉar la trajno tremas kaj la tuta amaso da homoj ekkuras al la elirejo. Ĉiuj petas ne puŝi, kvankam samtempe puŝadas, provante eliri eksteren unue. Kristina tenas la bebon kaj sian dorsosakon. Ŝia filo tenas la kaĝon al sia brusto.

La homamaso moviĝas en ĉambron, poste malsupren laŭ la ŝtuparo, pli kaj pli malsupren... ĝis ankaŭ ĉi tie ekodoras je musoj.

“Oni batas la relojn”, klarigas Maksim’ al mi, elpreninte min el la kaĝo kaj karesante min kvazaŭ li volus senŝeligi mian haŭton.

Kial “batas”? Mi ja scias, kio estas batado. Tio estas ekzemple kiam mi kutimis feki ekster la pleto, aŭ, sincere, intence sur la liton. Tiam oni frapetis min sub mia vosto. Kaj mi ankaŭ vidis, kiel la knabineto batis sian fraton. Sed nenio el tio kondukis al similaj rezultoj.

Ni veturas per buso. Fakte, mi preferas esti ĉi tie. En la trajno, ĉiuj dormis amase, kaj sur planko, kaj sur sidlokoj, kaj eĉ sub la plafono. La buso estas pli sekura formo de transporto. Ne pli ol po du homoj sur sidloko. Aŭ unu homo kaj unu besto. Mi ne aludas pri tiuj bestoj kun hufoj, tio estus tute malestetike: transporti bovinon aŭ kapron. Homoj lasis ilin hejme por ke ili prizorgu la domon. En la vojaĝo partoprenas elektitaj specioj: katoj, hundoj, birdoj, testudoj, fiŝoj, serpentoj, araneoj, lacertoj kaj ratoj. Ĉi tio lasta estas miaopinie neutila: ratoj devus perdi tiun privilegion vojaĝi samnivele kiel ni. Ili tute scipovas bone vojaĝi sen homoj.

Liza ĝemas, Kristina tremas, kaj Maksim’ estas tro afabla kun mi. Tiom ke mi suspektas, ke ili konduku min al la buĉejo. Ĉu eble al ia kliniko denove? Kie oni eksperimentos per mi... Mi estu honesta, mi ne ŝatas vojaĝi. Rigardante homojn, ankaŭ ili ne tro ŝatas tion. Do kial? Kial ili faras tion? Mi pensis ekde mia naskiĝo, ke la mondo ekster la loĝejo estas ne komforta. Kaj nun mi certiĝis pri tio. Se mi povus almenaŭ ion diri, mi dirus: “Kristina, mia kara homo, revenu. Nu, kial vi ne restis hejme? Kio estas pli bona ĉi tie ol tie?”

“Mi volas reveni hejmen”, finfine plendis Maksim’, ĝuste samopinie kiel mi. Bone farite, knabo! Nun ŝi aŭskultos kaj eliros de ĉi tiu buso por eniri en la revenan.

Anstataŭ respondi, Kristina glutas larmojn. Kio do okazas kun ŝi? Ĉu ŝi frapiĝis? Ĉu iu ofendis ŝin? Eble la infanoj?

“Nia hejmo ne plu estas.”

Kion signifas “ne estas”?

“Raketo trafis nian domon”, diras Kristina, fariĝante tiel pala, ke tentas min mordi ŝin por kontroli ĉu restas al ŝi sango.

Ĉu raketo trafis? Kia raketo estas tio? Ĉu kosma? Ĉu tiu, kiu aperis en miaj sonĝoj, kaj de kiu mi rigardis la teron tra la luko?

Anstataŭ demandi plu, Maksim' esploras. Tion mi ne ŝatas. Li ankaŭ malsekigas min per salo. Kaj poste mi devas leki min.

Mi komencas freneze miaŭi ĉar mi volas hejmeniri. Mi volas iri al mia lito kaj aŭdi la televidilon murmuri, kaj vidi muŝon ĉe la fenestro. Mi neelteneble tediĝis de ĉi tiu senfina vojaĝo, ĉi tiu balanciĝo kaj ŝanĝado de veturiloj.

Ni estas denove en trajno. Estas malvarme ĉi tie. Iu stulta hundo kaŝrigardas min tra la kradoj, eligante sian langon. Mi volonte krifumus ĝin, sed mi ne volas kaŭzi tumulton kaj mi dubas ke mi kapablas krifumi ĝin tra la stangoj. Ĉi tiu trajno pasigas pli da tempo halte ol veturante. Senforta avino rigardas min kaj frotas siajn okulojn per naztuko. Ŝi diras, ke ŝi devis lasi post si sub pafado tri samspecianojn kiel mi. Mi ne scias kio estas pafado, sed mi pensas, ke ĝi estas io malbona. Kial tiu ĉi avino tiom zorgas?

La trajno finfine haltas. Ĉiuj eliras el la vagonoj por atendi vice. Kristina parolas pri io kun viro sidanta ĉe budo. La lingvo sonas nekutima. La viro zorge rigardas min tra la vitro. Kaj poste li akre frapas la libron kaj donas ĝin al Kristina.

Ni troviĝas en granda halo kun alta plafono. La halo eĥas je ĉies paŝoj. Ĉi tie ne estas malagrabla, almenaŭ ĝi fine ne ŝanceliĝas. Kristina kaj la infanoj kuŝiĝis sur la plankon. Multaj homoj kuŝas sur la planko. Mi gardas por ke neniu ĝenu la dormon de miaj amatoj. Ili ŝajnas mortintaj, ĉar ne moviĝas kaj ne turniĝas de flanko al flanko. Mi longe rigardas atente kaj aŭskultas ilian spiradon. Ne, ili ne mortis, ili nur tre profunde dormas. Mi ringiĝas kaj ekdormas.

Mi vekigiĝis pro ies ridado. Ni denove estas en buso. Ĉe bushaltejoj, mi estas nutrata per manĝaĵo nekutime gusta, kaj estas karesata de ĉiuj karesemuloj. Mi eltenas superregante min. Mi volas kuri tra la apartamento, disŝiri la sofon, esti punita pro tio, salti sur la fenestrobreton kaj longe observi la stultajn kolombojn sur la balkono, kaj poste, kunfaldiĝinte apud Kristina, aŭskulti la murmuradon de la televidilo. Anstataŭe, mi observas la arbojn forkurantajn de ni

kaj aŭskultas la konstantan korbato de Maksim'. Nun miaj revoj ne temas pri kosmo aŭ triumfa morto, sed pri finiĝo de la vojaĝo.

Mi pensis kun timo, ke eble ĉi tiu vojaĝo ne havos finon. Kaj eĉ pli: mi forgesas, kiel la domo odoras, kiel ĝi sonas. Ĉu mi vojaĝos eterne? Nur unu afero konsolas min: mi havas sep vivojn. Mi kredas, ke en iu el la aliaj vivoj, mi revenos hejmen.

Enhavtabelo

Paola Cereda vi dà il benvenuto!.....	5
Paola Cereda bonvenigas vin!.....	6
Nicola Ruggiero salutas vin!	7
François Bolduc invitas vin!.....	8
Krepuska ĉielo (<i>Robert Sieber</i>).....	9
Она шагнула в ночь (<i>Джулия Ливай</i>)	11
Ŝi paŝis en la nokton (<i>Julia Levi</i>).....	12
Пізня ніч (<i>Оксана Василькова</i>).....	13
Noktofino (<i>Oksana Vasilkova</i>).....	14
Mani (<i>Laura Esposito</i>)	15
Manoj (<i>Laura Esposito</i>)	17
Ne vekigu (<i>Aaron Fingtam</i>).....	19
Mille in una (<i>Monia Minnicci</i>).....	21
Mil en unu (<i>Monia Minnicci</i>)	23
Волнующий аромат (<i>Наталья Никулина</i>)	25
Ekscita aromo (<i>Natalia Nikulina</i>)	27
L'auto-stoppeuse (<i>Cyrille Chopelet</i>).....	29
La petveturantino (<i>Cyrille Chopelet</i>)	32
Nelle notti d'estate (<i>Paola Cereda</i>)	35
En la someraj noktoj (<i>Paola Cereda</i>)	38
Liaj sorĉistinoj (<i>Carlos Hernández Loarca</i>).....	41
Nepre nun (<i>Pascal Vilain</i>).....	44
<i>Kvara premio – Komencanta kategorio</i>	
Безликие (<i>Кира Синельник</i>).....	48
Senvizaĝuloj (<i>Kira Sinelnik</i>).....	51

Баварське забуття (<i>Юра Проскура</i>)	54
Bavara forgeso (<i>Iura Proskura</i>).....	57
L'ultimo viaggio di Cesare (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	60
La lasta vojaĝo de Cezaro (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	64
Ultima corsa (<i>Mauro Barbetti</i>).....	68
Lasta veturo (<i>Mauro Barbetti</i>).....	72
Somera promenado (<i>Tatjana Tereĥova</i>)	76
<i>Unua premio – Komencanta kategorio</i>	
Antaŭakuŝa nokto (<i>Paulo Sergio Viana</i>).....	80
Ratih, karega mia (<i>Ilia Sumilfia Dewi</i>).....	84
Kosmonaŭtoj (<i>James Bridge</i>).....	88
І настала ніч (<i>Вадим Грін</i>).....	92
Kaj venis la nokto (<i>Vadim Grin</i>).....	97
Madre e Figlia (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	102
Patrino kaj filino (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	107
Я в порядке (<i>Юлия Баутина</i>).....	112
Mi bonfartas (<i>Julia Bautina</i>).....	117
La milito komenciĝos morgaŭ (<i>Jorge Rafael Nogueras</i>).....	121
Rapimento (<i>Anna Bonardi</i>).....	126
Kidnapado (<i>Anna Bonardi</i>).....	131
Perseo (<i>Maria Rosaria Spanò</i>).....	136
Найди меня (<i>Валентина Барачевская</i>).....	141
Trovu min (<i>Valentina Barachevskaia</i>).....	146
Incontro in punta di luna (<i>Lori Marchesin</i>).....	151
Renkonto ĉe la pinto de la luno (<i>Lori Marchesin</i>).....	157
Stelle (<i>Ugo Filippo Cavallo</i>).....	163
Steloj (<i>Ugo Filippo Cavallo</i>).....	170
В погоне за мечтой (<i>Анастасия Пушкарева</i>).....	176
Ĉasante revon (<i>Anastasia Pushkareva</i>).....	182

Полуночники (Александр Димидов)	188
<i>Третья премия – Категория опытных писателей</i>	
Noktemuloj (Aleksandr Dimidov).....	194
<i>Tria premio – Sperta kategorio</i>	
In cerca di pace (Carlo Simonelli).....	199
Serĉante pacon (Carlo Simonelli).....	205
Autostrade senz'alba (Davide Bacchilega)	211
Aŭtovojoj sen tagiĝo (Davide Bacchilega)	218
El la nigro (Sten Johansson)	225
Найти дорогу (Ксения Кормыш)	232
<i>Вторая премия – Категория начинающих</i>	
Trovi la vojon (Ksenia Kormysh)	239
<i>Dua premio – Komencanta kategorio</i>	
La babaŝa preĝkolĉeno (Jorge Rafael Nogueras)	246
<i>Unua premio – Sperta kategorio</i>	
Viaggio al termine della notte (Luigi Guicciardi).....	252
<i>Quarto premio – Categoria esperti</i>	
Vojaĝo ĉe la noktofino (Luigi Guicciardi).....	258
<i>Kvara premio – Sperta kategorio</i>	
Цветы для папы (Евгений Зиберт)	264
<i>Третья премия – Категория начинающих</i>	
Floroj por paĉjo (Eugenij Zibert)	272
<i>Tria premio – Komencanta kategorio</i>	
Malnova amikino (Akiko Ĵin)	280
Остання перша подорож (Наталія Доляк)	287
<i>Друга премія – Категорія визнаного письменника</i>	
La unua vojaĝo estas la lasta (Natalia Dolak)	294
<i>Dua premio – Sperta kategorio</i>	

Noveloj en Esperanto

Krepuska ĉielo (<i>Robert Sieber</i>).....	9
Ŝi paŝis en la nokton (<i>Julia Levi</i>).....	12
Noktofino (<i>Oksana Vasilkova</i>).....	14
Manoj (<i>Laura Esposito</i>).....	17
Ne vekigu (<i>Aaron Fingtam</i>).....	19
Mil en unu (<i>Monia Minnucci</i>).....	23
Ekscita aromo (<i>Natalia Nikulina</i>).....	27
La petveturantino (<i>Cyrille Chopelet</i>).....	32
En la someraj noktoj (<i>Paola Cereda</i>).....	38
Liaj sorĉistinoj (<i>Carlos Hernández Loarca</i>).....	41
Nepre nun (<i>Pascal Vilain</i>).....	44
<i>Kvara premio – Komencanta kategorio</i>	
Senvizaĝuloj (<i>Kira Sinelnik</i>).....	51
Bavara forgeso (<i>Iura Proskura</i>).....	57
La lasta vojaĝo de Cezaro (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	64
Lasta veturo (<i>Mauro Barbetti</i>).....	72
Somera promenado (<i>Tatjana Tereĥova</i>).....	76
<i>Unua premio – Komencanta kategorio</i>	
Antaŭakuŝa nokto (<i>Paulo Sergio Viana</i>).....	80
Ratih, karega mia (<i>Ilia Sumilfia Dewi</i>).....	84
Kosmonaŭtoj (<i>James Bridge</i>).....	88
Kaj venis la nokto (<i>Vadim Grin</i>).....	97
Patrino kaj filino (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	107
Mi bonfartas (<i>Julia Bautina</i>).....	117
La milito komenciĝos morgaŭ (<i>Jorge Rafael Noguerras</i>).....	121
Kidnapado (<i>Anna Bonardi</i>).....	131
Perseo (<i>Maria Rosaria Spanò</i>).....	136
Trovi min (<i>Valentina Barachevskaia</i>).....	146
Renkonto ĉe la pinto de la luno (<i>Lori Marchesin</i>).....	157
Steloj (<i>Ugo Filippo Cavallo</i>).....	170

Ĉasante revon (<i>Anastasia Pushkareva</i>)	182
Noktemuloj (<i>Aleksandr Dimidov</i>)	194
<i>Tria premio – Sperta kategorio</i>	
Serĉante pacon (<i>Carlo Simonelli</i>).....	205
Aŭtovojoj sen tagiĝo (<i>Davide Bacchilega</i>)	218
El la nigro (<i>Sten Johansson</i>)	225
Trovi la vojon (<i>Ksenia Kormysh</i>)	239
<i>Dua premio – Komencanta kategorio</i>	
La babaŝa preĝkolĉeno (<i>Jorge Rafael Nogueras</i>)	246
<i>Unua premio – Sperta kategorio</i>	
Vojaĝo ĉe la noktofino (<i>Luigi Guicciardi</i>)	258
<i>Kvara premio – Sperta kategorio</i>	
Floroj por paĉjo (<i>Evgenij Zibert</i>)	272
<i>Tria premio – Komencanta kategorio</i>	
Malnova amikino (<i>Akiko ŝin</i>)	280
La unua vojaĝo estas la lasta (<i>Natalia Dolak</i>)	294
<i>Dua premio – Sperta kategorio</i>	

Noveloj en la itala Novelle in italiano

Mani (<i>Laura Esposito</i>).....	14
Mille in una (<i>Monia Minnucci</i>).....	20
Nelle notti d'estate (<i>Paola Cereda</i>).....	34
L'ultimo viaggio di Cesare (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	59
Ultima corsa (<i>Mauro Barbetti</i>).....	67
Madre e Figlia (<i>Emanuela Pellicciaro</i>).....	101
Rapimento (<i>Anna Bonardi</i>).....	126
Incontro in punta di luna (<i>Lori Marchesin</i>).....	151
Stelle (<i>Ugo Filippo Cavallo</i>).....	162
In cerca di pace (<i>Carlo Simonelli</i>).....	197
Autostrade senz'alba (<i>Davide Bacchilega</i>).....	209
Viaggio al termine della notte (<i>Luigi Guicciardi</i>).....	250
<i>Quarto premio – Categoria esperti</i>	

Novelo en la franca Nouvelle en français

L'auto-stoppeuse (<i>Cyrille Chopelet</i>).....	28
---	----

Noveloj en la rusa Рассказы на русском языке

Она шагнула в ночь (<i>Джулия Ливай</i>).....	10
Волнующий аромат (<i>Наталья Никулина</i>).....	24
Безликие (<i>Кира Синельник</i>).....	47
Я в порядке (<i>Юлия Баутина</i>).....	111
Найди меня (<i>Валентина Барачевская</i>).....	141
В погоне за мечтой (<i>Анастасия Пушкарева</i>).....	174
Полуночники (<i>Александр Димидов</i>).....	186
<i>Третья премия – Категория опытных писателей</i>	
Найти дорогу (<i>Ксения Кормыш</i>).....	230
<i>Вторая премия – Категория начинающих</i>	
Цветы для папы (<i>Евгений Зиберт</i>).....	262
<i>Третья премия – Категория начинающих</i>	

Noveloj en la ukraina Оповідання українською мовою

Пізня ніч (<i>Оксана Василькова</i>).....	12
Баварське забуття (<i>Юра Проскура</i>).....	53
І настала ніч (<i>Вадим Грін</i>).....	91
Остання перша подорож (<i>Наталія Доляк</i>).....	285
<i>Друга премія – Категорія визнаного письменника</i>	

Novaĵoj

Vizitu la retejon de Bobelarto por ekscii pri novaj eldonoj de la konkurso kaj por malkovri la plej moĵosan komunumon de literaturamantoj:

<https://bobelarto.ink/>

Aŭ skanu la sekvan rapidrespondan kodon:



Prezidanto de la dua eldono de la
Interkultura Novelo-Konkurso

Bruĉjo Kasini, Italio

Honora prezidanto de la dua eldono de la
Interkultura Novelo-Konkurso

Paola Cereda, Italio

Sekretario de la dua eldono de la
Interkultura Novelo-Konkurso


Stela Besenyei-Merger, Hungario

Ĵurio de la dua eldono de la
Interkultura Novelo-Konkurso

István Ertl, Luksemburgo
Heidi Goes, Belgio
Ahmad Mamdoohi, Irano
Paŭlo Mojajevo, Ukrainio
Chelsea Rae Moses, Usono
James Rezende Piton, Brazilo
Anna Striganova, Rusio

El la eldonaĵoj de KAVA-PECH

Verkitaj de la eldonisto



Petr Chrdle: Sen laco por paco – Vivo kaj verko de Bertha von Suttner

Atesto pri la vivo kaj verko de la virino, kiu famiĝis kiel verkistino (la plej fama estas ŝia kontraŭmilita amromano *For la batalilojn!*), porpaca aganto en internacia skalo, sed ankaŭ batalantino kontraŭ antisemitismo kaj por la virinaj rajtoj. Kiel la unua virino ŝi ricevis en la jaro 1905 la Nobel-premion pri paco. Solide bindita.

159 paĝoj


15,90 EUR

Petr Chrdle: Ĉinio, Koreio, Japanio Landoj similaj sed diferencaj

La aŭtoro priskribas siajn travivaĵojn kaj impresojn el la tri landoj, kie li havis bonŝancon (precipe en la Suda Koreio kaj Japanio) konatiĝi kun la vivo kiel en familioj, tiel ankaŭ en universitatoj kaj religiaj centroj. Kun multaj koloraj fotoj. Solide bindita.

247 paĝoj

24 EUR



Petr Chrdle: Mia vivo kun Esperanto

La aŭtoro priskribas sian Esperantan karieron kaj kiel funkciulo de pluraj Esperanto-organizaĵoj (UEA, ĈEA, IFEF, AIS) kaj kiel utiliganto de Esperanto profesie en sia Kongresa kaj Kleriga Agentejo KAVA-PECH kaj samnoma eldono. Li montras kaj seriozajn kaj gajajn momentojn de sia Esperanto-vivo, ofte lernigajn.

251 paĝoj

15 EUR





El la ceteraj eldonaĵoj

François Bolduc (red.): Amo, tuso kaj forpaso Homoj kaj kovimo

Finalistaj noveloj de la Interkultura Novelaro-Konkurso. La aŭtoroj devenas el 23 landoj de 5 kontinentoj. Homoj kaj, kun, kontraŭ la mortiga kovimo. Ĉu ni reagis same al la viruso? La respondo estas en ĉi tiu novelaro.

114 paĝoj

9.90 EUR



Martin Stuppnig: Home en senhomeco

Rememoroj de la aŭtoro pri la milito, kiam li estis devigita batali por la venko de la Tria Imperio. La unua parto priskribas liajn travivaĵojn en la kruela batalo ĉe Monte Cassino, la dua liajn aventurojn en angla militkaptitejo en Afriko. El la germana tradukis Jozefo Horvath. Aldonaĵojn pri la bataloj ĉe Monte Cassino, militkaptitejoj en Afriko kaj pri la aŭtoro verkis Petro Chrdle. Tria solide bindita eldono.

205 paĝoj


17,70 EUR

Leif Nordenstorm: Arne, la ĉefido

Aventura historia rakonto el la vikinga epoko. La avo de Arne estas vikingo. En la vilaĝo aperas du fremduloj. Kiu estas la viroj? Ĉu povas libera homo kaj sklavo ligi amikecon? La facile legebla libro taŭgas por junuloj, sed ankaŭ por ĉiuaguloj. Dua solide bindita eldono.

119 paĝoj

15 EUR



Kompletan oferton de KAVA-PECH vidu ĉe <https://kava-pech.cz/esperanto>

LA LASTA VOJAĜO DE CEZARO KAJ ALIAJ NOKTAJ AVENTUROJ

Ĉefredaktoro: François Bolduc

Redaktoro: Jaes Estrada

Provlegis: Stela Besenyei-Merger, Ileana Tetereva, LinguaForce

Tradukis: ĉiujn tekstojn LinguaForce, krom Cyrille Chopelet
(La petveturantino), Manuela Ronco (*Paola Cereda bonvenigas vin;
En la someraj noktoj*) kaj Anna Striganova (*Senvizaĝuloj*)

Ilustraĵoj: Bruno Rouyère

Enpaĝigo: Luděk Nežil

Eldonis KAVA-PECH kiel sian 254-an eldonaĵon, la 105-an en
Esperanto

Unua eldono, 2023